MARŜO EN LA REGNON DE L' MAHAGONO

B.Traven

Milita marŝo

Mahagonciklo romano 3

Aŭtoro B.Traven

Titolo Marŝo en la regnon de l' mahagono

Tradukis Dorothea & Hans-Georg Kaiser (Donjo & Cezar)
laŭ la unua eldono
de la romano „Marsch ins Reich der Caoba“ de librogildo Gutenberg en Zuriko, Vieno kaj Prago el la jaro 1933

Lingve kontrolis Vladimir Türk

Aranĝis Frank Vohla
Hans-Georg Kaiser

Finredakto je la 14-a de oktobro
en la jaro 2016

Ĉapitro 01

01

En Hucutsin komencis alveni la karavanoj de la siriaj komercistoj. Tiu okazaĵo instigis la loĝantojn de la loko refoje vekiĝi. Dum la tuta jaro ili ne havis okazon memori, ke ili vivas, ke ilia loko troviĝas ie surtere, kaj ke la nomo de ilia urbeto estas skribata tiel diverse, ke ĉiu unuopa loĝanto rajtas sekvi al sia propra sento.

La loka administrejo skribis la nomon de la urbeto alimaniere ol la poŝtaj instancoj stampis la poŝtmarkojn. Jam tio per si mem estis jam sufiĉe da kaŭzo por tio, ke la poŝtestro, federacia oficisto, ne kapablis interkonsentiĝi kun la urbestro troviĝanta sub la ordonoj de la ŝtata guberniestro pri demando de personaj aŭ de ĝeneralaj vidpunktoj. Sed la urbestro tamen vivtenis sufiĉe da amikeco kun la poŝtestro por ĉeokaze povi preni al si la permeson glitigi tra siaj fingroj la enirantajn kaj forirantajn leterojn kaj poste de tempo al tempo ridetante peti la poŝtestron reteni tiun aŭ tiun ĉi leteron dum certa tempo kaj transdoni ĝin al la ricevonto kun prokrasto aŭ por lasi foriri alian leteron ne per la sekva, sed nur per la

postsekva poŝtsendaĵo.

La poŝtaĵoj venis nur unufoje dum semajno, kaj nur unufoje dum semajno la poŝtaĵoj foriris. Oni transportis ilin sur la dorso de indiĝena portisto dum kvar tagoj ĝis la plej proksima pli granda kolekta loko. De tiu kolektloko oni transportis la poŝtaĵojn tiam sur muloj ĝis ili alvenis post pliaj sep aŭ ok tagaj vojaĝoj la fervojstacion.

Tiu longa vojaĝo de poŝtaĵoj, kiu sufiĉe ofte estis duoble aŭ trioble plilongigata per gravaj tropikaj pluvelverŝiĝoj aŭ per informoj pri vagantaj banditaroj, faris tion simpla por la poŝtestro ĉeokaze montriĝi iom pli komplezema al la urbestro.

La urbestro estis ja ne nur urbestro. Li estis krome ankaŭ la edzo de edzino, kiu havas en la loko bone ekipitan vendejon. Kaj li estis la bofrato de viro, kiu kunaĉetas krudan tabakon ĉe la indiĝenaj kamparanoj, kiu forsendas tiun tabakon kun granda gajno al la pli grandaj lokoj. Sed ĉar ankaŭ aliaj homoj en la loko havis vendejon kaj tabakkomercejon, tiel estis sufiĉe avantaĝe por la urbestro scii, kun kiu tiu aŭ tiu el la negocistoj de la loko havas komercajn rilatojn al la pli grandaj foirplacoj.

La sirianoj estis konataj sub kiuj ajn nomoj en la lando. Ankaŭ en tiu kazo tute decidis la persona sento de la homoj pri tio, kiel ili nomis tiujn komercistojn. Jen oni nomis ilin libananoj, jen turkoj, jen araboj, egiptoj, profetoj, mohamedanoj, kvankam ili plej ofte laŭ propra imago estis katolikoj. Jen levantianoj kaj ĉeokaze dezertaj loĝantoj. La homoj, kiuj devis aĉeti ĉe la siriaj etkomercistoj, kaj tio estis la plimulto de la inoseksa loĝantaro en la foraj lokoj, kien venis preskaŭ nur araboj, nomis la komercistojn mensogemuloj, trompistoj, monfalsistoj, rabistoj, friponoj, ekspluatistoj de meksikaj kudristinoj kaj tekstilindustriaj laboristinoj, murdistoj, infanŝtelistoj, kaj elektotoj por la artikolo 33. La artikolo 33 de la meksika konstitucio okupiĝas pri la deportado de ĉiuj nedezirataj personoj.

La sirianoj, kvankam ilia kristaneco estis multoble pli nedifinita ol tiu de la meksikanoj, tamen konis ĉiujn tagojn de l' sanktuloj en Meksiko multe pli bone kaj pli ĝuste ol la meksikanoj mem. Tio signifas multon. Ja kvankam kelkaj milionoj el la meksikanoj ne kapablas legi kaj skribi, ili tamen ĉiuj scias la sanktulajn tagojn

parkere. Kaj ju pli maledukitaj ili estas en ĉiuj kromaj aferoj de la vivo, des pli edukitaj ili estas en ĉiuj tiuj detaloj, kiuj koncernas eklezian sanktulon persone. La meksikanoj havas per la eklezio en sin martelitan intereson pri la vivosortoj de la sanktuloj. Kontraŭe la sirianoj, pli interesiĝantaj pri praktikaj kaj ĉimondaj aferoj, ili havas nur pure ekonomian kaj materian intereson pri la naskiĝ- kaj ekzekuttagoj kaj torturaj detaloj de la sanktuloj. La sirianoj, kiuj enmigras en Meksiko, povraj kiel grilo en frostigita plugosulko, posedas post dekkvin jaroj grandan magazenon aŭ fabrikon, kiuj ne aĉeteblas nur per kvincent mil dolaroj.

Se ili komercas malgrande kaj tre malgrande, la araboj vagadas al la sanktulaj festoj de la federaciaj ŝtatoj de Meksiko. Ili scias pli bone ol *señor* arkiepiskopo, kiam ĉiu sanktulo havas sian naskiĝtagon, kie tiu naskiĝtago estas festata kaj kiujn precipajn varojn postulas la loĝantaro en la diversaj lokoj, kie la naskiĝtagoj solene estas festataj per granda *feria*. Ili konas la gradon de la instruiteco de la loĝantaro de ĉiu loko en Meksiko pli fidinde ol la meksika ministerio por publika instruado kaj ili scias precize, ĉu la loĝantaro en certa loko povas diferencigi silkon de katuno, kiu estas ŝlifita ĝis glateco, ĉu perlojn de

polurita parafino, ĉu vitron de diamantoj kaj ĉu pluvombrelojn de sabloskribriloj. Ili scias, kiujn sanktulajn bildojn ili devas amase kunporti kaj ili scias, kie estas eble vendi Sanktan Jozefon kiel Sanktan Antonion kaj kie tio ne eblas, ĉar ili tie male estus tradraŝataj, kiam ili provus ŝakri bunte kriantan bildon de Sankta Virgulino de Los Remedios kiel tiun de Sankta Virgulino de Guadalupe. En ĉiuj tiuj kazoj, se bonaj meksikanoj estas samtempe bonaj komercistoj, ili lernis tion de la siri-libananoj. Ĉar ja la meksikaj etkomercistoj laboras kokson je kokso kun la arabaj komercistoj sur la foirplacoj de la sanktulaj festoj, restas neniu alia elirvojo al la meksikaj katunkomercistoj krom kopii ĉiujn trukojn kaj artifikaĵojn de la sirianoj, por ke ili ne malsatmortu en la propra lando.

Se tiuj arabaj komercistoj post pluraj jaroj da vagado sur la sanktulaj festoj fariĝas pli oldaj kaj ne sufiĉe plu povas elteni la streĉiĝojn de tiaj vojaĝoj, ili intertempe jam tiom bonstatas, ke ili povas entrepreni grosieran komercon kaj starigas fabrikojn, kie ili pagas dudek centavojn da tagsalajro al la meksikaj laboristinoj por la kudrado de ĉemizoj kaj kalsonoj kaj por la produktado de ĉiaj tiaj fikomercaĵoj, kiajn la siriaj etkomercistoj podetale vendas

sur la foirplacoj. Tiuj etkomercistoj devas vendi tion, kion iliaj riĉaj samlandanoj transdonas al ili por vendado, ĉar ili ricevas nur de tiuj krediton. Kaj ili atendas de tiam tiun tagon, kiam ankaŭ ili estos tiom riĉaj, por fari tion kun la sekvantaj etkomercistoj de sia speco same tiel, kiel oni faris tion kun ili.

Rimarkoj
feria = foiro, jarfoiro
señor = sinjoro

La siri-libanaj komercistoj estis la unuaj inter la komercistoj, kiuj alvenis en Hucutsin. Ili estis la plej fervoraj je la intertraktadoj kun la loka administrado kaj ili sciis, kiom ili devis pagi al tiu kaj tiu el la publikaj instancoj postdorse, por ricevi precipajn privilegiojn kaj la plej bonajn foirplacajn lokojn por standoj.

Dum la sekvaj tagoj alvenis tiam la aliaj etkomercistoj: meksikanoj, hispanoj, gvatemalianoj kaj kubanoj.

Ĉiu speco de etkomerco aŭ de metio havis sian specialan lokon sur la placo.

Jen ludistaj benkoj, ĵetkubistaj budoj, tabulludoj, sukeraĵistaj komercistoj, vestoŝtofaj vendistoj, ornamaĵkomercistoj, etaj kuirejoj, glavo- kaj fajroglutistoj, sorĉkartaj vendistoj, aŭguristoj, komercistoj pri sanktaj kandeloj, amuletoj, sanktulobildoj kaj oferaj ornamaĵoj, silkokomercistoj, katunkomercistoj, komercistoj pri potoj, selfaristoj, ŝnuregaj komercistoj, plektistoj pri petatoj kaj pri ĉapeloj, komercistoj pri brodofadenoj, komercistinoj pri bunte broditaj ĉemizoj

kaj jaketoj, papagokomercistoj, lacertovendistoj, komercistoj pri jaguaraj kaj pumaj feloj, vendistoj pri municio, fusilforĝistoj, horloĝistoj, tranĉilakrigistoj, koridokantistoj, aliaj muzikistoj, jarfoiristoj prezentantaj ŝtelitajn infanojn kiel artistojn kaj akrobatojn devigantaj ilin elartikigi kaj tro fleksi la membrojn. Nur cirkojn, karuselojn, svingoboatojn kaj similajn grandaĵojn oni ne prezentis. Tiuj grandaj entreprenoj ne transporteblis per muloj kaj azenoj. Kaj ĉio ĉi, kio ne transporteblis sur la dorsoj de ŝarĝbestoj aŭ de indiĝenoj, ne havigeblis tie.

La foirhomoj sur la foirplaco konstruis por si urbeton. Unuopaj komercaj grupoj kiel ekzemple la vestoŝtofaj komercistoj, la katunkomercistoj kaj la silkokomercistoj havis tutajn stratojn por si mem.

La diversaj standoj por ĉiu unuopa komercisto estis lotumataj. Ĉe la lotumado ĉiuj komercistoj devis ĉeesti persone por malhelpi estontecajn kverelojn. Tiaj kvereloj de la komercistoj estis tre seriozaj. Tra la aero flugadis sufiĉe da revolverkugloj, sed kelkaj el ili flugis al tiu aŭ tiu rekte tra la subĉemizo internen. Malagrable estis, se senhejmaĉaj revolverkugloj jetiĝis sub la antaŭan subĉemizon de iu, kiu tute ne havis rilaton al la kvereloj

de la komercistoj, sed ĵus tute hazarde preteriris, kiam la foiristoj alvokis Dion pro juĝo.

Tiuj komercistoj, kiuj, plenaj de komprenemo, interkonsentiĝis antaŭe kun la urbestro pri la privataj zorgoj de la foiraj administrantoj, ricevis siajn lotonumerojn kun garantiata gajno per ŝovado en poŝon; ili devis nur voki 'Presente! - Ĉeestas'!, kiam ilia numero estis vokata, ke ili ĉeestas kaj ili devis diri sian nomon. Kiu ne konis la alirvojojn al la privataj zorgoj de la urbestro aŭ ne sciis bone kaj lerte lubriki tiujn pordojn, devis kontentiĝi pri la lokoj, kiuj postrestis aŭ kiuj estis asignitaj al ili de Sankta Virgulino dum la lotumado. Estis sufiĉe da komercistoj, sed ne estis la arabaj, kiuj, anstataŭ viziti la urbestron, preferis iri en katedralon, por oferi al Sankta Virgulino ses kandelojn kaj por petegi ŝin, ke ŝi donu al ili bonan standon en la lotumado kaj plibeligu tiun standon per ĉiuj surteraj benoj kaj precipe per bonega vendo dum la sanktulofesto.

Rimarkoj
koridokantisto = migrantaj popolkantistoj en Meksiko
petato = mato

Kompreneble, la perlaboro de mono estis tute ne tiel facila, kiel tion imagas iu, kiu ne konas la landon kaj ties specialajn rilatojn. Sub la ĉielo, sub kiu vivas la homaro, oni ne donacas ion al iu, kaj al neniu oni faciligas tro la vivon.

La arabaj komercistoj atingis bonstaton kaj riĉon. Tio estas ĝusta. Sed tio estis nur justa rekompenco por ilia streĉa laboro. Ĉiu, kiu atingas bonstaton, ĉu pro streĉa laboro, ĉu pro ŝtelado, estas enviata de tiuj, kiuj postrestas.

La meksikanoj havis en sia propra lando same tiom da liberoj kaj rajtoj kiel la sirianoj. Sed la meksikanoj, almenaŭ la granda plimulto de la meksikanoj, ne povas elteni tion, ke ili havas monon en monujo aŭ en kesto. Se meksikano enspezas kvin pesojn dum tago, jen li penas elspezi sep pesojn. Li ŝategas festi festojn kaj festojn aranĝi. Ju pli da tiuj estas des pli bone. Li festas la tagon de sia protekta patrono per pompo, kiu kostas al li kvaronon de lia jarenspezo. Krome kompreneble estas festata la tago de la protekta patrono de lia edzino, krome

tiu de lia patrino, tiu de lia patro,tiu de la gefiloj, tiu de liaj geonkloj, de liaj nevoj, de liaj gefratoj, de liaj gebofratoj, de liaj gekuzoj, kaj fine li ankoraŭ festas ĉiujn nomotagojn de liaj amikoj. Sed dum tio li ne rajtas forgesi la oficialajn ekleziajn festojn, kiuj ampleksas ĉirkaŭ ducent tagojn en la jaro. Aldoniĝas ankoraŭ la kvindek patriotaj festotagoj. Finfine li devas festi krome la *Semana Santa,* la indulgencan semajnon de Pasko, dum kiu li faras sian ĉiujaran forpermesan vojaĝon. Estas tute ne troigite diri, ke meksikano, kiu volas plaĉi al sia familio, al sia patrolando, al siaj amikoj kaj al la katolika eklezio, bezonas trimil sepcent tagojn, por aranĝi ĉiujn ĉi festojn kaj festi ilin interne de jaro kiel bona familia patro, kiel patrioto kaj kiel pia katoliko laŭ sia devo. Tial meksikano ne havas monon, neniam havigas al si monon, kaj se li efektive ĉirkaŭvoje atingas bonstaton, li aranĝas grandan bankedon por ĉiuj amikoj por festi tiun okazaĵon – kaj sekvatage li havas tiom da ŝuldoj, ke li bezonas kvin jarojn por ree atingi la staton, kiun li havis antaŭ la bankedo.

La araboj en Meksiko ne faras tion. Tial la meksikaj inoj devas labori por la arabaj fabrikistoj por tagsalajro da dudek aŭ dudek kvin centavoj. Ili kompreneble retenas la

rajton povi protesti kontraŭ la impertinenta ekspluato fare de la libananoj. Rajto devas resti ja eĉ al la ekspluatataj proletoj.

Rilate la laboron la meksikaj komercistoj neniel pli malkapablas ol la arabaj komercistoj. Ili estis same tiel ŝarĝeblaj eltenemaj kiel tiuj, plej ofte pli inteligentaj ol la sirianoj kaj ili same tiom malmulte kiom la araboj timis kiajn ajn grandajn suferojn kaj penojn. Tiu, kiu volas veni al *Candelaria*-festo al Hucutsin por fari tie negocojn, devas esti ŝarĝebla, persista kaj inteligenta.

Rimarkoj
candelaria = Puriĝo de Sankta Virgulino
Semana Santa = La indulgenca semajno de Pasko

La loko estis iom pli ol kvarcent tridek kilometrojn malproksima de la plej proksima fervojstacio. En la tute seka tempo, jen la tempo de la fino de februaro ĝis la komenco de majo, tiu ducent sesdek kilometrojn longa distanco estis veturebla per stabila kaj rezistema aŭtomobilo. Dum la duone seka tempo, jen la tempo de fino de decembro ĝis la fino de junio, oni povis veturi la unuajn cent kvindek kilometrojn ekde la fervojstacio per aŭto. Kompreneble, en la duone seka tempo okazis sufiĉe ofte, ke oni devis halti kun la aŭto en marĉo dum kelkaj tagoj. En la pluvotempo la tuta vojaĝo fareblis nur per muloj, ĉevaloj aŭ ĉaroj.

La lasta triono de la vojo, tute egale, ĉu oni venis de Jovel aŭ de Balún-Canán, nur per muloj privojaĝeblis, egale, ĉu estis seka tempo aŭ pluva tempo, ĉar tiu distanco ne havis firman vojon, nek por ĉaroj nek por nepezaj ĉaretoj, kaj tute ne por aŭtoj.

Tiu vojo kondukis trans tiom da altaj vojoj de la *Sierra Madre del Sur,* ke oni devis grimpi seninterrompe kvincent metrojn supren, poste ree kvincent metrojn

malsupren, tiam ree supren, kaj poste ankoraŭfoje malsupren. Sur la tuta distanco apenaŭ troveblis eĉ nur kvin kilometroj, kie oni povis rajdi sur ebena tero. La vojo kondukis trans rokodorsojn, tra vepro, tra ŝlimo kaj marĉoj, tra riveroj kaj profunde ellavitaj terosulkoj.

Tia vojaĝo sur bona mulo, se oni estas akompanata nur de juna servisto, estas sufiĉe streĉa, sed ne ĉiam vivdanĝera. Sed estis laboro por firmaj manoj devi fari tiun vojaĝon kun granda transporto de varoj, kiuj ĉiuj estis transportataj sur la dorsoj de ŝarĝbestoj. Kaj tio estis ne nur streĉa laboro, sed eterna zorgado. Se besto nur mergis sin en la akvo de trairenda rivero, por fridetigi sin aŭ por defendi sin kontraŭ mordantaj muŝoj, jen la bela kara silkovaro el Francio jam estis finita, jen speguloj kaj horloĝoj kaj municio aŭ kio ajn en la pakaĵo, estis fuŝitaj kaj perditaj. Transporti tiajn varojn en elegantaj ladaj kofroj por tropikaj regionoj, estas tre granda ideo. Sed por realigi ĝin, la transporto bezonus la kvaroblon de ŝarĝbestoj, kvaroblon de mulpelistoj, kaj kvaroblon de maizoporcioj, kiuj estus kunŝargendaj sur la bestojn, ĉar okazas ĉe grandaj transportoj, ke survoje ne aĉeteblas manĝo por la bestoj. La varo tiukaze fariĝas tiom multekosta je la vendoplaco, ke neniu povas aĉeti ĝin kaj

la komercisto devas reporti ĝin kun si.

La marŝo de Jovel ĝis Hucutsin per karavano daŭris ĉirkaŭ kvin tagojn. Kelkaj el la komercistoj duobligis tiun tempon per tio, ke ili restadis tagon en kelkaj de la indiĝenaj lokoj, kiujn ili renkontis en la marŝo, por oferti tie siajn varojn. Sed tio kaŭzis novajn impostojn kaj pli altajn elspezojn por la luitaj ŝarĝbestoj kaj por la pelistoj.

Multaj komercistoj, precipe povraj, luprenis indiĝenojn, kiuj portis sur siaj dorsoj la varojn al Hucutsin. La indiĝenoj estis pli malkaraj ol la muloj kaj ili ne metis sin kun la varoj en la akvon de rivero. Ili ankaŭ malpli ofte renversiĝis kun la varoj en abismon kaj ili ankaŭ ne puŝis pakaĵojn kontraŭ rokovandojn aŭ kontraŭ arbojn. Eĉ spite al la pli malgranda salajro, la indiĝenaj portistoj havis ja pli da menso ol la muloj, kiuj ne interesiĝis pri tio, kio estis en la pakaĵoj, kaj kiuj tiukaze, se ili vidis por ekzemplo ŝtelirantan jaguaron en la vepro, ektimis, sturmadis dum mejloj kun siaj pakaĵoj antaŭen sen halto, kun la pakaĵoj kurante kontraŭ ion kaj puŝante ĉion renkontatan survoje.

Sed la indiĝenaj portistoj havis por la komercistoj

malavantaĝon kompare al la muloj. Ĉar ili povis pensi, ili ne estis ĉiufoje tiom fidindaj kiel la muloj. La indiĝenoj de tempo al tempo ekhavis hejmsopiron pri siaj edzinoj kaj infanoj. Tiukaze ili postlasis la pakaĵojn en la loko, kie oni tranoktis kaj malaperis antaŭ la matena krepusko. La komercisto en tiu kazo staradis kun siaj pakaĵoj kaj ne povis vojaĝi plu. Eble li sukcesis trovi portistojn en la loko, en kiu li ĝuste estis. Sed al tiuj li devis pagi trioblan sumon, ĉar ili eluzis, sufiĉe lertaj por negoco, la embarason de la komercisto je sia avantaĝo.

Rimarko
Sierra Madre del Sur = montara ĉeno en la sudo de Meksiko

06

De Jovel ĝis la plej proksima pli granda urbo kaj la finstacio de la ĉaroj kondukis tri padoj trans ĉeno de montoj al Hucutsin. Sed ĉiu vojo estis simile longa, simile komplika, kaj same plena de diversaj danĝeroj, malagrablaĵoj kaj ĉagrenoj.

Tamen, tie, kie du aŭ pli da komercistoj renkontiĝis, komenciĝis la kverelado pri tio, kiu el la tri vojoj estas la plej bona. Tie, kie vojoj estas tiom grandaj kaj gravaj aferoj kiel en tiuj foraj kaj sovaĝaj regionoj, jen homoj, ĉu komercistoj, ĉu nekomercistoj pasigas tutajn tagojn inklude de la noktoj per nenio alia krom la kverelado pri la distanco, la malfacilaĵoj, la avantaĝoj kaj la malavantaĝoj de vojoj. Tiuj kvereloj estas multe pli seriozaj ol en Eŭropo la kvereloj pri la avantaĝoj kaj malvantaĝoj de certaj politikaj partioj kaj pri politikaj temoj. Tiu, kiu devas vojaĝi tiujn vojojn havas nek tempon nek emon ekscitiĝi pri politikaj aferoj. Al tiu tio estas tute indiferenta, ĉu pravas komunistoj ĉu faŝistoj. Lia tuta politika opinio koncentriĝas je la ununura voko:'*Por Santísima*, ho, Sankta Virgulino de Dio, *que camino*. Kia vojo!' Tiam li sakras precipe pri la

guberniestro kaj la registaro ĝenerale, kiuj jam dum jardekoj postulas kromajn impostojn por la vojo kaj neniam konstruas vojon.

La plej preferata vojo al Hucutsin kondukas tra la indiĝena loko Teultepec. Tiu loko troviĝas en alto de dumil metroj sur la *Sierra*. Estas la lasta loko, antaŭ ol oni atingas Hucutsin. Se oni havas la lokon ĉirkaŭ du rajdohorojn post si, oni atingas malgrandan plataĵon, kie troviĝas tri krucoj, por doni okazon al la vojaĝantoj rekomendi ĉi tie sian animon kaj siajn varojn al la sanktuloj. Ĉar de tie, mil kaj cent metrojn krute sub si oni vidas nun la sternitan Hucutsin. Estis bona ideo, ĉi tie je tiu loko starigi tri krucojn. Krucoj ĉiam memoras onin pri suferoj. Ili zorgas pri tio, ke la homoj neniam forgesu, ke la surtera vivovojo estas sufervojo kaj strato kovrata de dornoj kaj de kardoj.

Per tiuj krucoj la vojaĝanto estas nun preparita pri tio, kio ĉio povas okazi.

La pado, kiu tie kondukas krute malsupren estas plena de ŝtonoj, marĉa kaj rompiĝema. Iafoje ruliĝas aŭ ĵetiĝas grandaj ŝtonpecoj de la montpintoj el la roka altaĵa ĉeno

kun bruo trans la padon kaj kunŝiras abismen kun si ĉion, kio venas en ties vojon: arbojn, rajdistojn, mulojn.

Je multnombraj lokoj la vojo estas tiom profunde forrompita, ellavita aŭ diserigita, ke la ŝarĝbestoj subite glitas dekkvin ĝis dudek metrojn je la krutaj vandoj malsupren ĝis ili falas sur novan kurbiĝon de la pado, kiu kondukas kun centoj da kurbiĝoj laŭ la deklivo malsupren.

Okazas ofte, ke la muloj pro siaj ŝarĝoj sur la dorsoj turniĝas flanken ĉirkaŭ si mem, foje tial la pakaĵoj estas supraj, foje la kruroj de la bestoj.

Estas tute normale, ke en loko, kiu estas tiom malproksima de fervojstacio kaj pro tio de la civilizacio alirebla tiom malfacile, povas okazi aferoj, kiuj en alia regiono kaj en alia loko eĉ ne estas penseblaj. Kiu ajn regas en tia loko, ĉu urbestro, ĉu polica ĉefo aŭ juĝisto, tiu regas absolute. Neniu gazeto raportas pri li kaj al la registaro estas konata nur tio, kion li raportas mem.

Hucutsin estas indiĝena vorto kaj signifas „granda placo“ aŭ „granda loko“. El la indiĝena nomo ekkoneblas, kiun signifon la loko havis iam. Oni tuj povas konstati la limojn, kiujn la loko okupis en malnovaj indiĝenaj tempoj. Tiuj limoj transiras dudekoble transen de la limoj, kiujn la loko havas nun. Sed ne nur je la limmarkoj takseblas la graveco de la urbo.

Dekstraflanke, se oni venas de la kruta pado de Teultepec malsupren, troviĝas, kovrite de tero suramasiĝinta dum centoj de jaroj, giganta templopiramido, kies formo ekde la loko klare videblas.

Tri rajdohorojn malproksime de la loko troviĝas la ruinoj de sankta urbo, kiu estis la religia centro de la tre priloĝata regiono. Tiel, kiel migrobirdoj dum jarcentoj, eble eĉ dum jarmiloj, ĉiujare faras la saman vojaĝon kaj revenas al la samaj lokoj, tiel venas en ĉiu jaro ĉiuj tiuj miloj de indiĝenoj, kiuj loĝas en la regiono vaste distritaj, iam revenas al tiu centrala loko de sia raso kaj de sia historio. Kvazaŭ kiel pelate de nedetruebla instinkto, ili tie unuiĝas unufoje dum jaro, kvankam la loko estas

priloĝata nur de meksikanoj, el kiuj kompreneble multaj grandparte estas miksitaj kun indiĝena sango.

La festo, kiu pelas la indiĝenojn unufoje en la jaro tien, estas la *Candelaria*-festo, kiu estas festata en la unua semajno de februaro.

La festo havas katolikan karakteron, kaj la religiaj solenaĵoj okazas en la katedralo de la loko. La indiĝenoj, kiuj venas al la festo, estas ĉiuj katolike baptitaj. Tamen oni povas esti tute certa, ke la katolika eklezio entreprenis tie la saman tre lertan kunĵetadon, kiun ĝi ankaŭ entreprenis en la tempo de la konvertado de la ĝermanaj paganoj, kunmiksaĵon, kiu esence plifaciligis la negocon al la katolika eklezio. Estas sufiĉe strange, ke ĉe la malnovaj germanoj Kristo ĝuste kaj precize je la Julfesto estis naskita.

Ke en Hucutsin la *Candelaria*-festo estas festata kiel la jarfesto de la katolika eklezio, havas per si mem ne sencon, ĉar Hucutsin al la C*andeleria* tute ne havas rilaton.

La okazaĵo tamen klariĝas per tio, se oni scias, ke la indiĝenoj de tiu regiono en malnovaj tempoj kaj certe

dum jarmiloj kaj multajn jarcentojn antaŭe, antaŭ ol iam venis hispano al Meksiko, festis en la sepa semajno post la vintra solstico sian grandan religian jarfeston en Hucutsin kaj en la proksima sankta urbo. Pastroj kaj monaĥoj ĉiam kaj ĉie en ĉiuj landoj en ĉiuj religioj estis bonaj komercistoj. Religio, tute indiferente, pri kiu temas, kiu ne havas bonajn negocistojn en la gvidaro, ne vivas longe.

Tiel en Hucutsin estis antaŭdireble, kio okazos, kiam la hispanoj alportas la katolikan religion al la kompatindaj indiĝenaj paganoj.

La granda religia festo de la indiĝenoj okazis en la unua semajno de februaro.

Ĉar la katolikoj devas festi ĉiutage en la jaro almenaŭ unu sanktulon aŭ mistikan okazaĵon, tial ili povis elekti el superfluo. Kaj ĉar ili festas en la unua semajno de februaro ĉie la *Candelaria*-feston, tial ili nomis la indiĝenan feston ekde la tago de ilia enmarŝo en Hucutscin simple *Candelaria*-festo. Per tio la konvertado de la paganoj estis finfarita. Ĉar la indiĝenoj venis kiel en pasintaj jarcentoj en la unua semajno de februaro de ĉiu

jaro al Hucutsin, ĉar ili partoprenis tie antaŭ la templo la religiajn ceremoniojn kaj transdonis al la pastroj la oferdonojn, poste frekventis la foirplacon kaj fordonis sin al eksterekleziaj ĝojoj, tial ili faris tion ankaŭ estontece. La indiĝena templo estis forigita kaj je ĝia loko oni konstruis la katedralon sur la samaj ŝtonfundamentoj, sur kiuj staris la indiĝena templo. Kaj la katolika eklezio estis konstruita kun la samaj ŝtonoj, kun kiuj oni konstruis la templon. La monaĥoj, pensante nur pri rapida profito, eĉ ne penis cenzuri ĉiujn tiujn ŝtonojn. Tiel troviĝas ĝis nun en la muroj de la katolika katedralo interne kaj ekstere kaj en la tero tre multaj ŝtonoj, kiuj surhavas malnovajn indiĝenajn hieroglifojn kaj religiajn simbolojn.

La diservo en la eklezio kaj la agoj de la pastroj en la katedralo ne estas tro diversaj de la ceremonioj en la indiĝenaj temploj. Tie kiel ĉi tie la pastroj parolis kaj regurde kantadis ion, kion komprenis neniu aŭskultanto; tie kaj ĉi tie dancis kaj gestadis la pastroj antaŭ la altaro, turnadis sin kaj kurbiĝadis, kliniĝadis kaj etendis brakojn supren enaeren. La indiĝenoj volis kontentigi siajn religiajn bezonojn, ĉar ili estis kutimigantaj pri tio, kaj tial ili iris de nun kun la sama kutimiĝo kaj laŭreguleco en

la katedralon, kiel ili iris antaŭe en siajn templojn. Kiu volas danci, devas danci laŭ la muziko, kiun oni ofertas al li.

Sed Hucutsin estis ankaŭ la politika mezpunkto, la ĉefurbo de la nacioj de la tseltaloj. Pro ĉiuj siaj juĝaferoj submetitaj al tribunalo, pro ĉiuj siaj negocaj agoj, kiuj postulis la konfirmadon de la aŭtoritatoj por esti validaj, ili devis iri al Hucutsin. Tie estis ilia reĝo, kiu decidis juĝaferojn, tie estis la juĝistoj, kiuj verdiktis, tie oni konfirmis heredaĵajn rajtojn kaj proprietajn rajtojn, tie kontraktoj estis subskribataj, tie okazis ĉiuj decidoj, kiuj koncernas la personan aŭ ŝtatan vivon de indiĝeno aŭ de ilia familio. Tio, kio ne estis decidita en Hucutsin, ne validis kiel plenrajta.

Kaj tiel, kiel la celtaloj en malnovaj tempoj kun ĉiuj siaj problemoj migris al Hucutsin por solvi ilin, tiel ili venis ankaŭ nun ankoraŭ post la alveno de la hispanoj al Hucutsin, pro la samaj kaŭzoj. Iliaj reĝoj, juĝistoj kaj pastroj estis murditaj. Kaj ĉar ili krome renkontis neniun aŭtoritaton por decidi ion, tial ili nun devis alvoki la hispanajn aŭtoritatojn.

Estis kvazaŭ de jarmiloj en la sango de la celtaloj, ke Hucutsin unufoje ĉiujare estas vizitenda, tiel kiel mahometanoj unufoje en la vivo devas viziti Mekkon por trovi internan pacon. Kiel jam antaŭe, tiel ankaŭ nun en Hucutsin ĉio estis plenumata de la indiĝenoj, kion ili volis plenumi, kaj kion ili amasigis je deziroj, premoj kaj necesoj dum la jaro.

La posedantoj de grandaj bienoj, la bienuloj, baldaŭ ekkonis la gravecon de la loko. Ili lernis dum mallonga tempo, ke ĉio tio, kion ili devis intertrakti kaj komerci kun la celtalaj indiĝenoj, havis pliigitan juran forton, se oni faris tion en Hucutsin dum la *Candelaria*-festo. Neniu hispana kaj pli poste neniu meksika instanco povis havigi al kontraktoj, kiuj estis konfirmitaj kun indiĝenoj, tiom altan valoron kaj respekton, kiel faris tion la celtaloj mem, se la kontraktoj fariĝis leĝofortaj en Hucutsin dum la *Candelaria*-festo.

Tio estis unu el la plej gravaj kaŭzoj, kial la agentoj, varbante indiĝenojn por la monterioj, subskribis kaj konformigis la laborkontraktojn en Hucutsin dum la *Candelaria*-festo.

La alia kaŭzo estis tiu, ke en Hucutsin troviĝis la lasta instanco, kiu estis rekonata de la leĝo kaj de la konstitucio. La loko estis la plej ekstera posteno de la civilizacio kaj de la registara potenco de la meksika respubliko. Post la ĝardeno de lasta domo komenciĝis la unuaj arbustaĵoj de la ĝangalo; kaj la loĝantoj de la ĝangalo, precipe jaguaroj, pumoj, kojotoj, aligatoroj kaj serpentoj ne timis rompŝteli tie nokte aŭ jam dum la vespera krepusko en la kortoj de la lastaj domoj de l' loko.

De tie, dudek vojaĝtagojn malproksime al oriento kaj sudokcidento ne plu ekzistis laŭleĝaj instancoj. Tuj, kiam la ĝangalo komenciĝis, estis tiu la instanco, kiu havis la plej bonan revolveron, kaj tiu, kiu plej rapide kapablis eltiri kaj ekpafigi ĝin.

Rimarko
Candelaria = kandelo-festo = Puriĝo de Sankta Virgulino
Julo = festo en Skandinavio, komparu al Sankta Kristnasko

En Hucutsin la instancoj konfirmis dum kelkaj *Candelaria*-festoj la kontraktojn de ĉirkaŭ kvincent indiĝenoj, kiuj estis varbitaj por monterioj.

Tiuj homoj ricevis dudek ĝis kvindek pesojn antaŭpage, tuj kiam la kontrakto estis leĝoforta, laŭ la alto de la sumo, kiun ili jam ricevis dum la varbado, kaj sub konsidero de la tempo, kiun ili supervivos laŭ la opinio de la varbaj agentoj en la ĝangalo, antaŭ ol oni devos enfosigi ilin.

Mono havis nek en la ĝangalo nek en la malproksimaj labordistriktoj de la monterioj iun valoron. Valoron havis nur ĉiuspecaj artikloj por la ĉiutaga uzo. Tial la indiĝenoj, kiuj estis kondukataj kiel varbitaj laboristoj en la monteriojn, eldonis tie la tutan monon, kiun ili posedis kaj kiun ili ricevis kiel antaŭpagon aŭ tie poste ricevis de la agentoj. Ili rigardis la aĉeton de varoj tie kiel bonan investon de sia salajro; ĉar en la monterioj la varoj estis kvaroble aŭ sesoble, ja eĉ dekoble pli multekostaj ol tie. En Hucutsin estis akra konkurenco inter la komercistoj, dum en la monterioj ne ekzistis konkurado inter

komercistoj.

Tiuj grandaj trupoj de indiĝenoj, kiuj estis varbitaj por la monterioj kaj tie devis konfirmigi siajn kontraktojn ĉe instanco estis treege grava bazo por la granda ekonomia signifo de la *Candelaria*-sanktulofesto en Hucutsin. Oni ne tro multe kalkulis, se oni supozis, ke ĉiu unuopulo el la varbitaj indiĝenoj eldonis almenaŭ tridek pesojn en tiu festo. Sed certe pli ol triono el ili eldonis ĝis cent pesojn. Estis tiuj, kiuj venis tien kun siaj familioj kaj tie adiaŭis ilin. Tiuj indiĝenoj aĉetis ne nur por si, sed ili akceptis tre altajn antaŭpagojn por aĉeti por siaj edzinoj, infanoj, patrinoj aŭ pli junaj gefratoj ĉion tion, kion tiuj familianoj dependantaj de ili, povis uzi dum ilia malĉeesto.

La agentoj montriĝis tie pri antaŭpagoj multe pli donemaj ol en la hejmlokoj de la indiĝenoj. Tie la kontrakto estis subskribita kaj konfirmita de la instancoj, kaj la indiĝenoj troviĝis tuj sub polica gardado. Ili apenaŭ estus povintaj forlasi la lokon en iu direkto sen esti ekvidataj kaj kaptitaj de unu el la multnombraj helpaj policistoj.

Tiel la indiĝenoj donis al la festo ekonomian signifon

tioman, ke la komercistoj bonvoleme pagis la foirplacajn impostojn de tempo al tempo ege altajn, kiujn postulis la urbestro, por ke ili havu bonan lokon en tiu placo.

Ĉar la urbestro ricevis de ĉiu kontrakto de la laboristoj, kiun li subskribis kaj substampis, dudek kvin pesojn, tial la trupoj de la varbitaj indiĝenoj estis por li kiel urbestro la plej grava fonto de siaj enspezoj. Kaj tiu tiom grava enspezfonto kun la alia granda enspezo el la kromaj impostoj de la *Candelaria*-festo, estis sufiĉe da kaŭzoj, ke ĉe la baloto por la urbestra posteno ĉiufoje ĉirkaŭ proksimume dudek civitanoj postrestadis sur la batalkampo de la demokratiaj elektoj; kaj apenaŭ nombreblaj estis tiuj, kiuj havis nur kelkajn prifajlitajn revolverkuglojn ie inter la ostoj de sia skeleto.

Krom tiuj varbitaj indiĝenoj venis ankaŭ la granda plimulto, ĉirkaŭ naŭdek procentoj el la indiĝenoj al la festo, kiuj loĝis tie dise en la tuta regiono.

Parte ili venis al la festo pro la eklezio. Por la plimulto de la indiĝenoj estas la ununura eklezia diservo dum la tuta jaro, kiun ili partoprenis. En la plej multaj lokoj kaj setlejoj ili detruis la preĝejon, ĉar ili ne volis ĉiam toleri ekleziulojn ĉirkaŭ si, ĉar ili rigardis la ekleziulojn kiel parazitojn. En la malmultaj lokoj, kie ili ne detruis la preĝejon, la preĝejoj estis disfalintaj, konstruitaj sub hispana regado. Se tamen preĝejo eble postrestis, neniam venis pastro tien, ĉar tio ne enspezigis ion al li.

La indiĝenoj sentis sin en sia konscienco tute trankviligitaj, se ili unufoje ĉiujare pilgrimis al la granda festo en Hucutsin, se ili partoprenis tie en meso, se ili ekde la enireja pordo glitante ŝovis sin sur siaj genuoj ĝis la altaro kaj sur tiu vojo kisis la lakitajn piedojn de ĉiu sanktula figuro, kiun ili preterrampis, se ili ŝmiris al siaj infanoj la katedralan koton de la ŝtonplanko en la buŝon por protekti la infanojn kontraŭ malsanojn kaj malbonajn

spiritojn, se ili al si mem ŝmiris tiun koton kiel medicinon sur vundojn, kiujn ili havis korpe, kaj tiam fine, veninte al la altaro, transdonis al la preĝeja servisto la kandelojn, kiujn ili supozis oferi al Dipatrino kaj la sanktuloj. Tiam ili metis florojn kaj fruktojn sur la ŝtupojn de la ĉefaltaro kaj sur la genutabulojn de la multnombraj apudaj altaroj. Kaj laste, forlasante la katedralon, ili pagis sur la telerojn metitajn de la enkasigantoj al ili sur la bruston; tio estis iliaj pesoj por la satigo de Sankta Patro.

Tuj, kiam ili tie pagis ĉion ĝuste kaj baptigis siajn infanojn kaj pagis ankaŭ por tio, ree ĉio estis farita por ili dum la daŭro de jaro, kio ligis ilin kun la katolika eklezio. Ŝajne neniu atendis de ili ion plu, kaj Dio donis al ili, al iliaj maizkampoj kaj ŝaf-kaj kaprogregoj denove fekundecon por la sekvaj dekdu monatoj.

Se ili jam plenumis siajn religiajn devojn ĝis tiu punkto, ili returniĝis al siaj surteraj devoj kaj plezuroj.

Ĉiuj ĉi indiĝenoj kunprenis memfaritajn varojn, kiujn ili intencis vendi tie sur la foirplaco: potojn, ĉapelojn, lankovrilojn, lanrubandojn, petatojn, felojn de kapreoloj kaj antilopoj kaj jaguaroj kaj pumoj, ledon de serpentoj

kaj de aligatoroj, krome fabojn, maizon, ovojn, kokinojn, kaprojn, ŝafojn, bovidojn, porkojn, hundojn, papagojn, kantobirdojn, lacertojn, tabakon, kotonon, lanon, kafon, kakaon, vanilajn guŝojn, bananojn, maĉgumon, medicinajn plantojn kaj herbojn.

Se tiuj homoj jam vendis siajn varojn, ili mem komencis aĉeti ion sur la foirplaco.

Se tio ĉio estis plenumita, ili aĉetis komitekon kaj fervore ebriiĝis.

Tuj, kiam la viroj komencis la drinkadon, aperis la agentoj de la monterioj apud ili. La agentoj estis malavaraj pri brando. Se la viroj sufiĉe drinkis, la agentoj pruntedonis monon al ili, por ke la indiĝenoj aĉetu pli da brando. Tiel la indiĝenoj kaj la agentoj fariĝis bonaj amikoj.

Sed la agentoj nun ne plu lasis gliti siajn amikojn el la maŝo. Je la sekva mateno, se la viroj ankoraŭ estis en stato de eŭforio, komenciĝs la pliprofundigo de la amikeco per novaj invitoj al *copita*, al glaseto da brando.

Tiam oni montris al la *amiguitos*, al la karaj amikoj, la

grandiozaĵojn de la mondo.

„*Hermanito*, frateto“, diris la agento afable al indiĝeno, „kion vi pensas, kion via *mujer*, via edzino dirus, se vi aĉetus al ŝi tiun buntan antaŭtukon?“

„Ho, ŝi certe ĝojus“, respondis la juna indiĝeno kun brilaj okuloj.

„Bone“, vi estas amiko mia, *mi amigo*, mi pruntedonas al vi la monon por la antaŭtuko“, diris pro tio la agento kaj vokis neglekteme al la arabo: „He, vi, ulo, kiom kostas la antaŭtuko?“

„Inter fratoj“, diris la arabo, frapante sian bruston, „la antaŭtukon mi ne povas vendi por malpli ol kvar pesoj, sed por vi, sinjoro, bone, mia lasta sanktigita kaj nerevokebla oferto: tri kaj duono da pesoj.“

La agento sciis, ke li povus havi la antaŭtukon de la sama arabo facile por du pesoj. Sed li ja ne pagas ĝin. Por li ne gravis, ĉu la indiĝeno donacos al sia edzino antaŭtukon aŭ silkan rubandon aŭ kaptukon. Kial interesu lin la edzino de indiĝeno? Por li gravis nur tio, ke la indiĝeno elspezas multe da mono kaj tiel faras ŝuldojn.

Se ne estis donacoj, kiujn la indiĝenoj volis havi por sia edzino aŭ sia amatino aŭ sia patrino, tiukaze la agento sciis veki aliajn dezirojn en la indiĝeno: bela poŝtranĉilo, paro da trembrilaj fingroringoj kun grandaj diamantoj aŭ rubinoj falsitaj el vitro, brodita ĉemizo kiun portas la grandbienuloj, horloĝo. La indiĝeno povis havi ĉion, al kio direktiĝis lia rigardo. Li estis kvazaŭ en la halo de kastelo, en kiu magiisto montras siajn trezorojn, el kiuj ĉiu, kiu venis kaj penis pri tio, rajtis preni ĉion laŭplaĉe. La indiĝeno devis diri nur: 'Tion mi volas havi.' Kaj tuj estis en liaj manoj.

Se nenio povis forlogi iun indiĝenon, ĉar lia senco ne celis posedon, la agento tamen ne embarasiĝis. Komiteko kaj brando helpis ĉiam. La enhavojn de la unuaj du plenigitaj glasetoj li donacis. La indiĝeno ja ne povis ofendi la afablan agenton kaj rifuzi trinki ion kun li. Sed, kiam li jam trinkis du aŭ tri glasetplenojn, ne plu estis halto. La agento pruntedonis kaj pruntedonis, kaj la indiĝeno subskribis, kion oni volis.

Rimarkoj
amiguitos = karaj amikoj
comiteco = speco de brando, produkita en Comitán, Ĉiapaso
copita = glaseto (da brando ktp.)

mujer = edzino
hermanito = frateto
petato = mato

10

Al la *Candelaria*-festo venis ankaŭ ĉiuj grandaj posedantoj de bienoj, la bienuloj. Ili venis plej ofte kun siaj familioj kaj kun deko da servoknaboj kaj servoknabinoj.

Ili vizitis la feston por plenumi siajn religiajn devojn. Sed estis ankaŭ certa socia devo de ĉiuj bienuloj kaj grandbienuloj de la regiono ĉeesti en la *Candelaria*-festo kun siaj familioj.

Kelkaj el tiuj grandbienuloj havis dekmil hektarojn da terposedo, kaj kelkaj kvindek mil hektarojn da ĝi. Kelkaj el ili posedis tiom grandajn terposedaĵojn, ke ili devis rajdi en multaj kazoj ses horojn por viziti siajn plej proksimajn najbarojn. La familioj de tiuj bienuloj ĉiuj reciproke havis parencojn kaj boparencojn. Kvankam la viroj de tempo al tempo ie renkontiĝis iafoje kaj ĉeokaze, ekzemple en Hucutsin aŭ en Jovel aŭ en Balún-Canán aŭ en Achlumal, la familioj tamen apenaŭ havis alian okazon reciproke vidis sin, krom ĉe la *Candelaria*-festo, kie ĉiuj ĉeestis dum la sama semajno.

Kiam la bienuloj jam oferis siajn kandelojn en la katedralo, kiam ili almenaŭ parte jam aŭdis meson kaj faris servoprete la devigan nombron de surgenuiĝoj kaj krucsignoj, ili turnis sin al siaj negocoj.

La plimulto de la vendoj je bruto, maizo, sukero, kafo aŭ kion ajn ili produktis, estis tiel kontraktataj, ke la liveroj estas rekompensataj kaj pagataj dum la *Candelaria*-festo. Kun la *Candelaria*-festo finiĝis por la bienuloj la malnova negocojaro kaj komenciĝis la nova. Venis ĉiuj komercistoj, kiuj havis negocan rilaton al la bienuloj, por fari novajn kontraktojn kaj por plenumi la devojn de ekzistantaj kontraktoj. Ĉiuj kalkuloj estis pagataj. Bienulo, kiu prenis dum la tuta jaro ĉiujn varojn je kredito, por malhelpi, ke liaj servistoj portas monon kun si, pagis je tiu tago ĉiujn tiujn kalkulojn prezentatajn en tiu tago al ili, tuj kiam la bienulo jam ricevis je la sama tago la monon por la liveritaj varoj.

Je tiu tago la bienuloj samtempe pagis la impostojn en *la tesoreria,* en la ministerio por financoj en Hucutsin kaj en la *agenturo de la hacienda*, en la impostoficejo de la federacia registaro.

La bienuloj, kiuj troviĝis jam en la posedo de la mono, kiun ili enkasigis por liveroj, estis al ĉiuj flankoj donacemaj. Ili permesis aĉeti al siaj edzinoj kaj filinoj tiom, kiom tiuj volis. Ili donis al siaj filoj cent aŭ ducent orajn pesojn manen, por ke la filoj post la longa monotona vivo en la malproksima bieno ĝuu kelkajn bonajn tagojn. La filoj aĉetis grandajn arĝentajn spronojn, ore kaj arĝente marketritajn revolverojn, ledojakojn kun ĉizelitaj kaj brulmarkitaj ornamentoj, pantalonojn kun alkudritaj gigantaj arĝenteroj je la flankoj, grandajn ĉapelojn kun puraj orobrodaĵoj, ĉapeloj, el kiuj ĉiu kostis ĝis dumil pesojn. Ili aĉetis ruĝajn, flavajn, blankajn ĉemizojn el pura silko. Kaj se la dentisto, kiu dum tiu tempo tenis malferma sian magazenon, havis tempon dum horo, jen la filoj de la bienuloj iris tien, komisiis al la dentkuracisto prišlifi tri aŭ kvar tute sanajn dentojn kaj poste surmeti orajn kronojn, por ke ĉiu knabino povu vidi, ke ili estas la filoj de ege riĉaj bienuloj, kiuj povas permesi al si havi orajn dentojn.

Se ĉio estis farita, oni trinkis kaj ludis, ludis kaj trinkis, dancis sur libera placo, ree trinkis kaj ludis, kaptis ĉeokaze indiĝenan servistinon al si kaj post horo forlasis

ŝin, transdoninte brilan kolĉenon aŭ buntan gvatemalian antaŭtukon aŭ tri metrojn da silkorubando aŭ grandan harklipan kombilon marketritan kun perletoj, kiel restantan rememorilon por preterfluginta momento de raviteco.

11

Pro ĉiuj tiuj kaŭzoj estas kompreneble, kial la *Candelaria*-festo estis en tiu tiom fora Hucustin tiom grava festo por kvincent komercistoj el araba, meksika, hispana, kuba kaj indiĝena nacioj.

Oni vendis kandelojn por kvinmil pesoj ĉiujare, kandelojn oferatajn en la katedralo. Estis jaroj, en kiuj oni vendis kandelojn por okmil pesoj kaj en kiuj oni estus povinta vendi kandelojn por pliaj trimil pesoj, se ili estus je dispono.

Je ĉiu alia tempo de la jaro Hucutsin vekis la impreson, kvazaŭ la loko estus forgesita ne nur de la cetera mondo, sed ankaŭ de siaj propraj loĝantoj. La loĝantoj ŝajne vivis plu nur tial, ĉar ili ne sciis kiel morti. Se la posedanto de la plej granda magazeno en la loko je sabato vendis varojn por kvar pesoj, li rigardis tion tia brila negoco, ke li revis pri tio fari negocon kun banko. Kiu rajdis en la urbon, tiu elserĉis en la herbe prikreskata strato padon, kiu ŝajnis al li sufiĉe mola por malhelpi, ke oni aŭdu la hufojn de lia ĉevalo, ĉar li timis veki la loĝantojn de la loko el ilia saniga dormo. Ne malmultaj rajdantoj,

alveninte en la loko eksentis korpremon. Ili imagis, ke la loĝantoj ĉiuj mortis kaj kuŝas sen katafalko ie en la domoj. Nur kiam la rajdanto proksimiĝis al la placo, kie la strato estas pavumita kaj la hufoj de lia ĉevalo resonis trans la placon, jen tie, jen ĉi tie iu paŝis sur la sojlon de pordo por rigardi, kiu ekhavis en tiu vasta mondo, en kiu estas tiom da loko, la aventureman ideon vojaĝi ĝuste al Hucutsin. Post iom da tempo trotis tiam eble viro en sandaloj, kun surŝultra fusilo buŝe ŝarĝenda, ĉirkaŭ angulon, rigardis la rajdanton kaj pripensis, ĉu troviĝas kaŭzo aresti la rajdanton pro io, por pruvi, ke li perlaboras siajn ĉiutagajn dudek kvin centavojn kiel policisto honeste. Kaj por doni al la urbestro okazon meti monpunon kaj miksi iom da distro en la tristiĝintan lokon.

La indiĝenoj, ĉeokaze venantaj el siaj setlejoj al Hucutsin, por vendi tie la produktojn de siaj kampoj, kompreneble rigardis la lokon kiel grandan urbon kaj kiel ege viglan, riĉan, progreseman kaj modernegan centralan punkton de l' mondo. Multaj el tiuj indiĝenoj ne povis imagi, ke ie surtere povas esti pli granda urbo ol Hucutsin; nur ĉar certaj viroj, kiuj estis en Jovel aŭ en Balún-Canán, asertis, ke tiuj du urboj estas dudekfoje pli grandaj ol Hucutsin,

kaj ke la magazenoj tie havas vitrotabulojn grandajn kiel tuta vando de domo. Tiuj viroj estis ja konataj por tio, ke ili estas fanfaronuloj kaj faras el pulo facile jaguaron.

Tiuj indiĝenoj venantaj en la kutimaj tempoj de la jaro al Hucutsin kaj havantaj ĉe si siajn edzinojn kaj infanojn kaj hundojn, kaj kiuj jam vojaĝis plurajn tagojn, proksimiĝis al tiu loko ĉiam kun timo. Tiu timo perdiĝis iom post iom, se ili tre ofte venis en la lokon, se ili vendis siajn produktojn por ankoraŭ iel akcepteblaj prezoj kaj aĉetis kun multe da marĉando por elteneblaj prezoj tion, kion ili bezonis en siaj malproksimaj setlejoj, kaj se ili ne estis molestataj de la instancoj de la loko. Sed tiam okazis, ke kelkaj el la grupoj de indiĝenoj, kiuj venis pace en la lokon por vendi kaj aĉeti, de la policistoj tute simple estis arestitaj pro iu ajn elpensita kaŭzo kaj metitaj en la prizonon, el kiu ili povis liberigi sin nur per tio, ke ili laboris por la loka administrejo dum semajno en la stratoj aŭ ĉe konstruado de kelkaj domoj.

Sed, se tiuj indiĝenoj venis en tiu semajno en la lokon, en kiu estis festata la *Candelaria*-festo, ili kampadis kun siaj familioj unue plenan tagon tute ekstere de la loko ie en la vepro. De tie tiam ekiris viro, kiu ofte estis en Hucutsin

kaj kiu havis spertojn, por esplori, ĉu estas sufiĉe sekure veni en la lokon.

La impreso, kiun la indiĝenoj havis dum tiu festo en Hucutsin, estis multoble pli profunda ol la impreso, kiun havas farmisto el Kentukio, kiu venis la unuan fojon al Nov-Jorko kaj sen enkonduko kaj transiro estas metata mezen de *Broadway*.

La diverseco de la loko kun siaj bruado kaj ondado dum la *Candelaria*-festo rilate la aspekton kaj la vivon de siaj loĝantoj en kutimaj tempoj estis tiom granda, ke la indiĝenoj perdis ĉiun internan kaj eksteran ligon kun la realeco.

La granda diverseco de la loko, kiun konis la indiĝenoj en la kvietaj tempoj, kaj de tiu loko, kiun ili renkontis dum la festo, fariĝas komprenebla, se oni konsideras, ke la vendosumo de la varoj je tiu de Dio forgesita loko dum la *Candelaria*-festo iafoje ampleksis unu milionon kaj kvaronon da pesoj, ke tiam dekmilpesaj ĉekoj iris tiel facile de mano al mano, kiel en la kutimaj tempoj de la jaro eĉ ne dek pesoj.

Rimarko

Broadway = La teatrokvartalo je la *Time Square* (Time-placo) en Nov-Jorko

Diktatoro aŭ despoto neniel estus povintaj tiel bonege krei aŭ komandi tiun fonon, kiu tie kvazaŭ per si mem elformiĝis en centoj de jaroj.

Estas konate kiel en civilizitaj landoj liberaj homoj estas devige aŭ rekrutataj aŭ devigitaj en laborservon. Por la ĵurigon de la rekrutoj oni kreas bombastan fonon. Ĉio, kio havas krurojn aŭ devus havi krurojn devas stariĝi laŭvice en parada uniformo, oni disruligas la sanktajn flagojn, oni kantas ĥoralojn kaj ludas patriotajn himnojn. La rekrutoj aŭ ties anstataŭantoj devas meti manon sur la flagon kaj plenumi teruran ĵuron. Ĉion ĉi oni faras tiel solene kaj pompe, kvazaŭ la kara Dio en la ĉielo persone volus protekti la militliveradojn. La junaj rekrutoj, palaj kaj tremantaj en tiu bombasto, sentantaj la proksimon de la ĉiopotenca Dio, per tiu ĵuro estas tiel sufokataj kaj gorĝe premataj, ke ili neniam forgesas en sia tuta vivo tiun sanktan okazaĵon akompanatan de tiom da teatraĵoj kaj ĥoraloj kaj paradaj uniformoj. Ĝuste tio estas la celo. Ne sufiĉus, ke junulo paŝus al kruda ligna tablo kaj tie kun kutimaj vortoj klarigus, ke li volas servi al sia patrolando en tempoj de mizero fidele kaj kun ĉiuj siaj

fortoj. Estas pli efikoplena fari ĉion ĉi kun pompo, gloro, ĉeesto de Dio kaj kun suka bato cerben de juna viro.

Tiel ekkompreneblas, kial la laboragentoj okazigis la finfinan konfirmigon de la kontraktoj por la laboristoj kondukotaj en la forajn monteriojn, tie en Hucutsin dum la *Candelaria*-festo. Oni revelaciis al la sklavoj la potencon kaj la pompon kaj la ĉiopotencan Dion de iliaj mastroj. La indiĝenoj, kiuj sub la impreso de tiuj ĉi ebriigaj grandiozaj aferoj konfirmis kontraktojn, pensis tiom malmulte pri dizerto kiel la rekrutoj, kies cerbojn oni nebuligis en la ĝusta okazo.

Kiam ajn indiĝeno en sia ekzisto kaj penoj kaj turmentoj en monterio pensas eĉ nur momenton pri fuĝo aŭ eĉ pri suicido, li tuj rememoris pri la bombasta *Candelaria*-festo en Hucutsin kaj la nevenkebla potenco de tiuj, kiujn li estis devigita servi.

Tiu, kiu povis ensorĉi en tian dormeman, kvietan kaj sekan lokon kiel Hucutsin tian pompon, tian vivon, tian grandan ondantan homamason, eĉ se nur dum la daŭro de dek tagoj, havis dian forton, de tiu ne povus fuĝi indiĝeno, kien ajn li turniĝus. Al tia mastro oni devas

plenumi la kontrakton ĝis la lasta surŝprucita punkteto post la lasta vorto.

Ĉapitro 02

01

La araboj estis la unuaj komercistoj, kiuj alvenis en Hucutsin. Tiam sekvis la hispanoj, tiam la kubanoj, kaj fine la gvatemalianoj.

Tute laste, precize observate, kun malfruiĝo, alvenis la meksikaj komercistoj. Estas pasio de la meksikanoj neniam esti ĝustatempaj. Ili eĉ ne mortas ĝustatempe. Nur du aferoj estas ĝustatempaj en Meksiko: la komenco de la taŭrobataloj kaj la *grito*. La *grito* estas la liberokrio, kiu ĉiujare estas elvokata de la plej alta ĉeestanta aŭtoritato en ĉiu loko en la tuta respubliko Meksiko kaj ĉe kunestantaj meksikanoj eksterlande por memori pri la elvokado de la sendependeco de Meksiko rilate la hispanan kronregnon. Tiu *grito* aŭ krio estas ĝustatempa ĉiujare precize la dekkvinan de septembro je la dekunua nokte.

Sed en siaj negocoj la meksikanoj estas kutime tiom malfruaj kiel en siaj nuptoj, infanbaptoj kaj entombigoj. Ja kial esti ĝustatempa? Ili troviĝas ja en sia propra

lando, kiu estis asignata al ili de Dio kiel eterna loĝloko, kie ili havas ĝeneralajn kaj libere demokratiajn balotojn.

Ili supozas, ke ĝuste tiu sola fakto sufiĉas por fari bonajn kaj prosperigajn negocojn en sia lando. Se ili tiam ekvidas ĉagrenite, ke la araboj kaj ĉinoj, ni tute ne parolu pri la hispanoj, faras pli enspezigajn negocojn kaj de tempo al tempoj ĉiujn negocojn kaj eĉ ne translasas al la meksikanoj cendon, spite al ties ĝenerala balotrajto kaj ilia rajto ĉe la balotoj iom plibonigi la bonŝancojn helpe de revolvero, jen kulpas tion la fremduloj, kiuj ĉiuj devus esti ekzilitaj, por ke la meksikanoj en sia propra lando ne mortu pro malsato.

La meksikaj komercistoj certe ĝustatempe ekmarŝis por alveni je bona kaj avantaĝa horo en Hucutsin. Sed ĝuste tial, ĉar ili marŝis ja en sia propra lando, ili renkontis jen iun *compadre,* jen iun *comadre,* jen kuzon, jen kuzinon, jen onklon kaj jen bofraton. Ie ili ĝuste alvenis je nuptofesto kaj tie je nomfesto. Ilia kvazaŭ denaska ĝentileco, la gastamikeco en ilia sango, la neekstermebla respekto je la sentoj kaj perceptoj de siaj kunhomoj, precipe al siaj parencoj kaj amikoj, ne permesis al ili simple preterrajdi domon kaj ĵeti hastan *„Adios,*

compadre!“ trans la latbarilon kiel saluton. Ili devis deseliĝi de sia mulo aŭ de sia ĉevalo kaj veni en la domon. Kaj plej ofte ili ne revenis el la domo ĝis ili unufoje tranoktis en ĝi.

Fine alveninte en la *feria,* ili trovis, ke la araboj kaj la hispanoj ne nur jam okupis la plej bonajn placojn kaj standojn, laŭrajte kaj laŭmore, sed eĉ faris tiom da negocoj kun bona gajno, ke la kostoj de la alvojaĝo kaĵ revojaĝo estis jam sufiĉe rekompencitaj. La araboj kaj la hispanoj jam kreis al si sekuran klientaron antaŭ ol la meksikanoj eĉ nur ekvidis la lokon.

La ununura rimedo, kiun ili havis kiel ideon por liberigi sin de tiuj teruraj konkurantoj, estis tiu, molesti la parlamentajn deputitojn per leteroj kaj vizitoj por krei pli severajn leĝojn kontraŭ nedezirataj enmigrintoj. Tiujn rimedojn ili kompreneble ne mem eltrovis, ili nur transprenis ilin de la usonanoj.

Rimarkoj
compadre = kamarado
comadre = klaĉulino
feria = foiro, jarfoiro

Kun la lastaj karavanoj de meksikaj komercistoj, kiuj malfruiĝinte alvenis en Hucutsin, alvenis tro malfrue ankaŭ *don* Gabriel Orduñez.

Don Gabriel estis varba agento por la monterioj.

Monterio estas granda kampadejo en la ĝangalo kaj praarbaroj de suda Meksiko kaj de Centra Ameriko, kie oni forhakas la mahagonarbojn kaj trenas ilin al la riveregoj por albordiĝi helpe de la riverega akvo en la maraj havenoj en la golfo de Meksiko kaj en Kariba Maro.

La tasko de la varbaj agentoj de tiuj monterioj estis havigi la laboristojn, kiuj estis bezonataj en la mahagonaj kampadejoj.

La agenton oni ne nomis laborista agento, sed *enganchador*, la viro kun la hoko aŭ la viro, kiu fiŝkaptas ion per hoko. En la vorto kaŝiĝas la senco, ke la *enganchador* ion allogas per io, kun granda lerteco, artifikaĵoj, ruzo, eĉ per trompo kaj aliaj krimoj, kion li je kutima maniero tute ne povus ricevi. Pro la nocio de la agento kiel *engachador,* kontrakto, kiun la varbisto

konfirmis kun la varbitaj laboristoj, estis nomata *enganche*. Kvankam la laboro de la *engachador* estis tute laŭleĝa okupo, tamen la vorto *engachador* havis la embarasigan apudan guston, kiun oni sentas, se oni pensas pri la okupo de tiaj varbistoj, kiuj en pli fruaj jarcentoj allogis, surhokigis kaj altrenis la rekrutojn kun ties volo aŭ kontraŭ ties volo por la reĝoj troviĝantaj en milito. Oni nun do certe komprenas, kial la vorto *engachador,* kiu en tiuj regionoj de Meksiko, kie estas konata la detruiga, senskrupula kaj krima agado de la *engachadors* por la monterioj, validas kiel nekredebla ofendo, se la vorto estas uzata kun la intenco iun enigi en supermezuran koleron, kiu ne estas *engachador*.

Sed *don* Gabriel tamen tute ne malfruiĝis tial, ĉar li estis meksikano. Li estis multe tro okupata *engachador* por disipi sian tempon kun ĝentilecoj, kiuj enspezigas nenion. Dum sia marŝo al Hucutsin li vizitis multajn ranĉojn kaj domojn, sed ne kun la celo interŝanĝi salutojn kaj certigojn pri amikeco, sed por altigi la laboristaron. Kaj efektive al li sukcesis surhokigi aron da indiĝenoj en la lokoj proksimaj al Hucutsin, ekzemple en Shitalja, Taquinvits kaj Sibacja. La plej multaj el tiuj homoj havis ŝuldojn kaj lasis sin varbi por ricevi la ŝuldosumon kiel

antaŭpagon. La aliajn homojn *don* Gabriel gajnis per tio, ke li antaŭsorĉis lerte la belaĵojn kaj grandiozaĵojn de la *Candelaria*-festo en Hucutsin kaj rakontis al ili, kion ĉion ili povus aĉeti tie kaj kiom da brando ili tie povus trinki, se ili havus monon. Kaj ĉar ili kompreneble ne havis monon, li estis pli ol nur preta tuj enmanigi la monon al ĉiu kontraŭ la garantio de la loka sekretario, ke ĉiu el ili je la antaŭfiksita tago alvenos en Hucutsin por konfirmigi la *enganche*, la laborkontrakton, tie antaŭ la instanco en la municipo.

Rimarkoj
engachador = varbisto
enganche = kontrakto kun varbitoj
municipo = loka administrejo

La indiĝenoj, kiuj venis al la *Candelaria*-festo, ne serĉis tranoktejon en la loko. Ili ankaŭ ne trovus ĝin, ĉar ĉiuj ĉambroj, haloj, portikoj kaj verandoj estis okupataj ĝis la lasta anguleto de pilgrimuloj, ranĉistoj kaj ties familioj, de brutkomercistoj kaj kunaĉetistoj de la produktoj kiujn prezentas la indiĝenoj sur la foirplaco.

La komercistoj dormis kun siaj helpantoj sur kaj sub kaj apud la tabloj de siaj vendostandoj. Tiel ili ŝparis la elspezojn por la tranoktejo kaj samtempe ili ne devis pagi viron, kiu gardus iliajn varojn kaj la tegmentajn konstruaĵojn de iliaj tabloj. Pri la gardistoj krome oni ne scius, ĉu ili uzas sian gardadon por ŝtelado. Estis ja kelkaj policistoj proksime, kiuj dum la noktoj permesis al neniu, eĉ ne al komercistoj, forlasi la foirplacon kun pakaĵo. Sed ankaŭ ne estis certe, ke la komercistoj ne ŝtelas inter si mem kaj unu de la alia, se ili havas okazon por tio. Kompreneble, la ŝtelintaj kaptitoj havis nenion, pri kio ili povus ĝoji. Se ili efektive venis vivantaj ĝis la policejo, kio apenaŭ atendeblis, la policistoj trenadis ilin en tia stato, ke la korpoj ĉie estis kovritaj de batoj, kaj tiom sangantaj el ĉiuj truoj kaj ŝvelaĵoj, ke la batitoj preferus tuj esti

mortpafitaj. Spite al tiaj perspektivoj de kaptita ŝtelisto okazis tamen sufiĉe da rabado. La plej sekura rimedo por malhelpi la ŝteladon estis tio, ke la komercistoj dormis sur siaj varotabloj kaj varopakaĵoj, tiel ke la aliro al iliaj riĉoĵ eblis nur trans ilia kadavro. Ili ĉiuj havis ja pezan revolveron enigitan je la ledozono. Tiun zonon ili iom malstreĉigis por la nokto, estas vere, sed ili ne tute demetis ĝin.

La monon enspezintan dum la hela tago, ili portis en alia ledorimena zono, kiun ili kunbukis sur la nuda korpo. Tiu rimena zono estis vaka, tiel, ke oni povis enigi la orajn kaj arĝentajn monerojn kvazaŭ kiel en hoson.

Per ĉiuj tiuj zorgoj kaj ĉagrenoj la indiĝenoj estis malmulte ŝarĝataj, kiuj vizitis la feston. Ili ne havis multon, kion iu povus ŝteli de ili.

Ankaŭ, tiukaze, se en la loko ili trovus loĝeblojn, ili tamen preferis kampadi sur la vastaj paŝtejoj ekstere de la loko. Tie ili havis dum la tuta nokto brulantan bivakfajron kaj neniu ĝenis ilin. La policanoj estis kuraĝaj nur interne de la loko, kie ili renkontiĝis ĉiam nur kun kelkaj indiĝenoj, kiujn ili facile povis superforti kaj devigi al laboro. Sed

ekstere de la loko, sur la grandaj vastaj ebenaĵoj, kie kampadis centoj kaj miloj de indiĝenoj, neniu policisto aŭ alia aŭtoritato kuraĝis promeni. Kaj se aŭtoritato tamen venis tien, eble vokita por agi kiel peranto en komerca kverelo, la aŭtoritato tiel memgarde traktis la homojn kvazaŭ ĉiu unuopulo el ili estus deputito de la parlamento. La plej bona revolvero de la urbestro aŭ de la polica ĉefo estis tie senvalora, se temas pri ties lasta senco: defendi serioze la propran vivon.

La indiĝenoj kampadis kune en grupoj, laŭ la familio kaj parencaro. Tiuj grupoj ree kampadis kune laŭ triboj. Se iu agento aŭ kunaĉetisto sciis el varoj de indiĝena deveno, al kiu tribo apartenas viro, kun kiu li devis trakti ion, li devis iri nur al tiu paŝtejo, pri kiu li sciis, ke tie troviĝas la kampadejo de tiu certa tribo. Dum la festo la triboj neniam ŝanĝis la kampadejon, kiun ili iam elektis post sia alveno.

Jam antaŭ ol komenciĝis oficiale la sankta festo, kio okazis per granda solena meso en la katedralo de la loko kaj post la fino de la meso per civila festeto antaŭ la municipo, do antaŭ la administrejo de la loko, kun permeso de instanco, en Hucutsin alvenis unuope kaj en grupoj tiuj indiĝenoj kaj mestizoj, kiuj estis varbitaj kiel laboristoj por la monterioj kaj kies kontraktoj komenciĝis en la semajno de la *Candelaria*-festo.

Ĉiun pluan tagon, kiun la festo daŭris, alvenis pliaj grupoj de indiĝenoj. Parto el tiuj laboristoj migris kun siaj parencaroj, al kiuj ili apartenis. Sed la plimulto el ili disiĝis de siaj familioj jam en sia hejma loko. Ili jam ne tute plenrajte apartenis al siaj triboj. Iliaj interesoj ne plu estis ligitaj kun la interesoj de iliaj parencaroj. Ili komencis senti sin superfluaj interne de sia parencaro. Tial ili plej ofte libervole marŝis sola sur sia vojo al la festo, kaj se ili aliĝis al aliaj grupoj survoje, tiukaze ĉiam al grupoj , kiuj same konsistis el varbitaj indiĝenoj por la monterioj. Kvankam ili tute ne konis tiujn homojn, eble neniam antaŭe vidis ilin, ili komencis tuj, kiam ili aŭdis, ke estas varbitaj laboristoj, formi komunan societon, kiu

tute anstataŭis la komunumon kun tiu parencaro al kiu ili estis ligitaj ĝis tiam. Instinkte ili intime aliĝis al la novformita grupo. Ili sentis, ke ili dum la sekvaj monatoj aŭ eĉ jaroj ne plu havos alian komunan societon, ke ili ĉiuj estos laborkamaradoj kaj per tio suferokunuloj, kaj ke ili nur per tio povas venki la ekestantan teruran hejmsopiron, se ili aliĝas al tiuj, kiuj same devas provi sufoki sian hejmsopiron por ne perei mizere.

Estis tute simile al tio, se rekrutoj renkontiĝas en la sama fervojvagono unu la alian kaj kuniĝas, se ili jam ricevis la ordonon submetiĝi al la moderna sklaviĝo, al la militservo en la civilizitaj landoj. Ili parolas per neniu vorto pri siaj familioj, siaj malĝojaj patrinoj kaj plorantaj amatinoj kaj profesioj. Plenaj de melankolio, sed tamen kun la firma decidemo de tiu, kiu rajtas pensi pri nenio, se li volas transvivi la devigon, ili parolas tute preterire pri la aĉetitaj aĵoj aĉetitaj; ili reciproke montras al si la akiritajn aĵojn kaj juĝas ties valoron kaj prezon, ili admiras aŭ grumblas pri tio, kion havas la alia kaj interparolas kaj kverelas nur por paroli kaj kvereli kaj por tute ne devi pensi pri tio, kio sekvos ekde morgaŭ.

La indiĝenoj, kiuj kolektiĝis en Hucutsin por plenumi sian *enganche*, sian laborkontrakton, kampadis ĉiuj sur la herbejoj sur multaj rokoj, kiuj etendiĝis en la oriento de la loko inter la tombejo kaj la urbo. Pro la rokoplena grundo de tiuj paŝtejoj tiu ĉi loko estas la plej mizera el ĉiuj kampoj, kiuj taŭgas por kampadejo. Tial tiu loko estas la sola, kiun la parencaroj kaj triboj ne sopiras.

Kaj tiel komenciĝas la nova vivo de la laboristoj por la monterioj: kontentiĝi pri tio, kion aliaj postlasis kaj kion aliaj ne ŝatas kaj kion ili ekuzas nur tial, se ili jam rezignis pri ĉiu espero eĉ nur iomete pli kapti en la vivo.

Estis strange kiel la varbitaj indiĝenoj, eĉ se ili estis neniam antaŭe en Hucutsin, alvenis en tiu kampadejo, sen tio, ke iu sendis ilin tien, sen tio, ke iu estus dirinta al ili, ke tie la mahagonlaboristoj havas sian kampadejon.

Per tiu ĉi serĉado kaj trovado de la kampadejo fare de la varbitaj laboristoj por la praarbaro, tiuj homoj definitive komencis solviĝi de sia tribo kaj de sia parencaro. Ili akceptis la odoron, la kutimojn, la manierojn de la

parolado kaj gestado de siaj novaj kamaradoj. Kaj tiel, kiel ankaŭ la bestoj de la arbaroj kaj prerioj, kiuj iam ekakceptis la odoron de la aliaj kunuloj, kun kiuj ili vagadas, ne plu estas agnoskataj kaj akceptataj de sia propra patrino, tiel ankaŭ tiuj junaj viroj pasigintaj kelkajn tagojn kaj noktojn en la kampadejoj de siaj novaj sortokunuloj, ne plu estis akceptataj kiel plenrajtaj apartenantoj de siaj parencaroj.

En tiuj kampadejoj, tuj kiam kuntroviĝis jam grupo, tuj fariĝis sovaĝe.

La plimulto de la junaj viroj estis sekve de la disiĝo de la patrino aŭ de la amatino en plej fia humoro. Aldoniĝis, ke ili pensis, ke ili povas subigi la ekestantan hejmsopiron nur per sovaĝeco, per bruskaj paroloj kaj kruda gestado. Sed instinkte ili uzis tiun akcelitan sovaĝecon ankaŭ tuj por tio respektigi sin dekomence ĉe ĉiuj aliaj kunuloj. Tiel oni evitis plej bone, ke tiu aŭ tiu povas esperi moki koste de siaj kunkamaradoj aŭ priŝteli ilin aŭ konkeri iujn avantaĝojn al si.

Per la kunpuŝiĝo de tiuj junuloj komenciĝis tuj la tute natura batalo pri la rezervado de la individuo. Tiu, kiu tie

ne batalis ekde la unua minuto pri sia neestingebla rajto pri vivo per vortoj, gestoj, pugnoj kaj trancĉilo, estis dum la daŭro de sia laborkontrakto perdita kiel individuo. Ne necesis, ke li gajnis en kverelo, ĉar ja ĉiam nur unu el du batalantoj povas gajni. Sufiĉis, se li ne toleris ion de kiu ajn. Se sukcesis al li meti kelkajn fortajn ŝvelaĵojn al al la alia, kaj se li kapablis deskrapi la nazan supraĵon de la alia, tiukaze ne damaĝis, se li mem tute frakasite de la alia, kuŝis surtere. La fakto, ke li defendis sin obstine kaj la alian per bone trafitaj batoj ne lasis senvundita, tute sufiĉis, por ke la alia kaj ĉiuj, kiuj ĉeestis tiun fratan kverelon, trifoje pensis pri tio, antaŭ ol ili ree komencis seriozan kverelon kun li.

06

Okazis en la dudek minutoj inter la sunsubiro kaj la komenco de la plena nokto, ke sur la ŝtoneca kampo, kie la praarbaraj laboristoj kampadis, alvenis la juna indiĝeno Andreo.

Li iris kliniĝinte sub la peza pakaĵo, kiun li portis sur sia dorso per larĝa kruda rimeno sur sia frunto. La ĉemizon li estis malvestinta, por protekti ĝin kontraŭ la trafrotado sur la dorso. Sur la nuda dorso li portis felon de antilopo, kiu estis fiksita per maldikaj krudaj rimenoj je fortika portobendo.Kaj sur tiu felo estis la pakaĵo.

Andreo surhavis blankajn kotonpantalonojn. La dekstra pantalonkruro estis suprenruligita ĝis la unua supra triono de la femuro. La maldekstra pantalonkruro estis suprenruligita ĝis la supra fino de la genuo. Je la piedoj li havis sandalojn faritajn el tre kruda ledo. Supre surligite sur la pakaĵo li portis sian ĉapelon. Estis la ĉapelo de la cokesoj, de tiuj indiĝenoj, kiuj havis sian loĝregionon en la okcidento de la ŝtato Ĉiapaso. Jen tre alta ĉapelo plektita el palmobasto, supre facile golfete kavigita en tute stranga maniero, kiu ĝin diferencigas pro tio sendube

de ĉiu alia simila ĉapelo.

La juna viro havis bronzan haŭtkoloron, fortan nigran densan hararon senordigitan sur la kapo. Sed lia hararo ne estis duonlonge fortranĉita horizontale sur la frunto kiel ĉe la indiĝenoj de la bienoj kaj ĉe la sendependaj vilaĝoj, sed li havis mallongan hararon laŭ la maniero de la meksikanoj en la urboj.

Tiu fakto, ke la frizo de lia hararo ne identis kun lia cetera aspekto kaj kun la pure indiĝena maniero kiel li portis sian pakaĵon, estis la kaŭzo, ke ĉiuj junaj viroj, kiuj kuŝis sur la vasta kampo, turnis siajn okulojn al li. Ili estis certaj, ke tiu junulo mistrafis la vojon kaj ne apartenas al tiu kampo. Tuj antaŭ la bivakfajro, kiu estis plej proksima al li, kriis unu el la indiĝenaj viroj en la lingvo de la celtaloj transen: „He, vi, knabineto, kien vi volas iri, kotonulo. La indiĝenaj komercistoj havas siajn standojn en la strato, kiu kondukas de Teultepec rekte malsupren en la pueblovilaĝon.“

„Mi do travenis ĝis tie ĉi“, vokis Andreo respondante en la celtala, „sed mi estas ne *comerciante,* komercisto. Mi iros en monterion. Kaj mi supozas, ke estas ĉi tie, kie la

peonoj ĉiuj kolektiĝas por la *enganche*.“

„Ĉu ankaŭ vi iros al monterio?“ demandis vokante alia ulo ekde la sama bivakfajro. „Kion vi faros tie? Ĉu vi estas *capataz*, he vi? Jen ni tuj antaŭe foje interparolu kaj suke. Morgaŭ eble estos tro malfrue, se vi estas skurĝisto kaj punekzekuciisto. Vin, *hermanito*,.mia dolĉa frateto, mi atendas nun jam jaron.“

La indiĝeno, dum li parolis, proksimiĝis al Andreo.

Nun li staris antaŭ li, pugnigis ambaŭ manojn kaj vokis: „He, vi, mizerulo kaj pendumisto, ĵetu malsupren vian pakaĵon. Mi ne larĝbatos la grimacilon al iu, kiu havas pezan *carga*-n, ŝarĝegon sur la nuko.“

Andreo surgenuiĝis, tiris la kapon el la fruntobendo, ŝovis sin iom antaŭen por deiĝi de la pakaĵo kaj tiam ekstaris.

Sed antaŭ ol li povis rektiĝi genue, li ricevis fortan pugnobaton mezen de la vizaĝo. Li ekŝanceliĝis, skuis sin, saltis flanken kaj sekundon poste li troviĝis jam en gaja batalo kun la atakanto.

Ili batadis unu la alian kaj petoladis certe dum dek

minutoj sen tio, ke tiu aŭ tiu ĉi fariĝis en la batalo la finfina venkinto.

Tiam ili ŝajne samtempe ekakceptis, ke ĉiu el ili kaptus sufiĉe da batoj, kaj, ke tial la tuta batalo estas sensenca. Kaj kiam ili foje ambaŭ estis dum duono de sekundo liberaj unu de la alia, ili samtempe retrosaltis por gajni sufiĉe da interspaco.

Tio havigis Andreon la tempon finfine respondi la salutdemandon de la ekscitita junulo: „*Loco*, mi supozas, ke vi estas freneza supre kaj malsupre. Mi ne estas *capataz*, neniam estis *capataz*, nenie, en neniu bieno kaj en neniu monterio. Por ke vi sciu tion, *burro*, azeno, kiu vi estas. Kaj nun alvenu, mi hi*ĳito*, filĉjo. Ĉifoje mi kaptos vin, kaj suke, nun mi estas preta por la tumulto."

„Ĉu vere?" demandis la alia. Li nun komencis paroli hispane. „Ĉu tio estas la vero? Vi do ne estas *capataz*, ĉu? Jen do sidiĝu, ĉi tien al nia bivakfajro. *Bienvenido amiguito*. Estu bonvena, amiketo."

„Ne ĉi tien", diris Andreo. „Mi volas serĉi al mi fajron, kie sidas aliaj *muchachos*, kiuj apartenas al la fie naskita putinoservisto Gabriel. Tiu hundido de seksperfortita

endogamia kojoto, tiu estas mia *enganchador*.“

„Jen vi ĉi tie estas en la tute ĝusta konfidata hejmo“, enmiksiĝis dua junulo, kiu sidis ĉe la bivakfajro. Ankaŭ li diris tion hispane. „Jen, tiu ĉi hejmeca kuirfajro estas de plena grupo de la senhonoriganto de inoj, de tiu Gabriel. Kiel estas lia famila nomo? Mi memoras, Orduñez. Jen li. En tiu kazo vi elserĉis al vi ja noblan *enganchador,* frateto. Ankaŭ infanojn li murdis. Lian propran fraton li ligis al vosto de ĉevalo kaj deskrapis la haŭton de li tiom, ĝis fine restis eĉ ne peco da karno sur liaj ripoj. Ĉu vi scias, kio li estis iam? Ŝovu do vian pakaĵon proksimen. Mi verŝos akvon al vi sur la manojn, por ke vi povu lavi vin. Jen, prenu la kafon. Vi rajtas varmigi ankaŭ kelkajn *totopostles*. Kaj prenu al vi sufiĉe da *frijoles*. Ni ne estas povraj. Tute ne pensu tion pri ni. Ni estas la mahagonhakistoj. Gajaj kaj kontentaj kaj kantas ĉiam kantojn. Prefere surmetu vian ĉemizon. Vi tro rapide malvarmumiĝus kaj morgaŭ vin kaptos la *calentura* je la nuko, la febro, kaj ni devos porti vin pene. Do, prenu al vi, senĝenite, ankaŭ de la viando. Morgaŭ ni kaptos pli da kokinoj, se la homoj iros al la karnavalo. Ausencio gardas pro la policistoj, kiuj en ĉiu kazo ja nur serĉas ebriiĝintojn por sorĉe enpoŝigi la punmonojn al la *alcalde*. Mi tiom

rapide turnas la kolon de la kokinoj, ke ili pro tio tute forgesas krii kaj pepas nur kiel musoj.“

Andreo lavis sin, metante la manojn sub la premkavetigitan kaldronon, kiun lia kamarado tenis, li frotis la manojn ĝis ili estis sekaj, skuis la akvon el sia vizaĝo, gargaris la buŝon, sputis la akvon kun vasta arko malproksimen kaj ŝovis tiam kelkajn el la ofertitaj grandaj tortiljoj al la fajro.

Gabino, la juna viro, kiu faris tiun longan paroladon al li, supozis, ke necesas distri pro gastamikeco la novalvenintan laborkunulon. Ili parolis de nun ĉiuj hispane.

Gabino plu paroladis seninterrompe: „Ni ĉiuj ĉi tie estas el la *enganche* de la ĉevalŝtelisto Gabriel. Jen, ankaŭ la sekva bivakfajro. Ja la tuta plimulto de la viroj, kiuj havas ĉirkaŭe sian fajron, ili apartenas ĉiuj al la *enganche*, al la kontrakto de la elkraĉita Gabriel.“

„Ĉu elkraĉita?“ vokis unu el la junuloj, „elkraĉita, ĉu? Ke mi ne diskrevu pro ridado. Tiu ne estas elkraĉita. Tiu ne estas naskita de ino de antaŭe. Tiun mefito malantaŭe lakse elfurzis, kaj la mefito eĉ ne haltis por rigardi, kio ĝi

estas. Ĝi nur kuris kaj kuris por foriĝi je longa distanco kaj por esti senkulpa je la tago de la Lasta Juĝo pri tia monstro.“

Andreo trempis la varmigitajn grandajn tortiljojn en la kafon kaj diris: „Se vi ĉiuj scias, kia fripono li estas, kial vi do lasis kapti vin kaj surhokigi de li? Tion mi volus scii.“

„Verŝajne vi estas tute libervola ĉi tie. Sed tiukaze vi estus la ununura. La ununura en la tuta mondo. Aŭ vi ne scias kien vi venos, kaj kio okazos al vi“, diris Gabino.

„Libervole mi ne estas ĉi tie“, respondis Andreo.

„Tion vi ne devas diri al ni“, opiniis unu el la viroj.

„Ne, libervole ne“, parolis Andreo plu. „La bienulo je kiu mia patro estas peono, bienlaboristo, volis enkasigi la sesdek ŝuldopesojn, kiujn havas mia patro ĉe la patrono. Mia patro fariĝis nun kaduka kaj la bienulo supozis, ke mia patro ne povas forlabori la ŝuldon kaj povus morti antaŭ ol la lasta centavo estas pagita. Jen li do vendis mian patron por la ŝuldosumo al *don* Gabriel, al la *engachador* de la monterioj por ricevi sian monon kun certo. Mia patro ne transvivus la unuan semajnon en

monterio. Verŝajne li eĉ ne eltenus la longan marŝon en la ĝangalo. Jen mi iris hejmen de mia laborloko kaj transprenis la kontrakton de mia patro.“

„Ĝuste tio estas, kion mi diris“, rimarkis Gabino, kiu ŝovis leĝere branĉon en la fajron. „Vi estas same tiel libervole ĉi tie, kiel ni ĉiuj. Tiel kiel la indiĝenoj de la tuta kampadejo, kiuj ĉi tie ĉie sidas ĉe la fajroj kaj atendas la ekmarŝon. Ĉiuj venis tiel libervole kiel ilia naskiĝo, je kiu ili same tiom senkulpas. Kaj vi ne devas paroli plu, kial vi estas ĉi tie kaj kiel ĉio iras enmonde. *Don* Gabriel ne estus kunaĉetinta vian patron por monterio, se ne la patrono aŭ pli bone la patrono de lia patro estus dirinta, ke vi estas juna kaj fortika ulo, kiu kapablas labori. Tiu scias bone, tiu ĉevalperfortisto kaj beboŝtelulo, ke vi anstataŭos vian patron, se la tago de la ekmarŝo proksimiĝas.“

Andreo turniĝis kaj demandis: „Kie cetere estas la *muchacho*, kiu volis rompi mian kapon kiel nukson?“

„Vi celas Celson, la knabon el Chamula, ĉu ne?“

„Li ja certe estas el Chamula, mi pensas.“

„Tiu“, respondis Daniel, „li iris al la rojo por forlavi la

sangon de si kaj por fridetigi la okulon, kiun vi nigrigis per batoj.“

„Tio certe ne estis kulpo mia“, diris je tio Andreo. „Mi ne komencis tion. Li alsaltis min kiel sovaĝa hundo. Mi tute ne konas la ulon. Al li certe mankas klapo en la kapo.“

„Ĝuste“, respondis Gabino, „vi tute bone divenis, *m'ĵito*, fileto mia. Li hodiaŭ estas iom ekster si. Tion vi ne devas noti malbone al li, al Celso. He“, nun interrompis sin Gabino, „kiel vi nomiĝas cetere?“

„Andreo.“

„Do, Andreo. Nu, kiel mi diris, Celso estas tute konfuzita enkape ekde hodiaŭ matene. Jen historio, *hijito mio*, knabineto mia. Gaja aŭ malgaja, tute dependas de tio kiel vi rigardas la rakonton.“

Kaj Daniel diris: „Mi ja nun volonte volus scii kiel kondutus vi, se estus vi en la haŭto de Celso.“

„Sed tute certe mi neniel damaĝis al li“, respondis Andreo. „Vi devas paroli ja pli klare, se mi sciu, kio ĉi tie estas aŭ dekstra aŭ maldekstra. Kaj tuj, kiam mi scias

tion, mi povas defendi min mem aŭ eviti la vojon, se ŝajnas al mi pli avantaĝe.“

Rimarkoj
alcalde = alkaldo = lokestro, urbestro ks.
amiguito = amiketo
Chamula = loko, centro de la cocilaj maja-indiĝenoj en la federacia meksika ŝtato Ĉiapaso.
capataz = skipestro, gvidanto de la laborgrupo
capataces = skipestroj, gvidantoj de laborgrupo
Ĉiapaso = Chiapas (en la originalo)
Cocilo = Ttzotzil-ano
endogamio = devigo klane geedziĝi
frijoles = faboj, fazeoloj
hijito = eta filo
m'ijito = eta filo mia
muchachos = knaboj, junuloj, eŭfemisme: servistoj
totopostle = granda tortiljo el flanoj de maizkaĉo kun diametro de tridek kvin centimetroj, kiuj estas dikaj du milimetrojn. (laŭ ĉapitro 6 de la libro)

Ĉapitro 03

01

„Celso“, komencis paroli Gabino, „ estas diable bona ulo, bonega *compañero*, vera kaj plenvalora kamarado, kiu ne lasas sidi vin en kaĉo, sed tio, kio estas valora por monterio estas tio, ke li krome estas rekonata kiel unu el la plej diligentaj laboristoj, egale, kion ajn li faras. Li hakas kiel urso, portas kiel elefanto, trenas kiel jungitaj muloj kaj kapablas marŝigi bovojn en kolono tiel, ke ili paŝas tiel kiel ripozintaj kaj lubrikitaj soldatoj. Tian viron monterio ne volas perdi, tiom malpli *contratista,* kontraktisto, kaj se *enganchador* povas kapti lin, tiukaze tio enspezigas oron al la *enganchador*.

Celso havis tie en Ishtacolcot knabinon, li simple estus povinta kapti ŝin kaj forkuri kun ŝi. Sed la junulo havas koron, tio estas lia malavantaĝo. Li ne volis kauzi aflikton al la patro de la knabino. La patro ne donas la knabinon malkare al li. Ŝi estas linda, forta kaj sana. La patro opinias, ke ŝi facile povus alporti dekkvin infanojn al li, se la juna viro ne disipos tempon. Kaj tial la patro por la knabino volas havi konsiderindan belaspektan monteton

da mono.

En Ishtacolcot Celso neniam povus perlabori tiun monteton, li ofertis sin labori tri jarojn por la patro de la knabino. Sed la oldulo volas havi rigardeblajn valoraĵojn. Mi ne scias, kiom da ŝafoj, kiom da kaproj, kiom da maizo, lano, tabako kaj brando li surnukigis al la junulo pro la knabino. Sed temas pri konsiderinda monteto, tio estas certa. Vi povas demandi Jose, kiu sidas tie transe je la postsekva bivakfajro, li estas el la sama *comarca*. Eble li scias tion precize. Sed estas ja pri la afero tute egale, ĉu estas dek ŝafoj aldonaj aŭ kvin kaproj malpli.

En Ishtacolcot Celso lasis varbi sin por kafoplantaĵo, tie, ie en la regiono de Tapachula. Post du jaroj da ŝvitado, ĝemado kaj ŝparado li kolektis per sia laboro sufiĉe altan sumeton. Estis damnite multekosta mono. Ĉiam labori en kafovalo ne estas ĝojo. Preskaŭ tia aĉa, kia monterio. Tion mi rajtas diri al vi, ĉar mi tie estis tri monatojn pro la *cosecha*, pro la rikolto. Oni pagas al vi por korbo. Sed antaŭ ol vi kunhavas cent korbojn, vi ja devas salti, fileto mia. Se la *capataz,* la gvidanto de la laborgrupo, fihumoras, jen li vidas tro multe da verdaj kafograjnoj en korbo, tiukaze li elŝutas la korbon, sen enskribi ĝin por la

plukinto, kaj tiukaze vi plukis la tutan korbon por nenio. La *dueño*, la posedanto de la plantejo, kompreneble ne forĵetas la kafograjnojn. Nur al aliaj li minusas ilin.

Kiam Celso jam du jarojn laboris tie kaj kunhavis konsiderindan sumeton, li ekmarŝis hejmen sur la plej mallonga kaj plej komplika vojo tra Niquvivil kaj Salvador. En ĉiu vilaĝo, kiun li tramarŝis, la lokestro forprenis de li dek centavojn por la rajto iri tra la loko. Kaj se estis kaduka ponto ie sur la vojo, oni forprenis dudek centavojn de li, pontomonon. Ĉie ĉe la vojo oni ofertis kontraŭleĝe brandon al li. La malpermesita brando estis pli multekosta ol la permesita, kaj ĉar ĝi estis malpermesita, ĝi estis krome eĉ aĉa. Pura veneno. Ĉie oni volis ebriigi la junulon, por ke oni povu aresti lin, por meti lin en karceron pro ebrieco. Se tia junulo kiel Celso matene vekiĝis kaj volis marŝi plu, li kompreneble ne plu havis monon, eĉ ne unu centavon. Oni ja ne povas atendi, ke polica ĉefo por nenio metas iun en la karceron. Kaj se oni plendas pri tio, ke la polica ĉefo forprenis la monon, tiukaze oni devas punlabori dum monato en la vilaĝo pro ofendo de la aŭtoritato.

Sed Celso lernis sufiĉe en la plantejo el la spertoj de la

aliaj peonoj. Li trinkis eĉ ne gluton, eĉ se oni ofertis ĝin por nenio, pro pura nura amikeco. Kion li bezonis survoje, tion oni vendis al li je kvarobla prezo, ĉar li estis ja kafolaboristo, kiu riĉiginte revenis hejmen el plantejo.

Sed ankaŭ en tiu kazo li estis lerta kaj ruza. Li migris tute ĉifonita kaj rakontis al neniu, ke li revenas hejmen el kafoplantejo. Kiam la posedanto de magazeno ĉe la vojo demandis lin aŭ se aŭtoritato volis scii, de kie li venas, li diris, ke li kondukis kvar mulojn por sia patrono de Jovel al Huixtla.

Jovel estis la lasta urbo, tra kiu li iris antaŭ ol atingi sian hejmlokon. De tie estis nur plu proksimume dudek kvin kilometroj tien.

En Jovel li sentis sin jam en la hejmregiono. Ĉiun semajnon aŭ almenaŭ du fojojn ĉiumonate li venis al Jovel por tie vendi por sia patro maizon, lanon, hakitan lignon, krudajn felojn aŭ ruĝajn kapsikojn. Li aĉetis por kvin centavoj bananojn al si ĉe etkomercisto, kiu estis metinta siajn varojn sur petaton en la portiko de la urbodomo. Tiam li krucis la straton kaj kaŭriĝis sur la nudan lokon de la placo. Sur la placo kompreneble estis

starigitaj aro da benkoj.

Sed tiuj benkoj estis nur por la ladinoj, por la civilizita loĝantaro de la urbo. Kompreneble tia civilizeco ne sufiĉis en ĉiuj kazoj ĝis tiu ŝtupo, en kiu ĉiu sentas sin devigita ĉiumatene bonorde lavi kaj razi sin. Kun tiaj flankaj aferoj oni povas atendi trankvile ĝis dimanĉe posttagmeze, kaj tamen oni ne perdas la rajton validi kiel ladino.

Celso, migranta indiĝeno, estus forpelata de policano, se li havus la kuraĝon sidiĝi sur neuzitan benkon. Sed de la nuda pavumita tero de la placo la policistoj ja ne forpelis senmastrajn hundojn. Tial oni ankaŭ lasis kaŭri tie la indiĝenojn, kiuj volis ripozi.

Sur unu el la benkoj sidis du ladinoj. *Caballeros*. Ili fumis siajn cigaredojn kaj kritikis la registaron.

Jen diris unu el la ĝentlemanoj: 'Jen vagadas ĉi tie tiom da uloj en la *ciudad,* en tiu ĉi urbo, kiuj ne havas ĉemizon, kiu kovrus ilian postaĵon kaj, kiuj tamen montras mienon, kvazaŭ ili lue prenis la urbon laŭ kontrakto kiel hereditan farmon. Kaj jen aliaj kontraŭe al tio – rigardu foje la Chamula-junulon, kiu tie kaŭras sur la tero kaj

manĝaĉas bananojn. Li aspektas, kvazaŭ vi devus doni centavon al li, por ke li povu vivi plu. Kaj tiu kota ulo havas sepdek pesojn en poŝo aŭ kunrulis ilin en sian pantalonzonon.'

'Kial vi scias tion tiel precize?' demandis la alia kavaliro.

'Li ja estas de mia bieno, kie li laboris du jarojn en la kafoplantejo. Celso li nomiĝas. Jen la filo de Francisko Flores el Ishtacolcot.'

'Ĉu vere?'

'Certe. Sed kiel tiu *muchacho* koncernu min? Milojn kaj milojn de oraj pesomoneroj jam ensakigis la guberniestro por la aŭtovojo al Arriaga. Kaj milojn kaj milojn de pesoj li ankoraŭ ensakigos, antaŭ ol oni vere glate traveturos kun aŭtomobilo sur la vojo. Sed la afero estas ĝuste tiu...' Sed la alia kavaliro ne havis intereson je la miloj de pesoj, kiujn la guberniestro estis enkasiginta por aŭtovojo, kiu neniam estis konstruita aŭ nur tiom mankoplene konstruita, ke ĝi rekonstruendis post ĉiu pluvotempo por doni tiel al la guberniestro denove la okazon ensakigi milojn de pesoj, kiuj estis imposte postulitaj oficiale kiel kromtarifo. La kavaliro kiel guberniestro farus tion tute

same. Sed ĉar li momente ne estis guberniestro, li devis enspezi siajn pesojn alimaniere. Tial li ne aŭskultis, kiam la alia hontinde fulmotondris ion pri la registaro, sed li vokis transen al la indiĝeno Celso: 'He, vi, venu ĉi tien!'

Celso turniĝis, kaj kiam li vidis ladinon, kiu vokis al li, li servoprete eksaltis supren kaj proksimiĝis al la *caballero*. La bananon, kiun li ĵus komencis manĝi, li lasis enmane.

Kiam li staris antaŭ la *caballero*, li diris: '*A sus ordenes, patroncito*. Je via servo, patronĉjo!'

'Vi ja konas min', diris la *caballero*.

'Jes, patronĉjo, kompreneble mi konas vin. Vi estas *don* Sixto.'

'Ĝuste. Mi vendis al via patro du junajn bovojn. Li pagis nur parton al mi. Kaj via patro pere de garantianto, do per Cornelio Sanchez, kiun ja ankaŭ vi konas, garantiis al mi kun sankta ĵuro, ke li volas pagi la restaĵon je la sama tago, kiam vi revenos el la kafoplantejo kun la mono hejmen. Tio estas precize sepdek ses pesoj kaj kvindek centavoj, kiujn via patro devas pagi. Donu la monon al mi, tiukaze via patro ne devas veni ĉi tien en la urbon kaj

iri la longan vojon. Ĉu tio pravas pri la ŝuldo, *don* Emiliano?' demandis *don* Sixto.

'La ŝuldo estas laŭorda, kaj tute laŭorde garantiata', respondis *don* Emiliano.

Dum momento Celso havis la penson, ke *don* Emiliano ne efektive povas scii, ĉu la ŝuldo estas laŭorda kaj ĉu kaj kiel ĝi estas garantiata, ĉar li vidis *don* Emilianon ankoraŭ kelkajn tagojn antaŭ la ekmarŝo en la plantejo. Sed li ankaŭ tuj sciis, ke kontraŭ la aserto de *caballero* la ĵuro de indiĝeno ne havas valoron. Se la *caballero* simple diras, ke Tero turniĝas ĉirkaŭ Suno, jen la indiĝeno devas rigardi tion kiel veron, eĉ, se li povas vidi per la propraj okuloj, ke Suno turniĝas ĉirkaŭ Tero. Kaj tiel tio funkcias pri ĉiuj aferoj, kiujn diras *caballero*. Sed jen eĉ du *caballeros,* kiuj asertas ion, kion li ne povas scii, ĉar li ne estis hejme ja du plenajn jarojn.

Sed por pripensado kaj misfido oni ne lasis tempon al li.

Don Sixto agis rapide: 'Ek do, tuj donu la monon, *muchacho'*, li diris koncize kaj sen kompato. 'Se vi ne pagos tion, mi vokos la policon, kaj en la karcero vi povos pensadi pri tio, kio estas garantiata ŝuldo.'

El la malĝoja sperto de multaj el liaj kuntribaj fratoj Celso sciis, ke la karcero fariĝas tre multekosta por indiĝeno. La monon oni forprenus de li en ĉiu kazo, ĉar li ne povus kaŝi ĝin. Sed kiel aldonaĵon oni verŝajne kroĉus verdikte aldone ankoraŭ tri monatojn da punlaboro al li pro delikto, kiu nomiĝas vualado de devigo pro ŝuldo. Juĝisto aŭ polica ĉefo devis trovi nur la ĝustan vorton, kaj tuj estus delikto aŭ krimo, kion ajn indiĝeno faris.

Celso malvolvige deprenis la ruĝan lanan zonon. Ĉe tio falis lia mallonga katunpantalono sur la teron kaj li staris tute nuda antaŭ *don* Sixto. Li ne rimarkis tion, ĉar li sentis amarecon en la buŝo, en la stomako kaj en la animo. Li disruladis zorgeme kaj tre malrapide la lanozonon, kvazaŭ li povus protekti per hezitado la tiel pene akiritan monon, kiu havis la taskon doni al li la eblon de edziĝo kaj la esperon pri dekkvin infanoj. Sed eĉ ne unu centavon li povus kaŝi por si sen tio, ke *don* Sixto malkaŝus ĝin.

Finfine li tute disrulis la zonon. Por malhelpi, ke la mono ruliĝu teren, li kaŭriĝis kaj apogis la brakojn sur la genuojn. Poste li prenis ĉiun peson unuope el la zono kaj metis unu post la alian en la malferman manon de *don*

Sixto.

Celso ne kunkalkulis. Sed *don* Sixto diris la nombrojn, ĉiun unuope, ĉiam tiam, kiam peso estis metita manen.

Ĉiufoje, se li havis dek pesojn enmane, li malplenigis la manon per tio, ke li lasis gliti la monon en pantalonpoŝon, foje en la dekstran, foje en la maldekstran, poste en la dekstran dorsflankan kaj tiam en la maldekstran dorsflankan, tiam ree en la dekstran antaŭan.

Don Emiliano rigardis lin ĉe tio kaj kunkalkulis silente. Nombri monon estis pli interese ol ĉagreniĝi pri la neuzebla aŭtovojo de la guberniestro.

Venis la tempo, kiam *don* Sixto havis sepdek pesojn en la poŝoj. Li ree malfermis la manon, tenis ĝin al Celso, kaj kiam li havis pliajn sep pesojn, li diris: '*Basta, muchacho*. Mi redonas nun kvar realojn al vi. Honesteco estas honesteco. Mi ne volas havi eĉ nur unu centavon pli ol mi rajtas pretendi. Do, kaj nun mi skribos la kvitancon por vi. Ne pensu, ke mi volas veni duan fojon por pretendi la monon. Honesteco kaj deco regas la mondon.'

Li prenis etan notlibron el la ĉemizopoŝo, elŝiris kun avara zorgemo folieton kaj skribis kvitancon, ke li ricevis de Francisko Flores la plenan sumon por du bovoj per pago de restaĵo de sepdek ses pesoj kaj kvindek centavoj je la aktuala tago. Li skribis sian nomon sub tion, kun dek svingoplenaj arabeskoj, pri kiuj li supozis, ke neniu falsisto povus imiti ilin.

'Venu', li diris al Celso, 'mi tuj plenumos tion rilate la impostojn, por ke vi havu plenvalidan kvitancon por via patro.'

Li lasis atendi Celson ekstere, dum li surgluigis kaj stampigis la markojn en la oficejo de la poŝtmarka filio. Li elvenis, iris kun Celso reen al la placo, kie *don* Emiliano ankoraŭ nun sidis sur la benko, li fumis cigaredojn kaj pensadis pri la fia registaro, al kiu li ne apartenis. *Don* Sixto sidiĝis apud li kaj donis nun la kvitancan notfolion al Celso.

'Jen la kvitanco antaŭ atestanto', li diris, '*don* Emiliano estas atestanto, ke vi pagis por la bovoj. La kvitanco kun la markoj nun estas laŭleĝa kaj ankaŭ la brulmarkoj de la bovoj estas enskribitaj.Nur ne pensu pri mi, ke mi

forprenas vian monon. Alia ne tiel bonvoleme traktus indiĝenon, kiel faras mi tion; alia ne donacus la impostmarkojn al vi. Ĉe alia, kiu havas malpli da koro, vi devus pagi eĉ la impostmarkojn. Do, fortrotu nun, transdonu al via patro la kvitancon kaj ne aĉetu al vi *aguardiente* ekstere en la lasta brandofarejo ĉe la vojo. Diru al via patro, se li eble volas havi bovon aŭ mulon aŭ la plej bonan semon en la federacia ŝtato, ke li povos ricevi ĉion ĉi de mi kaj por la plej malmultekostaj prezoj en la tuta distrikto.'

Li svingis la kapon ordone al Celso por tiel diri: 'Ek do, formarŝu, mi havas nun aliaĵn taskojn, kiujn mi devas plenumi.'

Celso parte turniĝis kaj retroiris kelkajn paŝojn. Instinkte li iris al siaj bananoj, kiujn li devis lasi kuŝi surtere, kiam la *caballero* vokis al li. Sed kiam li rigardis tien, li rimarkis, ke ĝuste hundo tenis unu kruron super la bananoj. La hundo ja ne sciis, ke oni povas manĝi bananojn. Kompreneble, se li estus plenkreskinta en Tabasko, li scius tion. Sed ankaŭ en tiu kazo la bananoj por Celso estus perditaj.“

Rimarkoj

aguardiente = brando
basta = sufiĉe
caballero = sinjoro, kavaliro, ĝentlemano, honorindulo
compañero = kunulo, akompananto, kamarado
comarca = regiono, lokokvartalo, urbokvartalo
contrastita = kontraktisto
dueño = posedanto
ladino = mestizo = ido de blankuloj kaj indiĝenoj, en Ĉiapaso uzata specife por kontrasti indiĝenojn kaj ne-indiĝenojn, do ne nur mestizojn, sed ankaŭ blankulojn.

02

Kvazaŭ batite surkape, Celso peze paŝis proksimiĝante al la katredralo, kiu plenigis flankon de la placo kaj kies flanka enirejo troviĝis transe de la *cuartel*, de la kazerno de la soldatoj. Li haltis ĉe vendotablo, kiun komercistino starigis en la enirejo de la katedralo, li aĉetis du verdajn kandelojn, arĝentan steleton kaj arĝentan koreton. Unu kandelon li dediĉis al Sankta Virgulino, ĉar ŝi protektis lin survoje, unu kandelon li dediĉis al figuro, pri kiu li pensis, ke ĝi estas *San Andres,* Sankta Andreo, la sankta patrono de lia hejmregiono. La arĝentan koreton li donis al ina figuro de sanktulino, kiun li ne konis. Li ankaŭ ne scis, kial li donis la arĝentan steleton al ŝi. Sed la steleton la komercistino vendis al li kiel oferon por bonŝanco. Kaj la arĝentan koreton li metis sur balustradon de la ĉefa altaro kun la espero, ke nokte tiu Virgulino elvenos el sia larĝa ora kadro kaj prenos la koreton al si.

Kiam li metis la koreton sur la balustradon, li pensis pri la knabino, kiun li intencis edzinigi.

Nur en tiu ĉi momento, kaj eĉ ne unu fojon dum la komerco kun *don* Sixto, li ekkonsciis pri tio, ke li laboris

du jarojn en la kafoplantejo por nenio. La knabinon havi kiel edzinon, estis por li nun tiom malproksima, kiom je tiu tago, kiam li lasis varbi sin por la kafoplantejo. Li ne kapablis kompreni, kiel okazis, ke li donis sian monon tiel libervole al *don* Sixto, sen protesti, sen fari la provon forkuri. Nur nun venis en lian kapon, ke eble la tuta pago estis trompo. Sed li konis *don* Sixton. Tiu estis tre estimata en la urbo kaj Celso havis grandan respekton al li, kompreneble respekton, kiu estis ŝajne nur timo. Se *don* Sixto nur alvokus policiston kaj dirus: 'Ĵetu tiun Chamula-bubon en karceron!' Tiukaze oni arestus la knabon kaj metus lin en prizonon, kaj tie oni tiom longe retenus lin, ĝis *don* Sixto irus al sia amiko, al la polica ĉefo, kaj dirus: 'Lasu nun forkuri la *muchachon*.' *Don* Sixto estis honorata civitano de la urbo. Kaj rekonataj civitanoj havas rajtojn.

Celso surgenuis sur ŝtona planko, kiu estis abunde kovrata de abiopingloj, kaj li preĝis: *Ave Maria, Madre de Dios, ora pro nobis.*“ Li ripetis tion dekfoje. Li ne sciis, kion tio signifas, kial li diris tion, kaj kiun celon havis. Sed lia patrino tiom longe antaŭparolis tion al li,.ĝis li povis postparoli tion, kiam li estis kvinjara kaj la unuan fojon en la katedralo en Jovel. Tio estis la ununura preĝo,

kiun li konis. Lia patrino ne sciis pli ol li, kaj ŝi tial ankaŭ ne povis antaŭparoli aldonan al li.

Fininte sian simplan preĝon, li kunigis la pintojn de siaj montrofingro kaj dikfingro kaj frapis ilin sur siajn lipojn kaj kisis tiam la fingropintojn.

Nun li ekstaris kaj forlasis la katedralon. Li faris ĉion, kion lia patrino konsilis al li, kiam li formarŝis al la kafoplantejo. Ŝi diris al li, ke li tiukaze, se li revenos al Jovel, al la lasta urbo, aĉetu du verdajn kandelojn kaj ekbruligu ilin en la preĝejo kiel oferon por la hejmveno kiel sanulo.

Ĉe la indiĝena komercistino, kie li aĉetis la bananojn, kuŝis lia vojaĝpakaĵo, kiun li tie por certa tempo deponis. Li iris al la komercistino, levis sian pakaĵon kaj survojiĝis al la lasta distanco ĝis sia hejmvilaĝo.

La lasta domo ĉe la elirejo de la urbo estis malgranda *tienda,* malgranda magazeno, en kiu havigeblis tio, kion indiĝeno eventuale bezonas. Sed estis nur tre malmultaj varoj, kiuj tie aĉeteblis. La malmultaj varoj, ĉiuj polvkovritaj kaj neniam tuŝitaj, kiuj tie kuŝis sur la ŝanceliĝemaj regaloj, ne estis por vendo. Ili servis nur por

pruvi al kontrolantaj oficistoj, ke tie estas ofertataj varoj. Kompreneble, ĉiu oficisto sciis, ke tiuj varoj estis nur por la ĵuro, ke li supozis, ke tie temas pri legala *tienda*. Por preni kaj akcepti monon por ke li kontrolu tiel kiel plaĉas al la posedanto de la eta magazeno, la oficisto ne devis ĵuri ion. Se efektive iam venis plendo, la juĝisto, kiu manĝis el la sama pelvo, el kiu manĝis ankaŭ ĉiuj ceteraj oficistoj, estis sufiĉe bonkora kaj komprenema ne demandi, ĉu oni ofertis kaj akceptis monon.

La posedanto de la magazeno kun siaj varoj, eĉ se ili estus de la plej bona speco, ne povis fari grandajn negocojn, ĉar neniu aĉetas siajn bezonaĵojn en la lasta aŭ unua domo de urbo, tiom longe, kiom li ne provis kiaj estas la prezoj kaj valoroj de la varoj interne de la urbo, kie la konkurenco devigas la komercistojn teni malalte la prezojn.

La negoco, kiun la viro tie faris, estis de pli simpla naturo. Li vendis *aguardiente* sen pagi impostojn. Je brando sen impostoj oni enspezas pli ol je brando kun impostoj. La vendisto dividis kun la trinkanto la monon, kiun la registaro gajnus el la malvirto. Kaj ĉar en tiu kazo la vendisto estas ankaŭ la produktisto de la brando, li havis la duoblon de la gajno.

La magazenposedanto ne havas licencon por la vendado de brando. Tio estus molesta, ĉar tiukaze venus la inspektoroj kaj kontrolus la barelojn, ili trovus la senimpostajn kaj ŝarĝus ilin per kvindekobla imposto. La viro ankaŭ ne vendas brandon en glasetoj; tiukaze li devus havi licencon por brandovendejo, kaj la ceteraj posedantoj de brandovendejo, kiuj honeste pagas siajn impostojn, denuncus lin.

La tiea komercisto vendis la brandon en boteloj, ĉar li ja ne havas brandovendejon. La trinkontoj devis veni kun boteloj. Sed tiu, kiu ne havas botelon, povas aĉeti ĝin. Post la eltrinkado ĝi estas reaĉetata. En boteloj oni povas vendi pli grandajn kvantojn ol en glasetoj.

Neniu rajtas trinki interne de la magazeno. Tio estas malpermesita, ĉar ĝi ja ne estas brandovendejo. Ĉio cetera, kion la viro faras, simile estas malpermesita. Sed, ke li respektas la leĝon kaj ne eksterleĝe agas, li pruvas per tio, ke li instigas ĉiun aĉetinton eltrinki sian botelon post la domo aŭ apud la domo.

Antaŭ la domo, apud la domo, malantaŭ la domo kaj laŭ la vojoj al la vilaĝoj de la indiĝenoj kuŝas viroj, inoj,

junuloj, ĉiuj tute ebriaj subsune. Ĉiuj en ĉifonoj, kun hararoj feltiĝintaj kaj pedikoplenaj, la ebriaj inaĉoj kun jupoj tiritaj ĝis supren al la kolo. Ĉemizojn ili ne havis por tiri ankaŭ tiujn supren. La ebriaj viroj kriaĉadis, ĝemadis dormis aŭ dancis. Estas efektive la tre abunda pentraĵo de granda inferopentristo, kiu havas sufiĉe da ironio bone rigardeble glosi la humilaĉan palavron:Kaj Dio kreis la homon laŭ sia bildo.

Ĉiu loĝanto de la urbo scias, ja ĉiu infano, ke tie senlicence kaj sen impostpago estas vendata altprocenta *aguardiente* en boteloj al la indiĝenoj. Ĉiu fiska inspektoro scias tion. Sed ĉiu asertas ne scii tion, ĉar la viro, kiu entreprenas la prosperigan magazenon, lasas abunde kunenspezi aliajn homojn, kiuj povus fuŝi la negocon al li per fia skribo, do ekzemple impostinspektorojn, urbestrojn, juĝistojn kaj policajn ĉefojn. Pro tio la viro estas potenca kaj timata de ĉiu ajn. Kaj la lando estas tiom plena de bonaj kaj belaj leĝoj, ke oni eĉ ne povas turniĝi sur kalkanumo sen treti en leĝon kaj transpaŝi samtempe tri aliajn. Sed ĉiuj tiuj leĝoj ne ekzistas por teni la landon kaj la popolon en bona moro kaj en civilizita stato, sed ili ekzistas, por ke la diputitoj, guberniestroj, ubestroj, juĝistoj, prizonaj administrantoj,

policaj ĉefoj kaj ĉiuj, kiuj bonŝancis kapti oficon por povi elpremi de la civitanoj monon, kiu ne estas enkontigita en salajrolistojn.

Ĉe tiu magazeno, argila domo sen fenestroj kaj kovrata per lignaj ŝindoj, alvenis Celso. Li sidiĝis dum certa tempo al la rando de la sabla strato, apogite kun la dorso al sia pakaĵo. Li intencis aĉeti multajn aĵojn en Jovel, por kunporti ilin hejmen kiel donacon. Por la patro sandalojn, por la patrino novan ruĝan lanrubandon plekteblan en hararplektaĵon, kaj por la fianĉino trembrilan kolĉenon el perloj. Li revenis nun sen donacoj, tute tiel, kiel eterne ebria indiĝeno, ĝuste tiel kiel la plimulto el tiuj viroj kaj inoj, kiuj tie kuŝadis en la proksimo de la magazeno kiel forlasita grego, ĝemante kaj senkonscie kaj estis vendintaj kaj forgesintaj donacojn, la mondon, la infanojn kaj la lastan restaĵeton de homa digno, kiu restis al ili spite al ilia povreco.

Sen donacoj li revenas hejmen kaj sen mono por la geedziĝo. Por *don* Sixto tiuj sepdek ses pesoj kaj kvindek centavoj estis ĝuste tiom, kiom leĝera klakado de fingro. Li perdis la duoblon dum horo ĉe ruleto sur la placo aŭ ĉe la ĵetado de kuboj en la vendejo por trinkaĵoj. Por Celso

tiuj sepdek ses pesoj estis dekkvin infanoj kaj ĉio, kion li bezonis por krei al si mondon, en kiu lia vivo ekhavas sencon.

Celso lasis kuŝi sian pakaĵon kaj iris en la magazenon. Li montris al ruĝa lanrubando, kiu pendis malsupren sur fadeno de lato. Ĝi estis tute kovrita de polvo kaj aspektis griza sekve de la polvo. La komercisto neniam havis la intencon vendi tiun lanrubandon aŭ ion similan, kion li havis en la magazeno. Tial estis egale al li, ĉu la aĵoj aŭ fariĝis polvoplenaj kaj ne plu frapis la atenton aŭ ne.

Li pikumadis enuigate per ligna dentopikilo en la buŝo, pigre turniĝis je duono, sed tiel ke li perdis la magazenan tabloplaton eĉ ne dum momento kiel apogilon. Li strabis supren al la kunfaldita rubando, turniĝis same tiom pigre reen, oblikvigis la buŝon, iom kunpinĉis okulon kaj diris: „De kie vi venas, *muchacho*? De kie vi estas?“

„De Ishtacolcot.“

„Do de Ishtacolcot. Vi ne aspektas kiel iu el Chamula. Vi certe estis en monterio. Ĉu ne?“

„Kiom kostas la rubando?“ demandis Celso denove.

„Nu, oni rigardu foje ĉi tien“, diris la komercisto mirigite. „Ĉu vi fariĝis nun dika kaj grasa? Vi havas ja tempon atendi. Ishtacolcot ne forkuros de vi. Ĉu vi volas akcepti gluton da brando? Mi donacos ĝin al vi.“

Celso turniĝis kaj volis foriri.

„He, vi“, la komercisto vokis al li, „iom elskuite el sia pigremo. „Ne forkuru, la rubandon vi povos ricevi. Ĝi kostas ok realojn.“

„La prezo en la urbo estis du realoj.

Celso iom malfermfaldis sian zonon. Li ne plu devis demeti ĝin por atingi la restaĵon de sia posedo. Li gratis el la faldo de la malfermfaldita zono la monon kaj kontrole nombris ĝin. Kiam li rimarkis, ke la komercisto observis lin, li turniĝis malkonfidiĝinte. Estis ankoraŭ kvardek sep centavoj.

„Ĉu vi povas lasi la rubandon al mi por kvardek sep *fierros*?“ li demandis la komerciston.

„Ne, tion mi tute certe ne povas, ĉe *Santísima Virgencita* kaj ĉe *San Jose* kaj la infano. Mi ne povas fordoni ĝin por

tio.“ La dentpurigilo ŝoviĝis nun ŝajne per si mem buŝe de unu buŝangulo al la alia, ĉar la viro apogis ambaŭ manojn sur la tabloplaton de la magazeno kaj diris: „Mi volas diri, kion mi volas fari por vi. Duono de litro da brando kostas kvindek centavojn. Mi volas doni ĝin al vi por kvardek sep centavoj, por ke vi vidu, ke mi tiukaze, se mi povas vendi ion por malpli da mono, mi ĉiam estas preta je tio.“

Celso venis hejmen en sian patran domon sen donacoj, sen mono por la geedziĝo, sen sia pakaĵo, kiun li perdis ie ĉe la vojo. Li falis laŭlonge en la kabanon kaj en la sinon de sia patrino, kiu kaŭris surtere apud la fajro kaj pretigis la vespermanĝon.

Rimarkoj
compadre = baptopatro, amiko, kunulo
„Ora pro nobis“ = „Petu por ni“, liturgia formulo por alvoko de sanktulo
fierro = fero

03

Je la sekva tago, kiam ree eblis paroli laŭhome kun Celso, demandis lin lia patro, kie li lasis la monon, kiun li enspezis dum du jaroj.

„Tion *don* Sixto forprenis de mi.“

„Estas ĝuste“, diris la patro, „mi ŝuldas al *don* Sixto la monon por la du bovoj. Sed ne estis parolo pri tio, ke mi mem promesis al li la nepagitan monon por la bovoj de via salajro. Ni interkonsentiĝis, ke mi priparolos la aĉeton kun vi, kiam vi venos hejmen de la kafoplantejo, ĉar vi unue rigardu kaj juĝu la bovojn. Mi volis doni la bovojn al vi, kiam naskiĝos via unua infano. Kaj se la bovoj ne plaĉas al vi, mi povus rekonduki ilin al *don* Sixto, kaj li redonus la pagon al mi, kiun mi faris, aŭ alkalkulus ĝin por mulo. Ni interkonsentiĝis, ke mi donos al *don* Sixto post ĉiu jarkvarono ses pesojn, ĝis la bovoj estos pagitaj kaj, ke ni tiam validigos la aĉetkontrakton en Jovel en la oficejo, kiam vi revenos. Jen la interkonsento.“

Tio aspektis tiel simple tie en lia patra domo, kie lia patrino en la ombro de palmtegmento frotadis sur *metate*

la *maza* por la tagmanĝo. Tio aŭdiĝis tiel aŭtentike kaj simple el la buŝo de lia patro. Ĝi sonis tiel klare kaj sen embusko, jen tie en lia vilaĝo ĉirkaŭbarata de densa agava kreskaĵaro, kie enuigite bojis hundoj, kie pigre trumpetis azenoj, gluglis meleagrinoj , ride klukis kokinoj, kriĉis infanoj kaj kie vere ĉio kunsonadis en paco kaj konkordo kun la ĉirkaŭejo en plena harmonio.

Sed ĉio sonis tiel alimaniere el la bruska buŝo de *don* Sixto, kiu ne diskutis, sed komandis. Ĝi sonis tiel alie sur la placo, kie Celso vidis sidi antaŭ si la du ordonemajn *caballeros* kaj sentis en sia dorso la minacan larĝan kaj grandan konstruaĵon super kiu legeblis grandlitere *„Presidencia de Municipalidad“* kaj kie super ĉiuj pordoj, kiuj aspektis kiel eniroj al kavernoj, legeblis nigraj grasaj literoj: *„Tesoreria“ Jefe de la Policia“ „Carcel“*. Kion Celso povis fari en tia ĉirkaŭejo? Sub tiaj influoj kaj en tia tereno li estus fordoninta sian tutan monon, eĉ se *don* Sixto farus la negocon malpli lerte. Nek Celso nek lia patro ekhavis la ideon iri al Jovel kaj retropostuli la monon de *don* Sixto. Estus vana provo. Kaj se ili ekscitiĝus kaj dirus eĉ nur unu malican vorton al *don* Sixto, ili ambaŭ baldaŭ troviĝus en la karcero. Francisko Flores, la patro de Celso havis la bovojn, kaj *don* Sixto,

kiu vendis ambaŭ bovojn al li, ricevis laŭorde la monon kaj por tio li skribis leĝe validan kvitancon, kaj li estis ĉe tio eĉ tiel malavara, ke li pagis la impostmarkojn mem. Daŭrus tagojn antaŭ ol Celso kaj lia patro al aŭtoritato povus klarigi, ke ĉe tia komerco okazis malprecizaĵo, kiu flanke de Celso disrompis pli ol la plej bonaj bovoj kaj la plej bela kvitanco iam ajn povus kuraci.

Je la sama tago Celso foriris por serĉi sian pakaĵon. Li vere trovis ĝin. Kaj ĉar sur tiu vojo, sur kiu li venis, migris nur indiĝenoj, tial lia pakaĵo estis netuŝita.

Celso hontis iri al sia fianĉino.

Sed kiam Celso estis pli ol semajnon hejme kaj ĉiutage laboris kun sia patro kaj en la *milpa,* kaj estis vidata de ĉiuj homoj en la vilaĝo ĉe tio, kiel li penis trejni la bovojn por la plugado, venis iam posttagmeze mallonge antaŭ la sunsubiro la patro de la fianĉino al la kabano de Francisko Flores.

Malantaŭ la patro je sufiĉe longa distanco proksimiĝis la filino.

La patro de la knabino, Manuel Laso, paŝis en la korton,

salutis kaj sidiĝis sur benkon.

La knabino haltis ekstere de la arbustara heĝo. Ŝi estis nudpieda, kiel vestojn ŝi surhavis la kutiman nigran krudan lanjupon, kiu atingis ŝiajn genuojn, kaj ŝi portis verdan vitroperlan kolĉenon. Ŝia densa hararo estis plektita je harplektaĵo kun ruĝa lanrubando kaj aranĝita turoforme surkape. Ŝi krucis ambaŭ brakojn antaŭ la mamoj kaj kaŝis la vizaĝon helpe de la manoj. Sed ŝi rigardis vigle tra la fingroj kaj ĉiu povis vidi, kaj certe laŭ ŝi eĉ vidu, ke nenio restas nerimarkata de ŝi, kio okazas en la kabano aŭ en la korto.

La patrino de Celso ekstaris de la fajro, eliris de la kabano, kliniĝis iom antaŭ la gasto, etendis al li la fingropintojn, kiujn li facile tuŝis, iris tiam al la agava heĝo kaj invitis la knabinon veni en la korton.

Kvazaŭ ŝi faris ion nedecan, hastis la knabino flanke de la patrino de Celso tre rapide en la kabanon, kie ŝi sidiĝis kun la patrino je la fajro kaj kie ambaŭ komencis babili.

Celso laboris malantaŭ la domo. Li okupiĝis pri la farado de la jungilaro por la bovoj.

Li venis en la antaŭan korton kaj salutis la patron de la knabino tiel preterire kvazaŭ estus egale al li, ĉu li estas ĉi tie aŭ ne. La knabino ŝajne ne interesis lin, li eĉ ne atentis ŝin. Li evitis iri en la kabanon, kvankam li divenis, ke ŝi estas interne aŭ pli bone, ĉar li sciis tion. Dum longa tempo li tamen ne eltenis tion. Li iris al la pordo de la kabano kaj demandis la patrinon, ĉu ŝi ne scias, kie estas lia tranĉilo. Li sciis, kie ĝi estas, ĝi estis en la kabano pikita en foston, kaj por povi preni ĝin li devis trairi la tutan kabanon. Li iris al la fosto kun rekte antaŭen direktataj okuloj sen atenti eĉ nur per tikado de la okulklapoj la kaŭrantan knabinon.

La knabino, kiam la junulo venis en la kabanon, tuj kaŝis sian vizaĝon en la supren tiritan mamoparton de sia jupo. Sed de la flanko kaj de sube ŝi sekvis al ĉiuj movoj de la juna viro. Eĉ, se ŝi ne povis multe influi la elekton de sia edzo, ĉar tio estis la afero de ambaŭ patroj kaj de la geedziĝkapabla edzo, ŝi tamen ĉiam avidis ĵeti rigardon al tiu viro, kiu estis promesita al ŝi kiel edzo jam dum du jaroj. Ŝi havis tiam dekses jarojn. Kaj estis tempo por ŝi kaj ŝiaj gepatroj serioze pensi pri la estonteco. Kun dudek jaroj ŝi estus jam polve kovrita virgulino sen plua espero.

Ambaŭ patroj estis parolintaj tion kaj tion. Kiam Celso nun ree venis el la kabano vokis Manuel Laso al li: „He, vi, *muchacho*, kial vi ne foje venis transen al mi, por diri 'Bonan tagon, kiel vi fartas'? Mi atendis vin.“

„Mi ankoraŭ ne havis tempon, *don* Manuel“, diris Celso, „ni havas nun la bovojn kaj mi volas, ke ili tiru por la patro, kiam mi ree foriros.“

„Antaŭ ol vi ree foriros, ĉu?“ demandis Manuel Laso.

„Kien foriri, filo“, demandis nun ankaŭ la patro de Celso. Li eksciis tion same tiel neatendite, kiel okazis al Manuel Laso.

„Perlabori la monon por la geedziĝo“, klarigis Celso, kvazaŭ tio estus memkomprenebla.

Manuel Laso kuntordis la vizaĝon kaj diris: „Mi pensis, ke vi kunportas la monon de la kafoplantejo por la geedziĝo. Vi fervore laboris du jarojn.“

„Sed mi ne havas la monon, *don* Manuel, kaj tial mi ree devas foriri kaj iel provi perlabori la monon.“

Li ne diris, ke li pagis la monon por la bovoj. Ankaŭ lia

patro diris nenion. Ĉar estis tute egale, kie estis la mono en tiu kazo. Gravis nur, ke Celso alportu la aĵojn, kiujn li transdonu kiel geedziĝan valoraĵon. Ne pri mono temas, sed pri la geedziĝa dono. Manuel Laso eble havis divenon, ke tiu mono verŝajne havis iun rilaton kun la bovoj de Francisko Flores. Sed ne estis afero lia esplori tion, ĉar tio ne ŝanĝis ion je la fakto, ke Celso ne havis la monon, kiun li bezonis por transdoni ĝin por la fianĉino.

Francisko Flores diris: „Mi promesis al Celso ambaŭ bovojn, se la unua infano estos naskita. Sciu, *don* Manuel, mi ankaŭ volonte jam hodiaŭ povas doni la bovojn al Celso.“

„La du bovoj ne estas gravaj en la komerco, kiun mi havas kun Celso, *don* Pancho“, diris Manuel Laso. „Vi jam antaŭ kelke da tempo diris al mi, ke vi donos al Celso la bovojn, kiam li estos benata per la unua infano. Tion vi faris tre bone. Sed ĉio ĉi havas neniun rilaton al mia komerco kun Celso. Li devas per si mem kaj sen via kunhelpo havigi la monon por pagi la geedziĝan donon. Damne kaj ankoraŭ fojon damne, mi ja devas scii, ĉu la vagabondo efektive povas perlabori monon. Vi ja eble eĉ ne pensas, ke mi donos mian filinon al pigrulo, kiu ne kapablas perlabori

monon, se tio necesas. Celso plaĉas al mi, kaj la knabino diras al la *vieja,* al mia oldulino, ke Celso estas tre bonvena kaj tre agrabla al ŝi. Sed tio ne longe daŭros. Kio sole daŭros estas la kapablo labori kaj perlabori monon. Do, kaj tio estas nun mia lasta vorto en la afero. Celso, vi mem devas perlabori la monon, ne via patro. Vi volas havi mian filinon, mian *hija*, ne via patro. Mi donas al vi ankoraŭfoje du jarojn. La knabino povus havi dek fianĉojn, se mi volus. Sed vi plaĉus al mi kiel bofilo, kaj vi plaĉas al mia filino. Kaj tial mi donas al vi ankoraŭfoje du jarojn por la mono. Sed pli ol du jarojn la knabino ne povas atendi.“

Manuel Laso ekstaris, etendis manon al Francisko Flores kaj vokis al la pordo de la kabano: „Mi foriras.“

La patrino de Celso venis al la pordo kaj diris: *„Adiosito, don* Manuel.“

„Hasta luego“, respondis *don* Manuel. „Ĝis tiam.“

Li survojiĝis.

La knabino proksimiĝis al Francisko Flores, al la esperata bopatro, kiel timema hundeto, kliniĝis kaj kisis manon de

li.

Li metis sian alian manon sur la kapon de la knabino kaj diris: „*Vete con Dios*, iru kun Dio, *chiquita* mia.“

Sen rigardi supren kaj kun sia kliniĝinta supra korpoparto en la sama pozicio kiel ŝi estis, kiam ŝi salutis *don* Franciskon, ŝi turniĝis rapide kaj postkuris ŝian patron kun rapidaj paŝetoj. Ekstere de la heĝo ŝi tamen turniĝis iom kaj strabis transŝultren reen en la korton. Sed ŝi tenis ambaŭ manojn tiel, ke ili kovris la vizaĝon.

Celso staris je fosto de la kabano kaj skulptadis kun sia tranĉilo je bastono. La maniero, kiel li okupiĝis kun la bastono vekis la impreson, ke tio estas tre grava laboro por la jungilaro de la bovoj. Sed en vero li tranĉadis je la bastono tien kaj tien sen certa intenco rilate la plibeligon aŭ la utiligon de la lignaĵo. Li ne postrigardis la knabinon kaj li ne zorgis sin pri ŝia rigardo. Tiu ĉi timema rigardo malantaŭ ŝiaj manoj, kvazaŭ post la krado de prizonfenestro, estis la ununura gesto, kiun ŝi montris por evidentigi, ke Celso estis por ŝi la sola estonta edzo sub la ĉielo.

Nur, kiam, post lia taksado, la patro kun la knabino estis

almenaŭ tricent paŝojn malproksimaj de la kabano, Celso levis la rigardon, sed lia mano skulptadis per la tranĉilo seninterrompe plu je la bastono, tiel, ke tiukaze, se iu observus lin, li devus mallevi nur la okulklapojn por esti gardata kontraŭ ĉia suspekto, ke li volas havi nur tiun knabinon kaj ne iun alian kiel patrinon de siaj dek kvin infanoj. Li rigardis la knabinon, kiam li estis ankoraŭ hejme en sia vilaĝo, la knabinon elproksime. Unufoje, kiam venis *cura*, por bapti infanojn en la kunrompiĝonta preĝejo de la loko, alian fojon en nupto, kiam li dancis kvarfoje kun la knabino. Kaj plurajn fojojn renkontiĝis la du familioj sur la hejmvojo de la foirplaco en Jovel. Se li zorgeme kaj tre bone kunkalkulus ĉion, kion li parolis dum sia vivtempo ĝis tiam kun la knabino, estus certe ne pli ol dekok aŭ dudek vortoj. Eĉ dum la danco li ne postulis ion de ŝi, eĉ ne per vorto, li nur iom proksimiĝis al ŝi kaj ĵetis ruĝan koltuketon al ŝia sino por montri al ŝi, ke li honorigas ŝin per tio, ke li volas danci kun ŝi. Li ne sciis kion diri al la knabino. Ke estas varme aŭ fride aŭ, ke pluvos, aŭ ke ŝi estas soifa, tion sciis la knabino ja mem. Kial do demandi ŝin pri tio? Eĉ diri 'Dankon' aŭ 'Kiel vi fartas?' estus tiel ridinde, ke oni rakontus tiun aferon en la vilaĝo kiel eksterordinaraĵon. Eĉ multe malpli li estus

ŝin demandinta, ĉu ŝi amas lin, kaj milfoje malpli li kapablus diri al ŝi, ke li ŝin amas. Se ŝi ne scius tion mem, ŝi neniam estus kandidatino por liaj estontecaj dek kvin infanoj. Ĉu ŝi volas edziniĝi al li aŭ ne, ne estas afero inter ŝi kaj li, tio estas afero nur inter ŝia patro kaj li. Ŝi povus diri, ke ne, pri la negoco de la du viroj. Tio estis ŝia bona rajto. Sed alia junulo en la vilaĝo estus eĉ ne joton pli bona. Ĉiuj viroj estas samaj. Diferencon ŝi ne povis vidi; kaj nek ŝi nek alia ino de la tribo estis edukita vidi diferencojn inter diversaj viroj aŭ senti tiajn. Diferencetojn inter edziĝkapabla viro kaj alia viro faris nur ŝia patro kaj ne ŝi mem. Tiuj diferencoj konsistis el tio, ke unu el la viroj estis drinkulo kaj la alia modera trinkulo kaj alia tute ne trinkis *aguardiente*. Kromaj diferencoj estis, ke, laŭ la juĝo de la patro de la knabino, unu el la viroj ne sciis labori dum alia estis diligenta kaj fervora junulo. Sed la plej grava diferenco estis tiu, denove laŭ la juĝo de la patro, ke unu el la du junaj viroj ne ŝajnis kapabla naskigi dek infanojn al knabino, dum alia vekis la impreson en la patro, ke prizorgadi tridek infanojn per spirado kaj nutraĵoj estis infanludo por li. De animaj sentoj, egale ĉu ili radikas en la koro aŭ en la animo aŭ en parkere lernita rimo, la edziĝo de indiĝena

meksikano ne povas grasiĝi.

Tamen, ekde la tago, kiam Celso parolis kun la patro de la knabino pri la geedziĝdono por la knabino, tiu eksentis, ke Celso kaj neniu alia viro surtere estas ŝia celo jam ĉiam. Kaj Celso, se li kapablus esprimi tion poete, asertus, ke la knabino estis asignita de la sorto al li antaŭ la kreado de l' mondo kiel ununura kaj sola ino.

Se ili ambaŭ estus geo, iam venus la tago, kiam ili estus geo tridek jarojn sen eklezio, sen ŝtata registrado, nur kun konsento de la patroj. Ĉu la geo post tridekjara komuna vivo estus feliĉa aŭ estus estinta feliĉa, ili ambaŭ ne sciis. Geedzeca feliĉo estis ekstere de iliaj imagoj. Ili havus infanojn, kelkaj estus mortintaj, aliaj vivus, multaj estus geedziĝintaj. Ili vivus en ĉiama streĉa laboro. Tuj kiam ili ĉesus labori eĉ nur dum monato, ili ne havus maizon por manĝo kaj ne fabojn. Ili vivus pace kune. La edzino obeus sian edzon ekde la tago de ilia geedziĝo pli ol ŝi obeus Dion. Kion li dirus kaj ordonus, estus neŝanĝebla leĝo por ŝi kaj ĉiuj infanoj, ĉu ili ankoraŭ vivus kun ili en la kabano aŭ havus jam sian propran hejmon. Tiel kiel bona katoliko eĉ ne pensas pri tio kritiki iam ordonon de la papo aŭ kontroli ties ĝustecon, tiel ankaŭ la edzino

neniam pensus kritiki juĝon aŭ ordonon de sia edzo. Ili ambaŭ interkonsiliĝus kiel, kie kaj je kia prezo ili volas vendi la superfluon je maizo, lano, kaproj kaj feloj. Se ili interkonsentiĝus, estus bone, se ne, jen dirus li la lastan vorton kaj tiu validus. Se post iom da tempo montriĝus, ke ŝia konsilo estis pli bona ol lia, ŝi ne ŝvelus pro eskcitiĝo kaj ne riproĉus lin, tiel kiel pia homo ne ekscitiĝas kun plenbloviĝo de la vangoj, se Dio sekigas ĉion anstaŭ lasi fali pluvon.

Tiel tia geedziĝo deruliĝas sen eskcitiĝo kaj sen ĉia tia fono, kiun verkisto de teatraĵo bezonus por fabriki ekscitigan geedziĝdramon, pri kiu neniu spektanto fine scias, pri kiu problemo efektive temas, sed kelkaj pensantaj vizitantoj havas la acidigan senton, ke tie dum tri horoj kverelis deko da pucaj gehometoj pri ŝinko, kiu ne ekzistas en vero, sed en la unua akto kiel ombro estis sorĉita en la cerbojn de la homoj, kiuj volas, ke oni ekscitigu ilin.

Por Celso tiu knabino, ĝuste tiu, estis same tiel grava kaj same tiel valora, kiel por iu alia viro junulino, pri kiu li pensas, ke li mem ŝin elserĉis kaj, ke li ne povas vivi sen ŝi. La imagoj de la sentoj kontraŭ la geedziĝo kaj la sentoj

de unu el la genro kontraŭ la alia genro estas eltrovitaj en poemoj kaj ŝanĝiĝas kun la reganta filozofio kaj la romanoj, poemoj kaj dramoj, kiuj estas laŭmodaj. Kaj ĉar vivoforta filozofio, filozofio, kiu ne estas dekadenta kaj ne degenerinta, kaj ĉar ankaŭ la verkado, kiu estas kerne vivoforta en sia esenco kaj ne mensogema sente, radikas en la regantaj ekonomiaj rilatoj, tial oni same bone povas uzi la pli rektan vojon kaj diri, ke la sinteno de la homoj pri la geedziĝo kaj iliaj sentoj rilate la emon de la genroj, se oni foje ne atentas la instinktojn pri la konservado de l' speco, radikas en la ekonomiaj rilatoj, en kiuj ili vivas.

Konservi por si kaj gajni per ĉiuj fortoj la knabinon, kiun oni asignis al li, rigardis Celso same kiel sian plej urĝan kaj plej duran taskon, kiel juna bankoficisto en Nov-Jorko, Londono aŭ Berlino penas krei la kondiĉojn, sub kiuj li fine povas geedziĝi al sia elektita fianĉino. La diferenco, la sola diferenco je tiuj agoj de homoj el du diversaj rasoj kaj moroj, estas nur tiu, ke la juna bankoficisto en Nov-Jorko renkontis sian amatinon ie kaj iam unuan fojon, ke ambaŭ tre ŝatis sin reciproke, kaj ke ili post iom da tempo interkonsentiĝis pri sia estonteca sorto, dum la profunda respekto al la gepatroj kaj al ĉiuj aliaj anoj de la tribo Celson devigis prepari sian

geedziĝon en aliaj formo kaj maniero. Celso tamen estis en la sama maŝo kiel juna geedziĝpreta bankoficisto en Londono. Unu el ili havis la devon labori streĉe por la mebloj, dum la alia havis la devon transdoni al la patro la postulatan geedziĝdonon, ĉar li ne bezonis meblojn, kurtenojn kaj lampoŝirmilojn.

Nenio estas senkosta en tiu ĉi vivo, nek por bankoficisto, nek por Celso. Kaj tial Celso ree devis foriri por denove havigi la monon, kiun li jam foje supozis posedi.

Rimarkoj
chiquita = mujer = ino
cura = pastro
hasta luego = ĝis tiam
maza = greno kaj similaj nutraĵoj, el kiuj oni faras kaĉon por pano kaj similan
metate = speco de frotigilo, iomete volbita ŝtonplato sur piedoj, simila al benketo, sur kiu oni frotadas de pratempoj per klaboforma ŝtono simila al pasta rulilo grenon aŭ maizon aŭ herbojn laŭ indiĝena tradicio.
milpa = kultivita terpeco, sur kiu oni plantas ekz. maizon, fabojn kaj kukurbojn
tesoreria = ministerio aŭ oficejo de financoj

04

Celso ree ŝarĝis sian pakaĵon kaj matene je la tria li estis sur la vojo al Jovel.

Ne estis agentoj en Jovel por varbi homojn por la kafoplantejoj. Se oni varbus iun, tiukaze nur por la *cosechas*, por la rikoltoj. Por la plantado de novaj plantoj oni havis sufiĉe da laboristoj. Al Celso krome ŝajnas, ke ne eblas sufiĉe perlabori en kafoplantejo kaj, ke li eble povus trovi ion, pere de kio li pli rapide enspezus la necesan monon.

Li staris en magazeno ĉe la placo kaj aĉetis krudajn tabakfoliojn por havi cigarojn por la vojo. En la magazeno ĉeestis ladino. La *caballero* interparolis kun la posedanto de la magazeno pri eblo sendi leteron kun dokumentoj al la monterio Agua Azul. Li jam kelkajn tagojn serĉis *arrieros*, mulopelistojn, kiuj pretas transporti varojn sur muloj en la malproksimajn distriktojn, tien, kie ne ekzistas stratoj. Sed neniu el la mulpelistoj kondukis karavanon al monterio. Eble post monato aŭ kvar da ili, se la turko kun sia komerco moviĝus al monterio. Sed hodiaŭ aŭ dum du aŭ tri semajnoj neniukaze.

La *caballero* pro tio serĉis heroldon. Sed neniu volis rajdi sola. Ili ĉiuj timis la longan marŝon tra la ĝangalo, marŝon, kiu daŭras dek tagojn; aldoniĝus ankoraŭ la marŝo reen. La marŝo de Jovel ĝis la lasta setlejo antaŭ la ĝangalo daŭras ses tagojn. Inklude de la necesaj ripozaj tagoj, tio estus kvardektaga herolda marŝo. Do kvardek tagoj pagendis al la heroldo. Aldoniĝis ties ĉevalo kaj krome lia mulo, sur kiu li transportis sian propran vojaĝpakaĵon. Kaj la mulo servis ankaŭ por tio ĉeokaze ŝarĝi ĝin alterne kun la ĉevalo por lacigi neniun el la bestoj Se ĉevaloj aŭ muloj laciĝas en la ĝangalo, ili sternas sin, ne plu manĝas ion kaj formortas kvazaŭ pro malĝojo. Sed unuopa heroldo timis la vojon. Li volis havi serviston kiel akompananton. Tia postulo ne estis malpravigita. Ankaŭ al tiu akompanservisto kvardektaga salajro estis pagenda. Same por lia ĉevalo.

Simple glui poŝtmarkon sur ĝin por dudek centavoj kaj ŝovi la leteron en leterkeston kaj rapide forkuri, same ne helpus al la *caballero*. La letero sekvatage en la hotelo estus ree transdonita al li kun la rimarko: „*No hay correos,* tien ne ekzistas poŝtkonekto.“ Se oni sendas leteron pere de heroldo, tie, kie estas poŝtkonekto, oni povas esti punata per cent pesoj, ĉar la poŝto havas la

ŝtatan monopolon, sed se oni volas sendi poŝtaĵon tien, kien ne ekzistas poŝtkonekto, la poŝto ne sciigas onin kion fari tiukaze. En tia kazo la poŝto kompreneble estas grandanima, ĝi ne punas la sendinton per cent pesoj, se li sendas la leteron per heroldo.

Jen diris la magazenposedanto: „Aŭskultu, *don* Apolinar, kial vi ne sendas la leteron per indiĝeno el *Chamula*? Tiu ne bezonas ĉevalon kaj kuras kiel la diablo, tiun dek ĉevaloj ne atingos, se li rapidas kiel sago.“

„Tio estas ideo, kiun mi pripensos“, diris *don* Apolinar.

„Tio ne pripensindas“, diris al tio la magazenviro, „demandu tuj la ulon, kiu sidas ĉi tie sur la benko kaj rulumas cigarojn al si. Mi garantias por li, mi konas lin kaj lian patron, li estas el Ishtacolcot.“

Origine Celso parolis kiel ĉiuj siaj tribanoj nur la lingvon de sia nacio, la cocilan. Sed jam antaŭ ol li iris al la kafoplantejoj por labori tie, li komencis lerni la hispanan, tiam, kiam li laboris dum kelkaj monatoj en la segilejo de *don* Prisciliano por dudek kvin centavoj ĉiutage. En la kafoplantejoj, kie kunvenis tiom da uloj el diversaj lingvoregionoj, jen la hispana necesis por povi

interkomprenigi sin reciproke, li lernis tiam la hispanan tiel perfekte, kiel eblas por indiĝeno, kiu neniam frekventis lernejon.

Li aŭdis tion, kion la du *caballeros* parolis kune, sed kondutis tiel, kvazaŭ li ne komprenus sufiĉe multe, pri kio temas.

En aferoj tiaj, kiaj pri tiu temo, indiĝeno, kiu vivas en sia pueblo, en sia vilaĝo, estas tre malrapida pri la komprenado kaj ankoraŭ multe pli malrapida en la kaptado de avantaĝa bonŝanco. Pro sia vivo en la kafoplantejoj, kie ne nur renkontiĝas pure indiĝenaj laboristoj , sed ankaŭ ruzuloj, serviluloj kaj la ŝmire kota feĉo de la urboj, kiuj de tempo al tempo iras en la kafoplantejon por labori tie, por forgliti el la vidaĵoj kaj de la polico kaj de la juĝistoj, Celso tamen komencis deskui la denaskan flegmon en la pensado. Tute li ankoraŭ ne deskuis ĝin, alikaze li ja ne tiel ŝanceliĝante estus irinta en la reton de *don* Sixto , sed li defendus sin kaj unue atendus, ĉu li vere enprizoniĝus aŭ ne, se li ne pagus ion al *don* Sixto. Tiu timo pro la prizono estis unu el la imagoj, kiujn li ankoraŭ ne denukigis. Li tro ofte vidis kiom rapide, kiom senkulpe, kaj kiom ofte sen iu serioza

kaŭzo, estis kaptitaj indiĝenoj kaj poste trenitaj en prizonon.

Sed la malmulto, kiun li gajnis ĝis tiam el la kafoplantejoj je la kapablo uzi sian propran avantaĝon en la mondo, nun estis tre utila al li.

Se li ne estus akirinta tiun vivosperton, li verŝajne eksaltus kaj ofertus sin al *don* Apolinar por porti la leteron al Agua Azul. Sed li lasis tion, ĉar li jam lernis, ke laboristo, kiu ofertas sin, validas nur duonon de tiu laboristo, kiu estas serĉata.

Tial li trankvile sidis plu sur sia benko kaj rulumadis siajn cigarojn. Kaj ĉar li ŝajne kondutis tiel naive, la du *caballeros* parolis sen embaraso pri la prezo por la heroldo.

„Ĉu vi pensas, ke li farus tion por du realoj, por dudek kvin centavoj ĉiutage?“ demandis *don* Apolinar.

„Li povas fari ĝin dum tridek tagoj. Tio estus do sep pesoj kaj kvindek centavoj“, kalkulis la komercisto.

„Aŭskultu foje, *chamula“* vokis *don* Apolinar.

Celso ekstaris kaj proksimiĝis. Li alvenis kun la timidaj kaj timemaj gestoj de simpla indiĝeno, kiu neatendite estas vokita de fremda *caballero* kaj ne scias, kio atendas lin, ĉu suka tretita bato sur la postaĵon, ĉu prizono, ĉu cigaredo, ĉu glaseto kun brando, ĉu nepagota servo, ĉu postulata montrado de la variolvakcinadaj cikatroj aŭ ĉu diro de la nomo aŭ, kiom da ŝafoj li havas hejme.

Sed je la unua fojo en sia vivo Celso agis mensogeme. La timema kaj timida gesto, kun kiu li proksimiĝis al *don* Apolinar estis hipokrita. Li komprenis, ke nek la polica ĉefo, nek la *Jefe Politico* nek eĉ la guberniestro en tiu komerco povis ordoni ion. Aŭtoritato povis ordoni al li, ke li portu leteron al monterio, sen pago, ja eĉ sen pago de lia manĝo. Sed, se la letero estus ŝtelita de li, dum li dormus, aŭ, se la letero nevidate elturniĝus el lia lanzono kaj perdiĝus en la ĝangalo, aŭ se li detruus ĝin pro dismoliĝo en la akvo, dum li devus naĝi tra rivero, tiukaze eĉ ne mortopuno pro la letero povus rehavigi la leteron kun la gravaj dokumentoj kaj bankaj ĉekoj. Kaj ĉar estis tiom da ebloj perdi la leteron aŭ en akvo aŭ pro disiĝo en daŭra pluvo, neniu povus pruvi al li, ke li eble ne traktis la leteron kun zorgemo aŭ eble eĉ intence perdis ĝin por venĝi sin pro la nepagita deviga laboro. La letero kun la

gravaj dokumentoj estis tre konfidenca afero, kiu estis traktebla nur kun lia tuta libervoleco kaj lia bona volo por la plaĉo de la homoj, kiuj havas intereson je la letero. Li hipokrite montris la timidan geston por ne malkaŝi jam antaŭe, ke ĉikaze eblis duobla negoco por li.

Kiam li aŭdis pri la letero kaj la malfacilaĵo transporti ĝin, li komencis labori pri plano sen montri tion. Kaj minuton poste li ekkomprenis, ke la plej bona ŝanco, kiu helpos al li en lia tiama situo, estas nur tio, porti gravan leteron al monterio.

Li intencis ree iri al al kafoplantejoj, kvankam tiu laboro fariĝis jam malagrabla por li kaj li volonte farus ion alian. Sed kiam li aŭdis, ke neniu agento ĉeestas kaj, ke oni ne serĉas laboristojn, eĉ se agentoj estus je la loko, li pensis, ke ekzistas nur unu alia elirvojo: monterio. Estis durega laboro, oni povus nomi ĝin murda. Sed li ne timis ĝin. Kion li volis eviti, tio estis la altaj kostoj por ricevi laboron en monterio. La agento postulis inter dudek kvin kaj kvindek pesoj da komisipago por la varbado. La laborkontrakto kostis en Hucutsin dudek kvin da pesoj por impostoj ĉe la urbestro. La marŝo, aŭ pli bone tio, kion li konsumis je la marŝo, kostis monon lian. Estis

preskaŭ tri monatoj da laboro, kiujn li devis plenumi nur por la kostoj de la fakto, ke li efektive rajtas labori.

Kaj nun, dum li tiam tiel kaŝe retiriĝema pensadis pri sia situacio, falis la letero kun la gravaj dokumentoj kvazaŭ sur lian sinon. La vojo estos pagita. Li alvenos en la monterio. En monterio oni ĉiam kaj eterne bezonas laboristojn, ĉar ili formortas kiel laŭsoj ĉe gazolinpumpilo. Li ne devos pagi komision al agento. Kaj li ne devos pagi al la prezidanto de la administrejo en Hucutsin dudek kvin pesojn da impostmono por stampo. Li laboros sen kontrakto en la monterio, rajtos foriri, kiam li volas, kaj kiam li pensos havi tiom da mono, kiom li bezonas por lia geedziĝo.

Rimarkoj
arriero = mulisto, mulpelisto
ladino = mestizo = ido de blankuloj kaj indiĝenoj, en Ĉiapaso uzata specife por kontrasti indiĝenojn kaj ne-indiĝenojn, do ne nur mestizojn, sed ankaŭ blankulojn

05

„Kiel vi do nomiĝas, *muchacho*?“ demandis *don* Apolinar.

„Celso, Celso Flores, *a sus órdenes, patroncito*.“

Kvankam *don* Apolinar sciis tion, ĉar la komercisto ja ĵus diris tion al li, li demandis tamen: „*Hasta donde tiénes tu terra?* De kie vi estas?“

„El Ishtacolcot, patronĉjo.“

„Tio estas kelkajn leguojn post Chamula, ĉu?“

„Jes, sinjoro, dek aŭ dekdu kilometrojn.“

„Ĉu vi scias la vojon al la monterioj?“

„Ne, patronĉjo.“

Don Apolinar komencis klarigi la vojon al li. Li prenis pecon da pakuma papero, kiu troviĝis sur la magazentablo kaj desegnis sur ĝin la vojlinion. Ĉar Celso ne povis legi, li desegnis malgrandajn kvarangulojn ĉien tien, kie estas vilaĝo kaj li desegnis por ĉiu unuopa vilaĝo signon, kiu estis aŭ precipa signo por preĝejo aŭ placo aŭ

granda arbo aŭ la situo de *cementerio*, de la tombejo. Per tio la vojo estis same bone pentrita por la kompreno de Celso, eble eĉ pli bone ol por vojaĝa komizo la fervoja horaro. Tiel desegnis *don* Apolinar la tre penigan vojon, kiun li iris plurfoje ĝis la lasta setlejo ĉe la rando de la ĝangalo. De tie la vojo ne plu tiel bone klarigeblis sur la papero. Li nur povis diri al Celso, ke li tranoktu en la lasta setlejo kaj tie petu pri ĝisdetala priskribo de la vojo tra la ĝangalo, ke li aĉetu en la lasta setlejo ankaŭ ĉion tion, kion li bezonas je manĝo tra la ĝangalo; ĉar en la ĝangalo ne estas magazenoj, neniuj kabanoj kaj eĉ ne homo. Kaj la vojo tra la ĝangalo daŭras naŭ tagojn ĝis dekdu tagoj laŭ la rapideco de la marŝanto.

„Vi do vidas ĉi tie, Celso, kie troviĝas la vojo kaj kiom longe vi bezonos proksimume ĝis Agua Azul“, diris *don* Apolinar. „Ni parolu nun pri via salajro. Vi certe povas iri la vojon dum tridek tagoj, dek kvin tagojn tien kaj dekkvin tagojn reen. Por ĉiu tago mi donos al vi du realojn, tio sume estas sep pesoj kaj kvindek centavoj, kaj se vi laŭorde plenumos tion, mi donos libervole al vi krome kvar realojn kiel rekompencon.“

Celso aŭskultis tion sen kapjesi, sen nei ion, sen esprimi

per certa mieno sur la vizaĝo, ke li efektive komprenis tion, kion oni postulis de li. Se li jam foje komencis atenti pri sia propra avantaĝo, li nun tion ankaŭ tuj devis daŭrigi, ĉar alikaze la komenco ne indis la penon. Dum *don* Apolinar seninterrompe parolis al li, venis en lian kapon, ke almenaŭ parte li povus regajni de Apolinar tion, kion *don* Sixto forprenis de li. *Don* Apolinar kaj *don* Sixto estis ja ambaŭ ladinoj, tiuj finkalkuladu tion inter si. Sen scii la ekonomiajn rilatojn kaj la tien-tien ŝovadon en la negocoj de ladinoj inter si, Celso havis tamen aludon pri la ideo, ke ĉion, kion perdas ladino je alia ladino, tiu provas regajni de alia ladino, kaj ke el tiu zigzaga pelmelo ekestas ĉiuj tiuj kvereloj, fikomercoj kaj interpafadoj, per kiuj la ladinoj plenigas la plej grandan parton de sia vivo. Tiel Celso pensis, ke tiukaze, se li bone pagigas *don* Apolinaron, li iel regajnos la sumon de la alia ladino, ĝis li fine atingos la monujon de *don* Sixto, el kie estos eltirita tiu sumo, kiun *don* Apolinar devos pagi al Celso. Timeme, servile kaj ŝajne stulte Celso nun diris: „*Con su amiable permiso,* kun via afabla permeso, *patroncito,* mi ne pensas, ke mi povos iri tien. Tio estas tre tre malproksima. Mi timas iri tra la *jungla*, tra la ĝangalo. Jen vivas la sovaĝaj *caribes,* la indiĝenoj, kiuj

ŝtelas inojn kaj mortbatas ĉiujn tiujn indiĝenoĵn, kiuj ne estas *caribes* kaj ne parolas ilian *idioma*, se ili proksimiĝas tro.“

„La *caribes* estas bonaj homoj, tiuj ne suferigos vin“, enmiksiĝis la komercisto.

„Sed mi timas tamen“, diris ree Celso. „Estas ankaŭ jaguaroj kaj pumoj kaj serpentoj en la ĝangalo, kaj mi ne havas fusilon.“

„Vi havas ja vian maĉeton, vian ĝangaltranĉilegon“, kontraŭdiris *don* Apolinar.

„Kompreneble, tion mi havas, patronĉjo“, diris Celso lamente kaj en maniero kvazaŭ li iru ĉasi elefantojn kaj havas nenion alian kiel armilon krom malakran fiŝkaptan hokon je tvirna fadeno.

„Maĉeto iafoje pli valoras ol du bonaj fusiloj“ opiniis *don* Apolinar trankvilige. „Fusiloj eble ĝuste tiam ne ekpafos, se jaguaro eksaltas, kaj kion vi faros tiukaze?“

„Tion mi nun ankoraŭ ne scias, kion mi faros tiam“, diris Celso. „Mi unue devos vidi, kiel tio aspektas.“

Don Apolinar kaj la komercisto ekridis kaj sentis sin superaj kaj abunde saĝaj kontraŭ la naiveco kaj stulteco de Celso.

„Ĉu vi unue volas trinki gluton da konjako, Celso?“ demandis *don* Apolinar. Li havis botelon kun konjako antaŭ si kaj volis verŝi el ĝi en glaseton. Sed li tuj rememoris pri tio, ke la glaseto kun la konjako kostus sesdek centavojn, dum li povus ricevi plenigitan glaseton kun brando por dek kvin centavoj. Li volis peti la botelon kun *aguardiente* de la komercisto, sed la komercisto pensis la saman, kion pensis ankaŭ *don* Apolinar. Ili estis ja *caballeros,* plenkreskintaj kvazaŭ en simila loĝoĉambro, kie knabo diris „ci“ kaj „aŭskultu“ al indiĝeno, kiu havas naŭdek jarojn, dume la maljuna indiĝeno devis alparoli tiun ladinoknabon, kiu ankoraŭ ne mem povis forviŝi la nazmukon, kun „vi“ kaj kun *„don“* por havi la rajton sidi sur la sojlo de la domo kaj atendi, eble eĉ la tutan posttagmezon, ĝis la dommastrino fine ekpensas pri tio pagi al la indiĝeno la kvin centavojn por la ligno, kiun li portis en la domon, kaj kiun li transportis dudek kilometrojn por povi perlabori la kvin centavojn.

Ĉar la komercisto kaj *don* Apolinar plenkreskiĝis en la

sama popoltavolo, la komercisto tenis la argilan kruĉon kun *aguardiente* jam enmane.

Sed Celso diris: „*Mil gracias, patroncito, no tomo*, mi tre dankas, patronĉjo, sed mi ne trinkas brandon.“

„*Bueno, bueno*“, diris *don* Apolinar, kaj la komercisto remetis la kruĉon al ties loko. Poste *don* Apolinar aldonis: „*Pues,* do, vi iros por mi, Celso.“

„*Muy lejos, demasiado lejos el camino“, diris Celso* sin defendante, videble defendante sin. Sed en vero li atakis la alian: „La vojo estas tro longa, multe tro longa.“

„Mi diras al vi tion, Celso. Mi donos al vi tri realojn por ĉiu tago, tri realojn kaj tridek sep centavojn por ĉiuj tagoj kune. “

„Kaj la manĝo, patronĉjo? De kie mi ricevu la manĝon?“

„La manĝon kompreneble vi devos antaŭe aĉeti al vi.“

„De la tri realoj, kara patronĉjo mia?“

„Tio kostas vin ja nur duonon de realo aŭ eĉ nur *quinto-n,* kvin centavojn.“

„Sed tiukaze mi ja ne plu havos tri realojn ĉiutage por mia laboro, patronĉjo, *con su permiso*“.

Celso parolis pli kaj pli humile, pli kaj pli servile kaj pli kaj pli ĝentile. Ŝajne pli kaj pli stulte, kaj kun pli kaj pli da malkompreno. Tiukaze eĉ ne la plej bruska polica ĉefo povus krii al li, ke li kondutas nedece. Kaj eĉ la plej ruza laborista agento ne malkovrus, ke ne la ladino ludas kun la indiĝeno, sed la indiĝeno kun la ladino. La ludo estis des pli superba, ĉar nek *don* Apolinar, nek la komercisto, kiuj sentis sin tiom grandiozaj, rimarkis aŭ eĉ nur divenis, ke Celso kun ili ludas. Ju pli humila kaj servila Celso fariĝis des pli diosimila sentis sin la du *caballeros kaj* des pli cedemaj kaj senatentemaj ili fariĝis rilate la intertraktadon kun Celso.

Por la manĝo la heroldo devis zorgi mem, por tio li ricevis ja sian salajron. Kiam *don* Apolinar ofertis dudek kvin centavojn, li faris tion, sen pensi pri tio, kun la antaŭkondiĉo, ke la zorgo pri la manĝo estas la afero de Celso. Celso, kiu aspektis pli kaj pli stulta, ne estis menciinta la manĝon, kiam Apolinar parolis pri dudek kvin centavoj. La indiĝeno ekparolis pri la pagado de la manĝo nur tiam, kiam la ĉiutaga salajro jam estis altigita

al tri realoj. Tri realoj estis la salajro; kaj pro tiu maniero, kiel li atentigis en la intertraktado pri la manĝo, la manĝomono nun ne plu estis minusigebla de la salajro.

„Bone, jen mia lasta vorto, mi donos al vi ĉiutage kvar realojn, Celso“, diris *don* Apolinar laŭ tono, per kiu li aludis , ke la intertraktado nun estas decidite finita.

„Sed *patroncito, señorito*, patronĉjo mia, kara sinjorĉjo kaj paĉjo, kun via permeso, se vi volas pardoni al mi. Kiel mi iru tiun vojon dum dekkvin tagoj, eĉ ne ĉevalo povas iri tiun vojon dum dek kvin tagoj.“ Celso diris tion ploreme. Kaj li diris tion tiel, ke ĝi sonis kvazaŭ je tiu fakto nek li nek la ĉevalo kulpas, sed la vojo.

Don Apolinar, mishumorigite pro la longa intertraktado ne plu tute atente aŭskultis tion, kion Celso diris. Li rememoris, ke apenaŭ tridek minutojn antaŭe oni parolis pri kvardek tagoj, dudek tagoj tien kaj dudek tagoj reen. Ke tiukaze, se li devus sendi heroldon kun rajdobesto, eble eĉ kun akompano, la letero fariĝus tre multekosta. Nun, ĉe la komparado de la sumoj, li trovis la indiĝenon tiom malmultekosta, ke li ekhavis senton de malavaremo. Tiu sento tuj miksiĝis kun la negoca penso, ke tiukaze, se

li montriĝas malavara al Celso, li tenas la serviston en bona humoro. La bona humoro de la heroldo estis necesa, por ke tiu sur la vojo ne eble eĉ malkuraĝiĝu kaj ne simple returniĝu, reportante la leteron kaj rezignante pri kia ajn salajro.

„Kompreneble, la vojo estas longa, Celso, vi pravas“, li diris. „Ĉion, kion mi povas fari por vi kaj faros por vi, estas, ke mi pagos al vi tridek kvin tagojn kun po kvar realoj por ĉiu tago. Se vi transdonos la leteron jam post dek kvar tagoj en la monterio, vi ricevos po ok realojn da salajro por ĉiu tago. Tion mi skribos en aparta letero al sinjoro Gerente en la monterio, al *don* Eduardo. La leteron vi donu nur al *don* Eduardo.“

Don Apolinar dum certa tempo meditadis, ĉar li nun subite ekkonis, ke li ja pagos al Celso pli ol duoblon de tio, kion li elkalkulis antaŭe.

Li volis reenspezi iom de ĝi. Sed li ne povis fari tion per minusigo de la salajro, ĉar tiukaze la tuta komerco verŝajne solviĝus en nenion. Li faris ĝin per altigo de laborproduktiveco. Per tio lia ĝenata ekonomia balanco ree stabiliĝis, kaj li ne devis konti la tagon kiel perditan.

Kiam li menciis *don* Eduardon, envenis en lian kapon, ke *don* Leonardo petis lin sendi kininon.

„Estas kompreneble ne nur la letero, kiun vi devas transporti en la monterion“, li diris al Celso, kaj li diris tion tiom indiferente, kvazaŭ oni estus interparolinta dum la tuta tempo pri plia pakaĵo ol nur pri la letero. La letero estis ampleksa kaj peza kaj estis sufiĉe da pakaĵo por iu, kiu marŝas piede, kiu grimpas trans altajn montarojn, naĝas tra riveroj, vadas tra marĉoj, kiu devas trabati per maĉeto vojon al si tra densaj ĝangalaj kreskaĵoj, se oni konsideras, ke la marŝanto devis porti manĝon por dek tagoj, inklude de lankovrilo, de petato kaj moskitoreto. Letero, kiu matene ĉe la ekmarŝo pezas sepcent gramojn, pezas je la dua posttagmeze sur la dorso de heroldo haste iranta sur arda sablo sub tropika suno kaj preskaŭ mortanta pro soifo, sep kilogramojn; kaj se li suprengrimpas sur kruta rokopado ĝi pezas dek kvar kilogramojn. Soldato sur milita marŝo en mezvarma zono de Eŭropo scias, kiom povas pezi paro da ŝuoj posttagmeze en varmega aŭgusta tago, kaj kiun diferencon povas rezultigi, se li ne devas kunporti la ŝuojn surdorse.

„Ne, ne estas nur la letero, tion vi ja sciis, Celso. Pro letero mi ne sendus heroldon.“

Nun estis ree Celso, kun kiu oni ludis. *Don* Apolinar, sciis tre lerte ĝustatempe mencii la aldonan laboron. Se li estus havinta fabrikon, li certe simile varbus laboriston. Unue li fiksus la salajron, lasante la laboriston en la supozo, ke temas pri labortempo de naŭ horoj ĉiutage. Se la salajro tiam estus fiksita kaj la laboristo havus kelkajn minutojn da tempo por imagi al si, kiom avantaĝa tiu salajro estas por li kaj kiel li aranĝos sian vivon kaj tiun de la familio per tiu salajro, jen aperus la postfrazo: 'Kompreneble vi certe ne supozis, ke ĉi tie ĉe ni oni laboras nur dek horojn ĉiutage, ne, kompreneble ne. Estas ja konate al ĉiu, ke ni laboradas dek kvar horojn ĉiutage kaj dimanĉe ses horojn.' La laboristo, kiu pensas pri sia longa tempo de senlaboreco kaj krome ankaŭ pri sia familio ne tuj ĉe sia dungiĝo volas prezenti sin kiel bolŝeviko kaj dekomence fuŝi la rilaton al sia salajropaganto. Kaj tial li respondas: 'Sed kompreneble ne, kompreneble mi pensis eĉ ne iom pri tio, ke ĉi tie oni laboras nur dekdu horojn ĉiutage. Dio mia, mi ja tiom ĝojas, ke mi ne ĉiutage devas labori dek sep horojn kaj dimanĉe dek ok horojn.' Kaj ambaŭ, la salajrodonanto kaj

la salajroricevanto estas kune kontentaj, ili komprenas sin reciproke kaj nun oni povas labori trankvile kaj laŭorde kaj fine foje streĉi la muskolojn, por ke la patrio povu leviĝi el la ŝlimo kaj Francio ricevu sian monon.

„La letero ja apenaŭ havas pezon, tiom, ke oni tute ne povas paroli pri pezo“, parolis *don* Apolinar plu. „Vi ankoraŭ kunprenos pakaĵon, kiun mi tuj donos al vi. Atendu ĉi tie, mi kuras nur foje al la *botica*, al la apoteko tuj apude. Estos pli bone, se vi tuj kunvenos. Nu, lasu vian pakaĵon ĉi tie en la magazeno. *Don* Pedro ja atentos pri tio, ke neniu forŝtelu ĝin de vi. Ĉi tie cetere neniam iu ŝtelas ion.“

Don Apolinar iris al la apoteko kaj aĉetis kvin kilogramojn da kinino kaj mil gelanteningojn por plenigado. La apotekisto zorgeme pakis ĝin en paperon, pri kiu li asertis, ke ĝi estas preskaŭ tute akvorezista. Kaj tiam li pakis ĉion en kesteton. Ĉar li ne trovis laŭan kesteton, la kesteto estis multe pli granda ol necesus. Li diris trankvilige al *don* Apolinar: „Por la ulo el Chamula tio ne estas problemo, ĉu la kesto estas je kvindek centimetroj pli granda aŭ pli malgranda, kaj ĉu estas dek kilogramoj aldonaj aŭ pli malmultaj. Tiu tute ne sentas

tion.“

Kvin kilogramoj da ŝarĝo pli aŭ malpli povas esti la kaŭzo, ke portisto post forta tropika pluvo en ĝangala rivero estas forŝirita kaj dronas aŭ ankoraŭ savas sin. La apotekisto ja ne devas porti la ŝarĝon, kaj tra la ĝangalo li ne marŝus eĉ tiukaze, se li ricevus ĉiutage kvindek pesojn por tio. Ja kial? La homoj, kiuj bezonas medicinon, venas al li en la apotekon. Li havas sufiĉe da laboro pro tio, ke li kuradas post la apotekista tablo tien kaj tien kaj por aranĝi la medicinon laŭ la receptoj, kiujn li plej ofte komprenas nur parte.

Don Apolinar kaj Celso revenis al la magazeno.

Don Apolinar skribis, apogante sin sur la magazentablo, apartan leteron al *don* Eduardo, en kiu li sciigis al li, kion Celso tranportas al li, do leteron kaj kininon. Tiam li elkalkuladis, kiom da mono *don* Eduardo devos ankoraŭ pagi al Celso.

Li kunvolvis la grandan leteron kaj la malgrandan en sufiĉe da pakpapero, laŭorde ŝnuris la pakaĵeton kaj donis ĝin al Celso.

„Kie vi portas la pakaĵeton kun la leteroj, ĉu en via pakaĵo aŭ sur via postaĵo aŭ firmligita sur via brusto, tio estas egala. Sed tion mi al vi diras, la pakaĵeton vi ne perdu, nenie lasu kuŝi ĝin, oni ne forŝtelu ĝin tie, kie vi dormas, se vi vadas enrivere vi ne moligu, kaj ne lasu fordrivi ĝin tie. Mi enprizonigos vin, kaj vi restados tie dudek jarojn, se vi perdos la leterojn; kaj eblas, ke la generalo vin eĉ pafmortigos aŭ pendumigos. Kion li faros, mi ankoraŭ ne scias . Li eble fortrancos vian kapon. Sed, se vi laŭorde transdonos la leteron al *don* Eduardo, li pagos la restaĵon de la salajro al vi. Tio estos dekdu pesoj kaj kvindek centavoj. Kaj se vi alvenos tie je la dekkvara tago, li donos al vi peson kiel kromrekompencon.“

Celso prenis la pakaĵeton kaj ŝovis ĝin sub sian brustvestan antaŭon, kvazaŭ ĝi estus gazeto de la pasinta monato.

Don Apolinar diris nenion. Li lasis agi lin laŭ ties plaĉo. Kaj Celso sciis tute precize, kion li faris. La letero estis grava. Tion iu povus vidi. Iu povus observi lin. Kaj, se li traktus la leteron tiel, kiel *don* Apolinar imagis tion, tiukaze iu, kiu observus Celson, povus supozi, ke la letero entenas monon. Oni sekvus lin survoje kaj ie mortbatus

lin pro la letero. Nur tie, kie Celso sciis tute sendube, ke neniu povas observi lin, li metus la leteron tien, kie ĝi restadu dum la marŝo.

Celso havis en reto sian tutan vojaĝpakaĵon, laŭ la maniero de la homoj de sia nacio. La reto estis hejme plektita el forta kruda bastŝnureto. Ĝi tiom vaste elstreĉeblis, ke oni povus meti la viandon de tuta virbovo en ĝin kaj ĝi male povis aspekti tiom ŝrumpinta, ke oni povus supozi, ke eĉ ne du plenkreskintaj kunikloj trovus lokon en ĝi.

Li malfermtiris la reton kaj metis la keston kun la kinino inter ĉiujn tiujn proprajn aĵojn, kiujn li portis kun si. Li ordigis la pakaĵon tiam tiel, kiel li deziris tion por la portado.

Tiam li rigardis supren.

Don Apolinar observis lin, sidante sur benko en la magazeno, kaj fumis cigaron.

Tiam li tiris kvin pesojn el poŝo kaj diris al la komercisto: „*Don* Pedro, ŝanĝu la kvin pesojn al mi, en kupron kaj arĝentajn monerojn, kvinojn da centavojoj, dekojn kaj

dudekojn da ili. La *muchacho* sur la vojo ne bezonas monbileton, ĉar neniu povus ŝanĝi tian monon al li.“

„Du pesojn kaj kvindek centavojn mi povas ŝanĝi al ŝanĝmono“, diris la komercisto. „La ceterajn du pesojn kaj la kvindek centavojn li bonŝance povas porti kiel centavajn kvindekojn. La unuajn kvar tagojn li trairos vilaĝojn kaj bienojn, kie oni ĉiam povas ŝanĝi kvindekon.“

„*Gracias, don* Pedro.“

„*No hay, porque*, nedankinde“, respondis la komercisto.

„*Bueno*, Celso“, diris *don* Apolinar. „Ĉi tie estas kvin pesoj, do kvardek realoj. Tio estas la antaŭpago al via salajro. *Don* Eduardo donos al vi la restsumon, aŭ se li donos al vi ĉekon, *don* Pedro ĉi tie pagos la ĉekon al vi. Sed *don* Eduardo certe tie havos la monon. Kaj morgaŭ matene, *muy tempranito*, do tre frue, antaŭ ol Suno leviĝos, vi jam marŝos.“

„*Con su permiso, patroncito“,* Celso interdiris, „kun via permeso mi volas ekiri tuj nun. Mi aĉetos nur salon, akran kapsikon, tortiljojn kaj verdajn foliojn. Post momento mi jam survojos.“

„Pli bonas, pli bonas“, kapjese diris *don* Apolinar. „Vin pelas la peso aldona, *bueno*, do, ek, foriĝu kaj kuru.“

Don Apolinar ne donis manon al li, li frapis lin patrece sur ŝultron.

Celso levis sian pakaĵon. Tiam li klinis la kapon, ŝovis la dikfingrojn de ambaŭ manoj sub la surfruntan portorimenon, por ĝin reordigi, ĉar ĝi premis lin. Li turniĝis por foriri.

Don Apolinar, sen leviĝo de sur sia benko,diris: „*Buena suerte*, multe da feliĉo.“

„Gracias, patroncito, *me voy*, mi ekiras.“ Kaj jam li estis for el la magazeno.

Rimarkoj
A sus órdenes, patroncito =Je via servo, patronĉjo!
botica = apoteko
ladino = mestizo = ido de blankuloj kaj indiĝenoj, en Ĉiapaso uzata specife por kontrasti indiĝenojn kaj ne-indiĝenojn, do ne nur mestizojn, sed ankaŭ blankulojn
legua = leŭgo, mezurunuo de distancoj, surtere ĉirkaŭ 4,5 km-oj

06

La hasto, kun kiu Celso survojiĝis, ne koncernis la leterojn. Senprobleme li povus atendi ĝis la sekva mateno. Sed ĝuste tion li volis eviti.

Povus okazi, kiel *don* Apolinar ĝuste diris, ke du aŭ eĉ kvar monatojn ne irus karavano al la monterioj, sed same tiel bone eblus, ke dum horo alvenus en la urbon karavano aŭ eĉ nur karavaneto, kiu estus sur la vojo al la monterio. En tia kazo *don* Apolinar revokus Celson, forprenus de li la leteron kaj la kesteton, donus al li kvindekon da centavoj por la peno kaj transdonus la leteron kaj la kesteton al *arriero*, do al mulpelisto de la karavano. Li donus al li tri pesojn da krommono, kaj la viro estus kontenta, ĉar li ricevus donacon da tri pesoj, ĉar li devas iri al la monterio ja ĉiukaze. Kaj ĉu li kunportos la leteron kaj la kesteton aŭ ne, tio ĉe lia transporto estus tute egala.

Sed se Celso estus jam eĉ nur tridek minutojn for el la urbo, tiukaze *don* Apolinar povus postsendi eĉ la plej rapidan ĉevalon al li, sed la viro sur la ĉevalo ne rekondukus lin. Tro longan vojon li ne povus postsendi

heroldon, tio fariĝus tro multekosta. Sed Celso volas marŝi al la monterio, kaj li volas, ke la vojo estu bone pagita. Tial for el la urbo! Ĉu li irus la vojon, kiun desegnis *don* Apolinar por li, tio tiam ne estis certa. Sur tiu vojo povus renkonti lin postsendita heroldo. Tial Celso iras sian propran vojon. Li devis nur kun certo alveni en la lasta setlejo antaŭ la ĝangalo, ĉar nur de tie eblis pluirado al la monterio. Sed kiel Celso atingos la setlejon, tio estis afero lia. La setlejon li trovus same tiel bone sen la desegnaĵo de *don* Apolinar, eble multe pli bone sen la krajone gratita zigzagado.

Sed al Jovel ne venis karavano, kiu troviĝis en marŝo al monterio. Eĉ dum monatoj alvenis neniu. Kaj oni ne postsendis rajdantan heroldon al Celso. Sed Celso, ŝanceliĝanta de bonŝanco al bonŝanco, renkontis en la setlejo pomalgrandan meksikan komerciston. Tiu komercisto havis tri azenetojn ŝarĝitajn per malmultekostaj komercaĵoj kaj kiel helpanton li havis knabon dekdujaran. En ĉiuj vilaĝoj kaj haciendoj, kie la komercisto vojaĝis, li faris tiom aĉajn negocojn, ke tio priplorindis. La grandaj arabaj komercistoj, kiuj vojaĝis kun dudek, ja kun kvardek muloj, ne nur povis aĉeti ĉion pli malkare, sed iliaj varoj validis kiel pli bonaj kaj pli

modernaj. La monterio estis nun la lasta espero por *don* Policarpo, kiu estis hejme en Socoltenango. Sed li timis sole migri tra la ĝangalo kun la eta metilernanto de komerco. Li atendis, ke eble alvenos kelkaj mahagonlaboristoj, kiuj estas sur la vojo al la monterio, kaj kun kiuj li povus vojaĝi. Sed neniu venis. Li jam decidis sekvamatene revojaĝi por denove iri sian vojon tra la vilaĝoj kaj haciendoj.

Jen trotante alvenis kun la sunsubiro, Celso. Al tiu fora setlejo venis nur tiu, kiu tie aŭ loĝas aŭ tiu, kiu marŝas plu tra la ĝangalo. Celso ne loĝis tie. Tial *don* Policarpo ne devis demandi lin, kien li volas iri.

Li rigardis tion kiel bonŝancon, ke Celso alvenis. Post interkonsentiĝo Celso des pli rigardis tion kiel bonŝancon, ke li trovis la komerciston.

Ju pli Celso proksimiĝis al la ĝangalo des pli klare li konsciiĝis pri la malfacilaĵoj, kiuj troviĝas antaŭ li, ĉar tiu ĝangalo estis tre diferenca de tiuj ĝangaloj, al kiuj li konatiĝis tie, kie li iam plantis kafon kaj sarkis el la vicoj inter la kafarboj la fiherbojn. Tio estis kultivita ĝangalo, kun helaj kaj puraj vojoj. Se oni estis jam tiom

malproksime de kafoplantejo, ke oni apenaŭ plu povis aŭdi la bojadon de hundoj, oni jam ĉeokaze tute mallaŭte perceptis la bojadon de la hundoj de la sekva plantejo.

Kiam *don* Apolinar parolis pri la ĝangalo, estis en la imago de Celso la kultivita ĝangalo de la kafoplantejo. Li pensis la ĝangalon nur iom pli prikreskata kaj la distancon inter du plantejoj iom pli longa. Sed li imagis ja ankoraŭ, ke li estas en atingebla proksimo de aliaj homaj vizaĝoj, voĉoj kaj agoj.

Sur la ĝistiama vojo li renkontis nun vojkunulojn, kiuj konis la grandan ĝangalon kaj kelkajn, kiuj jam marŝis sur la vojo al la monterio. Vespere li tiam eksciis en la kabanoj de indiĝenaj vilaĝanoj, kie li tranoktis, pluajn detalojn pri la marŝo tra la ĝangalo de spertaj viroj.

Ĉiu unuopulo diris al li, ke li sola ne povus marŝi la vojon. Neniu povus marŝi sola. Tio estis laŭ ili la kaŭzo, kial la monterioj estas tiom certaj pri siaj viroj, se ili jam foje estas tie.

Kaj ĉiu parolis pri aliaj kaŭzoj, kial sola viro, eĉ se li estas indiĝeno aŭ pli malbonŝance eĉ ladino, ne povas marŝi sola. Ĉiun kaŭzon, kiu estis klarigita al li, Celso

komprenis. Tiu, kiu ŝajne estis bonintenca al li, avertis lin tute serioze entrepreni la marŝon, ĉar estas tute certe, ke li pereos en la ĝangalo.

Li estis transpreninta la komision porti la leteron kaj la kesteton al la monterio Agua Azul. Al neniu survoje aŭ en la kabanoj li parolis pri la letero. Li estis memgardema, eĉ kontraŭ siaj propraj popolanoj. Li parolis ĉiam nur pri la kesteto kun la kinino, kiun li devas porti por la malsanuloj al la monterioj. Medicinon por malsaniĝintoj ŝtelus neniu de li. Eble tial ne, ĉar la malsaniĝintoj sen medicino povus morti kaj tiam kiel malbonaj spiritoj farus la teran vivon infere malagrabla al la friponoj pri l' ŝtelita medicino.

Ĉiuj homoj, kiujn li pridemandis, rakontis al li hororajn historiojn pri la ĝangalo, pri la vojo tra la ĝangalo kaj pri la travivaĵoj de tiuj, kiuj iris la vojon. La granda plimulto de tiuj homoj kompreneble neniam estis en ĝangalo, la plej multaj eĉ ne proksimiĝis al la unua vepro de ĝangalo. Ĉiuj rakontis pri tio, kion aliaj vidis kaj travivis.

Kiel ajn la diversaj historioj sturme atakis Celson, kaj kiu ajn rakontis ilin, kaj je kia ajn maniero oni raportis, ĉio ĉi,

sen escepto kontribuis al tio, vekigi en Celso gigantan timon pri la ĝangalo. Iun celon, eble eĉ tiun, Celson deturnigi de sia tasko, certe neniu havis. Ĉu Celso aŭ pereas en la ĝangalo aŭ ne, tio estis tute egala al ĉiu. Oni parolis nur, por havi interesajn aŭskultantojn por distri al si mem la tempon kaj por entuziasmigi sin je la propraj rakontoj kaj por eskcitiĝi. Oni ankaŭ ne rakontas fantom- kaj hororrakontojn nokte por deturnigi iun de tio iri en la nokto tra tombejo, se tiu devas fari tion. Oni rakontas por rakonti, por pasigi vesperon agrable kaj por delektiĝi je la timo de la najbaro.

Nu, kompreneble, plezuro aŭ eĉ *feria* aŭ promeno la marŝo tra la ĝangalo ne estis. Tiu marŝo en vero estis jam tre proksima al la hororrakontoj, kiujn raportis la homoj. Ĉar tiuj homoj, kiuj renkontis Celson en lia vojaĝo, ĉe kiuj li tranoktis, estis indiĝenoj. Kaj ne estis ties kutimo tro troigi aferojn, kiuj per si mem estis naturaj kaj kiujn iu devas fari. Kelkaj koncedis, ke oni efektive povus iri sola la vojon, sed la malfacilaĵo traveni estus tamen tiel granda, ke oni agas multe pli prudente, se oni ne iras sola la vojon, ĉar la sekureco atingi la monterion sola, estus nur kvindekprocenta.

Plenŝtopite ĝis la dentoj pri tiaj rakontoj, opinioj kaj konsiloj, alvenis Celso en la lasta setlejo. Certan impreson pri tio, kio atendos lin, li ricevis en la lastaj dekdu horoj. La setlejo mem troviĝis jam je duono de marŝtago profunde en la ĝangalo, eĉ se tiu parto de la vojo ankoraŭ ne estis origina ĝangalo, sed transiro de unu pejzaĝo al alia. Estis miksita pejzaĝo. Sed estis jam sufiĉe da ĝangalo por ekscii kiel aspektas la granda ĝangalo. Sur tiu ĉi lasta vojdistanco daŭranta duonon de tago, Celso ankoraŭ ne trovis eĉ nur unu homon, male al tio jam la spurojn de grandaj jaguaroj; kaj sur branĉo li vidis jaguaron, kiu tie kaŭrante kliniĝinte firmkroĉiĝis per siaj ungoj.

Mallonge antaŭ tagmezo li trairis la lastan vilaĝon de sia marŝo. Estis vilaĝo, kiu konsistis nur el kvin kabanoj kaj argila domo. Tuj post la vilaĝo Celso vadis tra granda rivero, kiu tie estis sufiĉe malprofunda, kaj en kiu la akvo atingis ĝuste ĝis la koksoj de Celso.

Post la rivero la ĝangalo komencis montri sin. Unue ankoraŭ malferme kaj hele, kvazaŭ tiel, kiel tre sovaĝiĝinta terpeco, kiu antaŭ multaj jaroj iam estis kultivata. Tiam ĝi fariĝis iom post, sed sufiĉe bone rimarkeble, pli kaj pli dense, pli morne kaj pli potence;

kaj pli minacante kun ĉiu paŝo, kiun Celso iris plu.

Li trotis facilmaniere, por atingi la setlejon antaŭ la nokto. Antaŭ la setlejo, kiam li jam aŭdis boji la hundojn, estis denove travadenda rivero, kiu tie estis tiom larĝa kaj en la mezo tiom profunda, ke Celso, antaŭpalpante per la piedoj kaj bastono, devis serĉi lokon, kie li travenos sen devi naĝi. Ke tiu rivero jam entenis atentindajn gregojn da aligatoroj, Celso ne sciis. Kaj neniu estis dirinta tion al li. Ĉar li sciis nenion pri aligatoroj, li vadis tra la akvo sen timo. La aligatoroj plezuriĝis ĝuste en alia maniero, kaj tial ili ne okupiĝis pri Celso.

Kiam Celso fine alvenis en la setlejo, li diris al la *mayordomo* de la setlejo: „Hodiaŭ posttagmeze mi jam ricevis bonan imagon pri la ĝangalo; jen aĉa kaj terura marŝo.“

La kabana mastro metis kruron sur alian, rigardis Celson, rulumis cigaredon kaj opiniis kvazaŭ preterire: „Hodiaŭ posttagmeze, ĉu? Nu, vi ricevis bonan imagon pri la ĝangalo, ĉu? Certe, certe, sed tie, kie vi marŝis, tie ne estas ĝangalo. Tio estas nia ripozoparko, kiam ni dimanĉe posttagmeze volas iom promeni. Je la dua marŝtago de ĉi

tie komenciĝas tio, pri kio mi kutime diras, ke tie nun la tereno komenciĝas fariĝi preskaŭ tute samaspekta kaj netravidebla. Sed *muchacho*, ne timu, la jaguaroj kutime ne mordas je la hela tago, tiam ili dormas, ili interesiĝas pli pri ulo, kiu dormas, kaj kiu endorme turniĝadas tien kaj tien. Sed mi konas sufiĉe da homoj, kiujn jaguaro molestis ankoraŭ neniam.“

Li lekadis sian cigaredon, bruligis ĝin kaj parolis plu: „Vin mi ne konas, *muchacho*. Sed, se vi iam ree travenos ĉi tie, vi ja povos diri al mi, kiel vi interkonsentiĝis kun la jaguaroj, kaj kiel la jaguaroj kun vi. Kaj se ni tiam ree trankvile povos interparoli, jen mi kalkulos vin al la homoj, kiujn mi konas, kaj kiujn jaguaro ne molestis.“

Jen do la ripozoparko por posttagmeza dimanĉo! Estis nun jam malhele. Celso turniĝis tie, kie li estis. Dudek paŝojn post la primitiva kabano, antaŭ kiu li sidis kun la korta kabanmastro, leviĝis la ĝangalo kun kruta vando el arboj. Ili tiom vaste kovris la ĉielon, ke Celso, se li volis vidi stelon, devis meti la kapon preskaŭ al la nuko. Muro, kiu estis alta sesdek, okdek aŭ cent metrojn. Tenebra kaj densa muro, nealirebla kaj sen malfermo.

„Kion vi cetere bezonas por la marŝo, chamulano?“ demandis la *mayordomo*. „Mi havas rostitajn tortiljojn, specialan specon, kiu ne fariĝas ŝima kaj makulhava. Aliaj tortiljoj ne taŭgus por vi. Mi havas rizon, fabojn, krudan sukeron, salon, alumetojn, kenajn torĉojn, freŝe muelitan kafon kaj citronojn. Vi ankaŭ povas ricevi freŝan posolon. Sed tiun nur kun dekdu horoj da mendotempo. Por ke ĝi estu freŝa kaj ne tiel rapide fariĝu verda kaj acida. Krudajn tabakfoliojn mi havas sufiĉe, kaj malpli karajn ol pakpaperon, kiun mi ne havas. Iom da cigareda papero vi povas ricevi de mi. Sed vi rulumas ja cigarojn, do vi ne bezonas cigaredopaperon. Kaj entute estas por vi pli bone, se vi atendos ĝis morgaŭ ĉi tie. Tiukaze ni povos knedi por vi bonan posolon. Vi ja ne devas hasti. Ĉi tie estas tiel, ke tiu, kiu devas iri tra la ĝangalo, ne rapidu. Nenio helpas al li. Helpas al li eĉ ne io, se li estas meze de ĝi. Prenu al vi tempon, kaj prenu al vi sufiĉe da tempo. La ĝangalo ne forkuros de vi kaj ankaŭ pontoj ne trarompiĝos, ĉar ne estas pontoj tie.“

La *mayordomo* leviĝis kaj iris en la kabanon, kie li penis ekfunkciigi fulgokovritan lanternon. Fariĝis nun jam tute nokte.

En la korto antaŭ la kabano brulis tiam jam nevigla fajro, kiu disvastigis certan helecon, kiu sufiĉis por vidi, kie estas la latbarilo de la korto.

Celso sidis sur trabo, kiu kuŝis surtere. La trabo estis kruda trunko, de kiu falis la ŝelo. Senŝeligi la trabon neniu penis. Je pluraj lokoj la trabo estis senatente noĉita. Tiuj noĉoj ekestis pro maĉetbatoj de homoj, kiuj tie staris kaj kaŭris kaj ne sciis, kiel ili pasigu la tempon.

'Prenu al vi tempon, vi ja ne devas hasti'. Tiu rimarko de la *mayordomo* venis tiam en la kapon de Celso. Sonis al li kiel la voko:'Atendu, amiko mia, mi helpos al vi.'

Dum la lastaj du tagoj, en sia animo pli kaj influate de la rakontoj pri la ĝangalo kaj precipe dum la dua duono de tiu ĉi tago, Celso komencis rigardi sian taskon el aliaj vidpunktoj. Li ĉesis pensi pri la pesorekompenco por precipa transportrapideco de la letero. Sed li estis promesinta porti la leteron kaj la kesteton al la monterio. Kion li promesis fari, li plenumos. Sed por trovi elirvojon el la urĝo, en kiun li venis sekve de la avertoj pri la ĝangalo, li okupiĝis serĉi tian solvon de sia tasko, kia estas malpli danĝera por li.

Lia instinkto ne permesas disipi sian vivon. Tiu instinkto sciigas lin, ke li havas nur unu vivon; kaj ĉu li havos vivon post la morto, tio estas necerta. Pri tio lia instinkto lin ne lasas senti ion. Tiel estas nun lia devo administri tiun vivon bone, ne forĵeti ĝin, ĝin ne riski kaj defendi ĝin kun ĉiuj siaj fortoj kaj kun sia tuta inteligento.

Kun sia malmulte trejnita cerbo li laboris streĉe, por prudente kaj kompreneme akordigi sian devigitan taskon kun sia instinkto ne disipi sian vivon. Tio estis tio, kio okupis tiom liajn pensojn dum la lastaj du tagoj, ke li sekvis sian vojon tiel kvazaŭ moviĝus liaj kruroj sen la kunefiko de la kapo.

Kiam li alvenis en la setlejo, li jam trovis du solvojn. Mankis al li nur la povo kialigi la solvojn tiel, ke li nek pri si mem nek pri *don* Apolinar devus havi la senton, ke li plenumas siajn transprenitajn taskojn nur malfidele.

Ĉar li estis indiĝeno, mankis al li la nocio pri tempo ligita al neceso. Nenio estis rapide farenda en lia vivo. Se li do transdonos la leteron interne de dek kvar tagoj, jen li ricevos peson kiel aldonan rekompencon. Sed, en lia komisio per neniu vorto estis dirita, ke la letero en ĉiu

kazo devu esti transdonita je fiksita tago en la monterio. Tion *don* Apolinar ne ordonus, ĉar dum tiom longa kaj peniga marŝo povus ekesti cent naturaj kaŭzoj, kiuj malhelpus la plumarŝadon de heroldo dum tagoj. Li povus fali teren, rivero povus forflosigi lin je longa distanco, li povus vundiĝi, la riveroj sekve de forta pluvo povus ŝveliĝi kaj li devus atendi ĝis ili ree havos normalan nivelon. Ekzistas nenombreble multaj kialoj por malhelpo.

Kaj ĉar nenio estis dirita pri tio, ke la letero nepre estu je certa tago ĉe *don* Eduardo, tial Celso povis tiam atendi en la setlejo ĝis li trovos akompanantojn. Oni pagis certan nombron de marŝtagoj al li. Se necesus pli da tagoj, tio okazus je kostoj liaj. Li ne prirabus *don* Apolinar, eĉ ne pri centavo.

Sed li transprenis la devon porti la leteron kaj la kesteton en ĉiu kazo al la monterio. Kaj Celso diris tion al si: 'Se mi pereos en la ĝangalo tiel aŭ tiel, la letero perdiĝos kaj ankaŭ la kesteto, kaj mi povos liveri nek la leteron nek la kesteton al *don* Eduardo. Por sekure transdoni la leteron, mi devas protekti mian vivon. Mi protektas ĝin plej bone, se mi iras ne sola tra la ĝangalo, sed atendas

akompanantojn.

Plej bonvene al li estis tial la rimarko de la *mayordomo*, ke li prenu tempon al si, ke li ne hastu kaj atendu tie.

La *mayordomo* estis ladino. Tiu diris, ke estus pli bone, se li atendus. Tiu scias tion plej bone. Celso povas ĉiam apogi sin rilate al *don* Apolinar kaj *don* Eduardo je la *mayordomo*. Celso diris senkaŝe al *don* Apolinar, ke li ne konas la vojon tra la ĝangalo. *Don* Apolinar havis la rajton pro tiu nesciado de Celso rifuzi la komision al li. Li ne faris tion, li donis al li la komision, kaj li tial devis transpreni la respondecon.

Tiel Celso, kiam la *mayordomo* altrotis finfine kun la fulganta lanterno, troviĝis en tiom trankviligita stato, kvazaŭ li devus iri la konatan vojon de sia vilaĝo al Jovel.

Li gratadis je siaj nudaj piedoj, eltiris entretitan pikilon, elpikis *niguas*, la bestaĉajn sablopulojn el la piedfingroj. Li gratis la *garrapatos*, la iksodojn el la haŭto kaj kun kamforo frotis moskitopikojn. Ĉion tion li faris kun la nehastema trankvilo de migranta indiĝeno, kiu scias, ke li ne devas marŝi je la sekva tago, sed enŝovas tagon de ripozo.

Fininte tiun higienan laboron, li prenis fruktopelvon el sia pakaĵo kaj demandis al la *mayordomo*, kie estas la akvo.

La *mayordomo* balanciĝis en la hejmfarita hamako streĉita inter du fostoj de la kabana portiko, por pasigi la tempon ĝis la vespermanĝo ne vane.

Kun la botelpinto li montris direkton kaj diris: „Tie transe estas la rivereto; jen pura, klara kaj saniga akvo.“

Celso perdiĝis en la malhelo. Li lavis siajn manojn kaj ŝprucis akvon sur sian vizaĝon. Tiam li trinkis akvon el sia pelvo kaj poste portis la pelvon plenigitan kun akvo reen al la trabo, kie li jam preparis sian tranoktejon.

Li retiriĝis pli al la unua fosto de la domo por esti pli malproksima de la tablo, kiu staris sub la portiko kaj je kiu manĝas la familio de la *mayordomo* vespere. Li altrenis sian pakaĵon, ree kaŭriĝis sur la trabo kaj komencis trafosi sian pakaĵon.

El la profundo li eligis ĉifitajn tortiljojn, kiuj jam komencis fariĝi rompiĝemaj. Poste nigre ruĝan sekigitan viandon similan al freŝa ledo. Kaĉigitajn nigrajn kuiritajn

fabojn envolvitajn en freŝan bananfolion. Krudan grajnan salon envolvitan en bananfolio kaj kunligita per minca bastfadeno. Kelkajn verdajn akrajn kapsikojn kaj manplenon da verdaj folioj, kiuj donu spican guston al la manĝo.

Ĉion tion metis Celso sur mateton el plektitaj bastfadenoj. Kaj tiam li iris, sen demandi pri permeso al la bivakfajro en la korto. La fajro estas je dispono al ĉiu migranto, ĉu tiu estas indiĝeno, ĉu ladino, se ĝi ne estas ĝuste uzata de la gastiganto.

Celso vigligis la fajron, surmetis pluan lignon. Kaj la korto kaj la kabano estis hele iluminataj. Kontraŭ tiu ekflamiĝanta lumo konturiĝis la vando de la ĝangalo nur des pli minacanta.

La juna viro kuŝigis la tortilojn al la fajro, turnis ilin, deblovis la cindron kaj ree turnis ilin; kaj kiam ili komencis eknigri, li retiris ilin al si kaj metis ilin en varmegan cindron tiritan de li per branĉeto el sub la fajro, por teni la tortiljojn varmaj.

La ledan ŝirajon el sekigita viando li pikis sur bastoneton kaj metis tiam la bastoneton sur du trunketojn, kiujn li

estis stariginta vertikale, por ke la viando ne estu vorata de flamoj. La fabojn li lasis en la bananfolio, sed li nestigis la banafolion en varmega cindro, kiun li jam gratis el sub la fajro.

Kiam la viando komencis stufi, li sternis sian manĝon sur la mateton, iom fortiris la maton de la fajro, turnis la viandon ankoraŭ plurfoje, prenis ĝin tiam kun bastoneto de la fajro kaj komencis sian vespermanĝon.

Li havis nek tranĉilon, nek forkon, nek kuleron. Tamen li uzis la fingrojn nur por preni la pinĉaĵojn da salo, kiujn li ne disŝutis sur la manĝon, sed kiujn li ŝovis senpere en la buŝon. La viandon kaj la fabojn li manĝis tiel, ke li derompis pecon de la tortiljo kaj kun tiu tortilja ŝiraĵo li levis la viandon aŭ la fabojn tiel, kvazaŭ li farus tion per ĉifoneto. Se li levis jam tiel pikante viandon aŭ fabojn, jen li kunrulis la tortiljajn ŝiraĵon rapide kiel konusforman papersaketon kaj ŝovis la saketon plenigitan kun viando kaj faboj en la buŝon.

Al tio li trinkis la akvon, kiun li ĉerpis per la pelvo en la rivereto. Li uzis senfine da tempo por la manĝo. Kiel ĉiuj

lacigitaj laboristoj li rigardis la manĝon kiel parton de la ripozo de streĉa laboro.

Dum li ankoraŭ manĝis, alportis la indiĝenaj servoknabinoj de la *mayordomo* la pelvojn kun la vespermanĝo. Kiam la pelvoj, teleroj kaj ladotasoj estis metitaj sur la alta ŝanceliĝema tablo, aperis la edzino de la *mayordomo*. Ŝi estis peza, plumpa kaj moviĝis kiel anaso antaŭen. Ŝi estis nudpieda kaj vestita per longa katunjupo atinganta ĝistere. Tiu triviĝis kiel la blanka katunbluzo, kiun ŝi portis parte malferme je la supra korpoparto, kaj kiu aspektis, kvazaŭ forta vento disfaligus ĝin en nebulo.

Kiam la sinjorino aperis en la portiko, Celso ekstaris de la fajro, iris renkonte al ŝi, kliniĝis kaj diris: *„Buenas noches, señora.“* La sinjorino rediris la saluton kaj rimarkis, nur por paroli ion: „De kie vi estas, chamulano?“

Sed tiam ŝi jam ne plu aŭskultis al tio, kion la junulo respondas, ĉar estis egale al ŝi, de kie li efektive venis. Ŝi sidiĝis sur tute malaltan skabelon. Estis tie nur du seĝoj. Sed la malalta skabelo ŝajne pli oportunis al la ino ol iu

kutima seĝo. Kaj ĉar ŝi sidis malalte, tiel, ke ŝi apenaŭ povis transrigardi la tablon, ŝi prenis sian teleron sur la sinon.

Kiam la sinjorino jam ekmanĝis, oscedis la *mayordomo* laŭte kaj elkore, skuis sin en sia hamako plurfoje tien kaj ĉi tien kaj rektiĝis poste tiom ĝemante, kvazaŭ li devus iri post longa bela dormo al malagrabla laboro.

Forkon kaj tranĉilon ankaŭ la *mayordomo* ne havis. Estis nur kelkaj kuleretoj sur la tablo, kiuj, kiam ili iam estis novaj, certe aspektis kiel falsa arĝento, sed kiuj tiam tiom estis prifrotitaj, ke jam ekvideblis nur la kruda, plumpe aspektanta lado. La edzino de la *mayordomo* manĝis per la fingroj, tiel kiel manĝis ankaŭ Celso. Ŝi ĉiufoje deŝiris pecon de varmega tortiljo, pike levis per tio sian manĝon aŭ siajn fabojn aŭ sian akran kapsikon aŭ sian rizon, permane kunĉifis la tortiljan ŝirajon kun la interne kunigitaj manĝoj kvazaŭ kiel saketon kaj ŝovis la tuton en la buŝon.

La *mayordomo* plej volonte estus manĝinta same tiel, sed ĉar li sentis, ke kiel *mayordomo* li devas esti diferenca de ĉiuj aliaj mortemaj homoj, por ne perdi la respekton, li

uzis sian poŝtranĉilon kaj ĉeokaze kuleron por manĝi. Sed, se li pensis, ke neniu observas lin, kaj ke eĉ lia edzino ne observas lin, li manĝis tute tiel kiel Celso.

La servistinoj surtere kaŭris tre malproksime en la fono, ie en la malhelo apud ardanta fajro. Oni ne vidis ilin, oni aŭdis nur ilian babiladon kaj subridadon. Se ili fariĝis tro laŭtaj, vokis la edzino: „Damnita fibando, mi ĵetos al vi bastonegon al la kranioj, se vi ne lasos manĝi nin ĉi tie trankvile.“

Dum kelke da tempo la knabinoj silentiĝis iom timigite, tiam ili ree subridis kiel kokinoj ĝis la edzino finfine kaptis ion, kio ĝuste estis ĉemane kaj ĵetis tion en tiun malhelon, kie la servistinoj kaŭris kaj manĝis.

Laste ili trinkis kafon el emajlotasoj, kiuj ekstere sube havis la stampitan surskribon *Bavario*. Kial ĝi estis surstampita, kaj kion ĝi signifas, sciis tie neniu en ĉirkaŭo de kvincent mejloj. Neniu okupiĝis pri tio. La knabinoj trinkis sian kafon el trinkpelvoj, kiel Celso, kiu ĉiam portis tian kun si.

Tuj kiam estis trinkita la lasta gluto, vokis la edzino, kun la taso ankoraŭ ĉe la buŝo: „*Lleven*. Detabligu!“ Post tio la

servistinoj alkuris rapide kaj forportis ĉion de la tablo.

Kiam la servistinoj, volis levi la premkavigitan ladokruĉon, en kiu troviĝis la kafo, vokis la *mayordomo*: „Venu, chamulano, jen prenu la kafon.“

Celso venis kun sia pelvo al la tablo kaj la *mayordomo* verŝis la tutan kafon, kiu ankoraŭ estis en la kruĉo, en ties pelvon.

„*Gracias,* patronĉjo“, diris Celso ridante kaj reiris gardeme pri la ĝisrande en la pelvon verŝitan kafon, al sia fajro.

La kafo estis nigra, sed kuirita kune kun bruna kruda sukero.

La edzino ekstaris de sia skabelo. Ŝi faris tiel, kvazaŭ estus giganta peno por ŝi leviĝi de la skabelo. Unue ŝi kliniĝis tre antaŭen, tiel, ke la nazo tuŝis la genuojn, tiam ŝi reĵetis la supran korpoparton kaj leviĝis per tiu svingo.

La *mayordomo* ree ĵetiĝis en la hamakon kaj komencis balanci sin. La krurojn li lasis pendi trans la hamakon je ambaŭ flankoj. Tiam li tiris ŝmacante la postrestaĵojn de

la vespermanĝo el la dentoj, dum li tenis la manojn kunfaldite post la kapo por havi kusenon. Tiel ofte, kiel ŝajnis al li agrabla aŭ helpis al lia digestado, li gruntis bonfarte. Ĉu li faris tion pro pura bonfartemo aŭ pro psika neceso aŭ por diri al sia edzino tiumaniere, ke ŝi estas bona kuiristino, ne estis eltrovebla. Sed oni trafas la ĝustan, se oni supozas, ke li faris ĉion tion, ĉar li sentis sin hejme, kaj ĉar li tie estis la ĉiopova reganto, kiu devas zorgi sin pri la bonfarto de neniu; kaj se tio al iu ajn ne plaĉus, kiel kondutas la reganto, tiu ja povus foriri sian vojon.

Rimarkoj

Buenas noches señora. = Bonan nokton, sinjorino.
Bavario = en la originalo legeblas kiel 'Bayern'. Sed ĉar B.Traven en Munkeno estis membro de la revolucia registaro en la „ruĝa“ Konsilia Respubliko *Baiern*, li certe sciis, ke oni skribas sur tiajn tasojn ne 'Bayern', sed *„Bavaria“*. Estas do iom enigme, ke li skribis tamen tiel. Ĉu li volis mistifiki nin? Ĉu ŝajnigi, ke li ne scias tion? Ke li neniam estis en Bavario? En sian taglibron notis Ret Marut la 26-an de septembro en la jaro 1924: *The Bavarian of Munich is dead.* (La bavaro de Munkeno estas morta.) Ŝajne li celis sin mem, lia rolo kiel bavara revoluciulo kiel Marut estis finita, komenciĝis nova tempo en la nova haŭto de certa B.Traven. Do tiel hazarde, kiel oni povus supozi tion unuamomente, li ne evitas la vorton „Bavaria (Bavario)“, kaj li verkas originale intence „Bayern“,

kaj ne eventuale eĉ „Baiern“ kiel surskribon de la taso, tio estus estinta tro evidenta saluto al la batalkamaradoj el la munkena tempo, ĉar tio estis laŭ la dekreto la nova nomo de Bavario por la antaŭa nomo „Bayern“, kiam la ruĝa respubliko ĵus starigis konsiliian respublikon laŭ la modelo de la bolŝevikaj sovetoj, kiuj origine estis rusaj kamparaj komunumoj.
Lleven = Forprenu!
mayordomo = intendanto, domkortega mastro, administristo, domisto
posol aŭ potzol = trinkaĵo el fermentita maizo, komuna en Ĉiapaso.
señora = sinjorino

07

Ankaŭ Celso intertempe finis sian vespermanĝon. Li iris kun sia pelvo al la rivereto, lavis siajn manojn, lavis kaj gargaris sian buŝon kaj revenis kun la pelvo plenigita de akvo al la bivakfajro. Li kunpakis siajn aĵojn kaj metis ĉion en sian reton. Li tiam tiris la pakaĵon reen al la trabo en la proksimo de la portiko, elprenis memrulumitan cigaron, ekbruligis ĝin per ardetanta bastoneto je la fajro kaj kaŭris sin nun fine en oportuna senzorgemo larĝe sur la trabon, apogante sin per la dorso kontraŭ la unua fosto de la portiko.

„Cetere, kiu sendis vin al Agua Azul?“ demandis la *mayordomo* por interparoli.

„*Don* Apolinar.“

La *mayordomo* tiris tabakon el la ĉemizopoŝo kaj vualis ĝin en mincan blankan paperon, kiu estis vendita kiel cigaredopapero, sed kiu estis tamen kutima pakpapero, eble eĉ pli malbonkvalita, neniel pli bona, kaj por cigaredoj neniel pli taŭga ol nepresita gazetpapero.

Servoprete Celso saltis supren, kiam li vidis, ke la

cigaredo estis rulumita kaj venis kun ardetanta branĉeto al la *mayordomo* por bruligi ties cigaredon.

„Estas de Dio malbenita vojo ĝis la monterio. Sed de tempo al tempo mi pensas, ke oni multe pli facile trairas surpiede ol per rajdobestoj kaj ŝarĝmuloj.“

Celso respondis nenion.

La *mayordomo* ne sciis, kion nun ankoraŭ diri aldone. Ĉio, kio povus esti temo, estis jam klarigita.

Sed li aŭdis voĉojn, kiuj proksimiĝis, kaj tio kondukis lin al nova inspiro: „Eble vi povus iri kun *don* Policarpo. Duope aŭ triope la vojo ne estas tiel trista.“

Ankaŭ Celso aŭdis la voĉojn, kaj kiam li rigardis flanken, li rimarkis en la malhelo du nekonturitajn figurojn, kiuj fine elpaŝis el la malhelo kaj ekrigardeblis. Jen viro kaj knabo.

„Buenas noches“, diris la viro, paŝis en la portikon kaj sidiĝis sur seĝon, kiun li ĵus fortiris de la tablo. La knabo sidiĝis sur la alian flankon de la trabo, sur kiu sidis Celso.

„*Como estas*, chamulano, kiel vi fartas?!“ li diris, turnante

sin al Celso.

Celso ekstaris, kliniĝis antaŭ la viro kaj diris: „*Buenas noches.*“

Estas *don* Policarpo de Socoltenango, komercisto, ankaŭ li volas iri al la monterioj. „Vi povus iri kun li, chamulano“, diris la *mayordomo*.

Nenion Celso en la lastaj tagoj pli sopire atendis ol iun, kiu volas migri al la monterioj kaj kiu povus iri la vojon komune kun li.

Sed Celso ne estis plu la sama nelerta kaj monde nesperta indiĝeno kiel tiam, kiam li revenis de la kafoplantejo. Li mem sentis, ke li ŝanĝiĝis. La unua ŝanĝo okazis, kiam *don* Sixto forprenis lian nuptomonon sen ia ajn ceremonio; la dua ŝanĝo okazis, kiam li ne plu povis aĉeti donacon por sia patrino, ĉar la komercisto triobligis la prezon por li, kiel li eksciis pli malfrue, nur por povi vendi brandon al li; la tria ŝanĝo okazis, kiam li aŭdis de sia patro, ke *don* Sixto ne havis la rajton forpreni la monon de li; kaj plia ŝanĝiĝo okazis en li, kiam li vidis kiel lia knabino turniĝis al li, kvankam li kvazaŭ ŝajnigis ne rimarki tion. Kaj ĉiuj tiuj ŝanĝoj influis lian karakteron.

Li jam elkreskis el sia naiveco. Li lernis, ke en tiu ĉi mondo nenio estas donacita kaj, ke tiukaze, se oni ne uzas avantaĝon, kiu ofertiĝas, alia uzas la avantaĝon kontraŭ tiu, kiu ne uzis ĝin. Tiel Celso el siaj spertoj pri malico, kiuj iam dolorigis lin, lernis pensi pli rapide kaj malpli rapide diri 'jes' kaj 'je via servo, patronĉjo'. Kaj ĉar la rapida pensado kaj la malrapida jesado havigis konsiderindan avantaĝon al li dum la komerco kun *don* Apolinar, tial estis decidita afero por li, ke li uzos plu tiun sistemon en la estonteco. Antaŭ liaj ŝanĝoj li dirus: 'Mi estas ja tiom feliĉa, patronĉjo, ke mi renkontis vin kaj ke ni kune povos iri tra la ĝangalo.' Sed tiam li jam sciis, ke la sekvo de lia grandanimeco estus tiu, ke la komercisto tuj eluzus lin je la avantaĝo de la komercisto kaj je la damaĝo de la indiĝeno.

Celso respondis nenion al la vortoj de la *mayordomo*. Li lasis la *mayordomo*-n kaj la komerciston tute en malklareco, kiel li akceptis tion, ĉu ĝi estis bonvena aŭ nebonvena al li.

Li rigardis *don* Policarpon, ne atentofrape, sed bone observante lin.

Don Policarpo aspektis bronze bruna kiel li mem, malaltstatura, sed fortika kaj tendenhava kiel li. Li havis nigrajn, iom oblikve aspektantajn okulojn kiel li. Kaj kiel li *don* Policarpo havis densan, nigran kaj dratecan hararon, kiu falis profunde sur lian frunton kaj, kiu vekis la impreson, ke Celso havas tre malaltan neevoluitan frunton, dum la supra parto de la malantaŭa kapo estis formita kiel konuso, kaj tiel li aspektis, kvazaŭ li estus metinta turbanon sur la kapon. Ne estis dubo, ke ambaŭ praavoj, eble eĉ la praavinoj de *don* Policarpo estis ankoraŭ puraj indiĝenoj en la vilaĝoj de siaj triboj, kaj ke la gepatroj de *don* Policarpo eble venis kiel domservistoj en la urbon, tie geedziĝis kaj edukis siajn infanojn tiam en la urbo. Per tio Policarpo fariĝis ladino, kiu faris sin memstara kaj sendependa kiel vagadanta etkomercisto. Li parolis tiel flue la indiĝenan lingvon kiel la hispanan. Tio ĉe lia komerco estis tre utila, kaj li havis tiel grandan avantaĝon kompare al aliaj etkomercistoj, kiuj parolis nur la hispanan. Ĉar li parolis ne nur indiĝenan lingvon, sed ankaŭ aspektis kiel indiĝeno, kaj se ŝajnis al li avantaĝe, montris indiĝenajn kutimojn kaj uzis ilin, li ĉiam gajnis la konfidon en la indiĝenaj vilaĝetoj kaj inter la indiĝenaj peonoj de la grandaj bienoj. Li estis laŭ sia maniero

honesta komercisto kaj kontentiĝis pri malpli da gajno ol iu alia el la multnombraj komercistoj de meksika aŭ araba devenoj, kiuj vagadis en la lando. La malavantaĝo estis tiu, ke li havis nur malmulte da kapitalo kaj tial povis vojaĝi nur kun malmultaj varoj. La grandaj komercistoj, speciale la arabaj, vojaĝis kun tre grandaj varostokoj kaj tiuj komercistoj dorlotis la homojn per sia ampleksaj ofertoj. Kontraŭ tiuj grandaj komercistoj *don* Policarpo estis ĉiam en embaraso. Por akiri sian porvivon li devis dure labori kaj eterne esti sur la piedoj kaj eterne surmarŝe.

Ĉio ĉi ne estis la zorgo de Celso. Li ne konis la negocajn rilatojn de *don* Policarpo. Li vidis nur la komerciston je *don* Policarpo, komerciston, kiu enspezas monon. Kvankam li ekkonis ankaŭ la indiĝenan fraton je *don* Policarpo, li tamen montris al li la plenan respekton kiel al ladino. Kaj ĉar *don* Policarpo volis esti ladino, tial Celso envicigis lin en la ĉenon de tiuj, kiun li iel bezonis por ree enkasigi la monon de *don* Sixto, kiun tiu forprenis de li.

Celso ekkuraĝis. Li kuraĝis riski la akompanon, kiu ofertiĝis tie al li. Sed li diris al si, se mi ne sukcesos tiel, kiel mi volas, mi tamen povos marŝi kun la viro. Ĉar ne

kostas ion al li, kaj mi ne molestas lin kaj ne volas havi ion de li, povas esti egale al *don* Policarpo, ĉu mi trotos post li aŭ ne.

„Perdóneme, patroncito“, li diris ĝentile kaj subuleme al la *mayordomo*: „Pardonu al mi, patronĉjo, sed mi pensas, ke mi ne povos vojaĝi kun *don* Policarpo.“

„Sed kial ne, *muchacho*?“ demandis *don* Policarpo.

„Pripensu“, li diris turniĝinte al ambaŭ viroj, „mi ricevis de *don* Apolinar la ordonon, ke mi portu la kesteton kun la medicino kiel eble plej rapide al Agua Azul, ĉar la peonoj estas malsanaj. Ili ĉiuj havas malarion, *paludismo*n, la intermitan febron, kaj kutiman febron. Kion sciu mi pri tio. Kaj *don* Apolinar promesis al mi ankoraŭ krompeson, se mi portos la kesteton rapide.“

Don Policarpo komencis marĉandi. „Lasu tion tiel, chamulano, trankviliĝu. Mi konas *don* Apolinar bone. Li estas mia amiko. Mi ja ĉion tion pritraktos kun li. Kaj mi volas diri al vi tion, *muchacho* – kiel vi nomiĝas? – Celso. Bone. Mi esperas, ke mi faros bonan negocon en la monterioj. Ekde monatoj tie jam ne estis komercisto. Mi estas certa, ke mi ĉion tion, kion mi havas ĉe mi, vendos.

Bone. Vi kompreneble kuras multe pli rapide per viaj kruroj ol mi kun miaj azenoj. Kaj mi koncedas, ke vi perdos vian krompeson, se vi vojaĝos kun mi. Sed tion mi glatigos. Mi donos al vi du pesojn, se vi iros kun mi kaj ni kune vojaĝos.“

La *mayordomo* diris: „Aŭskultu, chamulano, tiel rapide vi ne ree ricevos tri pesojn.“ Li kraĉis brue teren. Tiam li aldonis: „Mi ja ankaŭ jam diris, ke la vojo estas damnita de Dio, infere streĉa vojo. Neniu diablo iras tie por kapti animon al si. Tion vi ja vidos. Post *La Culebra* la ĝojoj komenciĝos. Prenu la du pesojn kaj iru kun *don* Policarpo.“

La *mayordomo* havis viglan intereson je tio, ke ĉiu, kiu venis en la setlejon kun la intenco vojaĝi al la monterioj, ankaŭ efektive ekmarŝos. Estis unu el liaj plej bonaj enspezfontoj, vendi al la vojaĝantoj la necesan provianton. Se li ne havus tiun enspezfonton, li verŝajne tute ne estus akceptinta la magrigan postenon kiel *mayordomo*. La bienulo, al kiu la setlejo apartenis, sed kiu loĝis en Tabasko, donis al li ĉiutage nur dudek kvin centavojn da salajro.

Don Policarpo ne havis alian elirvojon. Li devis migri en la monteriojn por plibonigi sian komercon. Tro longe li ne povis atendi, alie povus okazi, ke pli granda komercisto estus pli rapida ol li kaj kontentigus la tutan bezonon en la monterioj. Sed neniukaze li volis vojaĝi sola, nur kun sia malgranda komizo kiel akompananton. Ankaŭ Celso devis iri al la monterioj. Ankaŭ li ne volis vojaĝi sola, de kiam li aŭdis pri la danĝeroj. Sed Celso povis ŝajnigi al *don* Policarpo kaj al la *mayordomo,* ke li preferas vojaĝi sola. Kaj plian fojon, kiel kontraŭ *don* Apolinar, li ne ofertis sin, kvankam restis al li en vero neniu alia eblo krom akompani *don* Policarpon.

Don Policarpo tiris sian seĝon pli proksime al Celso. Li prenis pakaĵeton kun fabrike produktitaj cigaredoj, malfermis ĝin kaj transdonis cigaredon al Celso. Celso fumis ankoraŭ je sia larĝa cigaro. Sed li prenis tamen la cigaredon kaj kaŝis ĝin en la brustopoŝo.

„Nu, ne estu tiel obstina, Celso“, la komercisto fervore parolis al li. „Mi devas en ĉiu kazo iri en la monterion kun mia fatraso. La knabo, kiu laboras kun mi, estas bona diligenta ulo. Sed li estas ankoraŭ malgranda kaj malfortema. Ĉe tia marŝo oni ja devas havi iun, kiu scias

uzi la manojn. Mi volas diri tion al vi, *muchacho*, ke mi donos al vi tri pesojn ĝis Agua Azul, se vi iros kun mi. Kaj mi volas diri al vi ankaŭ tuj tion, vi manĝos kun mi dum la tuta vojaĝo. Vi ne devas eldoni ion por tio. Kiel rekompencon, ke mi donos al vi la manĝon, dum la marŝo vi iom helpos al mi. Matene ĉe la serĉado de la azenoj kaj ĉe la surpakado. Estu bona *muchacho*, Celso. Vi ne scias, ĉu ni iam denove renkontiĝos kaj mi eble povos fari ion por vi.“

„Bueno, patroncito“, diris Celso, „*bueno*, mi iros kun vi. Sed mi faras tion nur, ĉar vi tiom longe ne havis bonan negocon. Por aliulo mi tute certe ne farus tion. Mi ne povas trompi tiun *don* Apolinar.“

„Mi ja jam diris al vi, Celso“, respondis al tio la komercisto, „mi enordigos tion kun *don* Apolinar, por ke li ne pensu, ke vi volis malfruiĝi intence.“ Li turnis sin al la *mayordomo*: „*Don* Manuel, ĉu viaj *muchachas* ankoraŭ povus fari kafon al ni?“

„Kompreneble, kompreneble“, diris la *mayordomo*. Tiam li vokis: „He, Chucha, malbenita lantemulo kaj merdulo, diru al la sinjorino, ke ni volas havi ankoraŭ pli da kafo.

Kaj rapidu, alie mi saltos sur vian nukon. *Flojos*, fiaj pigruloj, tie en la kuirejo.“ Tiam li grakadis gorĝe kaj elkraĉis pafece.

Ne je la sekva tago, sed je la postsekva, la komercisto, la komizo, Celso kun sia pakaĵo sur la dorso kaj kvar azenetoj ŝarĝitaj per la komercaj varoj de *don* Policarpo ekmarŝis al la monterioj.

La vojo estis kvaroble pli mizera ol la *mayordomo* rakontis pri ĝi.

Estus malordigo de kutimaj aferoj, se ne la plej streĉan laboron sur la vojo ricevus Celso. Li estis bonvolema kaj volis honeste perlabori la manĝon, kiun *don* Policarpo permesis al li. Estis interkonsentite, ke Celso por la manĝo ĉeokaze iom helpos al la komercisto. Sed el la bonvolemo de Celso evoluiĝis jam je la dua tago de la marŝo memkomprenebleco, se ne eĉ devo. *Don* Policarpo komencis komandi, kvazaŭ li estus la mastro kaj Celso la servisto.

Ĝi komenciĝis per tio, ke *don* Policarpo je la unua vespero survoje, kiam ili alvenis ĉe ripozejo, lasis fali sin kaj klarigis, ke li estas tiom laca, ke li ne plu povus kurbigi fingron.

„Deŝarĝu la pakaĵojn de la *burritos, de la* azenetoj, mi helpos al vi pli malfrue“, diris *don* Policarpo. Kaj Celso sen helpo deŝarĝis la bestojn.

„Prenu la pakaĵojn ĉi tien“, *don* Policarpo ordonis poste.

La malgranda komizo penis antaŭ la okuloj de *don* Policarpo veki la ŝajnon, kvazaŭ li kunlaboras fervore.

Sed en vero li kuris nur tien kaj ĉi tien, kunrulis la pakŝnurojn kaj kunmetis ilin por la sekva mateno.

„Ni devas detranĉi foliojn por la azenetoj“, diris *don* Policarpo. Sed tiu 'ni' signifis, ke Celso ekmarŝu kun la maĉeto kaj dehaku foliaron, kaj alportu la foliaron, por ke la azenoj havu manĝon.

Don Policarpo per blovado vigligis la bivakfajron por prepari la manĝon. Sed Celso devis alporti la akvon, devis serĉi sekan lignon, devis lavi la potojn kaj gardi la manĝon, por ke ĝi ne ekbrulu. Matene Celso devis kunkolekti la azenetojn, surmeti la selojn, alporti la pakaĵojn por firmigi ilin sur la azenoj. Ĉe tio don Policarpo kompreneble helpis al li, kaj faris ĉe tio tion, kio laŭ la interkonsento de la intertraktado devus esti la kunhelpo de Celso. Ĉe la ŝarĝado de la portobestoj ĉiam unu persono devas fari la strecan laboron. La pli facila laboro estas la transdonado de la ŝnuroj kaj maŝoj por firme kunpakadi. Celso faris la strecan laboron, la ŝarĝadon kaj kunŝnuradon de la ŝarĝoj.

Kiam Celso serĉis la azenetojn en la ĝangalo, matenmanĝis don Policarpo. Kaj kiam la azenetoj estis

ŝarĝitaj, ili ektrotis kaj don Policarpo post ili. Nur tiam Celso gajnis kelkajn minutojn da tempo por trinki sian kafon kaj varmigi kelkajn tortiljojn al si. La kafon verŝis don Policarpo en lian pelvon, la tortiljojn li metis apud la fajron kaj la fabojn li ŝutis sur unu el la tortiljoj. Celso nun manĝis. Li devis manĝi rapide por ne tro malfruiĝi. Post la manĝo li ŝovelis teron sur la fajron por estingi ĝin. Tiam li levis sian pezan pakaĵon kaj rapide marŝis por ree atingi don Policarpon.

Lastfine li atingis la karavaneton. Kutime estis tiel, ke du aŭ tri bestoj forpuŝis la ŝarĝon, kaj ke Celso nun devis reŝarĝi ilin. Aŭ ankaŭ eblis, ke don Policarpo ne sufiĉe atentis kaj tial besto kuris kun la ŝarĝo sur propra vojo ien en la ĝangalo. Celso devis serĉi la beston. Kaj kiam li renkontis la azenon, tiu eble jam deskuis la ŝarĝon kaj ĝi pendis sub ĝia ventro. Celso ne povis ŝarĝi la beston sola, tial li liberigis la azeneton tute de ties ŝarĝo, kaptis la lazon de la azeno kaj metis la ŝarĝon sur sin mem por porti ĝin tien, kie atendis don Policarpo kun la ceteraj bestoj, por tie, kun la helpo de la komercisto, ree surpaki la ŝarĝon.

Povis okazi, ke la atendantaj bestoj fariĝis senpaciencaj

kaj don Policarpo estis nekapabla reteni ilin. Ili ekmarŝis kaj don Policarpo post ili, ĝis la azenoj per si mem ie haltis kaj ĵetis sin teren. La tutan distancon kuris Celso tiam kun la ŝarĝo de la azeneto sur sia dorso post don Policarpo, ĝis li atingis lin kaj povis ŝarĝi la beston kun li. Kiam la azeno estis reŝarĝita, don Policarpo tuj marŝis plu. Celso devis nun rekuri la distancon por preni sian propran pezan pakaĵon.

Sed Celso ankaŭ en la ĝangalo ŝanĝiĝis plu. Kiam li rimarkis, ke don Policarpo volis eluzi lin ĝis renversiĝo, kaj kiam li ekkomprenis, ke don Policarpo ja eble estas laca, sed eĉ pli nur pigra koste de Celso, ree okazis ŝanĝiĝo en li.

Ĉe la grimpado de tre kruta kaj roka pado falis Celso kun sia pakaĵo teren, kaj li falis tiel malbonŝance kaj ankoraŭ ĝuste antaŭ la okuloj de don Policarpo, ke la komercisto povis vidi kiel Celso elartikigis la dekstran brakon. Celso, tute kontraŭ sia kutima moro malkaŝis senton de doloro, ĝemadis kaj montris turmentatan vizaĝon.

Per la maldekstra brako li ne povis haki foliaron de la arboj. Li devis translasi la nutradon de la azenoj nun al

don Policarpo. Kaj ĉe la ŝarĝado de la azenoj estis nun Celso, kiu transdonis la ŝnurojn kaj maŝojn sub la ventro de la azeno al la pakanto. Dum la marŝo Celso kutimiĝis pri tio antaŭiri la komerciston kaj peli azenon antaŭ si. Li kaŭzigis tion tiel, ke li diris, ke la ceteraj azenoj tiel pli facile sekvas. Se nun al don Policarpo deglitis la pakaĵoj, li devis ree surpaki ilin kun sia komizo, kaj se la azeno, kiun Celso pelis antaŭ si, flankenŝovis ŝarĝon, jen Celso atendis ĝis don Policarpo alvenis.

Tiu ĉi maniero de la labordisdonado ŝajne ne tre plaĉis al don Policarpo. Li diris vespere, ĉe la alveno en la ripozejo, kiam li jam deŝarĝis la azenetojn: „Ho ve, Celso, vi bone povus helpi al mi per via maldekstra brako haki la foliaron de la arboj. Vi estas same tiel lerta kun via maldekstra brako kiel kun via dekstra.“

„Mi provos tion, patrono“, diris Celso helpoprete. Kaj li efektive alportis freŝan foliaran ŝarĝon el la profundo de la ĝangalo.

Kiam ili tiam kaŭris pli malfrue vespere post la manĝo apud la fajro kaj fumis, diris Celso kvazaŭ preterire: „Mi pensas, ke mi ne povas perdi tiom da tempo sur mia vojo,

patrono. La azenoj iras tro malrapide, mi devas esti pli rapide kun mia kesteto en Agua Azul. Don Apolinar tradraŝos min, se mi ne estas sufiĉe frutempe kun la medicino ĉe don Eduardo. La homoj, ĉiuj, estas malsanaj en la monterio.“

Don Policarpo en la tri tagoj de la marŝo ricevis sufiĉe impresan imagon pri la ĝangalo, por nun ektimi, kiam li ekkonis la aĉan perspektivon antaŭ si, ke Celso povus forlasi lin kaj adiaŭi de li meze de la ĝangalo. Tute egale, ĉu li marŝus antaŭen aŭ reen. Jam la penso pri tio lasis flui varman ŝviton en liajn sandalojn.

„Ni dividu skatoleton kun sardenoj, *muchacho*“, diris don Policarpo. Li altiris pakaĵon kaj fosadis en ĝi ĝis li aperigis etan skatoleton kun hispanaj sardenoj. La sardenoj estis en liaj migradoj la lukso, kiun li permesis al si de tempo al tempo, se li faris bonan negocon iutage. Ili estis samtempe lia lastrezerva porcio, nutroporcio por okazo de bezono, se ĉiuj ceteraj nutraĵoj estis detruitaj aŭ de la pluvo aŭ de ratoj. Lia komizo ne povis memori, ke li iam vidis lin malfermi skatoleton, kvankam la komercisto ĉiam havis ses da ili ĉe si. Skatoleto kun sardenoj estis la plej multekosta manĝo, kiun la komercisto en konsidero

de siaj enspezoj dum siaj vojaĝoj povis permesi al si.

La komizo ricevis sardeneton kaj duonan aldone kaj rajtis elleki la ladoskatoleton. La restaĵon de la sardenoj kaj la oleon dividis precize je duono don Policarpo kaj Celso.

Per tiu divido de la sardenskaloteleto, kiun *don* Policarpo tiel devote kaj honeste entreprenis, kvazaŭ li estrus la ceremonion de Sankta Manĝo, li akceptis Celson kiel sian samrangan vojkunulon. Li faris tion tiel decide, ke li vokis la komizon fari ĝin, se io estis alportenda al la bivakfajro aŭ se necesis iu negrava farado. Al Celso li diris: Restadu plu sur via postaĵo, la chamaco povas fari tion. Li ja krome ne havas okupon kaj perlaboras eĉ ne la salon, kiun li formanĝas de mi. Ni ambaŭ estas sufiĉe lacaj, la knabo havas pli viglajn krurojn.

Kaj je la sekva tago en la marŝo, kiam Celso vokis al li: „Patrono, patrono, Prieto deĵetas la ŝarĝon“, jen don Policarpo alvenis, helpis reĝustigi la ŝarĝon kaj diris tiam, kiam ili trotis plu: Aŭdu, Celso, diru simple señor al mi. Tio estas pli konciza. Se ni ne havas manĝon, vi malsatas same tiel, kiel mi.“

Rimarko
señor = sinjoro

Don Policarpo estis nur tagon en la unua monterio, kiun ili atingis, kaj jen eĉ ne plu tvirnfadeno postrestis al li, kiun li povus vendi. Ĉiujn varojn, kiujn li portis kun si de semajnoj en la bienoj kaj en la vilaĝetoj, li vendis kun bonaj enspezoj.

Li aĉetis ridinde malkare felojn, kiujn li volis kunpreni hejmen, por ke la azenoj ne iru sen ŝarĝo, por ke ili enspezigu pli ol nur la kostojn. Pere de feloj li ree povis gajni monon. Li atendis plu nur akompananton. Tiel malmulte kiel li volis vojaĝi sola al la monterioj, tiel malmulte kaj eĉ multe malpli li pensis pri tio remarŝi sola.

Celso ankoraŭ devis iri du tagmarŝojn plu ol *don* Policarpo, kiu tuj haltis en la unua monterio. Sed Celso ne migris sola, ĉar pluraj junaj viroj devis iri la saman vojon transirantan riveron al monterio, kiu troviĝis sur la alia flanko.

Celso transdonis la leterojn kaj la kesteton al *don* Eduardo. Li ricevis sian salajron kontante, ĉar li diris, ke

li ankoraŭ ne volas remarŝi kaj ĉeko tial ne estus utila al li. La homoj, kiuj remigris de la monterioj hejmen, egale ĉu ili estis laboristoj, ĉu oficistoj ĉu komercistoj, ĉiam preferis preni nur iom da mono kontante kaj la restaĵon kiel ĉekon kun la nomo de la portanto. Eĉ la komercistoj, kiuj vendis siajn varojn tie, transdonis la kontantan monon en la oficejoj de la monterioj kaj akceptis por tio ĉekon. Ĉekoj ne tiel facile perdiĝus, kaj ĉar ili havis la nomon de la portanto, ili ankaŭ ne ŝteleblus. Kontanta mono havis pezon. Kaj ĉiu vojaĝanto, ĉu li vojaĝis piede ĉu surĉevale, limigis la pezon de sia pakaĵo je kiel eble plej eta pezomezuro. La cekoj de la monterioj ĉie estis akceptataj, same al mono, sen aldonaj kostoj. La komercistoj de la urbetoj ofte pagis unu aŭ du procentojn pli por la ĉekoj ol tiuj valoris, ĉar transportoj de kontanta mono de la urbetoj al pli grandaj urboj aŭ al la fervojstacioj estis danĝeraj pro la banditoj. Neniu asekuris tiajn monsendaĵojn. Se la komercistoj de la urbetoj interne de la federacia ŝtato devis pagi ion al la pli grandaj komercaj entreprenoj, estis al ili tre agrable, se ili povis pagi siajn kalkulojn per ĉekoj de la monterioj. Celso esperis, ke li trovos laboron en Agua Azul, ne pro la letero, sed pro la laboro li migris al la monterioj. Sed

Agua Azul ĝuste tiam ne dungis laboristojn. La monterio jam dehakis la mahagonlignon de la tereno, kiun ĝi estis akiris por ekspluato. La direktoroj, kanadanoj kaj skotoj intertraktis kun la registaro por ricevi pluajn koncesiojn por aliaj terposedaĵoj. Sed tiuj intertraktadoj okazis tre malrapide. Kaj antaŭ ol tiuj novaj koncesioj ne estis sekurigitaj, la monterio ne povis labori kaj tial ankaŭ ne dungi laboristojn. La laboristoj, kiujn la entrepreno bezonis por plenumi la forflosigadon de la gigantaj provizaĵoj je mahagontrunkoj kun la komenco de la pluvotempo, estis kompletaj. La monterio Agua Azul havis inter la laboristoj la famon esti la ununura monterio, kie la laboristoj estas traktataj kiel homoj, je tiu grado, je kiu monterio entute povas permesi tion. Se ankaŭ en tiu monterio de tempo al tempo okazis malhumanaj aferoj, tiukaze malofte estis la kulpo de la estraro, sed kulpis tion rilatoj, kiujn forigi aŭ eviti estis ekster la povo de la gvidantaj personoj. Tiuj rilatoj baziĝis sur tio, ke mahagono kreskas nur en la ĝangalo kaj nur tie havigeblas, per tio, ke oni eligas ĝin el la ĝangalo. Se tie estus fervojo proksime kaj aŭtomobilfabriko, tiukaze tie ne estus trovebla ĝangalo, sed kultivitaj plugeblaj kampoj. Ju pli malproksima estas la sindikata domo de modernaj

laboristoj des pli nealirebla estas la ĝangalo, kaj des pli bona estas la mahagonligno. Du tre bonaj aĵoj malofte estas kunaj, eĉ ne lindulino, kiu samtempe estas bona kuiristino kaj faras ĉiujn siajn vestojn mem. Tiaj feliĉigaj aferoj estas malpermesitaj al la pekantaj homoj.

Celso devis ekiri por serĉi alian monterion, kie li povis esperi trovi laboron.

La monterioj ne tiel dense apudas kiel la karbominejoj je la rivero Ruro. Ĉiu monterio havas por ties ekspluato terenon de la grando de eŭropa duklando aŭ de meza reĝolando. La mahagonarboj ne tiel dense kreskas kiel karaganoj. Kaj tial de la administra konstruaĵo de unu el la monterioj al la ĉefa administrejo de alia monterio necesas en ĉiu direkto tagmarŝo. Iafoje eĉ tri tagmarŝoj.

Celso ne devis migri longe. La sekva monterio, kiun li atingis, post tagmarŝo kaj duono de tagmarŝo, akceptis lin. La monteriaj estroj ankaŭ akceptus droninton, se ili estus certaj, ke la droninto almenaŭ je duono de sia laborforto estus revokebla en la vivon. Agua Azul, ankaŭ, se ĝi laboris kun plena forto, havis nur malmulte da bezono je homoj, ĉar ili tie estis pli bone pagataj kaj pli

bone traktataj ol en iu alia monterio. Ju pli fifama estis monterio pro aĉa pagado kaj malhumana traktado des pli da bezono ĝi havis je laboristoj. Ne eble pro tio, ĉar la laboristoj fuĝis aŭ serĉis alian laboron, sed tial, ĉar oni senpardone viktimigis ilin. Oni kalkulis nur iliajn manojn kaj iliajn brakojn. Kapoj, animoj kaj koroj estis akcesoraĵoj, kiujn oni devis akcepti malvole, sed kiujn rezignus la *capataces* de la monterioj kun ĝojo, se tio estus aranĝebla iel. Oni ankaŭ rezignus pri la stomakoj de la peonoj; sed la stomako de la laboristoj estis tiel malmulte rezigneblaj kiel la fajrokanalo de vaporkaldrono.

Estis tia monterio, en kiu Celso akceptis labori. Li povus marŝi pliajn tagojn por serĉi pli bonan monterion. Sed pli poste li lernus, ke, kiun ajn monterion li iam ajn trovus, ĝi estus ĉiam eĉ pli aĉa ol la antaŭa. Ĝi estus eĉ tiukaze pli aĉa, se li estus irinta cirkle kaj reveninta al tiu, je kiu li unue demandis pro laboro; ĉar intertempe, dum li vagadus, la unua monterio pliaĉiĝus je kelkaj gradoj, se temas pri pagado kaj traktado de laboristoj.

La *capataz*, la kontrolanto, skurĝisto, pelovipisto kaj torturista mastro de la peonoj palpadis la manojn de

Celso, kaj tiam li premis ties brakmuskolojn kaj artikajn ostojn. „Ĉu vi jam laboris per hakilo?“ li demandis Celson.

„Malmulte per hakilo, sed mi estas bona maĉetisto“, respondis Celso, „mi laboris en la kafoplantejoj kelkajn jarojn per maĉeto.“

„Kvar realojn dum tago“, diris je tio la *capataz,* „kaj dek pesojn por mi, ĉar mi dungas vin. La dek pesoj estas dekalkulataj de la unua pago. Forkurado kostas ducent kvindek batojn por la unua fojo kaj kvindek pesojn da punmono. Duan forkuradon vi ja ne provos, ĉar tiukaze oni skurĝos kaj pendigos vin. Demandu ĉeokaze vian apudulon, kio tio estas. Aĉetoj okazas nur en la *tienda*, en la vendejo de la monterio. Kaj de komercisto vi aĉetos ion nur tiukaze, se li havas la permeson de la *gerente*, de la adminstranto. Vi estas dungita. Jen kontrakto nerevokebla dum jaro. Vi bonŝancas, ke vi ŝparas la imposton de la kontrakto. Sed ĉu kontraktimposto ĉu ne kontraktimposto, ne pensu, ke vi povos forkuri, se vi volas. Unu jaro estas la minimumo. Malpli ol jaron ni ne akceptas. Kiun nomon? – Aĝon? – Vilaĝon? *Bueno*, bone. Vi laboros en la trupo de *don* Paŭlino.“

De la kvindek centavoj, kiujn Celso ricevis ĉiutage, dudek centavojn li devis pagi al la kuiristo de la trupo por la manĝo. Celso ĉeokaze volis fumi kaj devis aĉeti tabakfoliojn. Li bezonis kamforon por kuraci sin pro moskitopikoj kaj mordoj kaj pikoj de aliaj insektoj kaj reptilioj. Kininon ĉeokaze donis la administrejo en formo de kelkaj ladujoj, se tre gravaj atakoj de la febro fariĝis tro oftaj – kaj se kinino estis je dispono. Krome li foje devis aĉeti sebon, por ŝmiri ĝin sur la dorson post ricevo de skurĝobatoj. Skurĝado estis ne nur puno por forkuro, kio apenaŭ okazis, sed por ĉiaj imageblaj deliktoj, inter kiuj estis la plej ofta: nesufiĉa taglaboro. Oni ne konsideris, kiujn kaŭzojn eble havis tiuj nesufiĉaj taglaboraj rezultoj. Kaj el tiaj kaŭzoj estis multaj, kiujn tute ne kulpis peono. Plej ofte kulpis tion malbonaj hakiloj aŭ tirhokoj kaj naturaj malhelpaĵoj, kiujn prezentas la ĝangalo. Ankaŭ febro kaj aliaj malsanoj ne estis senkulpigo por la livero de malpli ol la du ordonitaj tunoj da pura, senŝeligita mahagonligno preta por la fortransportado. Estis lokoj en la ĝangalo, kie troviĝis nur junaj arboj, kiuj ne havis valoron, ĉar ili aŭ estis rompiĝemaj aŭ fendiĝemaj aŭ verme ekboritaj; kie la peono kun la maĉeto en la ĝangalo devis trahaki vojon al si por serĉi taŭgajn arbojn. Foje foje

tio daŭris horojn. Ĉio ĉi ne estis prikalkulita favore al la laboristo. Li devis liveri du tunojn da plej altkvalita kaj veturpreta mahagonligno ĉiutage. Kiel li faris tion, estis afero lia. Oni pagis al li por tio, ke li liveras la lignon. Sed, se li bonŝancis havigi pro speciale favoraj cirkonstancoj je unu tago tri aŭ eĉ kvar tunojn, tiukaze ili eble estis skribitaj kiel pluso al li, ĉiam laŭ la humoro de la trupestro, eble interne de semajno por alia tago, kiu havis nesufiĉan kvantan rezulton. Sed, se la aĉa tago estis semajnon pli poste, li perdis tiun favoron. Plej ofte, aŭ ni prefere diru, preskaŭ ĉiam, la trupestro forgesis la troajn tunojn de bonŝanca tago kaj notis nur la mankantajn laborrezultojn de aĉa tago kaj enskribis la peonon por la festtago, kiam venis la *capataz* por ekzekucii la punojn. Rilate la vestojn Celso ŝparis pli ol tion, kion elspezas usona elsekigita virgulino por sia dorlotata hundo. Li laboris nuda por ne havi elspezojn por ĉemizo aŭ pantalono. Ĉirkaŭ la koksojn li volvis kotonvestan ŝirаĵon. Tio estis ĉio, kion li portis kiel laborveston. Ĉar neniam estis dimanĉo aŭ festtago, ĉar oni laboris ĉiutage de sunleviĝo ĝis sunsubiro, la peonoj bezonis nek ĉemizon nek pantalonon por sin vesti festtage. Estis permesate al la peonoj festi dum la resto de la tago, se ili pro bonŝancaj

kaŭzoj havigis sian kvanton da du tunoj antaŭ ol Suno malleviĝis kaj ilia propra labortago estis finita. Se ili gajnis tian kvaronon de festtago, kio okazis tre tre malofte, tiukaze ili foje iris bani al la rivero, pikis el siaj dentoj la enboriĝintajn vermojn kaj ties idaron, kuracis tranĉojn, fendetojn kaj vundojn de sia haŭto, tranĉis pikilojn kaj splitojn el la korpo aŭ el sub la fingraj ungoj kaj rostis bongustan *pescuintle*, specon de kuniklo, se ili bonŝancis kapti tian, por almenaŭ unufoje en la monato forgesi la guston de la eterne samaj nigraj faboj kuiritaj en akvo kaj spicitaj per verda kaj ruĝa kapsikoj.

La ununura tago en la jaro, en kiu ili ne devis labori, estis la deksesa septembro, la rememora tago de l' deklaro de la sendependeco de Meksiko disde la hispana reĝolando, ĉar la posedantoj de la monterioj estis bonaj respublikanoj. La respubliko ofertis al ili multe pli da libero rilate la negocojn ol monarkio, kaj eĉ pli ol la hispana monarkio permesis al ili. Tial tiu revolucia tago al ili estis tiom sankta kiel al mahometano la tombo de Mahometo. La monterio eĉ pagis tiun tagon kiel labortagon kaj la posedantoj estis tial tre fieraj pri sia bona respublika pensmaniero. Estis nur tiu ununura konstatebla malavantaĝo de tiu respublika pensmaniero,

ke en la trupoj, kiuj laboris profunde en la ĝangalo, kaj kiuj havis nur ĉiun duan aŭ trian monaton konekton kun la administrejo, ne troveblis kalendaro. En la plej multaj okazoj la c*ontratista*, la trupestro, eĉ ne sciis ĉu estas dimanĉo aŭ merkredo aŭ vendredo. Li havis nur malklaran imagon, ke devas esti aŭ julio aŭ decembro. En sia notlibro li skribis tiom kaj tiom da labortagoj, sed senintence li tute elreliĝis de la kalendaro. Kaj se li trovis tion ial necesa konstati la precizan daton de certa tago, li kalkulis ekde la tago de la ekmarŝo de sia trupo for de la placo de la administrejo. Tiu tago estis preciza, ĉar lia kontrakto komencis je tiu tago. Nun li komencis laŭ la labortagoj retrokalkuli tempe por trovi la ekmarŝan tagon kaj tiel konstati la precizan daton de la aktuala tago. Sed tiu retrokalkulado kaj tien-kaj-tien-kalkulado lacigis lin, ĉar li misnombris kelkajn tagojn. Tiel li rezignis fine pri tio kaj translasis tion al la prezidanto de Usono kaj al la Unua Ŝtatministro de Britlando legi je iliaj kalendaroj, kiu aktuala tago estas.

La trupestro ankaŭ ne devis scii la daton. Kvankam lia kontrakto havis certan tempon, du aŭ kvin jarojn, li ne estis pagata laŭ tagoj aŭ monatoj, sed laŭ la kvanto de la tunoj, kiujn li liveris al la ĉefa flosiga stacio de la

transportrivero.

Kaj ĉar en la trupoj neniu sciis kun certo, ĉu hodiaŭ aŭ morgaŭ aŭ iam interne de la sekva semajno estos la deksesa de septembro, la naskiĝtago de la respubliko, oni laboris ankaŭ je tiu tago plene, tiel kiel en ĉiu alia kutima tago. Kaj ĉar la peonoj laboris, ili ricevis pagon por tiu tago, per kio la posedantoj lojale plenumis sian leĝan devon pagi tiun respublikan festtagon al la laboristoj. En la administrejo la tago kompreneble estis festata ĝuste kaj juste. Ĉar tie pendis kalendaro mure.

Rimarkoj
capataz = kontrolisto, skipestro, gvidanto de laborgrupo
capataces = kontrolistoj, skipestroj, gvidantoj de laborgrupo
gerente = administranto, negoca estro, manaĝero
semanario = kolono
tienda = vendejo

10

Celso pensis nur plu pri sia edziĝo kaj pri siaj dekkvin nenaskitaj infanoj, kiujn meti en la lumon de la mondo helpe de sia knabino, li faris taskon al si. Tiu penso pri la knabino helpis toleri al li ĉiujn turmentojn en la monterio. Post ĉiu vespero, kiun li sternis sin sur sian petaton, kreskis la monsumo, kiun li devis havigi. Ĉar li pensis pri nenio alia krom pri tio, enspezi tiun sumon por montri al la patro de sia knabino, ke li estas kapabla kaj preta esti bona kaj fidele zorganta edzo al la knabino, tial li aĉetis krom la plej necesaj aĵoj, nenion en la *tienda de la* monterio. Li aĉetis nek ĉemizon, nek pantalonon. Post certa tempo li bezonis novan petaton. Li aĉetis bonkvalitan poŝtranĉilon, ĉar lia malnova estis trivita kaj eĉ disrompiĝis. Li bezonis kovrilon por la fridaj noktoj de la pluvotempo. La moskitoreto aĉiĝis kaj triviĝis, li do devis aĉeti novan, ĉar dormi sen moskitoreto eĉ indiĝeno ne povas elteni. Li pagis la dek pesojn al la *capataz* por la dungado.

Kiam finiĝis tuta jaro de tiu laboro kaj Celso kunkalkulis sian havaĵon en kontanta mono kaj aldonis sian bonhavaĵon en la administrejo, kiun li enspezis por la

transportado de la letero kaj por la helpservoj al la komercisto *don* Policarpo, li trovis, ke li havas kvindek tri pesojn kaj kvardek ses centavojn kiel surteran posedon.

Tiu ĉi sumo ne sufiĉis por veki la impreson ĉe la patro de sia knabino, kiun li intencis veki. Li volis posedi ne malpli ol okdek pesojn, kiam li forlasos la monterion.

Li dungiĝis por dua jaro. Ĉar li restis en la sama trupo kaj la restado por plia jaro estis ofertita al li de la trupestro, kion Celso lerte sciis tikli el tiu, li ŝparis la dek pesojn por la komisio, kiun iu, kiu ŝovus sin interen, povus preni de li.

Ŝajnis al li, ke la dua jaro pasis pli rapide ol la unua. Li fariĝis unu el la plej spertaj hakistoj. Li lernis tiel lerte elekti siajn arbojn kaj serĉi tiel bone pripensite la plej ĝustan lokon ĉe arbo por starigi la platformon, sur kiu oni dehakas la arbon, ke estis multaj tagoj, kiam li jam posttagmeze liveris sian norman kvanton. Li nun jam ofte helpis al iu novalveninta povrulo, kiu ne kapablis plenumi la normon kaj troviĝis en la danĝero esti enskribita en la liston por la *fiesta*, por la „festo“. Kiam pasis duono de la dua jaro, la trupestro donis al li kvin realojn ĉiutage, do

unu peson pli ol la intertraktitajn kvar realojn. La trupestro ne faris tion pro bonkoreco, sed por gajni Celson por tria jaro. Celso estis sufiĉe prudenta diri al neniu, ke li laboras ĉi tie nur por ricevi difinitan sumon kaj, ke li foriros, tuj, kiam li havos tiun sumon. Li intencis eĉ ne diri dum la maldungiĝo, ke li foriros por ĉiam, sed ke li devas viziti siajn gepatrojn kaj verŝajne baldaŭ revenos. Spertoj kun liaj laborkamaradoj instruis lin gardi sian haŭton kaj bone atenti, ke li ne iru senpripense en unu el la multaj kaptiloj, kiuj estis metitaj por denove kroĉi formigrantajn laboristojn.

Maldungiĝantajn peonojn kroĉi denove estis la negoco de homaj parasitoj, de tielnomataj *coyotes*, do de kojotoj, kiuj ennestigis sin en la monterioj kaj en ties rekrutigaj distriktoj. Ili vivis de la kadavraĵoj, kiujn la grandaj agentoj postlasis, kiuj kaptis animojn en la federacia ŝtato por povi vendi ties manojn kaj brakojn.

Estis la plej simpla laboro kapti homojn, kiuj jam finis siajn kontraktojn, per ruzo, trompo, per ĉiurimeda ebriigado kaj kun la helpo de malvirtiĝintaj inaĉoj de la plej malsupra tavolo, de la feĉo de la homaj rasoj. Nur malmultaj homoj, nur karaktere kaj vole fortaj eskapis de

tiuj kojotoj.

Se ne finiĝis kontraktoj, la kojotoj komencis ĉasi .Ili grupiĝis kaj serĉis en la vilaĝoj kaj bienoj proksimaj de la ĝangalo fuĝintajn prizonulojn, kiuj iafoje kaŝiĝis tie. La instancoj ne promesis premiojn por la kaptado de krimuloj. Male la kojotoj donis al la homoj, kiuj denuncis kaŝitajn krimulojn kaj fuĝintojn kaj konatigis ties kaŝejojn, rekompencojn de kvin ĝis sesdek pesoj po kapo kaj paro da manoj. La malgrandaj bienuloj, kiuj vivis en timo pro tiaj forkurintaj krimuloj kaj estis priŝtelataj de tiuj uloj kaj pro ili devis timi eĉ pri sia vivo, faris sian plej bonan por malkaŝi la kaŝejojn de tiuj fuĝintoj, por liberigi sin de tiu pesto.

La kojotoj ne havis zorgojn pri la morala pasinteco de siaj kaptitoj, ili okupiĝis nur pri ties fortaj brakoj. Ĉe la kaptado ili kondutis kvazaŭ ili apartenus al instanco. Kaj, se la fuĝintoj havis armilojn, ili serioze interbatalis kun ili, por kapti ilin. La kaptitoj estis tiel bone katenitaj kaj gardataj, ke ili pli facile povus fuĝi el cementita prizono ol de tiuj ĉasantoj. Ligite en vicoj oni trenis ilin tra la ĝangalo. Por la plej eta rompo de iu ordono oni tiom severe skurĝis ilin en la marŝo, ke ili ne plu havis ec unu

nelezitan pecon de haŭto je la korpo, kiam ili alvenis en la monterioj. Ĉiun, ankaŭ la plej modestan provon eskapi rezignis dum la marŝo la junaj viroj, kiam ili estis jam en la manoj de la kojotoj, tuj kiam ili estis dum horo marŝantaj, sed tute certe fine tiam, kiam ili vidis la unuan pendigadon de unu el siaj kunuloj, kiu provis fuĝi. La pendigado estis tial tiom teruriga kaj tiel neniiga por provita malobeo de la kaptitoj, ĉar ĝi ne estis mortiga. Se ĝi estus mortiga, ĝi ne tiom impresus ilin. Sed pendigadon kun la intenco mortigi la pendigiton, la kojotoj ne praktikis. Je ĝismorte pendigita ulo ili ne havis intereson, ĉar nur la vivanta enspezigis monon.

La *enganchadores*, la laŭrajtaj agentoj por la monterioj aĉetis indiĝenojn el la karceroj de la vilaĝoj, per tio, ke ili pagis la monpunojn de la indiĝeno al la alkaldo de la vilaĝo aŭ al la sekretario de la registaro, kiu estis en la vilaĝo komisie de la federacia registaro, por agi kiel oficisto pri la civila stato, kiel statikisto, poŝtestro kaj telegrafisto. La monpunojn, kiujn li kroĉis al indiĝenoj, li rigardis kiel gravan enspezfonton. Por la pagita monpuno oni transdonis la indiĝenon al la konceshavaj agentoj, kaj la agento vendis la indiĝenojn kiel peonojn al monterio. En la monterio la vendita indiĝeno devis forlabori la

punon, kiun la agento pagis por li, tiel kiel la altan varbokomision por la agento kaj la impostojn por la kontrakto, antaŭ ol li ricevis salajron.

La kojotoj provis malmultekoste akiri siajn homojn, por altigi la komisian premion. Ili ne aĉetis indiĝenojn el la prizonoj. Tia eldono estis por ili forĵetita mono. Ili nokte vagadis en la malgrandajn vilaĝojn, rompmalfermis la karcerojn kaj fortrenis la prizonulojn. Matene, kiam la sekretario rigardis al siaj prizonuloj kaj ne trovis ilin, sed vidis la karceron malfermrompitan, li supozis, kiel la tuta vilaĝo, ke la kaptitoj mem eskapis el la prizono, aŭ, ke amikoj liberigis ilin. Neniu, eĉ ne la propra familio atendis, ke la fuĝintoj libervole revenos, ĉar ili post la rekaptado devis atendi gravajn punojn. Tial ili restis ne plu troveblaj. Sed la kojotoj, por timigi la ŝtelitajn prizonulojn,.klarigis al ili, ke tiukaze, se ili ne libervole kunmarŝus en la monteriojn, ili denuncus ilin ĉe la juĝisto, kun la aserto, ke la indiĝenoj mem malfermrompis la prizonon kaj, ke ili petis la kojotojn, konduki ilin al la monterioj. Ili flustris al li, ke fuĝo el prizono kaj detruo de prizono, kio validis kiel detruo de publika konstruaĵo, estas punata per pafmortigo, kvankam la konstruaĵo estis farita nur el argilaj flanoj. La

indiĝenoj sciis, ke antaŭ la juĝisto oni pravigus la kojoton, kiu estas ladino, kaj ke la afero sekve estus tiel, kiel la ladino dirus ĝin.

Estis tiuj kojotoj, kiujn timis ĉiu laboristo en monterio, tuj kiam proksimiĝis la fino de lia kontrakttempo. Oni rakontis en la kampadejoj tiom pri la kojotoj kaj kun tiom da pruvoj, ke sciis ĉiu laboristo: Ne ekzistas fiago, kaj ne estas krimo, kiun kojoto ne deliktus, se li provas kroĉi peonon denove. Esti aŭ morta aŭ mortigi sin mem, ŝajne estis la ununura rimedo, per kiu peono kun certo povus savi sin de la kojotoj.

Ne estis lando surtere, kie la kojotismo, la agado de la kojotoj sukcis la vivsukon de la popolo tiom, kiom en Meksiko. Se la kojotismo limiĝus al la monterioj estis eble elteneble; sed la kojotismo epidemie infektas la tutan ekonomian politikan kaj privatan vivon de la meksikanoj. Kaj ĉar en la lando estas kojotoj, kiuj estas generaloj, ministroj, guberniestroj, urbestroj, policaj ĉefoj kaj direktoroj de hospitaloj, tial oni ne miru, se la plej subaj kojotoj rigardas la monteriojn kaj ties laboristojn kiel sian ekspluatan kampon, kaj tial oni miru eĉ malpli pri tio, ke neniu en la lando kontrolas tiujn plej subajn kojotojn. Se

la kojotoj en la monterioj ĉeokaze kunenspezigis la distriktan *Jefe Politiko*, en kiu troviĝis la monterioj, tiel kiel ankaŭ iafoje la urbestron de la plej proksima loko, kie la plej proksima instanco havis sian administrejon, tiukaze ili havis senlimigitan privilegion por ĉia ago, kiun ili faris.

Kaŭzis tiuj kojotoj, ke Celso intencis diri al neniu, ke li volas foriri por ĉiam de la monterio. Kaj estis pro sia trupestro, ke li ne diris, kion li intencis fari. Li rimarkis, ke lia trupestro ne traktas lin malbone, ke li asignis al li avantaĝajn lokojn kaj arbojn. Li faris tion, ĉar li pensis, ke Celso estas bona laboristo, kiun li volis konservi al si por pliaj jaroj. Ekde de la komenco de la dua jarduono Celso rakontadis, ke li nepre devos iri por kvar semajnoj hejmen por rigardi al sia patro kaj al sia patrino, ĉar li devas transdoni al ili la monon, kiun li enspezis, ĉar la gepatroj volas aĉeti brutaron al si. Lerte li enplektis, ke tiu mono ne sufiĉas, ke li devos labori du pliajn jarojn en la monterio por enspezi tiom, ke lia patro povu aĉeti al si certan pecon da tero, sur kiu, li, Celso, volas vivi, se li revenos hejmen post kvar jaroj por edziĝi kaj setli en sia vilaĝo por ĉiam.

11

Tiel venis fine la tempo, kiam Celso finis la duan jaron en la monterio. Sed li devus iri sola tra la ĝangalo, se li tuj ekmarŝus.Li pensis ĝin pli prudenta atendi kelkajn tagojn ĝis pli granda trupo de finservintaj laboristoj irus hejmen, kiuj ĉiuj, hejmirante, volas viziti la *Candelaria*-feston.

La *Candelaria*-festo en Hucutsin estis por la mahagonlaboristoj preskaŭ la sama kiel la ĝojoj de la paradizo por povra plagata pekisto surtere aŭ la sama, kio por maristo post longa veturo en ŝtorma maro estas granda haveno en Suda Ameriko.

Kun la *Candelaria*-festo en Hucutsin komenciĝis la laborkontraktoj de la plej granda parto de la laboristoj en la monterioj. Ili tie konatiĝis, kaj se ili volis elspezi monon tie, ili ĝuis ĉiujn surterajn ĝojoĵn, kiuj en tiu limigita mondo, el kiu eliris tiuj laboristoj, estis rigardataj la plej grandaj delicoj kaj plej pekaj voluptaj avidoj. Rigardate per sobraj okuloj de iu, kiu nur ĝuste hazarde venas al tiu festo kaj, kiu jam vidis similajn sanktulajn festojn en aliaj urboj de la lando, estis tiu festo en Hucutsin tamen sufiĉe mizera kaj sobra. Sed centoj de

varbitaj peonoj travivas tian feston je la unua fojo en la vivo. Rigardate de la tereno de iliaj vilaĝetoj kaj de la propra malvasta distrikto de iliaj tiom mizeraj palmaj kaj argilaj kabanoj la festo montriĝas kiel okazaĵo en la urbeto, kiu ne penseblas pli granda, pli bela, pli gaja, pli volupta, pli peka, pli mirinda, pli pompa kaj pli diboĉa.

Kaj kun tiu festo, kvazaŭ kiel finiĝo de ilia ĝistiama vivo, komenciĝis ilia laborkontrakto en angulo de la mondo, kiu aperas al ili tiom malproksima kaj perdita, kvazaŭ ĝi kuŝus sur peco da tero, kiu de patrino Tero forrompiĝis per kolizio kun alia enĉiela korpo kaj nun cirkulas sola kaj sen ligo al patrino Tero tra la kosma spaco, ĉiam proksima al patrino Tero, kiu tamen estas tiom fora de ĝi, ke neniu ligo inter la diversaj loĝantoj eblas plu. Sed ŝajnas al la varbitoj ne nur, kvazaŭ ili irus nun en landon, el kiu ne eblas reveni, sed kvazaŭ ili vagus nun al aventuroj, travivaĵoj, suferoj, doloroj kaj turmentoj, pri kiuj ili havas nur teruran imagon, kiu estas des pli terura por ili, ĉar ĉio, kion ili supozas scii, nur baziĝas je onidiroj kaj rakontoj de homoj, kiuj mem ne estis en la monterioj, sed kiuj konis homojn, kiuj dum jaroj tie laboris.

Ju pli longe tiuj laboristoj tiam laboras en la profundo de

la ĝangalo, ju pli da tempo forbloviĝas post ili, des pli brila kaj des pli ebriiga kreskas en ilia memoro la *Candeleria*-festo en Hucutsin. Kiu ajn fantazio eble eskcitas ilin, ĉu en la hela tago aŭ en la longaj noktoj en la ĝangalo, ĉiu fantazio kaj ĉiu surtera deziro ligiĝas en ili kun la *Candelaria*-festo. Deziroj povi aĉeti al si buntan kovrilon aŭ drinki ĝis renversiĝo aŭ ludi aŭ spekti dancistinojn kaj komikistojn en la *Carpas, en* la tendoj, aŭ havi seksavidan inon sub si aŭ la fumon kaj la incenson en la katedralo aŭ pugnobatali kun alia ulo sen esti skurĝata pro tio, vidi la inojn kaj knabinojn ĉe la vendotabloj, aŭskulti la muzikon de la nudpiedaj brunaj muzikistoj sur la stratetoj, staradi dum horoj sen fari ion kaj aŭskulti la sentimentalajn kantojn de la Korido-kantistoj kaj tiel plu kaj tiel plu. En la longaj monatoj de dura laboro en la ĝangalo ĝermas centoj de deziroj, tiel, ke la eterneco en la paradizo de la piuloj ne sufiĉas plenumi ĉiujn tiujn dezirojn.

Ju pli proksimiĝas la tempo de la *Candelaria*-festo, des pli ekscititaj fariĝas la laboristoj, ĉar la plenumo de iliaj deziroj ŝajne pli proksimiĝas al ili. Kaj kiel maristoj post longa marveturado atakas kiel sovaĝaj bovoj la tavernojn, la salonojn kun knabinoj kaj fumsaturitaj kaj kotkovritaj

dancejoj, tiel la mahagonlaboristoj ĵetiĝas en la *Candelaria*-feston, kiam ili post finservado de la laborjaroj alvenis en Hucutsin. Kaj tiel kiel la maristoj, kiuj dum la veturado intencis edzinigi sian knabinon kaj setli, tuj kiam ili revenis hejme, disipas en la tavernoj de la havenoj sian tutan salajron dum tri helaj tagoj kaj tri noktoj kun hurao, kaj tiam denove devas iri al granda veturo, ĉar eĉ ne restis tiom do mono al ili, por aĉeti veturbileton de Nov-Jorko al Harrisburg, tiel okazas ankaŭ kun dekoj de la laboristoj el la monterioj, el kiuj ĉiu post duono de semajno da festtumulto ne vidas alian elirvojon krom postkuri iun *enganchador* kaj demandi lin, ĉu li ne volas ree varbi lin. La *enganchador*, kiu en la festoj kaj en la kantinoj tien kaj tien rapidegas kiel malsata lacerto al muŝo, kiu estas plenŝtopita per mielo, donas al la vojerarinta virŝafideto bonvoleme kvindek pesojn da antaŭsalajro por la nova laborkontrakto. Kaj la virŝafideto ekmarŝas por ŝanĝi tiujn tiom facile akiritajn novajn kvindek pesojn en la ŝaŭmon de novaj ebriigaj ekstazoj. Je la tria tago de la remarŝo al la monterioj la virŝafideto tiam fine vekiĝas, akceptas, ke ĝi estis ŝafido, kaj je la dua tago de lia denova laboro, li komencas pensi pri la ebriegoj kaj pri la ĝuoj, kiujn li havos ĉe la sekva

Candelaria-festo.

Tiel facile Celso kompreneble ne estis kaptebla. Li havis la bonŝancon ne jam vidi la *Candelaria*-feston, kaj ne jam koniĝi al ĝi. Ĝi tial ankaŭ ne povis aperi al li kiel la promesita paradizo de liaj deziroj. Neniu *enganchador*, eĉ ne kojoto povis uzi la feston por forlogi Celson. La *Candelaria*-feston rigardi kiel komencon de laborkontrakto kaj kiel finon de laborjaro, estis saĝa ideo de la unuaj laboragentoj, kiuj perlaboris sian monon per la kaptado de laboristoj.

La festo Celson lasis ĉiel sobra. Li ne estis malsperta indiĝena kamparana knabo, kiu ne vidis ion de la mondo kaj de ties ĝojoj. Li vidis similajn festojn en la malgrandaj lokoj en Soconusco, kie li laboris en la kafoplantejoj. Li konis la grandan feston de la sanktulo Juan en Chamula. Li konis la jarfoirojn en Jovel kaj en Balún-Canán. La *Candelaria*-festo pro lia sperto ne estis sufiĉe altirforta por ĉirkaŭnebuligi liajn sensojn kaj forgesigi lin, kion signifas tio devi labori en monterio aŭ eĉ forgesigi al li la kaŭzon, kial li entute laboris en monterio.

Dum la plimulto de la junaj viroj en la ĝangalo pensis pri

la ebriiĝoj de la *Candelaria*-festo kaj sonĝis pri tio kiel ili rekompensos ĉiujn malhavojn de la jaro aŭ eĉ plurajn jarojn en la *Candelaria*-festo, Celso revis pri nenio alia ol pri la dek kvin nenaskitaj infanoj, kiujn li volis enmondigi helpe de sia knabino. Estis la timida, sed tamen varmkora rigardo, kiun li ricevis de sia knabino, sen tio, ke ŝi volis sciigi lin, kion ŝi pensas pri li; kaj estis la memretena, sed tamen elkora seriozeco de la patro de lia knabino, pri kio li pensis dum la du jaroj de sia laboro en la monterio, pri kio li sonĝis, kiam ajn li sternis sin sur sian petaton ĉe la komenco de la nokto. Rilate al tiu du aferoj, rilate al la timida rigardo de lia knabino kaj la elkora seriozeco de la patro de lia knabino, la ebriiga ekstazo de sanktula festo montriĝis nur kiel plenblovita, bunte kolorita gumobalono, kiu aspektas bela dum certa tempo, sed vespere elsekigite estas balaata en la rubon.

Rimarkoj
carpas = tendoj
korido = balado

12

La trupestro de Celso sciigis la administranton de la monterio pri tio, ke Celso verŝajne ne volas reveni, sed, ke ulo kiel Celso ne devas perdiĝi al la monterio. La administranto sendis pere de alia servoknabo leteron al *don* Gabriel, al la agento, pri kiu li sciis, ke li vizitos la *Candelaria*-feston en Hucutsin, por tie transdoni grandan transporton de la laboristoj por la monterioj.

La letero entenis plurajn instrukciojn por kiaj ajn postuloj, kiujn la administranto de la monterio havis rilate la bezonatajn peonojn. Pri tio, kio koncernis Celson, la instrukcioj tekstis tiel: Plia afero, *don* Gabriel, ulo, chamulano kun la nomo Celso de Ishtacolcot deprenis sian tutan salajron, kaj mi supozas, ke li havas la intencon ne plu lasi kroĉi sin. Ni ne povas rezigni pri li, li estas tro bona hakisto. Mi donas al vi kvindek pesojn por la ulo, la kutiman komision kompreneble krome. La ulo venos tra Hucutsin kun la foriranta karavano, kaj vi povos renkonti lin tie.

Por kromaj kvindek pesoj *don* Gabriel elfosigus mortinton, revokus lin en la vivon kaj varbus lin por la

monterio. Sed multfoje pli facile estis kapti vivantan laboriston, kaj eĉ centoble pli facile ol tio estis kroĉi junan indiĝenan viron por monterio. Ĉu la indiĝena knabo volis viziti sian mortantan patrinon aŭ intencis geedziĝi, aŭ havis hejmsopiron, tio ne afliktis lin. Tio eĉ malpi afliktis lin ol la ŝtaton, kiu komandas al junaj viroj veni al kazerno por tie lasi dresi sin nei volon, etikon kaj humanecon, por fari pro neekzistanta honoro krimojn, tuj kiam eksonas la signalo. Ĉu la viroj volis edziĝi aŭ nutras patrinon aŭ ĉu ili volas krei por si bazon en sia profesio, tio tuŝas la ŝtaton nur tiom, kiom la intereso de la ŝtato povus suferi pro tio, se la viron oni rabas el lia kutima ĉirkaŭejo. Sed, kvankam la ŝtato pro siaj propraj egoistaj celoj, eble povus havi intereson je la persona sorto de unu el siaj filoj, *don* Gabriel ne konis tian intereson. Li ja ankaŭ ne demandus virbovon, kiun li volas vendi, ĉu ĝi volas forlasi aŭ ne la paŝtejon, sur kiu ĝi plenkreskiĝis kaj kie ĝi havas ĉiujn bovinojn kiel amikinojn. Ke Celso posedas propran vivon kaj volas formi tiun propran vivon al sia propra bontrovo, tion *don* Gabriel bedaŭrinde ne povas konsideri, ĉar tio malpliigus liajn enspezojn. Eble Celso devus nutri maljunan patrinon aŭ edzinon kun infanoj. Tio estus bela kaj bona,

sed ankaŭ *don* Gabriel devas nutri edzinon kaj iutage eble eĉ aldone sian patrinon. Tial li ne povas respekti la sentojn de alia homo, plej malmulte de indiĝena juna viro, kiu ne havas la rajton kaj ankaŭ ne estas sufiĉe civilizita, por havi la sentojn de vera homo, precipe de ladino. Unue envicas mia edzino kaj miaj infanoj, poste mia frato kaj miaj amikoj, tiam mia patrujo. La aliaj devas provi ricevi tion, kion postlasas homo kiel *don* Gabriel, se li efektive lasas kuŝi etan paneron. Ĉar ja ankaŭ li devas pensi pri la estonteco. Tio estas la ĝusta, bone kristana, sufiĉe nobla kaj ĉie rekonata sinteno de ĉiu, kiu devas uzi siajn avantaĝojn, eĉ ĉe la bolŝevistoj. Je la nupto de Celso kaj je liaj nenaskitaj dek kvin infanoj *don* Gabriel ne povas riĉigi sin, ankaŭ ne je la personaj sentoj de Celso, kiu, tio estu tuj dirata, tute ne agus alie, se estus li laboragento kaj devus enspezi sian vivtenon kiel *enganchador*.

Je la sama tago, kiam la letero el la monterio alvenis en Hucutsin, la uloj, kiuj laboris kiel subagentoj de *don* Gabriel, malkovris Celson en la trupo de la homoj, kiuj de la monterio venis al la festo. Ekde tiu momento la alpelistoj ne plu lasis malaperi Celson el siaj okuloj.

Ili observadis ĉiujn liajn paŝojn kaj ili seniluziiĝis, kiam ili rimarkis, ke Celso ne trinkas *aguardiente*. Ebriigi la viktimon kaj dum ties ebrio kapti lin, estis la kutima truko, ĉar ĝi estis la plej facila. Celso ne malinklinis al granda gluto de forta komiteko. Sed li havis la volon trinki nur tiam, kiam plaĉis tio al li, kaj ne trinki, se li pensis ke estas pli bone plu esti sobra. Dum la du jaroj en la monterio li kolektis de siaj kamaradoj sufiĉe da spertoj, kiel laboras la *enganchadores* kaj kojotoj. Tial li eĉ tiukaze ne metis la brandon al la lipoj, kiam oni donacis ĝin al li.

Li rimarkis, ke ĉiam estis du uloj proksime. Tute egale, kie li troviĝis, kaj ke ĉiam estis la samaj du uloj, du mestizoj, parte en urbaj vestoj. Li konis la tipon de homo. Estis tiuj figuroj, el kiuj la monterioj elserĉis siajn *capataces*, la skurĝistoj kaj punekzekuciistoj, kiuj havis la rangon de *capataz*, do de subestro, por havi oficialan nomon, per kio ili distingiĝis de la peonoj. Ĉe la varbado ili estis la alpelistoj de la ĉasatoj. Ili estis tiuj, kiuj aŭ por la agento aŭ por la kojotoj deliktis la murdojn, pugnobatalojn, tranĉilpikadojn kaj la krudajn krimojn, kiujn ordonis la agento. La agento ĉiam retenis purajn manojn antaŭ la leĝo. Kaj la alpelistoj malaperis, se io

estis tro tikla; la agentoj vivtenis ilin kaj ili revenis al li, kiam la krimoj, kiujn ili deliktis,estis forgesitaj pro paliĝo aŭ, se amikoj de la agento venis en la oficejon.

La agento estis nobla ladino, kiu praktikis la varbadon de la laboristoj por la monterioj kiel honestan kaj leĝe protektatan negocon. La fiaĵojn de la negoco praktikis la *capataces*, kiuj ne trovis tion valora, ke oni rigardas ilin kiel bonmorajn kaj honestajn homojn. En Eŭropo en pli fruaj jarcentoj, ili estus landsknecxtoj, hodiaŭ ili servus al la francoj, morgaŭ al britlandanoj kaj postmorgaŭ al la prusoj, ĉiam al tiuj, kiuj promesis la plej bonan soldon kaj la plej grasajn marodopermesojn. Ili estis multe pli sekuraj rilate siajn enspezojn, se ili dungiĝis kiel alpelantoj de agento, ol se ili estus proprapugne vojaj embuskistoj kaj vojbanditoj. Kiel servistoj de agento ili estis sub certa protekto, tiel, kiel la pli fruaj landsknecxtoj laboris sub la protekto de reĝo kaj la pli fruaj murdokunuloj sub la blazono de rabokavaliero.

Kiam Celso vidis, ke la du uloj seninterrompe vagadas proksime, li sciis la enhavon de la letero, kiun ricevis tute certe iu agento. Li sciis, ke li de nun devos atendi ĉion, kion ajn agento povus elpensi por kapti laboriston. Estis

nur unu ago, kontraŭ kiu li sentis sin sekura, kaj tio estis murdo. Oni ne murdus lin, ĉar je morta indiĝeno neniu havas intereson, eĉ ne la diablo, kiu, kiel scias ĉiu indiĝeno, elserĉas nur blankulojn al si por rosti kaj stufi ilin.

Celso ektimis. Estis la terura timo de homo, kiu observas kiel oni starigas kaptilon por kroĉi lin kaj samtempe rekonas, ke li ne povos fuĝi de tiu kaptilo, kion ajn li provus.

Li komencis elpensi planojn. Li pensis sendi la monon al la patro de sia knabino kaj tiam fuĝi en la marŝo al la monterioj. Sed ju pli li pensis pri tiu plano des pli senvalora ĝi fariĝis. En Hucustsin ĉeestis neniu, al kiu li povus konfide transdoni la monon. Neniu estis tie el Ishtacolcot aŭ el unu el la najbaraj vilaĝoj. La monon sendi poŝtvoje, tia penso al indiĝeno tia, kia Celso estis, ne venis en la kapon. Li ja devus doni sian tiom dure perlaboritan monon al ladino, al oficisto. Kaj doni al ladino sian monon, por tio li estas tro memgardema; kaj se la ladino eĉ aldone estas oficisto, jen la indiĝeno duoble misfidas lin. Unu misfido por la ladino kaj dua misfido por la oficisto.

Li sciis, ke oni ne povus treni lin perforte al monterio. Devis ekzisti kontrakto. Se kontrakto estis, ne multe utilus al li, se lia fuĝo sukcesus, ĉar por tio ja dudek kvin pesoj da kontraktimpoŝto estis pagitaj al la instancoj, por ke la polico kaptu fuĝinton kaj rekonduku lin.

Se li scius, kiamaniere la agento laboros por logi Celson por konfirmo de nova kontrakto, Celso eble kapablus elpensi kontraŭplanon. Sed li ja eĉ ne sciis, kiu estas la agento por kiu ĉirkaŭvagadas la hienoj. Tiuj uloj ricevis por la sukcesa laboro, se ili estis bone pagataj tri pesojn, kaj se ili estis eksterordinare bone pagataj, kvin pesojn.

Sed por tio ili devis tiom longe labori ĝis Celso estis tute en la kontrakto.

Celso pensis dum certa tempo pri tio, ke li eble povus doni kvin pesojn al ĉiu el la uloj por havi sian pacon pro ili. Sed la sperto de liaj laborkamaradoj instruis lin, ke li tiel perdus nur duoble. Tuj kiam li pagus la monon al ili, ili tamen laborus plu por sia agento, ĉar ja ankaŭ tiu pagos kvin pesojn al ili, kaj ili tiam havus dek pesojn. Kiom ajn Celso ofertus, ili prenus lian monon kaj tamen perfidus lin; ĉar ĉiukaze ili ricevus krom la mono, kiun

donus Celso al ili, la kvin pesojn, kiun ili ricevas de sia agento kiel salajron. Eĉ tiukaze ili perfidus Celson, se la agento estus fia kaj donus al ili por la alpelado nur du pesojn. Tiukaze estus do du plusaj pesoj al la mono, kiun ili ricevus de Celso mem. Ili perfidus Celson jam pro tio, kiom ajn li pagus al ili, ĉar ilia agento estas daŭra komisia donanto, dume Celso estas nur ĉeokaza pagulo. Kaj oni ne forgesu tion, ke ili estis fidelaj laboristoj kaj fidindaj uloj, kiuj estas fidelaj al sia agento. Ie kaj iam eĉ la plej fia kanajlo devas esti fidela kaj teni promeson, eĉ se ĝi estus nur dum certa tempo. Eĉ la plej ĉifonvesta kaj senmorala fripono atendas honestecon, kaj tenadon de promesoj de siaj kunbanditoj. Ja kie la mondo fine alvenus, se ne plu estus fidelo kaj tenado de promesoj? La franco havas la devon murdi la germanon, se ili ambaŭ staras antaŭ la alia en uniformo, sed la sama franco perdus la kapon sub la gilotino, se li eble murdus francan uniformiton. Fidelo ne estas simple fidelo ĉiam kaj ĉie, fidelo laŭ la kazo povas esti ankaŭ malfidelo, ĉar la ŝtata moralo ne estas la sama moralo, kiun posedi oni instruas la individuon.

Celso intencis pasigi tri tagojn en Hucutsin. Parte li volis ripozi kaj kuraci la vundojn, kiujn li ricevis dum la marŝo tra la ĝangalo. Parte li volis ĝui la feston pro propra

spirita ripozo, li volis aŭskulti la migrantajn koridokantistojn kaj la migrantajn muzikantojn, li volis iri en la katedralon kaj aĉeti kandelon por destini ĝin al Sankta Virgulino, por la benata reveno el la monterio kaj krome li volis aĉeti donacojn por sia patrino, por sia knabino, por la patro de sia knabino kaj por sia propra patro, por ĝojigi hejme ĉiun. Dum la du jaroj de sia neĉeesto en sia vilaĝo li nek povis sendi mesaĝon al siaj gepatroj nek ricevi mesaĝon de ili. Skribi li ne povis, kaj ankaŭ ne legi. Lia edukado komenciĝis per tio kaj samtempe finiĝis per tio, ke lia patrino instruis lin, kiel ĝuste krucosigni sin, bonkondute surgenuiĝi, preĝi mallongan avemarion kaj aspergi sin ĉe la eniro en preĝejon per akvo. Kial tio ĉio okazu, li ne sciis, kaj lia patrino same malmulte povis klarigi tion al li, ĉar ŝi simile lernis tion, sen klarigo de ŝia patrino. Kaj ĉar li povis nek skribi nek legi, tial li povis nek sendi nek ricevi mesaĝon. Eĉ se li havus la ideon raporti hejmen, neniu povus helpi al li, ĉar neniu el liaj laborkamaradoj sciis legi aŭ skribi. Krome nek li nek iu alia el siaj kunlaboristoj havis la tempon skribi leteron. Restis al la peonoj eĉ ne tiom da trankvilo, ke ili povus pripensadi leteron. Dum la longaj monatoj en la ĝangalo, laborante sen interrompo,

ili rilate al ĉiuj siaj vivinteresoj tiom sinkis, ke ili distingiĝis de la bovoj kaj muloj, kiuj estis kunokupataj apud ili, nur pro la aspekto. Ili ne havis aliajn bezonojn krom dormi kaj manĝi, kaj ili havis neniun alian deziron krom trovi arbojn, kiujn tuj eblas facile forhaki, kaj ili havis neniun alian penson krom tiu, ke oni ne skurĝu ilin. Skribi leteron estis tiom fora de ili kiel al bovo la penso, esplori la sudan poluson.

Kiam Celso vidis embuski tiujn ulojn, li rezignis pri restado dum kelkaj tagoj en Hucutsin.

Li decidis, per kelkaj lertaj turnmovoj, je la festo eviti la vojon de la alpelistoj, sin kaŝi kaj nokte ekmarŝi kaj pasi la altan transpasejon de Teultepec. La vojo al la alta transpasejo estis multe pli strečа ol la vojo trans Sibacja. La alpelistoj supozus, ke li elektus la pli facilan kaj pli mallongan vojon trans Sibacja kaj li certis, ke ili sekvus al li sur tiu vojo, kiam ili rimarkus, ke li eskapis ilin.

Konsiderante ĉiujn konatajn cirkonstancojn, la silentema ekmarŝo en la nokto estis la ununura elirvojo, kiun Celso havis por savi sin de la agento, kiu persekutis lin. Se li restadus tie, eĉ se estus nur unu tago pli longe, li iĝus kun

certo la viktimo de la alpelistoj. Multe da tempo ili ne povis disipi al tiu sola viktimo. Ili havis pli da laboro, kaj estis sur la listo de la agento ankoraŭ aliaj viroj, kiujn ili same devis kroĉi. La tri pesojn, aŭ plej bonkaze kvin pesojn, kiujn ili ricevis por Celso ne sufiĉis por grasigi ilin. Sed simple lasi Celson, tion ili kompreneble ne povis. Ili nur devis labori rapide, por liberigi la manojn por la aliaj viktimoj. Tial estis tute ĝuste pripensite de Celso, ekiri tuj.

Se li ne havus pakaĵon, li pli facile sukcesus nerimarkate fuĝi de la alpelistoj. Sed pakaĵo ĉiam estas malhelpema por rapida vojaĝo. Sed la pakaĵo entenis lian tutan surteran havaĵon, se oni foje ne konsideras la monon, kiun li portis envolvite en sia lana zono. Tial li ne povis lasi sian pakaĵon post si.

Celso pretigis ĉe la argila muro de domo sub la vaste elstaranta tegmento el ŝindoj sian ripozejon. Ĉi tie ripozis ankoraŭ pli da indiĝenaj viroj de lia nacio. Kiam unu el ili foriris, ĉiam postrestis alia, kiu gardis la pakaĵojn por la ceteraj viroj, kiuj volis vidi la feston.

La du kaptistoj, kiuj persekutis Celson, atentis la pakaĵon

de Celso pli ol Celson mem. Ili sciis tre bone, ke indiĝeno ne povas postlasi sian pakaĵon, ĉar la pakaĵo entenas ĉion, kion indiĝeno bezonas dum siaj longaj marŝoj. Petaton, do palmmaton, sur kiu li dormas, lankovrilon, moskitoreton, kenon por fajro, sandalojn por vojoj, kiuj estas pikemaj, aŭ kie la tero estas kovrata de dika tavolo de konkosplitaĵoj el nekonata pratempo. Krome li havis en la pakaĵo ankoraŭ fajrilon el ŝtalo, fajroŝtonon kaj meĉon, siajn krudajn tabakfoliojn kaj sekigitan viandon, kunpremegitajn fridajn fabojn, tortiljojn, salon kaj verdajn legomfoliojn, kiujn li bezonis pro la necesaj vitaminoj kaj por spicado. Sen lia pakaĵo kaj sen lia maĉeto, la peza veprotranĉilo, la indiĝeno dum siaj marŝoj estus same tiom senhelpa kiel eŭropano dum marŝo tra la Mojave-dezerto sen plenigita akvosaketo.

La pakaĵo estis la kaŭzo, ke Celso entute fariĝis atentema pri tio, ke persekutas lin agento, kiu lin denove volas kroĉi. Li rimarkis la ulojn tuj post mallonga tempo post sia alveno en la loko, kaj li sentis instinkte, ke ili observadas lin. Tiam li malfermis sian pakaĵon por elpreni tabakfoliojn. Kiam li faris tion, li observis hazarde, ke la du uloj rapide parolis kune kaj gestadis al la pakaĵo laŭ maniero, kvazaŭ ili volus bone memori ties

aspekton. Unue Celso pensis, ke ili eble volas ŝteli la pakaĵon. Sed tuj li ekhavis la penson, ke tiuj mestizoj ne povas uzi tiun pakaĵon de indiĝeno; ili povas vendi la enhavon al neniu. Kiel ajn gravas la pakaĵo por la indiĝeno kiel propraĵo, tiel ajn senvaloras la pakaĵo por iu homo, kiu ne estas indiĝeno kiel Celso. La pakaĵo kun sia tuta enhavo ne havis vendovaloron. Neniu donus eĉ nur du realojn por ĝi.

Celso pensadis pri tio kiel li povus forporti sian pakaĵon sen tio, ke la alpelistoj vidus tion. Li povis interkonsentiĝi kun alia indiĝeno, kiu portus la pakaĵon por li antaŭ la urbeton, kie Celso prenus ĝin kaj ekmarŝus. Sed li ankaŭ povus transdoni la pakaĵon en butiko kaj interkonsentiĝi pri tio, ke li revenos je la sekva tago por preni la pakaĵon. Li mem povis fuĝi kaj ekstere de la loko tranokti sub arbo. Tiel li povus miskonduki la homĉasistojn kaj supozigi ilin, ke li forŝteliĝis. Povus esti, ke ili tiam rezignus pri tio pli okupiĝi pri li.

Sed ĉion, kion li elpensis, elpensis ankaŭ liaj persekutantoj. Li devus eltrovi ion eksterordinare novan kaj ion tute neatenditan por gliti tra la maŝoj de tiuj uloj.

Malsataj lupoj povus persekuti sian predon ne pli persiste ol tiuj alpelistoj fortan indiĝenon, kiun la varba agento havis sur sia listo. Bone servi al sia mastro ne nur donis la sekurecon al ili enspezi je tiu aŭ tiu viktimo tri aŭ kvin pesojn, sed por bona laboro kaj ĉiamaj bonaj servoj ili ricevis kiel rekompencon daŭre agrablan laboron.

Tuj kiam la elpelistoj finis sian laboron je la loko kaj la sanktula festo estis finita kaj komenciĝis la marŝo en la monteriojn, oni okupis ilin kiel pelistojn dum la marŝo. Ne kiel pelistojn de la pakbestoj, sed kiel pelistoj de la varbitaj indiĝenoj. Estis ilia tasko kuntenadi la karavanon kaj atenti pri tio, ke neniu postrestu, ke neniu provu fuĝi kaj eskapi. Oni donis al ili por tio skurĝojn, lazojn kaj la plej bonajn ĉevalojn por tiu tasko, sed la agento konscie ne donis revolverojn al ili, kaj se li eksciis, ke unu el la viroj havas revolveron, tiu devis transdoni ĝin al la agento. Tiuj uloj estis tiom avidaj kiel rabiaj bestoj povi pafmortigi indiĝenon por ĝoji pri la turmentoplena mortado de pafe renversita homo. Ili mencius ĉiujn eblajn cirkonstancojn por pruvi al la agento, ke ili ne havis alian elirvojon ol pafmortigi fuĝantan aŭ postrestintan viron. Ili pafis nur tiukaze, se ili sciis, ke la agento ne vidas tion kaj li ne povus kontroli poste, ĉu unu

aŭ eĉ pli da viroj de la varbitaj laboristoj provis eĉ ribelon.

Se la agento konfidus revolverojn al ili, ili certe transdonus apenaŭ duonon de la varbitoj en la monterioj, ĉar la pelistoj en la marŝo pafmortigus la aliajn pro ribelado aŭ atako al la pelistoj. La agento seninterrompe devis atenti pri tio, ke la pelistoj ne pro plezuro ĉeokaze pendumus viron, kiu postrestis. La agento havis sufiĉe da aliaj rimedoj puni ribelantajn homojn en la marŝo tiel, ke ili preferus la morton per pafmortigo. La sola intereso, kiun la agento havis, estis liveri la homojn vivantaj kaj laborkapablaj al monterio, ĉar la monterioj ne pagis por homoj, kiuj dummarŝe estis pafmortigitaj aŭ pendumitaj.

Se la varbitaj laboristoj plennombre estis liveritaj al monterio, tiukaze la plej bonaj kaj plej krudaj pelistoj restis kiel *capataces,* kiel kontrolistoj, skurĝistoj kaj punplenumantoj ĉe la trupoj, kiujn ili pelis monterien.

Tiom granda estas la kvanto de homoj, kiuj nenion pli ŝatas krom turmenti aliajn homojn en iu ajn maniero kaj tirani ilin, ke ŝtatoj povas elserĉi la plej taŭgajn homojn, kiuj kun volupto lasas dungi kaj misuzi sin kiel suboficiroj, prizongardistoj, ekzekutistoj, torturservistoj

en policaj oficejoj, policaj spionoj, politikaj hipokrituloj, moraj hipokrituloj, kaj kiel skurĝistoj en pundomoj. Monarkaj, kapitalismaj, faŝismaj kaj komunismaj diktaturoj ne povus ekzisti, se parto de la homoj ne havus la voluptan urĝon tirani la ceterajn homojn, turmenti ilin kaj marteli ideojn kaj doktrinojn per perforto en ties kapojn. Tial ne temis nur pri la malmultaj pesoj, kiujn tiuj alpelistoj ricevis por varbita laboristo, sed estis ankaŭ la bonŝanco pri agrabla laboro kiel *capataces*, kiu instigis ilin bone servi al sia mastro. Kontraŭ tiuj urĝoj kaj instinktoj de siaj ĉasistoj Celso ne havis armilon, per kies helpo li povus savi sin. Nur suicido ebligus pacon al li. Sed murdo je tiuj du uloj ne liberigus lin de ili. Oni verdiktus lin dum tridek minutoj al dekmilpesa monpuno, kaj li estus devigita perlabori la dekmil pesojn en monterio. Tiel la alpelistoj eĉ se oni jam murdis ilin, fine venkus laŭjure kontraŭ li.

Eĉ, se Celso povus diveni, kion liaj ĉasistoj farus por kapti lin interne de kiel eble plej mallonga tempo, li tamen ne povus eviti ilin. Tion, kion ambaŭ uloj elpensis por kroĉi Celson interne de dekdu horoj, estis tiel lerta, ke nur tute malofte miraklo povus savi lin, miraklo, tiom rara, ke eĉ ne la romanverkistoj de la bibliaj rakontoj povus eltrovi

tion.

Rimarko
petate = petato, specifa tipo de mato, plektaĵo el palmfolioj

Celso pretigis sin por la vojaĝo. Li intencis nokte forŝteliĝi. Li esperis, ke la uloj ebriiĝas aŭ, ke ili dormas. Ili estis ja, kiom sentaŭgulaj ili eble estis, tamen homoj laŭ speco kaj havis homajn bezonojn. Iam ankaŭ ili devas dormi. Estis la dekunua nokte. La urbo, kvankam ĝi estis la komerca mezopunkto de distrikto de ĉirkaŭ sesdek mil kvadratkilometroj, ne havis stratan lumon. Estas tipa eco de la meksikanoj, ke ili prefere elspezas sian monon aŭ publikajn monojn por festoj, bankedoj, por solenaj akceptoj kaj dekoracioj de la stratoj ol por stratlumo aŭ akvo aŭ kanala reto de siaj urboj. Meksik-urbo, moderna urbo de milionoj de loĝantoj nokte ne havas akvon, sed la urba administrado samtempe facilanime eldonas ducent mil pesojn por dekoracii la stratojn kaj placojn de la urbo por la karnavalo. Kaj ĝi eldonas kvincent mil pesojn por ilumini la urbon por granda nacia jarfoiro dum la jarŝanĝo. En distanco de malpli ol cent kilometroj laŭ ĉiu direkto estas tiom da trinkakvo, ke la urbo ĉiutage kvarfoje povus esti metita sub akvon kaj la akvo ĉiufoje atingus eĉ la plej altan pinton de la katedralo. Sed, ĉar la meksikanoj havas pli da ĝojo pri festoj, pri dekoracioj, pri

la ofta ŝanĝo de la uniformoj de sia polico, tial ili nokte ne havas akvoprovizadon. Ili nokte ne povas gargari siajn necesejojn, antaŭ la sepa matene ili ne povas bani sin kaj se komenciĝas nokte granda brulo, ĝi ne estingeblas. La imagoj pri tio, kio povas feliĉigi kaj kontentigi homojn, estas ĉe la rasoj kaj popoloj tre diversaj. Oni ne povas diskuti kun sukceso kun meksikanoj pri tio,.kial ili tiom elspezas por festoj kaj tiom malmulte por la kanalizado kaj akvoprovizado. Pri tiaj aferoj oni parolas vane al meksikano, li ne scias, kion oni celas, li supozas, ke oni volas ofendi lin, kaj li demandas kun acida mieno: „Vi ja ne volas diri per tio, ke ni, la meksikanoj, sentas nin bonaj en malpureco? Certe ne. La eraro estas nur tiu, sinjoro mia, ke mi ne estas prezidanto de la respubliko aŭ almenaŭ *jefe* de la federacia distrikto."

Kvankam ne estis stratlumoj en Hucutsin, troviĝis dum la sanktula festo tamen sufiĉe da lumo en la urbo. Estis la fulgantaj lumoj de la oleo-kaj petrollampoj de la komercistoj kaj la lumoj de kandeloj en boteloj kaj lanternoj, kiuj iom heligis la stratojn. Kelkaj komercistoj bruligis siajn lampojn dum la tuta nokto, por povi observi pli bone sian standon aŭ tablon, kiun ili kovris per protekta tolo, por tiel malhelpi ŝteladon, ĉar ja tie, kie

okazis en urbo sanktula festo, ĝi estis same plenigita per ŝtelistoj, rabistoj kaj monfalsistoj de mono kiel per komercistoj.

Celso ekstaris memgardeme kaj ŝteliris tra la stratoj por rigardi, ĉu liaj kroĉistoj estas proksime. Li vidis nek ilin nek iun ulon, pri kiu li gajnis la impreson, ke li laboras kun la kaptistoj.

Kiam li tiel trovis la ĉirkaŭon sekura, li ŝteliris reen al la portiko, kie li volis tranokti kaj levis atenteme sian pakaĵon. Unu el la viroj, kun kiuj li restadis sur la pavumita planko de la portiko, estis vekiginta, kiam Celso levis sian pakaĵon. La indiĝenoj, ĉiam dormantaj ĉe vojoj, kie estas pli ol cent danĝeroj, pli facile vekiĝas pro iu suspektiga brueto ol siaj hundoj. La viro levis sian kapon kaj grumble demandis: „Kio estas? Ĉu vi ekmarŝas?“

„Ne“, respondis Celso, „sed mi serĉos al mi alian lokon por dormo. Ĉi tie estas tre fride kaj ankaŭ puloj estas ĉi tie pli ol abunde.“ La viro trankviliĝis pro la respondo, ne pli okupiĝis pri la dormkunulo, etendiĝis kvazaŭ gruntante kaj poste ree kunruliĝis kaj tuj denove endormiĝis.

Celso timis, ke la alia eble tro laŭte parolis, tiel, ke unu el la kaptistoj, kiuj certe ne estis malproksime, kvankam Celso ne vidis ilin, aŭdis, ke tie oni parolis, kaj kion. Celso dum certa tempo kviete kaŭris plu. Kaj kiam li ne aŭdis alian brueton ol tiun, kiu venis de la standoj de la komercistoj, li sentis sin sufiĉe sekura.

Multe pli mallaŭte kaj pli atenteme ol antaŭe, li ree levis sian pakaĵon. Li faris tion tiel trankvile, ke ĉifoje neniu el tiuj, kiuj tie dormis, rimarkis ion.

La pakaĵo estis kutime tro peza por tio, ke Celso kapablis porti ĝin antaŭ si. Tion li do povis fari nur dum la malmultaj paŝoj, ĝis li estis ekster aŭdodistanco de la du uloj.

Li atingis la profundan ombron de la angulo de du domoj konstruitaj unu apud la alia, el kiuj unu staris pli fone ol la alia. Ĉi tie en la tenebro li aranĝis la rimenojn de la frunta portorubando laŭbezone kaj fine levis la pakaĵon por la marŝo.

Tiel profunde kliniĝinte, kiel la pakaĵo tion permesis, li rapide hastis sur la strato malsupren, lerte tenante sin en la ombro de la domoj. Je la fino de la strato li turniĝis

maldekstren por atingi padon, kiu jam etendiĝis ekstere de la urbeto. Li intencis iri laŭ la pado ĝis li venos proksimen de la malnova tombejo. Ĉi tie li intencis turniĝi plian fojon flanken por atingi sur kelkaj krucaj vojoj kaj sur vojoj transversaj la mulopadon, kiu kondukas al la alta transpasejo de Teultepec.

Sed kiam li vidis la lastan domon je la nordorienta angulo de la urbo je flanko klare konturita kontraŭ la briletanta nokta ĉielo kaj volis turniĝi transen al la tombejo, antaŭ li eksaltis supren tri viroj.

„He, vi chamulano“, unu el ili vokis, „kien vi volas iri meze de la nokto kun la ŝtelita pakaĵo?“

„Ne ŝtelite“, diris Celso haltante. „Tio estas pakaĵo mia. Kaj mi devas frue survojiĝi, se mi volas esti hodiaŭ posttagmeze en Oshchuc.“

„De kie vi estas, chamulano?“ demandis la dua viro.

„Tio tute ne estas afero via“, respondis Celso.

„Kara filo mia, vi ja estas impertinta“, diris la tria kaj pugnobatis lin en flankon.

„Cetere, kion vi volas de mi?“ demandis Celso, kvankam li sciis, kion la viroj intencas, ĉar li eĉ en la malhelo ekkonis siajn du kaptistojn inter la viroj.

„Ni same tiel bone kiel vi povas esti nokte sur tiu ĉi vojo, aŭ ĉu tio ne plaĉas al vi?“ diris unu el ili.

„Kompreneble vi povas esti ĉi tie“, respondis Celso. „Kaj mi nun plu marŝos sur mia vojo.“

Li turniĝis por foriri. Sed unu el ili draŝis lin tiom forte per pugno sur la kapon, ke Celso ekŝanceliĝis kaj de lia peza pakaĵo estis tirita teren. Alia atakanto jetiĝis sur lin. Celso volis liberigi sin, li luktis surtere kun la ulo, kiu jetiĝis sur lin.

Vidante, ke Celso kuŝas surtere kaj defendas sin por liberiĝi, la du kaptistoj, kuris kelkajn paŝojn al la unuaj domoj de la urbo kaj kriis sovaĝe: „*Policía, policía, policía, asesinos,* murdistoj, *auxilio*, helpon!“

Estis nun sufiĉe mirige, ke ne pasis kvarono de minuto, kaj jam aperis du policanoj.

Celso sciis, kio nun okazos al li. Li eksaltis kaj provis

forkuri, sen kunpreni sian pakaĵon. Sed la ulo, kiu luktis kun li surtere, atendis tion. Li kroĉiĝis tiom firme al la kruroj de Celso, ke tiu ree renversiĝis. Kiam li fine tamen liberiĝis kun plena forto kaj per forta pugnobato kaj komencis ekkuri, la policanoj, kiuj nun estis tute proksimaj, ĵetis al li siajn bastonojn inter la krurojn, kaj unu el la kaptistoj ĵetis sin mem sur la ŝanceliĝantan Celson, tiris lin perforte teren kaj turniĝadis kun li, ĝis la policanoj firme tenis Celson je brako kaj premegis la buŝojn de siaj ŝrotfusiloj sur la dorson. La ulo, kiu luktis kun Celso sur la tero, kriĉis nun: „Murdi li volis min, tiu fetoranta chamulano, li pikis min per tranĉilo, ĉi tien, en la kruron. Ho ve, kompatindulo, povrulo mi estas, nun mi ankaŭ perdos eĉ kruron. *Ay, sargentos, hombres,* jen la tranĉilo, kun kiu la chamulano volis murdi min, kaj kun kiu li pikis min. Jen la tranĉilo.“

Celso sciis, ke li havis sian tranĉilon en la pakaĵo, kie ĝi estis envolvita en tolon kun la sekigita viando.

Unu el la policanoj diris al li: „Prenu vian pakaĵon, chamulano, ni iros al nia *jefe,* al la polica ĉefo, por ekscii, kion li diros.“

Por Celso ne eblis eskapi. Kun la pakaĵo sur la dorso, li ne povus kuri, kaj je la plej eta provo deĵeti la pezan pakaĵon, la policanoj, kiuj iris post li, batus lin per siaj bastonoj sur la kapon. Sed eĉ, se li sukcesus fuĝi de la policanoj, kiuj eble ne havis tro grandan intereson pri lia arestigo, li ne povus fuĝi de siaj kaptistoj. Ili pli bone observis lin ol la tuta polica korpuso estus farinta tion. Kaj precipe, se ili preteriris malhelajn angulojn, kie eble fuĝo sukcesus kaj sekve de la nokto la policanoj apenaŭ povus celi kaj trafi lin, la kaptistoj estis tiel proksime je lia flanko, ke li povis nur paŝeti.

Oni eskortis lin en la ofican ĉambron de la polica ĉefo. La *jefe* sidis tie sen jako, ne estis razita dum duono de semajno kaj estis ebria.

„Kio estas koncerne la chamulanon?“ li demandis la policanojn.

„Pugnobatalo kun tiuj ĉi uloj.“

„Mi ne interbatadis, ĉefĉjo“, diris Celso timeme. La pakaĵon li havis ankoraŭ nun sur sia dorso.

„Ĉu *testigos*? Ĉu atestantoj?“ demandis la ĉefo.

Jes tri, ili estas ĉi tie“, diris la policano, montrante al ili.

„Min li pikis per la tranĉilo en kruron. Jen, jen, tie supre“, diris unu el la viroj laŭte kaj haste.

„En kruron li pikis, ĉu? Per la tranĉilo, ĉu? Kie?“ demandis la cefo.

La viro suprenrulumis la pantalonon sur la kruro, kaj jen efektive estis sango je la lana subpantalono. Li ordonis montri ankaŭ la pikvundon. Sed li ne proksimiĝis tre al la polica ĉefo, kiu sekve de tio, ke li metis la nazon tro en botelon, dormeme palpebrumis kaj povis vidi malmulte. Kaj la malmulto, kiun li povis vidi, fariĝis ankoraŭ pli senkontura, ĉar en la oficejo pendis nur lanterno, kiu estis tute kovrata de dika tavolo de fulgo kaj sur la tablo de la ĉefo lumis kandelo, kiu estis firmgluita al la tabloplato per la propra vakso. Kuracisto, kiu povus kontroli la vundon, ne ĉeestis, ĉar la urbo ne havis kuraciston. Kaj se iu tie estus estinta, estiĝus la demando, kiu pagu la ekzamenon.Pri tio leviĝus certe kverelo, ĝis la kuracisto dirus, ke li rifuzas entrepreni la ekzamenon, ĉar li devas iri al malsanulo.

Tiel kunvenis ĉiaj nur iel eblaj cirkonstancoj, kiuj por

Celso malebligis pruvi, eĉ se li estus pli lerta pri interrilatoj al aŭtoritatuloj, ke oni volis nur enfermi lin tiel, ke li ne povu fuĝi. Li estis tro timida vidalvide al la polica potenculo, ĉar li sciis pro sperto, ke tiukaze, se li mencius eĉ nur dubon je la proceduro, oni ne nur krius al li, sed tuj kroĉus al li dek pesojn pro malrespekto al instanco. Li havis nur la rajton diri, ke jes, aŭ ke ne, nenion plu. Se li aludus, ke agento persekutas lin, kaj ke pro tiu agento, kiu volis lin denove kapti por la monterio, okazis la lukto, oni nur ridus pri li.

Pro la konscio stari kiel povra indiĝeno antaŭ la polica ĉefo kiel akuzato, li tiom konfuziĝis kaj ektimis, ke li ne kuraĝis rigardi al la vundo, kiun li laŭdire kaŭzis per piko. Pro sia konfuzo li forgesis fari tion. Kaj ke li ne kuraĝus demandi en la oficejo de la polico pli precize pri la vundo, tion antaŭsciis liaj ĉasistoj. La vundo malnovis ĉirkaŭ ses horojn, ĝi jam bone sekiĝis. La ulo, kiu montris la vundon, ricevis ĝin posttagmeze en pugnobatalo en taverno. De kiu, tion li ne sciis. Sed tiu vundo al la ĉasistoj de Celso estis tre bonvena. Ili luprenis la ulon por kvindek centavoj, por ke li entreprenu la lukton kun Celso kaj anoncu la vundon kiel sekvon de tiu interbatalo.

Je la sekva mateno, kiam okazis la polica procedo kun Celso, la vundo jam aspektis tiel, ke ĝi bonege taŭgis por la aŭskultado de la atestantoj. Eĉ kuracisto eble ne kun certo povus diri, ĉu la vundo estis malnova nur dek horojn aŭ dekses horojn.

Celso pasigis la nokton en la polica karcero. Kiam liaj kaptistoj vidis lin tiel bone konservata, ili foriris por trinki komitekon, kaj tiam ili sternis sin por dormi trankvile kaj sen zorgoj. Ili ne plu devis gardi sian predon, instanco faris tion nun por ili.

Sekve de la sanktula festo je tiu mateno estis en la oficeja ĉambro de la polico sufiĉe da laboro: pugnobatalo, ebrioj, kvereloj de komercistoj inter si kaj kun komercistoj kaj ties klientaro, ŝtelado de bagatelaĵoj, negravaj trompoj, ofendoj, manko de licencoj, falsado de licencoj kaj de koncesioj, imposttrompo kaj rifuzo sekvi al la ordonoj de instancoj kaj aŭtoritoj. Celso estis ĉirkaŭ la dekdua en la vico. Lia kazo estis tre simpla. La atestantoj ĉeestis, sed oni ne pridemandis ilin, ĉar la polica ĉefo jam antaŭe sciis, kion ili dirus, kaj tial estus nur disipo de tempo.

Celso de la du policanoj, kiuj kaptis lin, estis kondukata

antaŭ la juĝiston.

„Vi venas de la monterio, chamulano, ĉu?“ demandis la polica juĝisto.

„Jes, *mi jefe.“*

„Kiom longe vi laboris tie?“

Du jarojn, patronĉjo.“

„Pro pugnobatalo kun mortiga armilo cent pesojn da *multa,* kiel punmonon. La sekva kazo.“

Oni vokis Celson al flanka eta tablo, kie sidis la sekretario.

„Cent pesojn, chamulano.“

„Mi ne havas cent pesojn, patronĉjo.“

„Sed vi ja laboris du jarojn en monterio, ĉu ne?“

„Jes ja, patronĉjo.“

„Tiukaze vi devas havi almenaŭ cent pesojn.“

„Mi havas nur ĉirkaŭ okdek pesojn.“

„Donu la okdek pesojn. Por la dudek pesoj kiel restaĵon kaj la dudek kvin pesojn da polica kaj juĝeja kostoj vi iros en la karceron. Donu do la okdek pesojn.“

Oni ne traserĉis Celson en la nokto. Neniu el la policanoj interesiĝis pri tio, kion li havas en sia pakaĵo; kiom da mono li havas, la polica juĝisto ja pritaksis ĝin, se ne jam la agento *don* Gabriel diris tion antaŭe al li.

Celso komencis elturnigi sian monon el la lana zono kaj nombris ĝin sur la etan tablon. Li havis ĉirkaŭ tri pesojn pli ol okdek.

„Tiujn kelkajn pesojn vi provizore povas reteni, chamulano, por ke vi povu aĉeti ĉi tie tabakon en la karcero, kaj tion, kion vi bezonas krome. Rapidu havigi ĉi tien la restaĵon de la punmono, tiukaze vi ne devos resti tiom longe en la *calabozo*.“

La sekretario pravis, Celso ne devis longe elteni en la karcero.

Du horojn pli poste alvenis *don* Gabriel, la agento por la

monterio. Li volis interparoli kun Celso. Celso ne konis lin.

Policano kondukis Celson eksteren kaj *don* Gabriel diris al li:“Mi volas interparoli kun vi, chamulano. Venu ĉi tien antaŭ la pordon.“

Ekstere, sur la strato, antaŭ la oficejo de la polico, estis benko. *Don* Gabriel sidiĝis sur la benkon kaj invitis Celson sidiĝi apud si. Li donis al li cigaredon.

„Ĉu vi volas akcepti gluton, chamulano?“ demandis *don* Gabriel.

„Ne, patronĉjo, *gracias,* dankon.“

„Kiom da punmono vi havas?“

„Cent pesojn kaj dudek kvin pesojn por la kostoj.“

„Kaj kiom vi do pagis?“

„Okdek pesojn.“

„Ĉion, kion vi havis ĉe vi?“

„Preskaŭ ĉion. Mi havas plu nur kelkajn pesojn por tabako.“

„Por la kvardek kvin pesoj, kiuj plu postrestas, ili certe retenos vin dum tri monatoj en la *calabozo*, en la senluma karcero.“

„Tio certe tiel estas, patronĉjo.“

Don Gabriel rigardis al la ĉielo, poste li rigardis la straton dekstre kaj maldekstre malsupren. Ladinoj kaj indiĝenoj en granda kvanto estis sur la strato. Dekstre en granda distanco ekde *don* Gabriel oni povis vidi parton de la placo, kie okazis jarfoiro. La bruo de la foirplaco ligita kun la muziko de vagantaj stratmuzikistoj kaj la babilado kaj kriĉado de la gajaj fratoj en la tavernoj, plenigis la straton ĝis Celso kaj *don* Gabriel. Ŝargitaj azenoj kondukataj de indiĝenoj pretiriris. Unu indiĝenino pelis antaŭ si etan gregon de meleagroj al la foiro. Homoj foje iris libere tien, foje tien, kiel plaĉis al ili. Maldekstre tuj ĉe la fino de la strato la altaj montoj prikreskataj kun verdaj arboj kaj arbustoj, komenciĝis leviĝi supren al la ĉielo. Suno inundis ĉion el sennuba profunde blua ĉielo. Tre alte en la aero flugis vulturoj en vastaj cirkloj. Ĉio

aspektis tiel libera, ĉio estis tiel libera kaj facila kaj tiom malferma.

Celso en tiu momento pensis pri tio, ke li nun devos pasigi tri monatojn en prizono. La planko konsistis el malsekaj tegoloj. Neniu litkadro, neniu seĝo, ne tablo. Nur muroj kaj malvasta korto. Ĉiu havis sian petaton, kiun li sternis sur la frida tegola planko,kiam li volis dormi. Kaj ĉio estis plena de puloj, cimoj, pedikoj, araneoj kaj ĉeokaze de skorpioj. Kaj tiom malmulte da sunbriloj, tiom malmulte da verdo. Kaj ĉiam enfermite, ĉiam premite malsupren en la animo.

Male la ĝangalo kun tiom da sunbriloj, kun tiom da verdo, tiom da zumado. La laboro estas dura. Sed ĝi okazas ekstere, en la hela, blua, trembrila aero. Nokte la vaste malferma ĉielo kun la steloj. Neniam enfermite. Suno, ĉielo, steloj, verdo, zumado de insektoj, trilado de birdoj, plaŭdado de rojoj, moskitoj en grandaj kvantoj, sed malmulte da puloj, malmulte da da pedikoj kaj neniuj cimoj.

Sur la benko, sidante antaŭ la karcero sur la strato, antaŭ Celso eklumis la monterio kiel la enkorpiĝo de libero. Tiel

aloga en tiu momento ŝajnis al li la monterio, ke li volis eksalti, forkuri kaj provi atingi la monterion.

„La tri monatojn, kiujn vi devus pasigi ĉi tie en la karcero pro la kvardek kvin pesoj“, diris nun *don* Gabriel, estus forĵetitaj. Se vi elvenus, vi ne havus eĉ centavon. Mi volas ion diri al vi, *muchacho*, kion mi volas fari por vi. Mi pagos la kvardek kvin pesojn kaj post kvin minutoj vi ne plu estos en la karcero.“ Post kvin minutoj ne plu esti en la karecero, por tio Celso oferus en tiu momento dek jarojn de sia vivo. Kontraŭe al tiuj dek jaroj, kiujn li pretis oferi, ŝajnis al li donaco, kiam *don* Gabriel diris: Vi faros nun novan kontrakton por la monterio. Mi pagos la kvardek kvin pesojn, tiujn mi skribos sur vian ŝuldokonton. Aldoniĝas mia provizio, mi kalkulos dudek kvin pesojn por tio, kaj la dudek kvin pesojn por la stampado. Kaj mi donas nun al vi dek pesojn da kontanta mono kiel antaŭpagon. Vi ricevos la kontrakton nur por cent kaj kvin pesoj. Kiam vi perlaboros en la monterio tiujn cent kaj kvin pesojn, jen ĉiu plia enspezo estos via propra mono.“

Dum sekundo Celso vekiĝis. Kiom longe daŭros, ĝis li forlaboros la cent kaj kvin pesojn da antaŭpago konsciiĝis

dum sekundo al li. Li maltrankvile glitadis sur la benko tien kaj tien.

Sed *don* Gabriel rapide kuntiris la maŝon, kiu volis solviĝi: „Sed vi estos ja tiam almenaŭ ekstere subsune kaj enverde kaj ne kuŝos ĉi tie en la sterka feĉo de la ebriuloj ĉiunokte. Vi aŭdos kanti la birdojn kaj ĉasos ankaŭ ĉeokaze antilopon. Kion vi havas ĉi tie en tiu stinkanta ratotruo, kie vi ne povas lasi fali eĉ manĝeron, ĉar tuj la ratoj sursaltus ĝin. Kaj mi diros al vi, vi multe pli rapide pasigos la kontrakton ol vi eble pensas. Vi estas tre lerta bubo kun grandaj spertoj. Kiom ili pagis al vi? Bone, mi faros al vi la kontrakton kun ses realoj ĉiutage."

Du policanoj altrenis ebriulon. Celso turniĝis kaj vidis kiel la viro estis ĵetita planken kaj kiel oni riglis la kradigitan pordon post li. Li vidis la vizaĝojn de siaj kunprizonuloj post la krado de la pordo.

Policano alvenis kaj diris: „*Don* Gabriel, mi devas nun rekonduki la prizonulon. Ni havas ĉi tie neniun, kiu gardas ilin. Ĉiuj estas sur la placo. Venu, chamulano."

La chamulano iros kun mi", diris *don* Gabriel, „mi iros kun li al la ĉefo."

„Tiukaze tio estas en ordo por mi“, diris la policano.

Sen havi propran volon, Celso sekvis *don* Gabrielon en la ofican ĉambron.

„Mi pagos por la chamulano la restaĵon de la *multa“,*li diris al la sekretario. Mi kunprenos lin en la monterion.“

„Bone, bone, *don* Gabriel“, diris la sekretario.

Li vokis la policanon proksimen. „La chamulano estas libera kaj rajtas foriri.“

„Muy bien, jefe“, diris la policano. Li gestis al Celso, ke li proksimiĝu kaj diris al li:„Venu kaj prenu vian pakaĵon.“

Kiam Celso levis sian pakaĵon, diris la policano al li: „Vi ja damne rapide elvenas de ĉi tie. Jen granda bonŝanco por vi, ke vi trovis tian bonan amikon, kian don Gabriel, kiu elaĉetas vin el tiu pestoplena ratokaverno. Aŭskultu min, ĉu vi eble havas iun duro, iun belan purpoluritan peson, por ke mi povu akcepti glaseton en la Candeleria-festo? Mi ja bone traktis vin ĉi tie. Mi ne tradraŝis vin. Mi nenion ŝtelis de vi. Peseton tio ja certe valoras, ĉu ne? Don Gabriel estas grandanima. Li donas al vi volonte

antaŭpagon.“

„Bueno, bueno“, diris Celso, „vi pravas, frato. Jen prenu la peson.“

„*Gracias, gracias,* chamulaneto, „kaj revenu tre baldaŭ.“ Sed la policano plibonigis sin ridante: „Ne, kompreneble ne, ne revenu tiom rapide. Tiel mi opinias tion, ĉu vi komprenas? Kaj buena suerte, multe da feliĉo en la monterio.“

Ekstere atendis don Gabriel. Li jam pretigis la kontrakton. Jam hieraŭ, ĉar li ja sciis, ke li havas bonajn alpelantojn, al kiuj li povas fidi.

„Ĉu vi havas viajn aĵojn, chamulano?“ li demandis. „Bone, bone. Jen ni nun tuj iru al la prezidanto, por subskribi kaj stampi la kontrakton.“

Ĉiuj instancoj de la loko estis en unu konstruaĵo. Tiu ĉiu granda administra konstruaĵo plenigis tutan blokon de domoj. En la antaŭfronto, kiu estis apud la placo, estis la administrejoj de la prezidanto de la municipo, krome tiuj de la sekretario, de la civila juĝisto, de la ayuntamiento, do de la magistrato, de la impostadministranto de la

federacia registaro. Je la suda flanko de la konstruaĵo troviĝis la ĉambroj de la financa oficejo. La poŝto kaj la oficiala ĉambro de la politika ĉefo. Je la norda flanko troviĝis la policejoj kaj en la patio, en la interna korto estis la prizono kun la malgranda korto, kie la prizonuloj restadis dum hela tago, kaj kie ili senmalhelpate povis interparoli kun siaj parencoj, kiuj alportis por ili la manĝon. Iliaj amikoj povus transdoni tranĉilojn, fajlilojn, segilojn, revolverojn kaj mitralojn, se ili intencus tion, kaj se tio ŝajnus utila. Sed neniu faris tion. La privilegiitaj prizonuloj, la ladinoj, komercistoj kaj grandbienuloj, se ili devis pasigi tempon ĉeokaze en la prizono, dum la tuta tago rajtis restadi en unu el la malfermaj oficejoj de la polico. Ili rajtis sidiĝi sur la benko antaŭ la pordo, kie ili sengardate povis interparoli kun ĉiu, kiu pretiriris, kaj se ili ne estis malamikaj al la urbestro aŭ aŭ la polica ĉefo aŭ al la juĝisto pro politikaj kaŭzoj aŭ pro familaj kvereloj, ili rajtis eĉ dum la tuta tago iri en la urbon, rajtis ebriiĝi, havis la permeson ludi kaj rajtis pugnobatali kontraŭ siaj drinkulaj kamaradoj. Vespere, se malheliĝis, ili revenis kaj lasis enfermi sin – kun granda botelo da konsoliga komiteko subbrake. Se tiaj privilegiaj liberoj ne estus cedataj nur al ladinoj, sed ankaŭ al Celso, tiukaze li havus

malpli da sopiro pri sunradioj kaj la verdo de la arboj, kaj li ne devus vendi sin al don Gabriel por havi sunradiojn kaj verdon. Sed homoj samas nur antaŭ Dio, kaj tiu estas tre fora kaj tronas en ĉielaj altoj.

Don Gabriel kondukis Celson antaŭ la sekretarion. Celso ne povis skribi kaj tial simple metis kelkajn zigzagaĵojn tien, kien la sekretario montris perfingre. La antaŭpagitajn sumojn sur sia ŝuldokonto agnoskis Celso kiel pravigitajn. Kaj por ne lasi dubon, don Gabriel donis al li antaŭ la okuloj de la sekretario la promesitajn aldonajn dek pesojn da antaŭpago. Kiam ili tiam denove staris en la portiko de la konstruaĵo kun la multaj oficejoj, diris *don* Gabriel: „Kampadu kun la ceteraj viroj, kiuj marŝos kun vi en la monterion. Ili kampadas tie ekstere“, don Gabriel svingis leĝere la brakon en certa direkto „jen sur la ŝtonplena tereno ĉe la vojo al la nova tombejo. Demandu nur pri la engancho, pri la varbita trupo de don Gabriel. Mi sciigos vin pere de la capataces, kiam vi ekmarŝos. Vi ja ne forkuros. Mi kaptos vin, kaj eĉ se mi devus eligi vin el la infero. Kaj kio tiam atendos vin, pro provita dizerto, tion mi ne devas diri al vi. Vi ja ne estas plu novulo. Vi estis du kompletajn jarojn en monterio kaj scias la regulojn. Jen, prenu la pakaĵeton da cigaredoj, kaj

jen ankaŭ tabuleton da chicle, maĉgumon, por ke la tempo ne fariĝu tro longa por vi, kaj por ke vi povu movi viajn dentojn. Ek do, al la viroj.“

Celso venis al la kampadejo kaj demetis sian pakaĵon en la proksimo de la bivakfajro, kie li trovis virojn el sia nacio.

En la prizono oni ne donis manĝon al li. Oni tie ja ne povas zorgi pri ĉio; la prizonuloj ricevas manĝon, kiam la policanoj havas tempon kaj emon pri tio. Celso ankaŭ ne emis manĝi ion. Li sentis sin terenpremita kiel kaptita kapreolo; kaj se la malsato ne tiom longe daŭrus kaj al oni ne lasus tiom da tempo ekpensi alie pri tio, li eble libervole provus mortigi sin per malsatmorto.

Sed nun ĉe la bivakfajro, kie ĉiuj viroj, kien ajn li rigardis, kuiris, manĝis, ridis, klaĉe babiladis, kie li perdis minuton post minuto la sentojn pri forlasiteco kaj kaptiteco, ĉar ĉiuj tiuj homgrupoj pendis je la sama ŝnurego, je kiu ankaŭ li pendis, kaj ĉar eĉ la pendumado eble povas ŝajni malpli terura, se oni pendumas onin en la ĉeesto de aliaj, ankaŭ Celso ree komencis trovi teron sub la piedoj.

Li ekmalsatis kaj malfermis sian pakaĵon. Li eltiris sian

manĝon.

La dispremitaj faboj komencis fariĝi tute ŝimaj. Sed li ne havis pli bonajn. Li pecetigis la striojn de la sekigita viando kaj metis la pecetojn en paton por rosti ilin. Li petis pri kaldronakvo de unu el siaj batalkunuloj kaj metis sian ladokruĉeton kun kafo kontraŭ la fajro. Li kirladis leĝere en la pato kaj ŝovis la ladokruĉeton tien kaj ĉi tien. Iafoje li palpebrumis kaj viŝis la akvon el la okuloj, ĉar tiam, kiam venteto trafis lin, la fumo de la fajro tuŝis lian vizaĝon. Ĉar Celso estis ĉe tiu bivakfajro fremdulo kaj neniu konis lin, oni parolis nur la plej necesan. Ili devis unue lertiĝi kaj spertiĝi pri la interparolado antaŭ ol ili vere ekinterparolis kaj gajnis reciprokan konfidon.

Kiam la kafo ekbolis, li blovis forte en la kruĉeton por reteni la ekbruantan kafon. Tiam li starigis la kruĉeton en certa distanco de la fajro, en la antaŭtiritan cindron por teni la kafon varma.

La viando brue kraketis en la graso, kiun li verŝis el ladoboteleto en la paton. Tiam la viando ŝajnis lin sufiĉe varmega, kaj li enmiksis la ŝimantajn fabojn. Per la ungoj li detiris akrajn verdajn kapsikojn el tuko kaj plukis de la

kapsikoj malgrandajn pecojn, kiujn li ĵetis en la fabojn por spici tiujn. La tortiljojn, kiujn li havis, ĉiuj fariĝis tro sekaj kaj falis tial en pecojn. Tial li metis nur la pecerojn en la varmegan cindron.

„Ĉu iu el vi jam estis en monterio?“ li demandis pretere. Li povis vidi je la junaj viroj, ke ili estis novuloj, kaj ke ili sciis pri la monterioj nur tion, kion oni rakontis al ili. Tial li ne nepre devis demandi. Li demandis ankaŭ nur, por malkaŝi al tiuj, kiuj tie flamigis la fajron kaj en certa senco estis la gastigantoj, ke li rajtas paroli. Tiun demandon li rigardis samtempe kiel saluton, kvankam li demandis nur post sufiĉe longa tempo post kaŭriĝo je la fajro. Kaj kiel saluton, la vortojn *muchachos* vere akceptis. Tiel, kiel li proksimiĝis al la fajro kaj kaŭriĝis tie, sen peti pri permeso, kaj la vizaĝo, kiun li montris intence, en neniu el la bivakfajruloj lasis ekesti la ideon komenci eĉ nur kvereleti. Li efektive tiel aspektis, kvazaŭ li nur atendus je tio, ke li havu okazon povi larĝbati grimacon. La viroj unu post la aliaj diris: „Ne, el ni ankoraŭ neniu iam estis en monterio.“

Dum li observis sian kafon, li diris: „Mi estis du plenajn jarojn tie, mi revenis hieraŭ.“

„Kaj vi iros nun denove kun ni al monterio?“ demandis iu el ili.

„Jes, mi iros nun kun vi.“

„Tial vi ĉifoje iros libervole tien.“

„Same tiel libervole kiel iras vi, *nenes*, suĉinfanoj de hieraŭ.“ Tiel leĝere kiel li kuiris, li manĝis nun. Kvankam la manĝo apenaŭ povus plenigi tri kulerplenojn, li manĝis tamen certe dum horo.

Du el la viroj intertempe ekstaris, lasis jam sian pakaĵon sub la kontrolo de alia viro kaj ekmarŝis al la *placa*, kie komencis vigli la festotumulto por atingi je la sepa vespere sian kulminan punkton.

Celso kunkolektis siajn patojn kaj kruĉetojn, purigis ilin de manĝorestaĵoj, pakis ilin en reton kaj kunŝnuris la pakaĵon, elpreninte krudajn tabakfoliojn.

Li rulumis sindone cigaron, ekbruligis ĝin, retiriĝis sidante kelkajn paŝojn for de la fajro, sternis sin sur la modesta herbejo, altiris sian pakaĵon, por ke ĝi servu lin kiel kapapogilo kaj fumis, postrigardante al la facila

nebulo, en kiu la flagrantaj tabaknuboj rapide disiĝis. Li provis persekuti per la okuloj kelkajn ŝiraĵojn de la disflagranta nebulo tiom longe, kiom liaj okuloj kapablis tion. Sed la nebulo disfluis kaj Celso vidis nur la vastan malferman ĉielon.

Celso komencis bonfarti, tiel povi kuŝi sub la malferma ĉielo kaj havi la perspektivon ankaŭ en la venontaj monatoj povi vidi la ĉielon, Sunon, stelojn kaj la verdan ĝangalon. Li turniĝis maltrankvile kelkajn fojojn sur la magra herbejo, kiam li, vidante la ĉielon, pensis pri la karcero, en kiu li devus pasigi tri aŭ kvar monatojn, se ne estus veninta *don* Gabriel kaj elaĉetis lin.

Kiam li tiel leĝere kuŝis sur la herbejo, senzorge fumis cigaron, kun stomako varmiĝinta de la akra kapsiko, de la sekigita viando kaj la faboj kaj la abunda varmega kafo, Celson komencis skuadi penso, unue heziteme, tiam pli klare, kaj fine forte kaj kun emfazo. Celso ne tuj povis koncentriĝi je tiu kreskanta penso. La penso, ŝajne foje tie, foje tie, volis firme kroĉiĝi en siaj korpo kaj animo. Sed kiam Celso fine tute senzorge rigardis en la vastan ĉielon, kies koloro volupte kuniĝis kaj satiĝis kun la proksima sunsubiro, kiam li konsciiĝis pri la bonfarto pro

la varma briltrema aero kaj en li komencis solviĝi la peza laco, kiun li sentis kape jam dum multaj horoj, dume li ekĝojis vivi, balais tra lia animo kiel bato la memoro pri la knabino, kaj kun ŝi la dek kvin infanoj, kiujn li volis enmondigi kun ŝi. Li ŝiris haste la cigaron el la buŝo kaj per subita movo li rektiĝis sidante.

„Damnite“, li diris kun seka gorĝo, „damnite, de Dio malbenite, kaj de Di' forlasite! La du jaroj estas pasintaj. Damne! Ŝi ne povas atendi plu. Ŝi fariĝas maljuna kaj neniu akceptos ŝin. La patro ne povas atendi. Ne plu. Li donis al mi du jarojn. Du belajn longajn jarojn. Ŝi ne plu povas atendi. Ŝi fariĝus tro maljuna.“

Helpe de senfinaj ripetoj de la vortoj li provis klarigi al si la situacion, en kiun li glitis, sen eĉ nur unufoje pensi pri la knabino. Li pensis nur pri Suno, pri la ĉielo kaj la verda ĝangalo. En tiun ĉielon kaj en tiun Sunon kaj en la verdon, pri kiuj li pensis de tiu momento, kiam oni puŝis lin en la karceron, lia knabino estis inkludita, sen klarigi tiun inkluditecon tute detale al si. Estis la ĝenerala esenco de tio, kion li komprenis kiel sian surteran feliĉon. La knabino kaj la dek kvin infanoj estis kunfanditaj en tiu unueco de lia imago pri feliĉo. Sed nun li ekkonis kun

rapide kreskanta teruriĝo, ke lia knabino kaj liaj nenaskitaj infanoj el la esenca unueco de sia beateco estis elŝiritaj kaj ke li ne havis eblon rekunteksi tiun disŝiritan unuecon.

Se li revenus post tiuj du jaroj, li trovus sian knabinon bone kaj sekure prizorgatan kun alia viro. Tion vidi, li apenaŭ povus elteni. Sed multe pli malfacile elteneble estus devi legi sur la vizaĝesprimo de la knabino kaj la vizaĝo de ŝia patro la amaran riproĉon, ke li estis je dua fojo pesita kiel homo kaj, ke li duan fojon fuŝis ĉion, ke li ne plenumis sian promeson al la patro de la knabino, ke li perfidis la knabinon, kio en tiuj moraj rilatoj signifus tute la saman kiel promesi al knabino geedzecon, fari kun ŝi infanon, sed poste edzinigi alian. Li estus malestimata ne nur de la knabino kaj de ŝia patro, sed ankaŭ de ĉiuj inoj kaj viroj en la vilaĝo, sen kies estimo li ne povus vivi inter sia parencaro.

La penso, ke li povus esti malestimata de ĉiuj tribanoj, kiujn li ŝatas, honoras kaj amas, fariĝis tiel neeltenebla, ke li pensis, ke estus pli bone morti.

Libervole korpe morti estas malfacile por indiĝeno. Tio

estas kontraŭ lia instinkto. Li povas fariĝi tiel senlime malĝoja kiel kaptita besto, tiel, ke li ne plu manĝas kaj pereas je malsato. Sed la saneco de lia karaktero estas tiel laŭnatura, ke li ne povas elteni elmalsatigon ĝis la fino. Lia transviva instinkto ankoraŭ ne estas degenerinta. Libervole helpe de iuj mekanikaj rimedoj mortigi sin, estas fremda al indiĝeno.

Pensante pri la morto li tamen trovis elirvojon, kiun li rigardis kiel bonan kaj ununuran.

Li nek tiam nek poste iam revenos al sia hejma loko. Li ankaŭ ne sciigos ion pri si. Tiel oni hejme supozos, ke li mortis kaj perdiĝis en la monterio. Per tio li konservos tion, kion li plej bezonas en sia tribo, la estimon de sia parencaro. Li libervole aliĝos al la multaj libervolaj devigitaj mortuloj, kiuj laboras en la monterioj. Iutage li tiam efektive estos morta. Eble kolera administranto pafmortigos lin aŭ laborkamarado mortbatas lin pro monteria katineto aŭ malario falĉos lin aŭ trafos lin tro frue renversigita mahagonarbo aŭ pikos lin skorpio, aŭ lin murdos venena serpento aŭ disŝiros jaguaro lin aŭ li dronos ĉe la forflosigado de la arboj aŭ.– nu, je ia memkomprenebla maniero li ja mortos en la monterioj.

Tiun honorsavadon la sorto certe permesos al li.

Nun al Celso ĉio estas egala. Li apartenas al la mortuloj kaj povas fari tion, kio plaĉas al li. Li ĉiutage povas ebriiĝi tiom longe, kiom la mono sufiĉas por tio. Li povas sterni sin kun infektita ino por korpaj bezonoj malantaŭ la preĝejo sub la disfalema arko de monaĥeja ruino. Li povas fuĝi. Li nur ne rajtas atingi sian vilaĝon, ĉar alie ĉio estus vana; li devas lasi kapti sin antaŭe, kaj por eviti la mil skurĝbatojn, li devas ataki la kaptiston kaj provoki, ke tiu pafmortigas lin kiel rabian hundon. Li povas komenci kverelon kun *capataz*, kontraŭdiri ion al li kaj lasi dishaki sin per maĉeto. Ĉio ĉi havas fine la saman rezulton. Li estas morta, kaj nur unufoje homo povas morti. Kaj ĉar ĉio estas egala al li, li povas komenci tute supre sur la listo kaj uzi bone siajn liberojn, kiuj pro diablo estas lia bona rajto.

Li ne zorgas sin pri sia pakaĵo, kiun li negardate postlasas malantaŭ la bivakfajro. Li iras al la *placa* kaj aĉetas tutan botelon da *aguardiente*. Se li jam jesas komenci la drinkadon, li povas fari tion same tiel bone ankaŭ ekonomie, por longe elteni kun la mono, ĉar en boteloj la brando ĉiam estas malpli multekosta ol en glasetoj, egale,

ĉu ili estas malgrandaj aŭ grandaj.

Li trinkis je unu gluto el la kvaronlitra botelo, donis al kelkaj indiĝenaj viroj pigrumantaj antaŭ la *tienda*, kie li aĉetis la brandon, gluton por gustumado, kaj tiam li ree enverŝis plengorĝon.

Post horo li ekhavis la emon murdi iun aŭ almenaŭ iun terenbati. Sed restis tiom da konscio, ke li ne ekhavis la ideon serĉi *don* Gabrielon por kontentigi sian murdan avidon je li. Tiel sensence ebriiĝi kiel li povas apenaŭ indiĝeno de tiuj malproksimaj distriktoj, por forgesi, ke la atakado de ladino apartenas nek al la rajtoj nek multe malpli al la kordeziroj de indiĝeno.

Sed li dormeme kaj ebrie komencis serĉi la du alpelistojn kun sia limigita juĝkapablo. Li ankaŭ kontentiĝus pri tiu ulo, kiu ĵuris, ke li estis pikita de li en la vunditan kruron. Kontraŭe al tiuj tri uloj ne estis dubo, ke Celso ilin buĉus, se li renkontus ilin. Sed aŭ ili persekutis aliajn viktimojn aŭ ili vidis ĉirkaŭvagadi la ebrian Celson kun batalavido en la vizaĝo. Lia ebrio ne permesis serĉi kun konsidero kaj persisto. Li fariĝis pezpaŝa, kaj ĉar li ne sciis kien ajn iri, li trotis reen al la kampadejo. Li sternis sin tie apud la

bivakfajro, parolis sensencaĵojn, per ungoj elfosis ŝtonojn el la tero kaj ĵetis ilin kontraŭ subevoluintajn arbustaĵojn.

Jen venis al la fajro novulo. Estis Andreo, kiun *don* Gabriel simile aĉetis por monterio, kaj kiu nun sur la kampoj serĉis tiujn grupojn, kiuj apartenas al la trupo de *don* Gabriel. Kvankam li portis laŭ maniero de indiĝeno pezan pakaĵon, li distingiĝis laŭ la vestoj kaj la ĉapelo de la junaj indiĝenaj viroj, kiuj tie kampadis kaj atendis la ordonon por la ekmarŝo.

Celso ne povis trankviligi sian koleron je la persekutistoj. Sed la nove alveninta Andreo aspektis tiel, kiel de tempo al tempo eble povus aspekti *capataz*. Estis la lasta okazo, ke Celso povis tradraŝi iun *capataz* por venĝi ĉion, kion *capataces* krimis iam je li. Se ili jam marŝos estos tro malfrue por tio. Ĉar poste li venos sub la leĝajn radojn de la monteria disciplino. Sed ĉi tie sur la kampadejo tio estus nur pugnobatalo. En la policejo oni tondre kroĉus al li novan *multa* de cent aŭ de ducent pesoj. Kaj tio estis indiferenta al li. Ĉu li ricevus monpunon da dek pesoj aŭ da dekmil pesoj, tio por lia sorto ne farus diferencon. *Don* Gabriel devus pagi la punmonon por ne perdi lin. Tio estus estinta la plej bona puno, kiun Celso povus kaŭzi al

li. Ĉar Celso rigardis sin kiel mortulon, estis nun tute egale, ĉu li estos dum du jaroj aŭ cent jaroj en la monterioj. Li ne havis la intencon reveni al la vivantoj. Tial neniu monpuno povus trafi lin, kiom ajn alta ĝi estus.

Tuj kiam Andreo alvenis, okazis tial, ke Celso komencis insulti kaj tuj tradraŝi lin por trankviligi sian koleron, tiel vehemente, ke efektive tiel aspektis, kvazaŭ Andreo tie devos gluti teron.

Sed Andreo kutimiĝis pri streĉa laboro same tiom, kiom Celso, kaj kvankam li estis tute laca kaj senforta pro la longa dura marŝo trans la altan montaron, kun nedireble peza pakaĵo sur la dorso, li tamen superis Celson, ĉar li estis tute sobra kaj Celso ebria.

Celso ne longe eltenis, la fino venis rapide kaj dolorplene. Li akceptis armisticon kaj ŝanceliĝis kun primartelita vizaĝo al la rojo, kie li rolis kiel sia propra medicina doktoro kaj flegistino.

Ĉapitro 04

01

La *Candeleria*-festo atingis la plej brilan kulminon. Ĝi nun rapide komencis paliĝi. La homoj komencis fariĝi sobraj, sobraj pri la drinkado kiel ankaŭ pri la laŭtaj ĝojoj kaj ĝuoj, de la tumulto, de la kriado, de la marĉando kaj la konfuziga pelmelo kaj seksmatraca surkuŝado dum la nun tre ekscitita ĉiutaga vivo. La loĝantoj de la kutime tiom kvieta kaj fora urbeto fariĝis serioze lacaj pri la sovaĝa logado de la komercistoj. Ili resopiris sian ripozigan kutiman trankvilon. Ili fariĝis tiel lamaj rilate la aĉetadon kaj tiel neagemaj pri sia ĉirkaŭvagado inter la vendotabloj, ke la komercistoj komencis oscedi kaj ĝojis, ke estis anoncite de la urbestro por la sekva tago la oficiala fino de la festo. Multaj el la komercistoj rapide kunpakis siajn aĵojn kaj pretigis sin por la ekmarŝo.

Nun ankaŭ la *enganchadores*, la laboragentoj, vigliĝis por organizi siajn trupojn kaj teni ilin pretaj por la longa streĉa marŝo tra la ĝangalo. Estis rapide konfirmataj kaj stampataj la lastaj kontraktoj en la urbestra oficejo. Kaj kun eĉ pli granda rapidemo la alpelistoj hastis tien kaj

tien por ankoraŭ kapti kelkajn virojn en la lasta sekundo kaj konduki ilin en trupon.

Tie estis ĉiam kelkaj dekoj de perditaj ŝafidetoj, kiuj postrestis, ĉe tia tiel sovaĝa kaj gaja festo. Viroj, kiuj ebriiĝis kaj perdis ankaŭ la lastan centavon, kiuj nun ne sciis kion fari. Aliaj, kiuj tiom kverelis kun siaj familioj, ke ili rigardis tion kiel savon povi disigi sin de siaj familioj. Aliaj perdis sian knabinon, kiu trovis viron, kiu pli plaĉas al ŝi, kaj la iama amanto pro malespero aŭ honto aŭ pro timo, ke li povus fari stultaĵon kun gravaj sekvoj antaŭ la aliaj viroj, postkuris al la agentoj kaj petis ilin eĉ varbi lin, ĉar tiumomente ĉio fariĝis indiferenta al ili kaj ili rigardis varbitecon al monterio nur kiel alian formon de suicido. Estis speco de memmortigo, el kiu pro ekstreme favoraj cirkonstancoj oni eble eĉ povis releviĝi iam.

Tiel plimultigis la laboristan karavanon ofte tute neatendite por la agentoj, dek aŭ eĉ dudek viroj, kiu tri tagojn antaŭe nur kun teruriĝo pensis pri tio devi aparteni al tia trupo.

02

Don Ramon Velasquez estis la ĉefa entreprenisto kaj la vera kapitalisto de la trupo Ramon. *Don* Gabriel, kiu por tiu granda trupo pere de vigla laboro, per tre lertaj trukoj, per trompema ŝakrado kun la bienuloj, kun la lokaj sekretarioj kaj policaj ĉefoj, per dolĉa logado, per promesoj de paradizaj ĝojoj kaj ĝuoj, per brando kaj per altrudita pruntado de mono, kapablis varbi pli ol duoble tiom da homoj ol *don* Ramon mem, estis nur la partoprenanto de la negoco. Sed jam nun, antaŭ ol li povis enkasigi la fruktojn de sia agado, li intencis denonci la partnerecon al la negoco kun *don* Ramon kaj fari la negocon sola. Li havis ja kontrakton kun *don* Ramon, sed kial zorgi pri kontraktoj kaj negocoj kun aliaj, se oni povas kapti pli bonajn avantaĝojn per rompo de kontraktoj. *Don* Gabriel jam tiel progresis pri sia pensado, ke li ne plu povus ĵuri pri la sekureco de la persono *don* Ramon antaŭ Sankta Virgulino, por povi solvi la kontrakton kun *don* Ramon. Li atendis nur, ke ekestu cirkonstanco de tia maniero, ke li povu diri antaŭ si mem, ke la sorto volis ĝin tiel. Aŭ Dio mem aranĝis tion tiel, kaj li mem simple havis nur bonŝancon.

Don Gabriel varbis jam en la lasta jaro laboristojn por la monterioj, kaj tiam ankaŭ kiel partoprenanto de la negocoj kun *don* Ramon. Antaŭ ol *don* Gabriel fariĝis ties partoprenanto li estis, pro la amikeco al la *jefe politico,* loka sekretario de indiĝena komunumo.

En la antaŭa jaro li varbis nur laboristojn, kolektis tiujn laboristojn je la *Candelaria*-festo kaj tie en Hucutsin, kontrakte ligis ilin oficiale en oficejo. Sed la varbomono, kiun pagas la monterio por ĉiu varbita laboristo, estis konsiderinde pli alta, se la agentoj kondukis mem la laboristojn ĝis la monterioj. En tia kazo la monterioj ne perdis ion, ĉar la agentoj transprenis la riskon, ke la varbitaj laboristoj efektive alvenu en la laborlokoj. Sed se, male al tio, la kontrolistoj de la monterioj transprenis la laboristojn en Hucutsin, tiukaze estis la tasko de la monterioj konduki la laboristojn en la monteriojn, kaj tiujn ulojn, kiuj fuĝis en marŝo, kiuj eskapis aŭ pereis, ili tiukaze devis konti kiel perdon, ĉar la varba mono estis pagita en Hucutsin, kaj la agentoj transprenis la riskon por alveno de la laboristoj nur ĝis Hucutsin.

Kvankam la kontrolistoj el la monterioj certe ne estis ŝafpaŝtistoj, sed bone uzeblaj punekzekuciistaj helpantoj

por la kompanioj, por kiuj ili laboris, tamen marŝo de la varbitaj laboristoj, kiu estis kondukata de tiuj kontrolistoj, estis dimanĉa promeno, se oni komparas ĝin kun tiuj marŝoj, kiujn la agentoj transprenis mem. Se la monteriaj kontrolistoj perdis viron pere de fuĝo aŭ neglektemo, la kampadeja manaĝero, la labordirektoro de la monterio alkriis ilin terure kaj li minacis ilin per tio, ke li minusos la perdon de ilia salajro. Sed tio kompreneble ne okazis. Per la alkriado la kazo estis flankenmetita kaj je la sama vespero la subestroj sidis kun la oficisto kvazaŭ en la meskantino kaj trinkis kune. La kostojn de la perditaj laboristoj transprenis la kompanio.

Sed tiukaze, se la agentoj perdis virojn dum marŝo, estis afero alia. La kompanio ne pagis la perdon. La kostojn pagis la agentoj. Ĉeokaze sola viro por la agentoj kostis ducent pesojn, kaj ne malofte tricent pesojn. Estis enliberiga mono, ŝuldoj, monpunoj pagitaj de la agentoj por liberigi la viron kaj varbi lin. Kaj ĉar perdo de homoj estis pagita de la agentoj, tial karavano kondukata de agentoj al monterio estis nekomparebla al festa procesio de pafista unuiĝo. Se oni havus tian imagon, tio ŝanĝus la veran vivon en revon.

Don Gabriel certe jam en tiu ĉi jaro denoncus la partnerecon al *don* Ramon aŭ simple disŝirus ĝin por sole fari la bonegan varbadan negocon. Sed *don* Gabriel ne konis la ĝangalon. Li certe eĉ dek virojn ne sukcese estus kondukinta tra la ĝangalo, se ili ne irus libervole. Ĉar li pli frue, kiam li estis ankoraŭ pli juna kaj brutkomercisto, sciis kiel oni pelu brutaron al la foirplaco. La laboristaj amasoj ja tute simile al bestoj estis pelataj al la monterioj. Sed tamen estis lernenda pli da artifikaĵoj por kunteni la trupon ol necesis por konduki bruttransportojn. La indiĝenaj viroj, kiom ajn timigitaj ili estis, kiom ajn forlasitaj ili sin sentis, spite al la mizero de sia vivo, spite al la tuta nesciado, kun kiu ili plenkreskiĝis, havis pli da inteligento ol bovoj, ŝafoj kaj porkoj. Tiel povis okazi, ĉu plaĉis tio al la agentoj ĉu ne, ke ili uzis la restaĵon de sia inteligento, kiun ili retenis, por fuĝi iam dum la marŝo. Ke kelkaj el la pli inteligentaj laboristoj povus sekrete prepari kaj entrepreni ribelon de siaj suferkunuloj, tiun penson la agentoj havis neniam. Tion ili konsideris neniam. Ĉion, kion la laboristoj entreprenis aŭ intencis entrepreni, ili faris solaj.Ĉiu por si, kaj ĉiu laŭ alia maniero. Okazis, ke duopo eskapis laŭ du diversaj direktoj, kaj ke ĉiuj *capataces* kaj pelistoj estis kunvokitaj

por postrajdi tiun fuĝantojn kaj kapti ilin. En tia kazo la karavano estis fakte sen kontrolo. Ĉiuj tiumomente povus forkuri, kaj la konfuziĝo fariĝus tiel granda, ke la agentoj kun siaj pelistoj devus rajdi reen por kapti ilin kun la helpo de la polico en ties vilaĝoj. Sed tio ne okazis. Se du aŭ tri viroj eskapis, kaj la trupo estis sen armiloj, kampadis la tuta trupo je tiu loko, kie ĝi ĝuste troviĝis, kuiris la manĝon kaj dormis, ĝis la pelistoj revenis kaj tamen ne mankis eĉ nur unu plia viro ol en tiu horo, kiam la pelistoj ekrajdis por serĉi la forkurintojn. Same tiel kondutis brutaj gregoj, se la pelistoj persekutis disirintajn bovojn. La brutaro haltis ĉe la loko, paŝtiĝis kaj ripozis kaj atendis ĝis la vipoj de la vakeroj ilin ree trovis por transporte konduki ilin al foirplaco aŭ buĉfabriko.

Je la kompleta instruiteco, kiun *don* Gabriel bezonis por sole fari la negocon, mankis al li ankoraŭ la sperto pri la transporto de la laboristoj al la monterioj. Tuj kiam li estos kondukinta transporton kun tia sperta agento, kia estas *don* Ramon, li ne plu bezonos *don* Ramon; tiam li estos ellerninta mastro pri tiu fako. Tio estis la kaŭzo, kial *don* Gabriel tiel fervore persvadis *don* Ramonon transdoni la laboristojn ne en Hucutsin, sed konduki ilin ĝis la monterioj. Kaj ĉar eblis konsiderinde pli alta gajno,

don Ramon facile lasis persvadi sin. Ĝenerale *don* Ramon preferis transdoni la laboristojn en Hucutsin al la reprezentantoj de la monterioj; ĉar li fariĝis dum la kuro de la jaroj pli pigrema kaj evitis prefere la penojn de granda marŝo.

Oni devas koni ambaŭ vojojn kaj konduki sur ĉiu el ili transporton, por laŭrajte diri kun certo, ĉu marŝo trans Alpojn estas pli streĉa ĉu marŝo tra tia ĝangalo.

Hanibalo, kiu kondukis armeon trans Alpojn, neniam kondukis armeon tra la ĝangaloj de Centrala Ameriko, kaj Cortez, kiu kondukis armeon tra tiaj ĝangaloj, havis neniam okazon konduki armeon trans Alpojn.

Cortez perdis kvar kvinonojn de sia armeo, neniam atingis la celojn, kiujn li intencis atingi dum sia marŝo kaj kondukis truporeston hejmen, kiu pli malesperiĝis ol la resto de la armeo de Napoleono revenanta de Ruslando.

Kiu tiujn ĝangalojn konas kaj konsideras sub kiaj kondiĉoj marŝis Cortez sen konstanta provizo de manĝo, sen freŝaj trupoj, sen loka gvidanto, sen scii kio okazas en la ĝangalo kaj kio troviĝas trans la ĝangalo, kaj kiu scias krome, ke Cortez posedis nur mapon el blanka paperpeco, tiu rajtas supozi, ke Cortez estus kondukinta armeon trans Alpojn kun paradomarŝo kaj tintanta muziko.

La marŝo de Hanibalo trans Alpojn estas grava historia okazaĵo, kies sinsekvon de eventoj lernantoj detale parkere devas lerni; la marŝon de Cortez tra Centrala Ameriko oni mencias eĉ en meksikaj historiaj libroj nur preterire en kelkaj linioj. Kaj se la marŝo tute ne estus menciita, neniu trovus breĉon en la historio de Meksiko. Entrepreni aŭ esti entrepreninta tiun aŭ la alian marŝon tute samvaloras, se oni komparas la aŭdacon kaj la voloforton de ambaŭ homoj. La marŝo de armeo, eĉ kun kanonoj tra tiaj ĝangaloj, pri tio apenaŭ eblas dubo, estas pli komplika ol marŝo trans Alpojn. Sed unu el la marŝoj estas turnopunkto en la historio kaj en la civilizado de la eŭropaj popoloj, kiuj fariĝis pro la sekvoj de tiu marŝo la heredantoj de la antaŭa kartaga mediteranea dominado, dum la marŝo de Cortez laŭ la meksikanoj estis sen influo al la historio de Ameriko kaj ĝis nun estas rigardata nur kiel aŭdaca marŝo. Eĉ se Cortez estus atinginta la regionojn, kiujn li celis, la marŝo tamen estus sen historia graveco, ĉar en tiuj regionoj ne troviĝis io grava, fakto, kiu nun estas konata, sed kiun Cortez ne sciis. La regno de la peruanoj kaj la istmo de Panamo estis trovitaj sur aliaj vojoj. Kaj tamen, eĉ nun, kvarcent jarojn poste, entreprenado de la sama marŝo, kun la sama amaso de

homoj kaj la sama militmaterialo, estus plu entrepreno, kio kostus al la kondukanto la duonon de sia armeo kaj havigus al la generalo, se li revenigus trionon de sia armeo, la ranĝon de marŝkomandanto, tian, kian ne kreis la lasta milito.

La marŝo de la laborista amaso tra la ĝangalo kompreneble ne kompareblas kun marŝo de armeo de konkeruloj.Ĉar tiu marŝo estas pli mallonga, lia celo konata, kaj la vojo, kiom ajn malbona ĝi eble estas, bone postireblas de la iniciitoj. La marŝkondukanto scias, kiom da tagoj la marŝo daŭras, kaj li scias ĉiujn eblojn de la provizado.

Sed ĉar temas en tiu kazo pri marŝo de homoj, kiuj ne ĉiuj iras libervole, kaj el kiuj eĉ ne unu homo almenaŭ iomete estas impresita de honoroj kaj aventuroj, ĉar estas homoj, kiuj sentas eĉ ne malfortan bendon de kamaradeco kaj reciproka helpopreteco, ĉar ĉiuj estas misvolemaj kaj azene rezistemaj, ellasante neniun okazon por fari komplikaĵojn al la karavankondukanto. Ĉar ĉiuj sentas sin same kiel punkaptitoj kaj galersklavoj, sen espero pri fino de sia puntempo, tial tia marŝo entenas komplikaĵojn, kiujn Hanibalo kaj Cortez ne devis travivi.

La agentoj, kiuj kondukas la varbitajn laboristojn tra la ĝangalo, ne devis esti strategoj. Sed ili devis esti laŭ sia maniero tute bonegaj diplomatoj. Ne helpis al ili pafmortigi viron aŭ skurĝadi alian tiom, ke li ne restariĝos. Tio estus perdoj. Ili male devis provi konservi ĉiun viron. Se ne alie eblis, eĉ per kisoj sur la pugon kaj ĉokoladaj bakaĵetoj sur la langon. Ili devis esti kapablaj pacigi kverelojn kontentige al ĉiuj, por ke la kverelantoj ne reciproke ŝiru la karnon per la dentoj de la korpoj kaj la agentoj tiel perdus tuj plurajn virojn je unu fojo. Ili devis haltigi la plorojn de tiuj, kiuj ekhavis hejmsopiron kaj ne volis manĝi kaj tiam post du tagoj estis tiom malfortaj, ke la moskitoj kaj iksodoj voris ilin vivantaj kaj ili mortaĉis antaŭ oli ili atingis la lagojn. Ili devis al tiuj, kiuj nutris en si pensojn pri dizerto, enkapigi per bone lubrikitaj paroloj la konvinkon, ke dizerto ne indas la penon, ĉar la fuĝintojn oni rekaptos en ĉiu kazo, eĉ se kostus kvincent pesojn. Kaj ili devis havis je dispono sufiĉe multajn ekzemplojn, kun nomoj kaj tre detalaj priskriboj por pruvi, ke fuĝintoj tute certe estos kaptitaj, eĉ se ili kaŝus sin tri jarojn kaj intertempe jam edziĝis kaj fariĝis patroj de infanoj. La agentoj kaj pelistoj devis esti kapablaj teni la virojn ĉiam en bona humoro, ili devis

rakonti ŝercojn al ili kaj eĉ antaŭkanti kantojn. Kaj ĉar la plej bona rimedo, por teni homojn en bona humoro, estas bona manĝo kaj sufiĉe da ĝi, tial la agentoj, kiuj havis ja fusilojn, neniam evitis la penon foriri ĉasi, por ĉeokaze havi freŝan viandon por la trupoj. La ĝangalo estis ja tiel nemezureble riĉa je sovaĝaj porkoj, je antilopoj, fazanoj kaj meleagroj, ke la agentoj kun sufiĉe da ĉasfervoro povis havigi sufiĉe da viando. Freŝa viando ĉiam estis okazo festi feston por la indiĝenoj , kiuj en sia mizera vivo nur malofte povis manĝi viandon en la bienoj kaj en siaj sendependaj vilaĝoj, ĉar festo kaj freŝa viando estas por indiĝeno nedisigeblaj aferoj.

La marŝantoj tage kaj nokte estis minacataj per revolveroj aŭ per karabenoj kaj oni vekis en ili la impreson, ke la agentoj eterne havas la fingron tre ŝanceliĝeme je la ĉano. En vero la pafado ne okazis. Ne pro homamo, sed ĉar pafado por la agento fariĝus tro multekosta. Li ne eldonis ducent pesojn por viro por pafmortigi lin sur la vojo ĉe la unua ebla okazo. Ankaŭ la skurĝado en la marŝo estis nur memgarde uzata. Ĉiam ekzistis la timo, ke tro skurĝata viro fariĝas malkapabla marŝi, tiel, ke li ne plu povas porti sian pakaĵon, ke ekpusas liaj vundostrioj aŭ, ke sangotoksiĝo aŭ nuka rigidiĝo estas la sekvo aŭ, ke

absceso kvazaŭ kancere travoras sin ĝis la ostoj kaj la viro mortas apud la vojo. Alia danĝero de la skurĝado estis, ke la viro fariĝos rezistema kiel maljuna mulo, tiel, ke li obstine strikas, sidiĝas apud la vojo kaj tiam, simile al trolacigita mulo aŭ azeno nek per batoj kaj nek kun pikoj per pintaj lignoj nek per promeso de la paradizo estis plu movebla al leviĝo kaj plumarŝado. La indiĝeno forsinkas en staton de tioma indiferenteco kontraŭ la ĉirkaŭa medio kaj ĉiujn iliajn dolorojn kaj ĝojojn, ke li eĉ tiam rifuzas ekstari, se oni serioze permesus al li iri hejmen, libera de ĉiu kontrakto. Li mortas kaj nenio povas savi lin, ĉar li rezignis pri la volo vivi kaj poste ne povas regajni ĝin.

Sed kiel la revolvero kaj la karabeno ĉiam kaj daŭre antaŭ la okuloj de la laboristoj trembrilis, tiel same ĉiam post kelkaj minutoj sible saltis la longa vipo de la rajdantaj agentoj kaj pelistoj trans la kapojn de la marŝantoj, por ke la homoj ne forgesu, ke la vipo ankoraŭ ne perdiĝis el la sela viptenilo. Ĉe tiu tien- kaj-tien ĉi-saltado de la vipoj kompreneble balais certa vipo aŭ alia trans tiun aŭ tiun ĉi kolon,trans la dorson aŭ la kapon. La rajdanto, kiu lasis klaki la vipon, ĉiam ŝajnigis, ke li en vero volis trafi neniun el la marŝantoj, ke la vipobato celis fakte la

mulon, kiun li rajdas, kaj, ke nur tial, ĉar li ne estis sufiĉe trafolerta, la bato deglitis kaj atingis la nukon de laboristo. Sed, ke la viro tamen estis pli bona vipanto, ol li tie ŝajnigis, montris sin per tio, ke li hazarde ĝuste ĉiufoje tiam trafis tiun viron, kiu iom laciĝis aŭ komencis lami. Kaj la viro, kiun trafis la bato, skuiĝis momente kaj ĉesis dormemi kaj rememoris pri tio, ke li troviĝas en marŝo kaj, ke oni devas marŝi dum marŝo. Se tia ulo samtempe rigardis supren por ekscii, de kie venis la bato, jen trafis lia rigardo la vizaĝon de la agento. La agento ne koleriĝis, ridis kaj diris en bona humoro: „Ĉu mi trafis vin, *muchacho*? *Siento mucho*, mi tre bedaŭras, sed mi devas okupi mian mulon, ĉar tiu praa kaprino ŝajne sonĝas pri verdaj herbejoj kaj dormemiĝas.“

La ulo neniam estis certa, ĉu vere estis tiel, kiel diris la agento, aŭ ĉu la bato efektive celis lin kaj li nur hazarde trafis ankaŭ la mulon. Sed ridanta vizaĝo de la agento forgesigis lin, ke la tranĉo de la vipo brulis sur lia nuko, kaj tiel li ne estis ofendita kaj eĉ akceptis, ke li propre sufiĉe meritis baton, ĉar li efektive eklaciĝis kaj tretadis al siaj postsekvuloj sur la piedfingrojn.

Nun la viroj ĉiuj senescepte portis sian pakaĵon sur la

dorso, tiel, ke ne ĉiu elglitinta vipobato trafis la dorson aŭ la nukon. Iafoje estis trafita nur postaĵparto aŭ la nuda supra brako aŭ nuda gambo. Kaj laŭ la opinio de la viroj ne estis trafita tio, kion celis la siblantaj vipoj, tial la okazaĵo estis pli rigardata kiel plezuro ol kiel serioza puno. La viroj eĉ ridis pri la malbone trafantaj agentoj , se estis trafita nur nuda femuro anstataŭ la nuko, kiun oni celis. Tio helpis al tio, ke estis gajo en la marŝo, spite al la vipobatoj kaj spite al la svingataj revolveroj.

Se la pelistoj faris la saman, kion praktikis la agentoj, la viroj fariĝis jam pli mishumuraj. Se pelisto klakis la vipon al iu, dependis de tio ĉu la viro estis ankoraŭ flavbekulo, aŭ ĉu li jam kolektis spertojn. La flavbekulo nur murmuris kiel urso kaj grumblis, sed la alia, kiu vidis jam pli ol nur sian vilaĝon, tuj ekkoleriĝis: „He, filo de putino, ankoraŭfoje tia bato, kaj ĉe la diablo, mi ĵetos al vi ŝtonon sur vian grimacon, tiel, ke eĉ ne unu dento restos al vi.“ Post tio eĉ alikaze grandbuŝa pelisto fariĝis iom malpli rapida pri la klakado de la vipo kaj li elserĉis nur tiujn, kiuj ŝajnis al li sufiĉe flavbekaj kaj kiuj ekkuris kiel ratoj, se li nur levis la vipon. Ĝuste tiu pelisto, kiu dum la tago plej vaste malfermis la buŝon kaj kondutis kiel bridisto de taŭroj, kutime fariĝis sufiĉe pepema, kiam venis la nokto.

La nokto en la ĝangalo estas damnite nigra. Kaj se post vasta arbustaĵo, elsagas tranĉilo mezen en la pelistodorson, sen tio, ke li vidas, kiu tenas la tranĉilon en la mano, tiukaze tio estas por li ne tiom ĝojiga kiel la vipobato, kiun li fordonacis tiom grandanime, kaj kiu gajigis lin tiom, ke li ankoraŭ povis ŝerĉi pri la taŭzita vizaĝo de la trafita ulo.

Al la agentoj tia ne okazis.Se ili disdividis batojn, neniu estis ofendita pro tio. La agentoj havis siajn zorgojn, tion eĉ la viroj akceptis; sed la pelistoj estis ja nur pagataj proletoj, tiel bone kiel ili. La kolonelo estas timata kaj la soldato evitas lian vojon. Sed la suboficiro estas malamata, oni tretas lin kaŝe postaĵen, por ke li falu en merdon.

Kiel ajn oni juĝas tion, la agentoj estis prudentaj diplomatoj pri la traktado de siaj varbitaj viroj. Kun tiom malmulte da fortoj konduki tiom da sanaj kaj ofte koleraj viroj tra la densa ĝangalo sen esti mortbatata kaj sen perdi virojn pro dizerto, escepte de tute maloftaj fojoj, tio postulas talentojn, kiuj ne estas donitaj al ĉiu, donoj kiuj eĉ inter famaj armeaj estroj estas raraj.

La trupoj ne estis ĉiam samaj laŭ la kvanto. Dependis de tio, kiom da homoj la monterioj bezonis kaj de tio, kiom da laboristoj la agentoj povis varbi.

En tiu jaro la bezono pri laboristoj estis eksterordinare granda. Febra epidemio forrabis ĉirkaŭ kvar kvaronojn de la laboristoj. Multnombraj novaj licencoj por la ekspluatado de la tropikaj arbaroj estis eldonitaj de *don* Porfirio, kaj ĉiuj licencoj, kiuj finiĝis, estis jam renovigitaj. En Usono, tiel, kiel ankaŭ en Eŭropo, estis grandega bezono je mahagonligno, la prezo estis alta.

Ĉio ĉi kontribuis al tio, ke la monterioj komisiis siajn agentojn altreni tiom da laboristoj, kiom ili povis trovi. Sen havi laboristojn estis ankaŭ la plej bela kaj plej multekosta licenco sen valoro. Se la licenco estis foje donita kaj pagita, kaj se la registaro en sia ŝtata buĝeto iam jam fiksis altan sumon el la enspezoj por eksportkotizoj de altvaloraj lignospecoj, la instancoj pli aŭ malpli estis devigitaj subteni la monteriojn en ĉiu rilato je la varbado de laboristoj. Tiu subteno estis en ĉiu kazo tiranio aŭ maljusteco kontraŭ la individuo kaj la

persona libero de la individuo. Ĉar tie, kie ĉio okazadas juste, do tiukaze, se ambaŭ partioj, tiu de la varbistoj kaj tiu de la varbitoj interkonsentiĝas pace pri la kondiĉoj, sub kiuj deruliĝas la varbado kaj la kontraktfarado, ne necesas subteno de la instancoj. La registaro kaj la instancoj ĉiam nur tiukaze estas alvokataj, se estas praktikata perforto de la persono kaj de la rajtoj de la individuo. La individuo ne havas rajtojn, kiam la ŝtato volas fari negocojn. Sed kiu estas la ŝtato? Kaj kiu estas tiu, kiu opinias sian personan opinion kiel la sole ĝustan opinion laŭ kiu la bonfarto de la ŝtato estu prijuĝata? Estas individuo aŭ kelkaj individuoj, kiuj interkonsentiĝis pri komuna opinio rilate al tio, kio estas helpema al la ŝtato kaj la nacio. Estas ĉiam la individuo, kiu estas perfortata, se eta grupo de demagogoj posedas sufiĉe da brutaleco kaj persvada kapablo trudi al ĉiuj ceteraj homoj sistemon. Kiel nomiĝas la sistemo, tio estas indiferenta. Ĉu iu sistemo estas utila aŭ malutila al iu popolo, ne dependas de la sistemo. Laŭ ĉiu sistemo popoloj povas esti administrataj, ĉu je ties utilo aŭ je ties malutilo. Dependas de la individuoj kiamaniere ili efektivigas tiun aŭ tiun sistemon; ĉar ekzistas nek bonaj nek malbonaj registaraj sistemoj. Ne estas sistemo, kion ajn preĝas la

propagandistoj de tiu aŭ de tiu sistemo, kiu povus feliĉigi kaj kontentigi almenaŭ kvaronon de la homoj, al kiuj la sistemo estu uzata.

05

La trupo, en kiu marŝis Andreo kaj Celso, ampleksis cent kaj naŭdek varbitajn laboristojn. Inter tiuj viroj estis junuloj, tre junaj junuloj, kaj ankaŭ viroj, kiuj preskaŭ jam havis kvindek jarojn. Estis inter ili homoj fortikaj kaj malfortemaj, flegmaj, viglaj kaj plumpaj. Multaj povis kuri kiel kapreoloj, aliaj nur pripenseme paŝi kiel maljunaj muloj. Multaj laciĝis rapide sub sia pakaĵo kaj ofte devis ripozi, dum aliaj portis kvindek kilogramojn, tiel nekoncernate de la ŝarĝo kvazaŭ ĝi estus malplena sukersako. Estis unu el la plej komplikaj taskoj de la agentoj kaj de la pelistoj, dense kunteni la karavanon. La rapiduloj ne marŝu tro antaŭe, la malfortemaj kaj nekutimiĝintaj ne tro restu malantaŭe. Trupo de soldatoj marŝas pli facile. La soldatoj estas ĉiuj samaĝaj, manĝas ĉiuj la samon, ĉiuj estas trejnitaj en la sama maniero, kaj ili ĉiuj portas la saman ŝarĝon sur sia dorso. Sed tie apenaŭ eblus kunigi eĉ nur dudek virojn, kiujn oni povus meti en la saman marŝotaĉmenton.

Postulas ekzercitecon konduki tian trupon. Estis unu el la laboroj, kiujn *don* Gabriel volis lerni dum tiu marŝo. En la trupo marŝis samtempe karavano el cent kaj tridek muloj,

ĉiuj multpeze ŝarĝitaj per varoj, kiuj estis portataj al la monterioj. Ankaŭ *Don* Gabriel kaj *don* Ramon aĉetis varojn, kiujn ili volis vendi grandgajne plu en la monterioj. Ili disponis pri grego el tridek ok bestoj, kiuj ĉiuj estis ŝarĝitaj. Tiuj bestoj ne estis ilia propraĵo, sed ili luprenis ilin kun la karavankondukantoj por la marŝo. Ili ne pagis laŭ la nombro de la bestoj, sed laŭ la pezo de la varoj. Ili do pagis nur la frajton kaj la posedantoj kaj kondukantoj de la bestoj estis la frajtentreprenistoj.

La ceteraj ŝarĝbestoj estis parte la posedaĵo de komercistoj, parte samtempe la posedo de frajtentreprenistoj, do ŝarĝbestoj kiujn la komercistoj luprenis por la transporto.

Por ambaŭ laboristaj agentoj estis kaj agrable kaj malagrable, ke aliĝis la grandaj karavanoj al la propra karavano. Malagrable estis tial, ĉar ĉe la ripozejoj ne havigeblis samtempe sufiĉe da manĝo por tiom da bestoj. Ĉe multaj ripozejoj tute ne estis paŝtejo, sed la viroj devis tiri la foliaron de la arboj kaj bati ĝin malsupren, por povi nutri la bestojn. Ju pli da bestoj samtempe haltis je loko des pli profunde la mulpelistoj devis iri en la ĝangalon por povi havigi sufiĉe da foliaro. La karavanoj havis sufiĉe

da maizo ĉe si. Efektive tiom multe da ĝi, ke po dek ŝarĝbestoj estis tri da ili, kiuj ne portis varojn, sed nur la maizon por la nutrado. Sed nur de maizo la bestoj ne povis vivi. Ili tiukaze facile ekhavus kolikon kaj kramfojn kaj estus perditaj. Ili bezonis abunde da verdaj nutraĵoj por esti ĉiam marŝ- kaj portokapablaj.

Tial estis malagrable por la agentoj havi tiom da bestoj en la karavano, ĉar la kondukistoj de la bestoj, kiuj portis tiujn komercajn varojn de la agentoj, devis tro streĉe labori kaj tial mishumuris. Sed neniu trupo volis postresti unu aŭ du tagojn post la unua trupo, ĉar en tiu kazo la dua trupo trovus ĉiujn paŝtejojn jam rastitaj pro manĝo, do pironĝitaj kaj formanĝitaj ĝis la lasta magra tigeto. Eĉ ĉe tia nekredeble granda kreskopovo, kia estas en la ĝangalo, tamen daŭras tri ĝis kvar semajnojn antaŭ ol ree postkreskos sufiĉe da foliaro sur la arboj, por trovi sufiĉe da manĝo proksime de la kampadejo.

Tiel okazis, ke tiukaze, se alvenis en la ekmarŝa loko du aŭ tri da karavanoj, ĉiu karavano uzis kiujn ajn eblajn trukojn por superi la sekvan karavanon. Sed ĉar neniu karavano volis postresti malantaŭ alia karavano unu aŭ du tagojn, pro la verda manĝo, tial ĉiuj karavanoj ĉe la

sama tago frue matene je la tria estas marŝpretaj kaj neniu truko, kiel ajn lerte elpensita, helpus por povi marŝigi la propran karavanon kun avanco de tago.

Tial tie ĉiuj karavanoj en tiu granda karavano kolektiĝis kaj ĉiuj ekmarŝis je la sama tago. Kaj ĉar ili ĉiuj ekmarŝis je la sama tago, ili ankaŭ ĉiuj kunestis ĝis la komuna celo.

Dum la marŝo neniu el la karavanoj povis gajni tagon, eĉ se ĝi estis tre malgranda.

Kial tio ne bone fareblis, havis alian kaŭzon. En la ĝangalo karavano aŭ eĉ malgranda trupo de vojaĝantoj ne povas ripozi je ĉiu ajn plaĉa loko. Eĉ, se besto renversiĝas, oni malŝarĝas ĝin, disdonas la ŝarĝon al la aliaj bestoj, kaj la karavano provas bone aŭ malbone atingi la sekvan ripozejon. La beston, kiu renversiĝis, oni poste serĉas kaj, se ĝi povas iri, oni kondukas ĝin ĝis la sekva ripozejo.

La ripozejoj estis elektitaj ne arbitre laŭ la volo de la unuaj karavanoj, kiuj tie marŝis.

Ripozejo unue devas havi akvon. Ofte temas nur pri marŝlageto de la lasta pluvo. Akvo ekzistas ne ĉie en la ĝangalo.

La vojo dum longa distancoj estas tiom marĉa, ke la bestoj marŝas nur malfacile. Tie ne estas loko por restado, eĉ malpli por tranoktado. Distancoj mejlojn longaj estas tiom rokaj kaj montaraj, ke ankaŭ tie ne eblas trovi ripozejon. Aliaj longaj distancoj pro pluraj kaŭzoj estas maltaŭgaj pro moskitoj, aliaj pro grandaj ĉevalmuŝoj. Neniu homo kaj neniu besto kapablas restadi tie. Je la plej multaj lokoj la ĝangalo estas tiom densa, ke restas nur malvasta pado malferma por marŝado, kiu kompreneble ne sufiĉas por kampadi tie.

La ripozejojn tiuj spertaj karavanaj kondukistoj, kiuj tie unue marŝis, elserĉis prudente. Multe da tempo ne pasis de tiam. Kelkaj el tiuj karavankondukistoj, kiuj unue entreprenis tiun longan vojaĝon al la monterioj tra la ĝangalo, vivas ankoraŭ. Pasis apenaŭ kvardek jaroj. Kaj tiuj pioniroj konis siajn bestojn, ili sciis, kiom ili povis ŝarĝi sur ilin, kaj kiom longdistanca ĉiu tagmarŝo devas esti. Tial estas tagmarŝo por ŝarĝitaj transportbestoj de ĉiu ripozejo al la sekva ripozejo. Sed ĉar la vojo je unuopaj distancoj sekve de marĉoj kaj rokaj montoj estas pli malfacile marŝebla ol ĉe aliaj distancoj, certa ripozejo mezurate laŭ la vojdistanco eble estas pli proksima ol alia. Sed la marŝdaŭro de unu ripozejo al la sekva estas

preskaŭ la sama. Ĝi havas ses ĝis ok horojn. Eĉ, se en la marŝo ĝangale estas trovata loko, kie oni povus starigi kampadejon, ĉar ĉeestas akvo kaj foliaro, tamen la laboro por vastigi la lokon, estas tro streĉa por lacigitaj viroj kaj forrabas tiom da tempo, ke nur tute malesperiga kazo povus esti la kaŭzo, tie aranĝi kampadejon ekstere de la ekzistantaj ripozejoj.

Eĉ se karavano gajnus tagon pro rapida marŝado rilate al la aliaj, aŭ nur dekdu horojn, la rezulto estus la sama. Se karavano alvenus nur du horojn pli frue je la sekva ripozejo, la sekva ripozejo, estas ankoraŭ tiom malproksime, ke ĝi ne estus atingebla je la sama tago. La karavano tial, ĉu ĝi volas, ĉu ne, devas atendi en la ripozejo, je la ceteraj karavanoj, kiuj same alvenos du horojn pli poste. Kaj se karavano kun ŝarĝitaj bestoj marŝas tro rapide, tiel, ke ĝi povas gajni du horojn, la bestoj alvenas tiom lacigitaj, ke ili eĉ per torturoj ne plu moviĝus antaŭen, eĉ ne du horojn plu. Se karavanestro provis tiajn marŝojn dum du tagoj, li devis halti je la tria tago kaj postrestis tutan tagon post la aliaj karavanoj. Sed karavano, kiu jam antaŭas tagon, ne estas reatingbla de alia karavano. Nur per neŝarĝitaj bestoj karavano povas gajni avancon kompare al karavano kun bestoj.

Tiu tiel limigita lokado de ripozejoj en la ĝangalo havas tamen ankaŭ la sekvon, ke fuĝanta laboristo ne povas eskapi. Se oni rimarkis lian fuĝon kaj la pelisto, kiu persekutas lin, havas ĉevalon, la fuĝanto ne havas bonŝancon. Ne en la ĝangalo. Ekstere de la ĝangalo estas pli facile. Sed en la ĝangalo li estas ligita al certa pado kaj al certaj ripozejoj. Tiu, kiu konas la ĝangalon, scias tion. Kaj indiĝeno, kiu bone konas la ĝangalon, ankaŭ ne entreprenas fuĝprovon, se li scias, ke lia fuĝo malkovreblos interne de tri tagoj. Nur se li povas gajni antaŭon de kvar tagoj kaj kvar noktoj, ekzistas por li bonŝanceto por fuĝo. Kompreneble nur el la monterio, kaj nur por certa tempo.

Kvankam la karavanoj, kiuj aliĝis al la transporto, havis malavantaĝojn por la agentoj, ili tamen havis ankaŭ avantaĝojn.

La komercistoj kaj la mulpelistoj de tiuj karavanoj, ne estis varbitaj mahagonlaboristoj. Ili estis *ladinos*. Kelkajn el la mulpelistoj oni eventuale povis nomi mestizoj. Kaj tiuj homoj pligrandigis la generalan stabon kaj la oficiran korpuson de la agentoj. Ili estis en ĉiu rilato speco de milico aŭ helppolico. Se okazus, ke en la amaso de la

varbitaj viroj komenciĝus ribelo, la komercistoj kaj ties mulpelistoj estus bona armila helpo por la agentoj. La komercistoj, tiel, kiel ankaŭ la kondukantoj de la karavanoj, portis revolverojn zone, kaj kelkaj el la komercistoj kaj ties helpantoj havis krome ĉasfusilojn ĉe si.

Sed nek tiuj agentoj tie, nek iuj aliaj agentoj, kiuj gvidis homojn al la monterioj, iam konsideris la eblon de ribelo.

Dum la dudek jaroj, ekde kiam oni praktikis en tiuj regionoj la ekspluatadon de altvaloraj lignospecoj, okazis nur unufoje ribelo. Tiu ribelo estis la bazo de multaj harhirtige hororaj rakontoj, per kiuj la komercistoj kaj agentoj pasigis la longajn vesperojn, kiam ili troviĝis en vojaĝo al la vilaĝoj kaj bienoj kaj sidis kun la bienuloj kaj rancĉistoj post la vespermanĝo en portiko, fumis kaj balanciĝis en balancseĝoj aŭ bonfartige malstreĉis sin en hamakoj. Ĉe la bivakfajroj dum vojaĝoj tra la ĝangalo oni plej ofte evitis tiajn rakontojn. Oni eventuale ĉeokaze menciis ilin, sed ĉiu rapidis ŝanĝi la temon de la rakonto, kiu okazas en regionoj, kiuj estis pli malproksimaj kaj cirkonstance ne tiel similis al tiuj cirkonstancoj en kiuj ĝuste troviĝis la viroj sidantaj ĉe la fajro.

Se oni rakontis ĝangale cer al bivakfajroj tiujn historiojn similajn al tiuj multe rakontataj historioj pri tio, kiel jaguaroj fortrenis nokte infanojn kaj dormantajn plenkreskulojn de la estingita bivakfajro, raportis la rakontistoj tiujn historiojn precize kaj nemiskompreneble, tiel, kiel ili efektive okazis. Tiukaze neniu mensogis kaj ĉiu evitis zorgeme ne troigi ilin.

Sed se tiuj rakontoj estis prezentataj en la ranĉodomoj aŭ en la grandsinjoraj domoj de la bienuloj, tiukaze la okazaĵoj travivis pliampleksigon je sia favoro. Oni ornamis ilin, plenblovis ilin, ŝminkis kaj surpentris ilin, tiel, ke ĉiu timis foriri de la tablo kaj iri sola en la ĝardenon por plenumi siajn personajn bezonojn.

Se tiaj rakontoj atingis sur longaj ĉirkaŭvojoj la manĝohalon de hotelo en la plej proksima urbo, kie la vojaĝantaj komercistoj de la grandaj komercaj entreprenoj de Meksikurbo kunvenis kaj interŝanĝis spertojn pri la lando kaj la homoj, tiam estis jam la aŭtentikaj kaj nefalsitaj trigroŝaj romanoj, el kiuj oni devas aĉeti almenaŭ cent kajerojn, se oni volas scii, kiu efektive estas la viro kun la nigra masko, kiu veturas sur motorciklo, kaj kiu ĝuste ĉiam tiam aperas sur scenejo, se la heroo de la romano ĝuste pendas je ŝnuro je naŭ dekonoj jam tratranĉita super lageto plena de kaptemaj aligatoroj, dum la ina heroo ĝuste je la sama tempo troviĝas enfermita en trunkodomo en profunda arbaro dum atakas ŝin viro, kiu havas la aspekton kaj la karakteron de gorilo. Se oni fine aĉetis kaj legis la trigroŝan romanon ĝis la lasta kajero, oni scias, kie la avo, kiam li ebriis, kaŝis la ok dolarojn, kiujn lia nevino

bezonas por pagi la hipotekon por la trunkodomo, kies pagodato estas transpaŝita, por ke la trunkodomo ne falu en la manojn de la fripono, kiu scias kiel ununura, ke la trunkodomo troviĝas super la eniro de tre orhava minejo, kiu estis forgesita dum tricent jaroj. Kaj plej mirige al la legantoj, kaj por ke ĉiuj facile povu ekkoni, ke estas ne eble nur trigroŝa romano, sed romano psikologia, montriĝas en la antaŭlasta linio, ke la viro kun la nigra masko, kiu ĉiam veturas bicikle, por esti ĉiam ĝustatempe en la ĝusta loko, kiam la bela forta heroo kaj la virga heroa ino ie sidas en kaptilo, ne estas unu el la viroj, kiujn suspektis la leganto dum la legado de cent kajeroj . Se estus unu el tiuj uloj, tiukaze kompreneble oni rajtus paroli pri trigroŝa romano. Sed estis ĉifoje ne la juna, serioza, simpatia, nova metodistopastro el la plej proksima loko, kie li tondre agitas kontraŭ ebrieco, volupto kaj malĉasto; ĉifoje ankaŭ ne temas pri la detektivo Wumbster Hillup Blatterstone, ankaŭ ne pri la maljuna grumbla ŝerifo Mike kun la rimarkinda kromnomo *Two-Guns-Ready (*Jam-pafpreta-kun-du-revolveroj); ne, ĉifoje temas, kaj tion faras el la trigroŝa romano romanon psikologian; pri la konata fripono; jen la sama fripono, kiu volas havi la trunkodomon, la

orminejon kaj la heroan inon, kaj kiu savas la heroon de liaj multnombraj malamikoj nur tial, ĉar li bezonas lin ankoraŭ por aliaj planoj, kiujn povus detrui tro hasta morto de la heroo.

Tute tiel gaje kaj plezurige tio kompreneble ne deruliĝas ĉe la veraj okazaĵoj. Almenaŭ oni agadis ĉe tiu ribelo sufiĉe serioze. *Don* Anselmo Espindola estis fervora kaj sperta agento. Li transprenis la komision varbi dudek aŭ dudek kvin virojn kaj konduki ilin al la monterioj. De la bienuloj li povis aĉeti nur ses virojn, ĉar li ne posedis sufiĉe da mono antaŭpagi la altajn ŝuldojn de aliaj.

Li venis en la regionon de la baĥajontekoj, kiuj loĝis en liberaj vilaĝoj kaj sendependaj setlejoj. Tie li sukcese varbis dekses ĝis dekok virojn, homojn, kiuj pro iuj kaŭzoj bezonis kontantan monon, kiuj ne havis okazon havigi la monon, kaj kiuj devis lasi varbi sin por tuta jaro al monterio, por kio ili ricevis tuj certan sumon kiel antaŭpagon surmanen. *Don* Anselmo ne povis atendi la *Candelaria*-feston por povi ekmarŝi kun granda karavano kaj aliĝi al aliaj agentoj. Li tuj devis konduki la virojn al la monterio.

Kiel helpanton li havis ulon, kiu havis proksimume dekkvin jarojn.

Ĉiuj tiuj agentoj, kiom ajn senrespekte ili praktikis sian negocon de la kaptado kaj aĉetado de indiĝenoj, neniel, kiel oni eble povus pensi, estas samrangaj al la komercistoj. Ili estas nekredeble fortaj kunuloj. Speco de homoj, kiajn kapablas krei nur tiu lando. Timon ili ne konas. Ili ne tikas per brovo, se iu premas ŝarĝitan revolveron sur ilian korpon aŭ, se iu staras super ili kaj premas la pinton de la maĉeto kontraŭ ilian gorĝon, kiam ili vekiĝas. Sed tiom malmulte, kiom estas timo, tiom malmulte estas braveco. Pli similas tiu sinteno al indiferenteco pri la valoro de la vivo. La agento rigardas al la buŝo de la revolvero kaj diras al si: '*pues*, do, mia lasta horo venis, kaj tiukaze helpas nenio.' Sed per tio ne estas dirite, ke li ne defendas sin. Se li vidas eblon, li defendas sin ĝis la lasta elspiro. Se li jam estas tiom frakasita, ke li ne plu povas savi sian vivon, li batalas tamen plu; tiam jam ne plu por ankoraŭ savi ion, sed nur por venĝi sin kaj ne lasi sen rebato la atakanton. Se li vidas dum la momento de sia mortigo, ke lia atakanto tamen estas mortonta, li ne interpaciĝas por tiel akiri ankoraŭ en la lasta minuto la ĉielon. Li jam havas sian paradizon, se li vidas morti la atakinton du minutojn pli frue ol li mem devas morti.

Don Anselmo ne estis escepto de tia speco.

Tiuj indiĝenoj, pli ol dudek de ili, kiuj pli-malpli nevolonte vagadis al la monterioj, sekve de la disiĝo de siaj familioj, estis en kiel eble plej fia humoro; ili apartenis al sendependa tribo, pri kiu estas konate, ke ties membroj estas ribelemaj, azene rezistemaj, atakemaj kaj kverelemaj viroj. Peli tiujn ulojn sola dek ĝis dekkvar tagojn tra la ĝangalo estis tasko, kiun ne aŭdacas transpreni kutima viro. Neniu, konante la cirkonstancojn, akuzos rifuzanton de la tasko, ke tiu rifuzis ĝin, ĉar la viro estas timema. Sed, ke *don* Anselmo transprenis tiun taskon sen longa pripensado kiel tio finiĝos, montras, ke li estis ne ĉiutaga viro, ĉar li konis la vojon, konis la homojn, kiujn li kondukis kaj li konis ties famon kaj ties karakteron. Li diris al si: 'Se mi sukcese estos kondukos la *muchachos* en la monterion, mi enspezos konsiderindan sumeton; se mi ne travenos, jen manĝos mian karnon la vulturoj, la formikoj kaj la sovaĝaj porkoj. Se mi uzus kiel helpantojn tri pliajn virojn, mi enspezus nenion. Sekve tion mi devas iri sola kun la knaba vermeto kaj rigardi kiel finiĝos la afero.'

Tri marŝtagojn ĉio deruliĝis laŭorde, ĝis la unuaj arboj de

la ĝangalo, tie, kie troviĝis la ranĉeto, kiu provizis la vojaĝantojn kun lastaj necesaj vivrimedoj.

Relative laŭorde ili marŝis, kiel *don* Anselmo devis koncedi. Per si mem kaj kiel lubrikite ili kompreneble ne. Li rimarkis, ke oni grumblas, ke la laboristoj kverelas inter si, ke post ĉiu restado je la vojo la ekstarado kaj plumarŝado estis akompanata per flegmaj kaj rifuzemaj gestoj.

Sed li konsiliĝis per tio, ke ĝangale deruliĝos ĉio pli bone. La homoj tiam ne plu renkontos iun, kiun ili konas; tiam ili ne plu memoros ilin pri la propraj vilaĝoj per kabanoj, kiujn ili vidis ĉeokaze ĝis tiam. Kaj ili falos tiam en obtuzecon, tiel, kiel soldatoj sur longaj militmarŝoj, kiuj trotadas, sen pensi plu multe pri tio, kial ili marŝas, kien ili marŝis, kiom longe ili marŝos. Ili eĉ dum horoj marŝus en cirklo sen pensi pri tio, ke tio estas sensencaĵo.

Don Anselmo havis sufiĉe da spertoj kun tiaj marŝoj. Li sciis, ke la uloj kun siaj pezaj pakaĵoj sur la dorso kaj sub la influo de eterne same restanta ĉirkaŭo, kaj ĉiam marŝante kaj restadante, tien kaj tien marŝante, falas en montonecon, en staton, kiu estas kiel dormo aŭ hipnozo,

tiel, ke ili ŝajne perdas ĉian penskapablon kaj ilia pensado kaj zorgado turniĝas nur plu ĉirkaŭ tio, kiam oni atingos la sekvan restadejon.

Je la unua tago en la ĝangalo sereniĝis la humoro de la viroj. Sen kaŭzo. Sed dum la vojaĝo tra tiu monotona ĝangalo kaj praarbaro la humoro de la homoj, ĉu indiĝenaj aŭ neindiĝenaj, estas influataj de aferoj, kiujn oni ne rimarkas kiel enfluan kaŭzon. Iutage oni estas ĝoja, kaj oni ne scias kial, je la sekva tago oni estas morteme malĝoja, kaj oni ne scias pro kio. Je mateno oni estas mishumura, je tagmezo indiferenta, je posttagmezo ĉagreniĝanta kaj vespere enuigata. Je certa tago oni volas konkeri la mondon kaj je la sekva tago oni blasfemas Dion de matene ĝis vespere, kaj hurlas pri Li, kial Li kreis moskitojn, iksodojn, murdajn muŝojn, pulojn, araneojn, marĉojn, pikilojn, dornojn, kaŭterizajn plantosukojn, ŝtonetarojn, falantajn arbojn kaj eĉ ne unu manĝeblan frukton, dum la irado sur tuttagaj vojoj.

Tiaj humoroj povas dependi de temperaturŝanĝoj, de la varmega humideco kaj de la malhela pezeco sub la densa foliaro, de ŝanĝiĝanta aerpremo, de la nepriskribebla monotoneco de la nutraĵoj, de la piko aŭ murdo de certaj

insektoj kaj de mil da aliaj aĵoj.

Ĉi tie estis tiel, ke la viroj je la unua tago en la ĝangalo estis tiom plezurigitaj, kiel ĝis tiam eĉ ne unu fojon. Unu el ili ludis sur buŝharmoniko, kelkaj fajfis dum tio, du el ili krie blekis kaj pensis, ke ili kantas, tie kaj tie en la trupo oni ridis kaj eterne babiladis.

Je la dua tago la homoj estis indiferentaj. Je la tria fihumoraj. Ili apenaŭ interparolis.

La viroj marŝis en longa vico, viro post viro. La pado ne permesis alian.

Don Anselmo en la trupo havis du mulojn, kiuj portis lian facilan pakaĵon kaj tiun de la knabo, tiel kiel la nutraĵojn por ambaŭ, kaj la maizon por lia ĉevalo, tiun de la knabo kaj por la du ŝarĝbestoj mem.

La knabo rajdis antaŭe. Post li trotis la du pakmuloj, kaj post ili *don* Anselmo.

La indiĝenaj viroj marŝis parte antaŭ la kerno de la karavano, do antaŭ la muloj; parte ili marŝis post ili.

Ĉeokaze, do du fojojn en semajno, kaj tie, kie la pado

permesis tion, *don* Anselmo haltis kun sia ĉevalo, deseliĝis, fermtiris la ledorimenojn, starigis sin apud arbo, bruligis cigaredon, tiam senhaste denove surseliĝis kaj postrajdis la karavanon. Li faris tion, kvazaŭ estus pro kaprico. Sed en vero li faris tion por lasi preteriri de tempo al tempo la tutan karavanon apud si, por nombri, ĉu iu postrestis. Ke iu postrestis tute ne devis esti pro tio, ke li volas fuĝi. Aŭ li volis preni ion el la pakaĵo aŭ li devis tranŝarĝi ion por pli bone dispartigi la ŝarĝon aŭ li tretis dornon en sian piedon aŭ vundpuŝis piedfingron je ŝtono aŭ li devis iri malantaŭ arbon aŭ kio ajn eble estis la kaŭzo. Se mankis viro, *don* Anselmo atendis dum certa tempo. Se la viro ne revenis, li rajdis malantaŭen por rigardi, kie li estas. Se li trovis lin kaj vidis, ke la viro havis kaŭzon postresti, jen li vokis al li: „He vi, *que paso*, kio okazis? Do dorno en la piedo, lasu min foje rigardi. Atendu, mi eltranĉos ĝin de vi. Finite la far', ek do, kaj rapide. La aliaj jam estas tre malproksimaj de ni. Ek! Ek!“

Se li vidis, ke ĉio laŭordis, li trankvile postlasis la junulon kaj li mem rajdis tiel rapide, ke li atingis denove la lastan trupon.

Kompreneble, se iu vespere mankus, ne restus io alia al li

ol denove surĉevaligi la selon kaj serĉi la viron. Povus esti, ke la junulo falus kaj ne povus iri plu. Se li estis certa, ke la ulo dizertis, tiukaze li ne postrajdus lin por lin rekapti. Sed eble li eĉ farus tion, kaj tiukaze lia trupo devus atendi en la ripozejo.

Je la kvara tago estis eksterordinare varmege. La viroj ŝajne estis tre lacaj, aŭ la marŝo por ili estis precipe ŝtreĉa sekve de la varmego kaj pro la peza humida kaj ŝarĝanta aero en la densa ĝangalo. Preskaŭ ĉe ĉiu rojo ili kaŭriĝis, fridetigis sian nukon, elprenis siajn pelvojn kaj trinkis. Plej ofte ili ne nur trinkis, sed ili miksis sian posolon kun akvo, por fari la trinkaĵon pli freŝa kaj por samtempe doni nutraĵovaloron al ĝi.

Don Anselmo diris nenion pri tiu ofta ripozado.

Sed kiam ili haltis post du horoj trian fojon kaj demetis siajn pakaĵojn por prokrasti la marŝon, li vokis: „He, *muchachos,* sed tio ja ne decas. Se ni tiel plu malfruiĝas, ni ne atingos hodiaŭ posttagmeze la ripozejon kaj ni devos sterni nin ĉi tie en la ŝlimo apud la pado.“

Unu el la viroj grumble diris ion. *Don* Anselmo estis sufiĉe prudenta ne demandi, kion li celis per tio. Pluraj el

la viroj tiel kondutis, kvazaŭ ili ne aŭdis tion, kion li diris. Ili kirladis plu leĝere la enhavon de siaj pelvoj kaj lasis multe da tempo al si, antaŭ ol ili ree komencis surpaki siajn aĵojn. Tion ili faris tiel nelerte kaj lante, kvazaŭ ili ne scius, kiel oni devas surpaki ion. La plimulto de la viroj tamen rapidis, levis la pakaĵojn kaj marŝis, kiam la aliaj ankoraŭ kaŭris ĉe la rojo kaj purigis siajn pelvojn per akvo.

Kiam la marŝo jam daŭris certan tempon, *don* Anselmo postrestis por rigardi, ĉu iu mankas. Kaj kiam li tiam ree rajdis post la ŝarĝobestoj, frapis lian atenton, ke la viroj estis strange silentemaj. Neniu parolis, neniu vokis ion al alia. Ĉiuj viroj estis nudpiedaj. Tial ilia marŝo estis senbrua. La ununura brueto, kiun *don* Aselmo registris, estis la knarado kaj susurado de la selo de sia ĉevalo kaj krome la grincado kaj frotado de la pakaĵoj sur la muloj.

Kaj nun, je la unua fojo en sia vivo *don* Anselmo ektimis, forte kaj serioze. Li iom post iom komencis pensi pri tio en kiu situacio li troviĝas. La fantazio komencis kreskegi. Li imagis, kio ĉio povus okazi, kaj kio ĉio okazus al li, se la viroj ribelus. Li vidis ion, kion li vidis neniam antaŭe: Ke li estia sola en la ĝangalo kun pli ol dudek indiĝenoj de la

plej sovaĝa famo en la ŝtato. Viroj, kiuj havas neniun intereson pri tio, ĉu li estas feliĉa ĉu ne, kiuj male ne havas kaŭzon deziri ion bonan al li. Li sentis, ke li estas tute sendefenda; ĉar eĉ tiukaze, se li tiom bone trafus, ke li mortpafus ses el ili, restus ankoraŭ dekok aliaj, kiuj ne lasus tempon al li reŝarĝi sian revolveron.

Veninte al tiu kurbiĝo de siaj pensoj, li falis en profundan teruron. Verŝajne li perdis la revolveron, kaj verŝajne unu el la viroj prenis la revolveron al si. Tio estas la kaŭzo, kial la viroj ĉe la rojo estis tiom azene rezistemaj kaj unu el ili eĉ grumblis. Kun hasta movo li kaptis malantaŭen kaj puŝas mane sur la pezan revolveringon.

Li ekspiris liberigite, kvazaŭ li estus do solvita de ĉiuj danĝeroj. Ke postrestas dekok kunuloj, kiuj kun certo venĝos siajn kamaradojn, se li ekpafos per la revolvero, li forgesis.

Li eltiras la revolveron el la zono kaj leĝere plu rajdante, li pruvas, ĉu la kulaskameroj estas plenigitaj kaj la revolvero pafpreta. Li reŝovas la revolveron en la ingon kaj flamigas cigaredon al si.

Sed la viroj, kiuj marŝis dense post li, vidis la hastan

movon al la revolvero. Ili rigardis unu la alian kaj rikane larĝigis la buŝon. La hasta movo de *don* Anselmo perfidis al ili, kion *don* Anselmo supozis povi kaŝi por ĉiam, nome tion, ke li timas.

Je la sekva rojo, apud kiu la viroj restadis, Anselmo diris nenion. Li lasis agi la virojn laŭ ties plaĉo. Ankaŭ li kirladis kiel la viroj sian posolon kaj ŝutis sur ĝin el ladokruĉeto iom da sukero por fari pli bongusta la trinkaĵon.

Tridek minutojn poste la karavano venis al rivereto, kiu ricevis de la unuaj karanvanestroj, kiuj ĉi tie estis alvenintaj, la nomon: *Las Tazas*, la tasoj, laŭ la strange formitaj ŝtonoj, kiuj tie troviĝas en la rivera fundo.

Kiam la viroj tie jam denove demetis siajn pakaĵojn kaj elprenis siajn pelvojn kaj tiel vekis la impreson, ke ili intencas fari pli longan paŭzon, *don* Anselmo ege ekkoleriĝis.

Li vokis kun kriĉanta voĉo: „He, vi, pigra stinkularo, antaŭeniĝu kaj marŝu, aŭ ni ne atingos la monterion kvar semajnojn post la Festo de Ĉiuj Sanktuloj. Ek, levu la hufojn, mi diros al vi, kie vi haltu!“

Li haltis kun sia ĉevalo meze de la rivero. La ŝargbestoj kaj la knabo sur sia ĉevalo jam surgrimpis la sekvan bordon kaj ĵus trotis en la densejon sen rigardi post si. La bestoj ne volis trinki, ĉar ili jam sufiĉe trinkis pro la oftaj haltoj de la trupo.

Don Anselmo konis indiĝenojn sufiĉe longe por scii, kiam indiĝenoj devas trinki ion, kiam kaj kiom ofte ili devas trinki ion por esti plu marŝkapablaj. La tago estis tre varmega. Sed la indiĝeno povas marŝi en multe pli granda varmego dum horoj sen singulti pri akvo. Ke ili trinkis, kiam ajn ili venis al akvo, *don* Anselmo tiel malmulte malpermesus al ili kiel li ne malpermesis tion al siaj ĉevaloj kaj muloj. Kio koleregis lin, estis, ke la viroj en la lastaj tri horoj je ĉiu eta akvejo faris tiom longan paŭzon, kiel ĝi akcepteblas kutime nur dufoje dum unu marŝtago, se oni volas atingi la laŭplanajn ripozejojn por la nokto.

Baĥajonteko, kiu sidis sur unu el la ŝtontasoj en la akvo, kriis same tiel kriĉante, kiel antaŭe kriis *don* Anselmo: „Blasfema hundido de senkompata diablo, vi aŭdacas malpermesi al povra mortanta indiĝeno gluton da akvo, kiun Dio metis ĉi tien al la vojo. Inferen foriĝu, al la serpentoj, paganido de putino!“

Ke indiĝeno, peono povus diri ion tian al ladino, *don* Anselmo neniam supozis ebla. Eĉ se indiĝeno estas tute ebria de la plej aĉa *aguardiente*, kiun povus elŝviti senlicenca brandofabriko en Jovel, li ne diras ion tian, ne al ladino. Sed la baĥajontekoj ja ne estis peonoj, sed viroj el sendependa indiĝena komunumo.

Don Anselmo trafulmis la ideo, ke devas esti brando en la karavano. Alie la konduto de la viroj ne estis klarigebla. En la du unuaj tagoj de marŝo kutime estis brando en la pakaĵoj. Sed la viroj tiom fervore kaj tiel senpripenseme uzis la brandon, ke je la vespero de la dua tago postrestis malofte ankoraŭ tiom de la brando, ke ĝi sufiĉus por ebriiĝo.

Sed, ĉu kelkaj uloj estis ebriaj ĉu ne, tio nun ne estis la temo. La atmosfero estis kreita, kaj *don* Aselmo sciis, ke tio estas ribelo.

La knabo kun la bestoj nun jam iom antaŭis. Dum spireto de sekundo *don* Anselmo pensis revoki la knabon per fajfado. Sed en la sama momento li ekhavis la ideon lasi trankvile marŝi la knabon, ĉar tiukaze, se la knabo revenus, ankaŭ li estus mortbatita. Kaj *don* Anselmo

rigardis tion kiel neutilan oferon. Li traflugis cent ideojn, kiel li povus liberigi sin el tiu situacio sen elveni kun tro da forskrapita haŭto.

Li ne sciis, ĉu inter la viroj eĉ nur unu estas je lia flanko. La ses peonoj de la bieno ne estis danĝeraj, ili ne atakus lin. Ili havis tro da respekto al ladinoj. Ke li povus fidi al baĥajonteko, kiu almenaŭ defendus lian dorsan flankon, tion li ne povis imagi. Eĉ se estus kelkaj inter ili, kiuj ne havis malamikajn sentojn al li, ili tamen ne helpus lin, ĉar ili timis tiujn, kiuj nun ŝajne ekkomandis.

Por konsideri ĉiujn tiujn pensojn, *don* Anselmo kompreneble ne havis la tempon. La agoj ne atendas la finon de pensado. *Don* Anselmo eĉ ne havis tempon konstati per hastaj rigardoj, kie staras la malamikoj, kaj kie la neŭtralaj.

Li estis kun sia ĉevalo meze de la rivero, kiam li vokis al la *muchachos,* ke ili ne jam denove ripozu. Sed ĉar kelkaj antaŭis dum la marŝo kaj aliaj postrestis, li havis en tiu momento virojn je ambaŭ bordoj. Kaj ne nur tio, pluraj viroj sidis ankaŭ je ambaŭ flankoj sur la tasoŝtonoj.

La rivero ne estis profunda je tiu loko, tial tie estis la

travadejo. La akvo ne tute atingis la koksojn de la viroj. Se ili lertis, ili povis tie travadi la riveron sen malsekigi la femurojn per tio, ke ili saltis de unu tasformaĵo ĝis la sekva, ĝis la transa bordo.

Don Amselmo estis tute encirkligita. Tio iris tiel rapide kaj okazis tiel neatendite, ke li rimarkis tion nur tiam, kiam li ne plu povis fuĝi. Jen ne helpas al li eĉ aŭdaca salto kun la ĉevalo. La tasoŝtonoj en la rivero estis tiel malegale disdonitaj, ke lia ĉevalo renversiĝus kun tutcerta rompiĝo de kruro, kien ajn li saltus kun ĝi por atingi la alian bordon.

Kun subita movo *don* Anselmo eligis la revolveron. Li ne pensis pri tio pafmortigi la viron, kiu tro vaste malfermis la buŝaĉon. Li tute ne volis mortpafi iun. Tio certe ne multe helpus al li. Li eltiris la revolveron nur tial, ĉar li volis havi ĝin pafprete ĉemane por povi defendi sin kontraŭ la plej proksimajn virojn kaj eble atingi iun el la bordoj, kie li povus forrajdi certan distancon, por almenaŭ trovi tempon fari planon kaj atendi, ĉu la viroj eble trankviliĝos.

Sed ĉio okazis alie ol li supozis.

En la momento, kiam li eltiris la revolveron, lia ĉevalo ricevis tre fortan baton per maĉeto trans la postaĵon, de unu el la viroj, kiu saltis malsupren de taso kaj post tiu salto jam estis proksima al la ĉevalo.

Per la neatendita bato, kiun la ĉevalo ricevis, ĝi baŭmis. Ĉar la rajdisto ne atendis tion, li deglitis kaj falis. Ĉar li falis laŭlonge, li trempis sin en la akvon.

Li restariĝis kaj trenis sin al la plej proksima taso. Kiam li grimpis sur ĝin por povi stari tie, kaj por de tie plu salti ĝis la bordo, saltis unu el la viroj de la kontraŭa taso malsupren sur la saman tason, sur kiun *don* Anselmo ĵus volis grimpi, kaj batis la maĉeton transverse de lia vizaĝo. Antaŭ ol li povis eksvingi la maĉeton je dua fojo, venis alia indiĝeno de la dorsa flanko kaj faris sukan tranĉon en la dekstran ŝultron de *don* Anselmo. La bato celis ties kapon. Se tiu sukcesus, la batalo finiĝus tiam, almenaŭ la batalo kontraŭ Anselmo mem. Sed *don* Anselmo dum la suprengrimpado al la taso tenis la kapon flanken,en tiu momento, kiam la bato trafis lin kiel fulmo. Ankaŭ la bato ŝultren samtempe povis esti lia fino. Sed li portis ledujon je forta larĝa rimeno trans la dekstran ŝultron. Kaj ĝuste sur tiun ŝultron ŝovis sin la forta buko, kiu ebligas

plilongigon aŭ malplilongigon de la rimeno.

Tiel ankaŭ tiu bato mise efikis kaj sukcesis nur negrava tranĉo.

Don Anselmo ne surgenue almozpetis pri kompato, neniun plorsingulte petis ne murdi la patron de siaj infanoj kaj la prizorganton de sia edzino. Li estis meksikano. Antaŭ ol la du uloj, povis ree levi manon por diskhaki lin nun tute en pecojn, li tiris sin kun supra korpoduono tute sur la tason kaj kun la revolverfusto tiom draŝis sur genuoston de la indiĝeno, kiu hakis en lian vizaĝon, ke la ulo estis sendanĝera dum la resto de la semajno. Per unu plia movo *don* Anselmo estis nun tute sur la taso. Sed li ne rektiĝis. Li sciis, ke li havis unu el la uloj post si. Li ne devis vidi tion, ĉar li ja sentis ĝin trans la ŝultron. Tuj kiam li tiris sin sur la tason, li turniĝis kun mallonga rapida svingo, kaj per la peza spronita boto li jam repuŝis la viron, kiu levis la maĉeton, tiom insiste en la intestojn, ke la ulo kun ekkrio kunkurbiĝis, de la taso, ke li falis kaj en la akvo baraktis kiel paftrafita aligatoro. Ankaŭ li por la resto de la semajno ne plu estus uzebla.

La indiĝenoj ne havas grandan organizan talenton. Tion

la meksikanoj de ili heredis kvazaŭ sange. Tial ili estas ankaŭ nur la loĝantoj de Meksiko, dume ili alikaze povus esti la mastroj de la du usonaj kontinentoj.

Kaj ĉar ankaŭ tie la baĥajontekoj ne pruvis organizan talenton, la aliaj, kiuj ne rekte partoprenis en la batalo, sidis trankvile sur siaj lokoj kaj rigardis la batalon kvazaŭ ĝi estus komedio en cirko. Estis multe pli agrable al ili observi la komedion ol aktive partopreni en ĝi.

Tiu manko de organiza talento, kiu estis antaŭ kvarcent jaroj la kaŭzo, ke Hernan Cortez povis eskapi el senespera kaj despera situacio. Tio estis nun ankaŭ por *don* Anselmo la kaŭzo, ke li transvivis tion. Nur unu aŭ du el la ceteraj viroj, kiuj kaŭradis ĉirkaŭe kaj rigardis la batalon kvazaŭ ili tute ne havus iun intereson pri tio, devis nur ekstari, preni ŝtonon kaj ĵeti ĝin al la kapo de *don* Anselmo. Per branĉo, kiu drivis en la rivero, la plej malforta el la viroj povus mortbati lin. Devus nur unu el ili krii, ke ili mortbatu la putinan hundon! Kaj la viroj ĉiuj ĵetiĝus sur lin.

Sed neniu faris ion kontraŭ *don* Anselmo. La duopo, kiu estis plej kolera, devis nun okupiĝi pri si mem. Ili eĉ ne

plu pensis pri tio provi duan atakon. Kaj ĉe ĉiuj aliaj viroj pli kaj pli rapide la malnova sento de subuleco, de obeemo kaj de respekto kontraŭ la ladino penetris en la cerbojn. Ili fariĝis tute humilaj kaj *don* Anselmo povus voki ilin ĉiujn per montrofingro al si, eĉ la atakantojn, kaj ili venus. Tiu ĉi manko de energia dua puŝofensivo estas tio, kio diferencigas proleton de neproleto. Proleto sunbaniĝas en sia unua venko. Li estas surprizita, ke estis tiel facile faligi la kontraŭulon. Kaj li supozas, ke la falinto nun devas timi lin kaj akcepti, ke li ne povas surpiediĝi. Ĉar mankas ilin la kapablo kaj nelacigebla pacienco ĉe la dua puŝo, tial proletoj neniam gajnas pozicion, kiu daŭras.

Kvankam *don* Anselmo sentis, ke li havas la situacion denove sufiĉe sub kontrolo, tiel, ke li tiumomente kondukus la karavanon pli sekure al la monterio ol antaŭe, li tamen ne estis kapabla repreni la perditan komandon.

La bato, kiun li ricevis per maĉeto transverse de la vizaĝo preskaŭ detruis lin. La frunto estis fendita, la nazo rompita kaj vango malfermis ĝis la mentono, tiel, ke videblis la dentoj. La dika sango fluis sur lian vizaĝon tiel,

ke li ne povis vidi ion. Li lavis sian vizaĝon en la rivero, sed la sangado ne malpliiĝis. Kiel mortanta besto li rampis al la bordo. Li tiam ne plu povis defendi sin.

Kiam li tiris sin supren de la bordo, li trempis sian ruĝmakulitan naztukon en la akvon, lavis la vizaĝon, elvringis la sangon el la tuko kaj ree forlavis la sanĝon. Kunpreni ĉe tia kutima vojaĝo medicinon de kiu ajn speco aŭ pansaĵon, estus nur ridinda por meksikano. Li hontus elpreni ĝin, eĉ se li havus ĝin ĉe si, ĉar lia edzino metis ĝin en lian selujon. Kun certo li ĵetus ĝin en la riveron, se iu vidus lin. Damne, li ja ne estas maljunaĉulino. Dum la meksika revolucio la meksikaj soldatoj kaj oficiroj detranĉis al si reciproke per sia klaktranĉilo aŭ per maĉeto la disŝiritajn korpomembrojn, ridis ĉe tio, faris ŝercojn kaj ne tikis eĉ per brovo. Nenio alia estus helpinta al li, ĉar ĉe la plej multaj revoluciaj trupoj estis nek kuracistoj nek flegistoj nek pansaĵo nek kloroformo. Pri tiaj aĵoj meksikaj soldatoj kaj oficiroj pensas nur tute laste, ĉar tio estas nur eŭropa sensencaĵo. En revolucio oni venkas aŭ mortas. Ĉio alia malgravas.

La agento, malamata de ĉiuj viroj, unue ĉar li estis agento, kaj due, ĉar li ne ĉiutage donas al la uloj du

rostitajn kokinetojn kaj duonplenan botelon kun brando por la vojo, kaŭras je la rando de la bordo, de supre ĝis sube malseka, lavanta kaj fridetiganta per lana koltuko sian oscedantan vizaĝvundon. Li estas tute senhelpa kaj sendefenda. Sekve de la batalo li laciĝis kaj havas eĉ ne plu la plej etan volon, rezisti iel, se li ankoraŭfoje estos atakata. Mankas la forto al li, ĉar la sangoperdo, kiun li havis kaj plu havas, febligas lin korpe kaj samtempe anime. Unu el la viroj povus ataki lin tiumomente per malseka viŝĉifono, kaj la viro tuj falus kiel putranta arbo.

Ĉirkaŭe, je ambaŭ bordoj kaj sur la tasoj en la rivero kaŭris la venkintoj. Kelkaj el ili, ĉar ili ne sciis kion fari krome, denove ekkirlis novan posolon; aliaj okupiĝis pri siaj pakaĵoj, kelkaj elpikis sablopulojn el la plandoj aŭ rastis siajn gambojn, brakojn kaj nudajn suprajn korpoduonojn pro nekredeble fajnaj pikiletoj apenaŭ videblaj pro sia eteco, kiujn ili hazarde defrotis en la ĝangalo de la plantoj, kaj kiuj tamen estas tre dolorigaj kaj molestaj. Pri la du atakintoj, el kiuj unu el ili masaĝas la genuoston kaj la alia la ventron, okupiĝis neniu.

La venkintoj kaŭris surtere, sendecide laŭ ĉiuj siaj gestoj, sendecide laŭ siaj interparoladoj, kiujn ili tre mallaŭte

faris, kvazaŭ ili volus eviti, ke iu vekiĝu, ili estis sendecidaj eĉ laŭ siaj rigardoj, kiujn ili turnis ĉeokaze al *don* Anselmo. Ili estas la venkintoj, kaj nun ili ne scias, kion fari kun la venko. Ili povas reiri en siajn vilaĝojn, neniu malhelpas ilin. Se ili donos al *don* Anselmo la kompatan mortigan baton kaj enfosos lin, eĉ ne la polico provos kapti ilin pro rompo de la kontrakto, ĉar ne ekzistas akuzanto. Ili nun ankaŭ ĉiuj povas marŝi en la monterion, post la enfosigo de *don* Anselmo. Ili povas iri libervole en la monterion kaj tie komenci labori. Ĉar ne estas agento, kiu pretendas antaŭpagojn ĉe la administrado de la monterio, ili ricevos la plenan salajron, kaj post du jaroj ili eble povos preni konsiderindan sumeton kun si hejmen. Kio fariĝis el *don* Anselmo, neniu el ili devas scii. Ili ja ne estas lia protektogardo. La knabo, kiu kiel servisto de *don* Anselmo rajdis en la trupo, ne vidis ion, ĉar li antaŭis sur la vojo. La *muchachos* rakontos, ke *don* Anselmo vidis en la marŝo gregon de sovaĝaj porkoj, ke li persekutis ilin por ĉaskapti unu aŭ du el ili, ĉar mankis je viando kaj, ke la viroj apud la vojo atendis lin dum la tuta hela tago kaj nokto, sed ke li ne revenis el la densejo de la ĝangalo. Verŝajne la sovaĝaj porkoj faligis lin kaj tiam manĝis lin

ankoraŭ vivanta aŭ li iĝis la viktimo de pumo, kiu sidis sur arbo, sub kiu *don* Anselmo preterpaŝis, kaj la pumo saltis sur lin. Aŭ serpento murdis lin kaj li pereis en la ĝangalo, aŭ okazis unu el tricent aliaj aferoj, kiuj povas kaŭzi la morton de homo en ĝangalo.

Sed la viroj kaŭris sendecide, ĝojis nur sekrete, ke la agento ricevis la batojn kaj nun certe koncedos, ke li ne povas regi ilin kiel despoto. Kaj kun la konscio, ke tiukaze, se ili volas tion, povas subpiedigi eĉ ladinon, ili kontentiĝas. Aldonan ili ne volis.

Tri viroj, kiuj sidas je la sama bordo kiel *don* Anselmo, interparolas kune. Tiam ili plukas certajn verdajn foliojn de certaj plantoj, kiujn ili serĉas zorgeme kaj renkonte iras al *don* Anselmo.

Ekvidante ilin, *don* Anselmo kaptas la revolveron, kiu kuŝas apud li. Li pensas, ke la uloj donos nun lastan baton al li, ĉar ili tenas branĉojn en la manoj. Se li jam devas morti, li, kiel bona meksikano, tiumomente tamen ne volas morti kiel malsana hundo. Iru kun li en la lasta momento en la inferon ankoraŭ tiom da ili, kiom li ankoraŭ kapablas trafi per kuglo.

Li celas ne precize, ĉar lia mano tremas, pro la granda malforto, sed li celas ankoraŭ sufiĉe bone al la uloj. Se meksikano serioze havas la intencon trafi iun, al kiu li ĵuris *venganza*, venĝon, jen li trafas ankoraŭ tiukaze, se ambaŭ okuloj liaj estas jam sub blindiga vualo de tuko.

Don Anselmo premis la ĉanon, sed la revolvero eligis nur pŝ-sonon. Li premis la ĉanon duan fojon kaj la revolvero nun eligis nur ff-sonon.

Don Anselmo tuj sakris forte al la sanktuloj, alvokis la diablon kaj ĉiujn fulmotondrojn, petegis en la sama momento Sanktan Virgulinon, ke ŝi punu ĉiujn municifabrikistojn per pesto kaj nigraj varioloj kaj sifiliso, ĉar ili faras tiom da malbona municio, ke meksikano eĉ ne povas fali akven kun sia kartoĉozono kaj la revolvero sen fariĝi tuj sendefenda kontraŭ ĉiuj siaj malamikoj.

Ĉiuj viroj vidis, ke la revolvero dufoje ne pafis. Per tio la agento estis do tute senarmigita kaj la viroj devis tiam preni eĉ ne malsekan fadenon por liberigi *don* Anselmon de ties malĝoja surtera ekzisto.

Sed ankaŭ tiumomente la viroj ne moviĝis. Ili restis

kaŭrantaj kaj rigardis ĉion tion kun intereso, tiel, kiel homoj rigardas filmon sen tio, ke ili ekhavus la ideon partopreni en la okazaĵoj de la filmo.

Ĉu *don* Anselmo paliĝis kiam li vidis, ke lia revolvero fariĝis senutila kaj li samtempe rimarkis, ke ĉiuj viroj vidis tion, ne eblas ekscii, ĉar lia vizaĝo estis ruĝigita de sango je tiuj lokoj, kiuj estis proksimaj al la bato. Kaj la ceteraj partoj de la vizaĝo kaj de la nuko estis sekve de la sangoperdo tiom palaj, ke ili neniukaze povis fariĝi eĉ pli palaj, ankaŭ se *don* Anselmo ektimus. Certe oni povas supozi, ke li ne paliĝis pro tia bagatelo.

Sen eĉ veki nur la plej etan ŝajnon, ke io ne estas en ordo je la revolvero, li svinge eligis kun rutina movo la bareleton, elpuŝis la kartoĉojn, ĵetis ilin per pliaj sakroj al la municifabrikistoj en la riveron, tiris tiam novajn kartoĉojn el la kartoĉa zono kaj ŝovis ilin en la bareleton. Li fermis la bareleton, ĵetis la revolveron en la aeron, tiel, ke ĝi dufoje tute cirklis en la aero, kaptis ĝin lerte je la fusto kaj metis ĝin per energia movo reen zonen. Li sciis, ke per tiu teatreca agado la revolvero ne fariĝis eĉ je knalrubandeto pli utila ol antaŭe, ĉar la kartoĉoj en la zono estis same tiel malsekaj, eble eĉ multe pli malsekaj

ol tiuj kartoĉoj, kiuj almenaŭ parte estis protektataj de la bareleto. Li supozis, ke la uloj, kiuj sciis nur fusilojn buŝe ŝarĝendajn kaj nur tiajn uzis dum ĉasado, ne scias, ke la kartoĉoj el la zono estas same tiom neuzeblaj kiel tiuj, kiujn li ĵetis en la riveron. Estis milita taktiko, kiu estas tute malnova, kiu tamen ebligis venki en militoj kaj malvenkigis revoluciojn pli ofte ol historiaj verkistoj sciigas tion.

La viroj, kiuj iris renkonte al la agento, haltis, kiam li eltiris la revolveron. Ĉu pro kuraĝo, ĉu pro indiferento, ĉu pro tio, ke ili sciis, ke forkurado ne ĉiam helpas kontraŭ ĉirkaŭflugantaj revolveraj kugloj, tio ne estis direbla.

Ke la revolvero ne ekis, ne faris impreson al ili. Almenaŭ ili ne montris sin mirigitaj. Ili trankvile lasis ŝarĝi *don* Anselmon, dum ili plu restadis tie, kie ili estis, kiam *don* Anselmo levis la revolveron.

Kiam li reŝovis la revolveron zonen, vokis unu el ili laŭte: „*Patroncito*, ni volas alporti ja nur la *yerbas buenas,* la kuracherbojn al vi, por meti ilin sur la vundon, por ke la sangado finiĝu, alie vi tute perdus vian sangon, *patroncito*, kara ĉefĉjo.“

„Bueno, bueno muchachos“, diris don Anselmo, dum li elvringis la koltukon en la akvo. „Alportu la *yerbas* ĉi tien, mi vidos, ĉu ili estas bonaj.“

Kiel ĉiuj meksikanoj, kiuj vivas kampare, en ĉiama kontakto kun la indiĝena loĝantaro de kamparanoj, li fidis pli al la kuracforto de la herboj, kiujn uzis indiĝenoj, ol al medicinoj en boteloj, pulvoroj kaj piluloj.

La viroj proksimiĝis. Ili prenis ŝtonojn, trempis ilin en akvon, por lavi ilin de tero, kaj tiam ili pistis la foliojn kaj mincajn branĉetojn al kaĉo. Ili helpis al *don* Anselmo, meti la kaĉon sur la vundojn, kaj poste ili helpis lin firme bandaĝi la tuton per la ruĝflora lantuko.

Bandaĝite, li turniĝis maldekstren kaj dekstren kaj diris: „Malbenite de Dio, kien kuris la damnita filo de putino, la *chivo*, la fikapro, nomata ĉevalo?!“

„El caballito, está, detrás de las otras bestias, ya bien adelante en el camino“, vokis unu el la kaŭrantaj viroj, „la ĉevaleto estas jam longan distancon antaŭe, sekvante la aliajn bestojn.“

„Tiukaze ni do devas piediri ĝis la sekva ripozejo“, diris

don Anselmo, kiu ekstariĝis kun granda peno.

Kiam li staris, li ŝanceliĝis. Sed li retrovis la balancon, ŝanceliĝis kun du longaj treniĝantaj paŝoj al arbo kaj apogis sin kontraŭ ĝi. Tie li skuiĝis kiel malseka hundo. Tiam li ree sakris pri la sanktuloj, la registaro, la aĉaj negocoj, kiuj devigis lin dediĉi sin al tia de Dio forgesita profesio, devi doni panon kaj laboron al povraj, ŝuldoŝarĝitaj indiĝenoj, kaj tiam li vokis: „He, *cabrones*, kaj *diabolos*, diabloj, fekfikuloj, ĉu unu el vi havas gluton da brando? Donu al mi!“

Unu el la viroj, kiuj sidis sur la tasoj, vokis: „*Tenga, patroncito,* mi havas boteleton.

„Mi ja sciis tion, *puercos*, fiporkoj, ke kelkaj el vi kunportas tiun diodamnitan *aguardiente*. La plej sankta, plej nemakulita pura patrino de Dio punu vin per blindeco kaj per putra difektiĝo de la ostoj! Diodamnita filo de putino, venu al mi kun la botelo.“

La ulo eltiris rapide la botelon, saltis haste trans la tasojn kaj alportis la botelon, kiu estis ankoraŭ plena je duono.

Don Anselmo elŝiris la korkŝtopilon, flaris je ĝi kaj diris:

„Tiun la praa malica sorĉistino *doñja* Emilia destilis en sia merdodomo, sen licenco, kaj kion mi sciu, kion ŝi ĉion enverŝis kaj enpisis en ĝin, tiu porkaĉulino. La miksaĵon mi konas. Ankaŭ min nun forlasis *nuestro señor* Jesuo Kristo, ĉar mi devas gluti tiun likvan sterkon de *doñja* Emilia.“

Li ne diris ĉion por eble amuzi la virojn per ŝercoj, sed tio estis pro la sakrado. Kaj tiun aŭ tion, kio venis nun en lian vojon, li malbenis per sakroj, por ke li povu liberigi sin de la certaj doloroj en sia brusto, kiuj fariĝis brulantaj kiel fajro. Mortanta aŭ tre grave vundita militisto aŭ revoluciulo, kiu blasfeme sakras, estas pli certa pri la komprenanta bonvolemo de granda Dio ol tiu viro, kiu hurletas je la subjupo de sia patrino kaj je la pie hipokrita babilaĉado de subpastro. Mortu aŭ vivu, sed faru tion kaj tion kun decidemo, kaj ne disipu tempon pri bagateloj.

Don Anselmo faris vivominacantan gluton, poste li demetis la botelon, elkraĉis la restaĵojn restintajn en la buŝo kvazaŭ laŭ arko tiom foren, kiom eblis al li, kaj tiam li diris: „Tian di-kompatigan supan sterkon oni devas trinki ĉi tie, kiam oni apenaŭ povas stari sur ambaŭ piedoj. Tiu fatrasa putina kanajlo! Oni devus pendigi ŝin

je galgo pro tiu likva merdaĵo. Ŝi ne hontas tiun pisaĵon nomi eĉ *comiteco añejo*. Dio ja iam repagos tion al ŝi venĝe, al tiu venenmiksulino. Neniu miraklo, ke pro tia suposterko la *muchachos* faras stultaĵojn“

Post tio li ree surlipigis la botelon kaj pafis duan gluton tra la ĝorĝo, emfaze kaj elteneme kiel je la unua fojo.

Tiam li demetis denove la botelon, elkraĉis ree kun sakro, rigardis la botelon, tenis ŝin kontrolante antaŭ si, kaj kiam li vidis, ke nur ankoraŭ du fingrolarĝoj restis en la botelo, li redonis la botelon al la viro, al kiu ĝi apartenis kaj diris: „*Gracias*. Kaj se vi ne volas venenigi vin kaj via patrino iutage revidu vin, tiukaze prefere ne trinku eĉ guton plu de tia *aguardiente*.“

„*Si, patroncito,* jes patronĉjo“, respondis la viro. Li prenis la botelon, portis ĝin al sia pakaĵo, pakis ĝin zorgeme inter ĉemizon kaj pantalonon, por ke ĝi ne eventuale disrompiĝu kaj per rimenoj ree kunligis sian pakaĵon.

„He, venu ĉi tien“, vokis *don* Anselmo la viron denove. Li metis manon en la sakon, eltiris sian monsaketon kaj diris: „Jen tiun *tostón* por la brando kiun mi eltrinkis de la botelo.“

Don Anselmo palpis en sia ĉemizopoŝo pro la cigaredoj. Li eltiris haste la pakaĵeton, sed restis nur bruna kaĉo en la moligita kaj disiĝanta papero.

„Mi havas cigaredojn, *patroncito*“, diris unu el la viroj, kiuj estis proksimaj al li. Li ne havis cigaredojn en pakaĵeto, sed nur ne enpakitajn cigaredojn, kiujn li rulumis en kutima pakpapero kaj ne en blanka papero por cigaredoj. La tabako estas bonega, sed la kutima papero ne faras plezuron el la fumado.

Don Anselmo prenis la kvin cigaredojn, kiujn la indiĝeno donis al li.

Mi donos al vi vespere en la *paraje,* en la ripozejo, pakaĵeton kun novaj cigaredoj. Mi havas sufiĉe da ili en la pakaĵo.

„*Gracias*, patrono“, diris la viro. „Ĉu mi serĉu la ĉevalon kaj rekonduku ĝin, *patroncito*?

„Ne, lasu tion, la ĉevalo estas ĉe la ceteraj bestoj kaj jam tre antaŭe, antaŭ ol vi revenus estus nokto. Ni ĉiuj marŝos.“

Don Anselmo ekbruligis cgaredon kaj fumis kun plaĉo, kvankam la cigaredoj estis saturitaj de la ŝvito de la viro, kiu portis la cigaredojn en la horloĝa poŝo de sia pantalono, kie ili estis senpere presataj kontraŭ la ventro de la viro.

Fuminte kelkajn enspirojn, li vokis: „He, *muchachos,* sed nun ek do, antaŭen, marŝu kaj viglu svarme. Ni devas atingi la sekvan ripozejon, damnite kaj malbenite, aŭ ni dormos ĉi tie kiel sovaĝaj porkoj apud la vojo. Ek, ek!“

Sen atendi, ĉu la viroj efektive sekvas lin, li tiris la ledan pantalonzonon supren, kuntiris la rimenon kroĉis la bukon de la zono pli streĉe, metis la ĉapelon sur unu flankon de la kapo, ĉar pro la bandaĝo ĝi ne surmeteblis tiel kiel kutime. Kaj li ekmarŝis.

Komence li marŝis pene. Li ŝanceliĝis plurfoje, li devis halti kaj apogi sin je arbo por kolekti novajn fortojn. Post duono de horo li marŝis jam pli bone. Li paŝis nun kuraĝe antaŭen. Eĉ ne unu fojon li turniĝis dorsen. Li translasis tion tute al la viroj, ĉu ili sekvos lin aŭ ĉu ili kompletigos la ribelon kaj reiros hejmen.

La ripozejo situis tiel, ke ĝi atingeblis en la kutimaj

marŝoj je la tria posttagmeze. *Don* Anselmo alvenis inter la sesa kaj la sepa vespere.

La knabo fariĝis timema, ĉar li vidis neniun el la trupo. Sed ĉar la tuta trupo postrestis, li opiniis, ke ĉio estas en ordo. Ne mirigis lin tro, ke la ĉevalo de *don* Anselmo altrotis sola kaj de la ceteraj bestoj, kiuj jam estis en la ripozejo, estis salutata per snufego kaj brua blovado.

Kiam post du horoj nek venis *don* Anselmo, nek iu el ties viroj, la knabo fariĝis maltrankvila, sed li povis fari nenion. Se li surseliĝus kaj retrorajdus, la aliaj bestoj povus eskapi. Tiam li diris al si, ke *don* Anselmo estas ja en la komuneco de pli ol dudek viroj, kiuj en ĉiu kazo alportus lin, se io okazus al li survoje.

Post certa tempo de nedecida atendado la knabo deŝarĝis la bestojn, senseligis la ĉevalojn, permesis, ke ili turniĝas surtere kaj poste serĉu herbojn. Li preparis la kampadejon nur provizore sub tegmento de palmoj, ekbruligis fine la bivakfajron kaj komencis kuiri fabojn, rizon, sekigitan viandon kaj kuiri kafon. Tiam alvenis *don* Anselmo. Li sternis sin antaŭ la fajro. La knabo ŝovis la selon al li, por ke *don* Anselmo povu apogi sin sur ĝin.

Tiam li donis kafon al li.

„*Que paso, don* Anselmo? Kio okazis al vi?“ demandis la knabo.

Don Anselmo trinkis la varmegan kafon, ŝovis kelkajn sekigitajn tortiljojn en la fajron kaj diris: „Nu, nenio grava, apenaŭ necesas paroli pri tio. Kelkaj el la *muchachos* ebriigis sin kaj mi kaptis kape baton per la maĉeto. Tio estas ĉio. Kaj vi ja scias, kiel tio iras. Tial do mi malfruiĝis. Kaj dum mi volis forlavi la sangon de mi, la ĉevalo ekgalopis sole. Tio estas ĉio. *Es todo*.“

„Ĉu vi ne pafis, *don* Anselmo?“ demandis la knabo.

„Sed mi ja ne mem estis ebria, kion vi pensas al vi, *chamaquito,* bubeto. Mi ja ne pafas. Estas ja mia propra mono, sur kiun mi pafus tiukaze. Kaj mi ja ne estas *loco*, freneza mortpafigi pro nura plezuro mian monon. Donu foje la cigaredojn al mi, miaj estas tute moligitaj, malfermu skaloteton kun sardenoj, mi havas apetiton je ili. Ĉu ni havas ankoraŭ bonan gluton da komiteko en la botelo?“

„Ĝi estas ankoraŭ pli plena ol je duono“, rediris la

knabo.“„Ĉu vi volas havi la botelon, *don* Anselmo?“

„Ne jam nun, pli malfrue, post la manĝo, antaŭ ol mi sternos min. Mi havas stomakon plenan de likva merdo, tiun mi devas tralavi. Donu la sardenojn al mi. Kie estas la salo? Ĉu la muloj estas vundfrotitaj?“

„Ne, *don* Anselmo, la muloj estas en bona ordo.“

„Vi ja ne eble eĉ timis, sola, *chamaquito,* ĉu?

„Sed, *don* Anselmo, mi ja ne timas, mi nur timis, ke io okazis al vi, eble kun la *muchachos.“*

Don Anselmo ridis: „Pro mi vi ne devas timi. Tion vi ja scias. Kaj la *muchachos* estas bonuloj.

„*Pues*, nu“, la knabo respondis, „mi ne tute certas pri la baĥajontekoj. Tiuj estas *matadores,* murduloj. Jen venas la *muchachos.“*

Don Anselmo rigardis transen, tien, kie la pado trafis la ripozejon. La uloj alvenis, solaj, unu post la alia.

Fariĝis nun rapide tenebre. Kaj kiam jam alvenis la lasta viro, jam tute noktiĝis.

Sur la ripozejo oni vidis jam nur la flagrantajn fajrojn kaj la tien-tien-kurado de la viroj, sen ekkoni ilin.

Don Anselmo ne sciis, ĉu ĉiuj viroj tie ĉeestis.Kaj se ili ne estus tie, ĉu ili eble nur morgaŭ alvenus. Je la sekva mateno, longe antaŭ la sunleviĝo, la kampadejanoj jam viglis. Kelkaj el la viroj kunkolektis la distrajn bestojn kaj helpis al la knabo ĉe la surŝarĝado de la bestoj.

Tiam oni estingis ĉiujn bivakfajrojn, oni tretadis sur ili kaj prijetis ilin per tero. Don Anselmo vokis: „Ek, muchachos!“

Li sidis jam en la selo, kaj la knabo pelis la du ŝarĝmulojn antaŭ si. Don Anselmo sekvis la knabon. Tiam li ordonis al la knabo, tuj kiam ili estis sur la vojo, ree rajdi antaŭe, por doni al la bestoj gvidadon, kaj li mem rajdis post ili. Tiom malmulte, kiom li zorgis hieraŭ ĉe la rivero pri tio, ĉu la uloj alvenas aŭ ne, tiom malmulte, kiom li zorgis sin vespere pri tio konstati kiom da viroj alvenis, tiom malmulte li nun penis ekscii, kiom da viroj estas ankoraŭ survoje.

Liaj vundoj doloris furioze. Li ne demetis la bandaĝojn en la nokto, ĝi jam gluiĝis firme, kaj se li faris neatenteman

movon per la kapo, tiu ŝire skuis la vundon kaj pliigis la doloron. Je la vespero li kontrole rigardis la mallongan vundon ĉe ŝultro. Ĝi estas longa nur kiel fingro kaj profunda duonon de colo. Tial li ne multe atentis ĝin, ĝi estis tro sensignifa.

La karavano atingis la monterion. Kaj tie don Anselmo trovis tiam necesa nombri la virojn, kiujn li kondukis en la monterion. Li perdis nur kvar el ili, kvar baĥajontekojn, inter ili du el tiuj, kiuj atakis lin. Li ankaŭ poste ne penis kaptigi ilin pro kontraktrompo. Li rigardis ilin kiel perdon, kvazaŭ ili mortis en la marŝo.

En la monterio oni demandis lin, de kie li havas sian vundon. Li diris, ke unu el la viroj trafis lin per maĉeto kaj poste dizertis. Aldonajn detalojn li ne menciis. Ili tamen iom post iom eksciis pliajn detalojn, ĉar la viroj rakontis la okazaĵojn al aliaj viroj.

La cikatron don Anselmo havas ankoraŭ nun. Ĝi estas tiel granda, ke neniu povas pretervidi ĝin kaj li ĝin ne povas kaŝi. Se iu serĉas lin, kaj oni lin ne konas, oni diras: Jen la viro kun la aĉa cikatro en la vizaĝo. Vi tute ne povas preni lin erare por alia.“

Don Anselmo estas ankoraŭ nun varba agento por la monterioj. Kaj pli ol dekfoje post tiu marŝo li kondukis kvindek virojn, akompanate nur de knabo, tra la ĝangalo en la monteriojn. Li faras tion ne pro plezuro aŭ aventuremo. Sed li devas vivteni familion. Estas la ununura negoco, kiun li regas kaj kiu enspezigas sufiĉe da mono por nutri kaj vesti sian familion. Ĉiam, kiam li pensas, ke nun la plej juna knabino fine jam estas trans la plej malbona kaj li ekpovas pensi pri tio aĉeti magazeneton al si kaj pasigi la reston de sia vivo trankvile en agrabla kunnajbareco de urbeto, jen diras lia edzino: „Karulo, mi pensas, ke la sekva ree estos knabo.“ Kiun alian elirvojon li havas? Li devas denove varbi laboristojn kaj konduki ilin al monterio. Li pendas same tiel bone je sia ĉeno kiel la viroj, kiujn li varbas, je siaj. Se li ne povus uzi sian kapon pli bone ol tiuj indiĝenoj, kiujn li kondukas al monterio, tiukaze povus okazi, ke li ne venus kiel varbisto al monterio, sed kiel varbito.

Rimarkoj
chamaquito = bubeto, knabeto
gracias = dankon
paraje = loko, ejo, pejzaĝo
patrono = patrono, ĉefo, mastro
patroncito = ĉefĉjo, patroneto

tostón = monero de kvindek centavoj

Ĉapitro 05

01

Foje-foje homoj, kiuj dum la unua renkontiĝo reciproke tradraŝis sin, fariĝas poste la plej bonaj kaj plej fidindaj amikoj.

Tiel okazis ankaŭ inter Andreo kaj Celso. Ankoraŭ antaŭ la ekmarŝo, kiam Celso jam sufiĉe sobriĝis por vidi la ĉirkaŭon kun pli klaraj okuloj, li repaciĝis kun Andreo.

Li sukcesis klarigi al Andreo, ke tiu havis same tiom da kulpo je la pugnobatalo kiel li mem.

Andreo kiel *carretero*, kiel ĉaristo, pro tiu laboro, kiun li faris multajn jarojn, tute demetis la kutimojn kaj la manieron de la parolado de indiĝenoj en la malgrandaj vilaĝoj. Per la maniero, kiel li vestis sin kaj kiel li moviĝis inter ladinoj kaj per tio, ke li sciis legi kaj skribi, li vekis ĉe ĉiu la impreson, ke li apartenas al tiu klaso, el kiu la monterioj kaj kafoplantejoj prenas siajn kontrolistojn kaj *capataces* kaj privilegiitajn laboristojn, de kiuj oni atendas certan gradon de inteligenteco.

Tiel estis tute kompreneble, ke Celso rigardis Andreon, kiam tiu proksimiĝis al la bivakfajro de la estontaj monteriolaboristoj, kiel *capataz*-on, kiel spionon kaj kaŝan fian elesploranton kaj fanfaronulon el la privilegiitaj laboristoj. Kaj ĉar la kolero, kiun sentis Celso kontraŭ la *capataces*, tiam ĵus atingis sian kulminan punkton, estis ne kulpigeble, ke li atakis Andreon ŝajne sen kaŭzo. Andreo komprenis la konduton de Celso, de kiam li eksciis ties historion, eĉ pli bone ol kelkaj aliaj komprenus tion. Li ja kiel Celso tute sen kulpo kaj sen povi fari ion kontraŭ tio falis en la kaptilon de varba agento, en tiun de *don* Gabriel. Li eskapis de la bieno, al kiu li apartenis kvazaŭ kiel la gregoj kaj la nemovebla terposedo, pro pluraj cirkonstancoj. Unufoje jam for dum pli longa tempo de tiu ĉiu speco de preskaŭa servuteco kaj for de la bieno, kaj jam tie, kie la potenco de la bienuloj estas malpli forta, kaj kie la samtempa kuneco de liberaj laboristoj kaj de ligitaj laboristoj estas ne plu praktikebla, la indiĝena kamparano kaj lia estonta familio estas perditaj por la bieno kaj ties senmoveblaj valoraĵoj.

Sed la bienuloj, kiuj iafoje laŭŝajne lasas eskapi peonon, ĉiam trovos rimedojn kaj vojojn rekonduki peonon al la heredaĵo de la bieno, kiam ili pensas, ke tio estas favora

por ili.

En la bieno, de kiu devenis Andreo, vivis la patro, la patrino kaj la pli junaj gefratoj de Andreo. La patro de Andreo havis ŝuldojn ĉe la patrono, kaj la bienulo decidis enkasigi la ŝuldojn de la peono, kiu estis sen posedo, per tio, ke li vendos lin por la ŝuldosumo al varba agento de la monterioj. La viro fariĝis olda kaj verŝajne ne longe plu estis taksebla kiel plenvalora laboristo. Tion diris ankaŭ la agento de *don* Gabriel. Sed la bienulo trankviligis *don* Gabrielon pri tiu afero: „Ne timu, vi ne devas preni la oldulon, vi ricevos la filon, kiu estas fortika kaj sana kiel kvarjara taŭro.

La filo efektive venis kaj transprenis la kontrakton de la patro, ĉar li ne kapablus vidi tion kiel la patro pereas kaj mortas en monterio.

Tiel la bienulo ricevis la ŝuldosumon kontante elpagitan de la agento. Samtempe li povis reteni sian peonon, la patron de Andreo, kaj per tio li firmtenis en la bieno ankaŭ la pli junajn gefratojn de Andreo, kiuj iom post iom plenkreskiĝos, kaj kun certo poste ankaŭ la familiojn, kiujn fondos tiuj plenkreskiĝintaj infanoj post malmultaj

jaroj. Tiam iutage ankaŭ Andreo revenos el la monterio, tuj kiam li forlaboris la ŝuldosumon de sia patro, kaj reveninte el la monterio, li rigardos la bienon kompare al monterio kiel paradizon. Sed tio ne estos ĉio. La bienulo intertempe estos parolinta kun unu el siaj peonoj, kiu havas edziĝkapablan filinon. La bienulo promesos al tiu peono, ke li donos pruntedone al la filino kiel doton precipe fekundan pecon da tero, kie ili povos starigi sian kabanon, krome du ŝafojn kaj du porketojn, sub la kondiĉo, ke ŝi edziniĝos kun Andreo, kiam li revenos. Andreo reveninta de monterio havos sopiron al ino, tiel kiel taŭro, kiu tri monatojn estis enfermita sen bovino. Tiel li edziĝos tiom rapide al la knabino, kiom la moro inter siaj parencoj tion permesas. Kaj la bieno havos novan setliĝintan familion el peonoj. Bieno sen laboristoj estas senvalora, kaj la ununuraj laboristoj, kiujn bieno povas havi en tia regiono, estas la familioj, kiuj apartenas al tiu bieno.

„Vi estas simile profunde en la merdo kiel mi, tion mi jam nun volas diri al vi“, opiniis Celso, kiam Andreo rakontis al li, kiel li venis en la trupon.

„Ni ĝiskole estas en ĝi; vin atendadas knabino, kaj min

atendadas knabino; ambaŭ ili certe devos atendi ĝis elsekiĝos iliaj musetoj“, diris Andreo.

„Mi nun ankoraŭ estas en iom pli bona situacio ol vi“, klarigis Celso. „Mi povas forkuri, mia patro ne estus kompensodeva, mi ankaŭ ne havas garantianton, kiun ili povus preni por mi. Sed en via kazo, en via kazo via patro devus anstataŭi vin. Kaj tiam vi estus ĝuste tie, kie vi estis , kiam vi ankoraŭ laboris ĉe viaj ĉaroj kaj via knabino sidis apud vi sur la ĉaro.“

„Sed, azeno, kiu vi estas, kial vi ne forkuras?“ demandis Andreo, „se nek via patro, nek kiu ajn estas kompensodeva por vi.“

„Azeno, azeno estas vi. Kien mi iru? Se mi volas havi mian knabinon, mi devas reiri en la vilaĝon, ŝi ne forlasos la vilaĝon. Tie estas ŝia tero, kaj tie estas ŝia patro kaj ŝia patrino. Kaj se mi reirus al la eta pueblo, la polico sekvatage havus min je la hoko, ili retrotrenus min al la monterio, mi kaptus kvincent batojn dorsen aŭ eĉ mil da ili, kaj sidus kun cent pesoj por la kaptiĝo eĉ pli profunde en la kaĉo. Tiel stulta mi ne estas. Kaj se mi ne povus reiri al la pueblo al la knabino, kiun sencon havus iri aliloken?

Ĉie vi devas labori, kaj damne streĉe labori, eĉ ne centavon ili donacus al vi. Tiukaze mi same tiel bone povas labori en la monterio. Forkuri, libere moviĝi laŭ propra plaĉo, ĉu? Kien? Ĉu de laborloko al laborloko? La salajro ja apenaŭ estas tre diversa. Ĉu kafoplantejo, ĉu monterio, ĉu ĉaro, ĉu esti *arriero*, do mulisto. Kiom da jaroj vi laboris kiel ĉaristo, ĉu vi diros al mi? Nu bone, ĉu vi do nun povas aĉeti al vi iun *milpa*, tute etan maizkampeton? Damne. Nenion. Nenion vi havas. Jaron post jaro vi veturigis ĉarojn kaj laboris, pli dure kaj pli ol ĉiuj viaj bovoj, kaj nun vi eĉ ne povas pagi la ŝuldon por via patro en la bieno, kaj vi devis transpreni eĉ la ŝuldon en la kontrakton, kiun vi havis ĉe via transportĉefo. Forkuri, ĉu? Diru al mi, kien? Jen, prenu la cigaron, mi scias rulumi ĝin pli bone ol vi. Ankaŭ tion vi lernos en la monterio, kiel oni rulumas bonajn cigarojn.“

Rimarkoj
arriero = mulisto, mulpelisto
milpa = maizkampo

Je la unua tago la karavano venis ĝis ranĉeto. Ĝia nomo estis: Chiquiltic, jen indiĝena vorto, ĝi signifas: Tikla punkto. La mastra domo estis argila kabano, kiu staris sur monteto, de kie la posedanto povis transrigardi ĉiujn tiujn mizerajn kabanojn de siaj peonoj, kiuj troviĝis pli malsupre.

La karavano kampadis parte sur la deklivo, parte malsupre inter la kabanoj de la indiĝenoj, parte rande de la arbara tereno, parte eĉ en la tereno de la arbaro mem.

Kvankam la marŝo ne estis tro streĉa, oni rigardis la distancon kiel *„una jornada regular“,* kiel kutiman farendan tagan kvanton. Sur la vojo krucendis rivero. Tio estis sufiĉe da laboro. Oni devis tie malŝarĝi ĉiujn bestojn. La ŝarĝojn oni portis sur la kapoj de la viroj trans la riveron. Se oni lasus la ŝarĝojn sur la dorsoj de la muloj, ili malsekiĝus kaj disiĝus, ĉar la akvo estis tiom alta, ke ĝi atingis la kolojn de la viroj.

Sur la alia flanko necesis lasi iom da tempo al la bestoj, por ke ili fariĝu sekaj por eviti, ke ili tro rapide

vundfrotiĝos. Tiam necesis ree ŝarĝi la bestojn. Por ĉio ĉi oni bezonis sufiĉe da tempo, kio fakte mallongigis la ceteran tagon, tiel ke jam estis malfrue posttagmeze, kiam la karavano alvenis en Chiquiltic.

Andreo kaj Celso kaŭris je la sama bivakfajro.

„Foje provu“, diris Andreo, „ĉu vi ricevos por dek centavoj *manteca,* buteron supre en la domo aŭ en kabano. Jen prenu la ladokruĉon.“

Celso ekmarŝis. En ĉiuj kabanoj on marĉandis, pri ovoj, sekigita viando, graso, tortiljoj, akra kapsiko kaj kruda sukero.

Kiam li fine revenis kun la aĉetita butero, li diris: Ni havas novulon.“

„Kian novulon?“ demandis Andreo.

„Novan kaptiton, denove iun, kiu tute libervole iras en monterion. Li vagadis ĉi tie du tagojn en la ranĉo kaj atendis la karavanon. Li iris renkonte al *don* Gabriel, kiam mi ĝuste estis tie supre en la domo kaj demandis pro la butero. *Don* Gabriel pendigis sian hamakon per

hokoj por la nokto tie supre en la portiko de la domo. Mi ne volus dormi tie. Tie amase svarmas la puloj. Jen la novulo demandis *don G*abrielon, ĉu tiu estas preta varbi lin por monterio. Jen *don* Gabriel rigardis lin de ĉiuj flankoj, palpadis lin, vi ja scias kiel li faras tion, kaj poste li diris: '*Bueno*, vi rajtas kuniri, *tostón,* kvindek centavojn ĉiutage, ĉu kulpojn? Ne. Ĉu vi volas havi antaŭpagon por la *enganche*? Do, tiel do, jen kvin pesojn kiel antaŭpago, aĉetu la necesan por la marŝo. La kontrakton ni skribos en la monterio. Vi ŝparas multe da mono, vi ne devas pagi stampilon. Elserĉu tie malsupre bivakfajron, kie vi povas sidiĝi al la *muchachos*. Kiel vi nomiĝas? Santiago, *bueno, adios*.' Tiam *don* Gabriel mangestis foriri al li, kaj poste li balancis sin ree en la hamako. Tiel al li falas la rostitaj meleagroj en la buŝon. Oni eĉ malfermas lian buŝon, por ke li ne laboru ĝis renversiĝo.“

„Kie li estas nun, la novulo?“ demandis Andreo.

Li iras de kabano al kabano kaj aĉetas manĝon al si. Jen, vi, tie li ŝteliras rekonte al ni.“

La novulo rekte venis al la fajro de Andreo, verŝajne, ĉar li vidis sidi nur duopon, dum ĉe ĉiuj aliaj fajroj kaŭris ses,

ok kaj eĉ dekdu da viroj.

Kiam li estis malproksima nur kvin paŝojn, Andreo vokis: „He, vi ja ne serioze volas diri al mi, ke vi estas Santiago de Cintalapa?“

„Haltu vian diodamnitan mokan klaĉtruon, Andreĉjo, al la stinkanta *engachador,* al tiu hundido, mi diris, ke mi estas de Suchiapa, kaj mi larĝbatos al vi la grimacon, se vi rakontos al kiu ajn, ke mi estas ĉaristo. Kaj vin tio same koncernas“, li diris, turniĝante al Celso.

„Kiu estas tiu, kiun vi havas ĉe vi, Andreĉjo?“

„Vi ne devas zorgi pri li, estas Celso. Li estis pli frue en Soconusco, en la kafoplantejoj kaj estas nun jam sperta olda knabo en la monterioj. La plej bona *muchacho* en la tuta mahagonarmeo.“

Santiago sidiĝis al la fajro kaj komencis elpaki el la reto ĉion tion, kion li aĉetis por la kuirado de la vespermanĝo.

„He, vi, Celso“, diris Andreo, „jen Santiago, li estis kun mi ĉaristo, li veturadis kun mi dum jaroj en la sama kolono. Ĉe mia sankta animo de bovo, *hombre*, Santiago, vin mi

atendis vidi ĉi tie tute laste. Nun mi ja ne plu povos esti tiom hunde trista, de kiam ankaŭ vi estas ĉi tie.“

„Ĉu vi scias, *m'ijo,* mia filo“, opiniis Santiago, dum li metis la nigrajn fabojn en poton sur la fajron „estis ĉiam mia sopiro iam iri al monterio. Se vi estis ĉaristo dum kelkaj jaroj, jen dio ŝparos al vi la inferan fajron, oni diras. Sed la homoj diras ankaŭ, ke tiu, kiu estis du jarojn en monterio, ne estas akceptata de diablo en infero, ĉar la diablo povas timigi lin nek per fajro nek per torturo kaj ĉar li acidigas ĉiun plezuron al li. Kaj ĉar tio ĉiam estis mia granda sopiro rigardi kiel estas en monterio, tial mi nun estas ĉi tie.“

„Sed, viro, *hombre“*, ridis Andreo, „ne parolu al ni tian fridan kikerokaĉon. Diru prefere rekte, *que pelo tienes en tu sopa?* Kia haro estas en via supo?“

Santiago tordis la vizaĝon kaj klarigis: „He, frateto, la hareto en mia supo estas dek jaroj *penitenciaria,* kaj se la juĝisto tagon antaŭe eble estos difektinta la stomakon al si, povus esti ankaŭ tute bone dudek jaroj da prizono. Eble vi nun komprenas mian sopiron al monterio pli bone, kaj multe pli bone vi nun komprenos, ke mi al vi,

kaj al tiu tie, kiel vi diras, Celso, ke mi al vi ambaŭ frakasos la babillukon tiel, ke eĉ ne loza dento plu restos pendanta en ĝi, se vi diros ion pri tio al iu ĉi tie aŭ kie ajn aliloke.“

Li kirladis en la faboj, ŝutis la muelitan kafon en la ladokruĉeton, ĵetis kelkajn pecojn de bruna sukero sur ĝin, verŝis akvon aldone en ĝin ĝis la supra rando kaj ŝovis la kruĉeton al la bivakfajro, dum li tordis la vizaĝon kaj ŝovegis malantaŭen sian kapon nuken, ĉar la mordanta fumo de la fajro kvazaŭ pikis lin en la okulojn. Kiam li nun havis ĉion necesan laŭ sia deziro staranta je la fajro kaj tiam pacience devis atenti pri tio, ĝis ĝi estos boligita, li rulumis al si cigaredon kun maiza folio, ekbruligis ĝin kaj diris: „Ke mi povus kapti nur ok jarojn, mi ne supozas. La okazaĵeto estis tro tikla. Dek jaroj almenaŭ atendus min. Jen viro kuŝas du metrojn sub la tero, kaj, kiel ili ĉiuj diras, li estis en la kulmino de sia vivo, kaj mi transmondigis lin, kaj ion tian oni ĉiam notas malakcepte al oni. Tia afero okazas subite al vi, kaj vi eĉ ne scias kiel. Per unu fojo li kuŝas tie kaj ne plu grumblas, kaj jen ne helpas plu balzamo kaj neniu kamomila teo kaj oni devas rapide foriĝi.“

„Sed, *hombre*, tiel oni ja ne rakontas pri tia afero“, diris Andreo. „Parolu rekte pri tio, laŭ bona kristana maniero, kaj ne salivumu malsupren iun kaĉon kiel olda pagano, pri kiu oni ne scias, ĉu ĝi estas vomita aŭ poste eligita. Aŭ tenu fermita vian buŝon entute, kaj digestu la intestojn.“

Santiago kompreneble ne kapablis fermteni la buŝaĉon, kiel neniu povas fermteni ĝin, se io gorĝopremas lin interne. Li devas paroli pri tio, pro lia stomako, kaj eĉ, se kostus la rompitan nukon al li. Ne la cerboj kaj ne la manoj, sed la buŝoj alportas plej ofte malbonon al la homoj. Vi ja konas mian amikinon, Sinforosa, tiun, kiun mi havis en Cintalapa, ĉu?“ demandis Santiago.

„Certe“, respondis Andreo, „ĉiu infano sciis, ke ŝi estis via edzino. Ĉu ŝi havis infanon de vi, ĉu?“

„Unu infanon, ĉu? Tri infanojn ŝi havas. Du mortis aŭ la patrino, mi celas la patrinon de Sinforosa, la olda fisorĉistino, venenis ĝin. Ŝi ja neniam ŝatis min, kaj centfoje la aĉa oldulino diris al mi vizaĝen, ke ŝi volus min vidi dek paŝojn sub la tero kaj miajn idojn aldone. Nur tiukaze ŝi estus feliĉa. Sed la knabino ŝatis min, kaj mi la knabinon, kaj la infanoj naskiĝis, mi eĉ nur foje devis skui

la maldekstran koksan oston. Tio estas ja tute normala. Du monatojn aŭ tri monatojn sur la diodamnita *camino*, sur la vojo, kun la ĉaroj, oni laboraĉas tiom, ke oni fariĝas verda kaj blua pro tio, kaj tiam oni revenas ĉeokaze kun la karavano tra Cintalapa, kaj haltas, ripozas du tagojn, kaj tiukaze oni ĉiam estas ĉe la knabino. *Bueno*, do bone. Kaj kiam mi tiam ree estis du monatojn for dum marŝo, jen okazis *fiesta,* festo, granda jarfoira spektaklo en Cintalapa. Iu karnavalo aŭ enoficigo de nova prezidanto de la municipo aŭ io tia. Multe da dancado. Kaj biero kaj tekilo, kaj muskatvino, aniza likvoro. Kompreneble ankaŭ Sinforosa estis tie. Ŝi havas ja nur dudek jarojn kaj belas kaj dancas volonte. Kaj se ŝi ĉeokaze ĉe tio havas sian privatan plezuron, tiukaze tio apartenas al tio. Kaj tion mi ja eĉ pardonas al ŝi. Botelon oni ja devas de tempo al tempo ŝtopi per korko, alikaze ĝi eĉ mallernos esti botelo kaj fariĝos ŝima.

Sed tio, kio min tiam tamen ĉagrenis, kiam mi eksciis tion, estis, ke tiu pusotubera hundo, nomata komercisto, havanta *tienda*-on, fatrasan butikon, forlogis mian knabinon kaj edzinon al sia domo, kiam ŝi estis iomete gaja kaj ebria de la muskatvino. Lia edzino ne estis hejme kaj tion Sinforosa ne sciis. Alikaze ŝi ne irus tien. Kiam ili

tiam estis dum certa tempo en la domo, tiu ido de fava hundino, pugnobatis ŝian kapon, ĵetis ĝin kun bruo sur la liton kaj perforte ŝtopis la korkon en ŝin.

La knabino en Cintalapa havas mem butiketon kun tvirno, kudrilojn, cigaredojn, rubandojn, kandelojn mem gisitajn de ŝi, bananojn, limonadon kaj bombonojn, kaj ĉiujn aliajn aĵojn, kiujn bezonas la homoj ĉiutage. Estis butiketo, kiun mi aĉetis kaj aranĝis de antaŭpago, kaj por tio, ke ŝi havu ion por fari kaj por ke ŝi vivtenu sin de ĝi, dum mi marŝas kun karavano. Sed tiam ŝi vere komencis aferon kun la komercisto. Jen 'mia kara dolĉa limaketo' kaj jen 'mia kara musokatineto' kaj krome ĉiuvespere reciproka sursaltado, ĉie, kie ili havis loketon por faligi sin. Lia edzino kompreneble sciis nenion, kaj amason da infanoj li havis mem en la propra domo. Se mi nur pensas pri tio, mi povus ebriigi min, damne. Pri tio oni povas fariĝi tute freneza. Kaj krome ŝi ĉiam diris al mi, ke ŝi ŝatas nur unu viron, kaj tiu estas mi. Kaj tiel, nu, vi ja povas imagi tion, kiel tio deruliĝas ĉe voluptaj inoj. Eterne tiklas ilin. Kaj ili ne povas havi sufiĉe da ĝi kaj parolas tie sukere kaj ĉi tie miele, kaj tie ili faras sapoŝaŭmon kaj ĉi tie bone kirlitan ovoblankon, kaj oni neniam scias, kio tiukaze esence estas ĝusta kaj kio vera

kaj kio mensogita, kaj kiel tio iras antaŭe kaj malantaŭe.

Bueno. Jen mi iutage alvenas kun mia trupo, mi veturis tiam kun la karavano de Pedro. Vi jam estis for, Andreĉjo. Do, mi alvenas kaj ĉio estas bona kaj agrable varma, kaj ĝi estas freŝe suka kiel ĉiam. Je la unua tago mi verŝajne estis tro trudiĝema, kaj tial nenio frapis mian atenton. Sed je la dua vespero, diversaj aferoj ŝajnis al mi tamen iom nekutimaj. Ĝi regis subite unu aŭ du trukojn, kiujn mi ne konis, ili ne estis tute neplezurigaj, sed post certa tempo mi tiam pensis, ĉe la diablo, tion ŝi lernis ie. Kompreneble de alia. Sed tiam mi tuj pensis, ke tion ankaŭ alia ino povus rakonti al ŝi. Tiuj tian ja inter si priparolas. Kaj nun ŝi volis foje provi tion kun mi.

Je la sekva tago estis dimanĉo. Mi tiam ja devus ekveturi kun la ĉaroj. Sed mi parolis kun Pedro, kaj mi bonŝanĉis per tio, ke ni renkontis kunaĉetiston de maizo, kaj, ke li ofertis frajton, sed nur por la sekva tago. Kaj tiel ni povis restadi ankoraŭ dum la dimanĉo. Mi iris en la bilardan halon, kie estis la aliaj viroj, ankaŭ tiuj el la vilaĝo. Unu el ili estis ege ebria, li venis renkonte al mi, rikanis kaj kriis:'He, *amiguito* Santiago, kiel plaĉas al vi via korko-bofrato?' 'Fermu la buŝon', vokis kelkaj viroj, kaj unu el ili

diris: 'Tiu ne scias, kion li diras, li estas ja de hieraŭ tiom ebria, ke li superfluas kiel barelo.'

'He, vi, kion vi celas per tio?' mi demandis la viron kaj tiris lin je la kolumo de la ĉemizo al mi tiel, ke li fariĝis ruĝa en la vizaĝo. Li kvazaŭ kvikis: 'Demandu vian *mujer*, tiu povas rakonti tion pli bone ol mi.'

Mi puŝis lin trans la bilardan tablon kaj kuris al ŝi: 'Nun foje fine flutu tion al mi', tuj mi diris ŝin. 'Mi ja scias, pri kio temas. Vi do rakontu al mi nun ankoraŭ la ceteran.' Mi sciis nenion. Sed tio ne estis konata al ŝi. En tuta Cintalapa, la edzino de la komercisto, estis la ununura persono, kiu sciis nenion, kaj mi estis ĝis tiam la dua persono. Ĉar Sinforosa supozis, ke la viroj eble jam ĉion rakontis al mi, kaj ĉar ŝi sciis ankaŭ, ke kutime tiaj aferoj estas tre troigataj, se aliaj rakontas ilin por kaŭzi skandalon, tial ŝi nun babilis ĉion, por malfortigi la troigojn. Ŝi diris al mi, ke ŝi tute ne kulpas tion, ke la viro ne nur logis ŝin al seksumado, sed ke antaŭe li ankaŭ batis ŝin sur la kapon kaj tiam ŝin seksperfortis, kiam ŝi estis senkonscia kaj eĉ ne povis krii.Tio koleregis min, tion vi povas imagi. Ŝi diris tiam ankaŭ, ke ŝi kompreneble plu estis kun li, ĉar li ĵuris ĉe Sankta

Virgulino, ke li fridasange mortpikos ŝin, se ŝi lin ne akceptus. Kaj tiam ŝi diris: 'Santiago, mi vida, mi alma, mia animo kaj mia vivo, vi ja scias, ke vi estas ĉio por mi.'

Mi ekis, kaj tuj mi estis ĉe la komercisto. 'He, vi, *cabrón*, bastardo malica, kion vi faris kun mia edzino?' 'Mi', li diris rikane, 'kion mi faris kun via edzino? Ŝi ja tenis ŝian sinon al mi, aŭ ĉu ŝi ne faris tion? Kaj nun eliĝu, vagabondo, ebriema stratsentaŭgulo, aŭ mi alfajfos la policon kaj enkarcerigos vin, ĉu vi komprenas tion, rabisto kaj bandito! Elen, kaj lasu min en paco. Se ŝi volas putinaĉi, kial tio koncernu vin? Do, elen! Aŭ mi plenigos vian ventron per kelkaj kugloj kvardekkvinkalibraj.' Li etendis manon al la revolvero, kiun li portis malantaŭe en la zono. Sed tion mi ne riskis. Antaŭ mi troviĝis botelo kun tekilo, pli ol duonplena. Mi kaptis la botelon kaj draŝis ĝin sur lian kapon. Li ŝiradis je sia revolvero, sed la revolvero ŝajne firmkroĉiĝis je la butono de la malantaŭa pantalonpoŝo. Li ne povis liberigi ĝin. Mi puŝis lin kontraŭ vandon kaj ree marteladis lin per la botelo. Kiam mi tiam foje komencis tion, mi koleriĝis eĉ pli, kaj batadis tiom longe ĝis la botelo disrompiĝs sur lia kapo. Tiam mi kaptis tabulon, kiu estis ĉemane de mi, kaj mi draŝadis lin plu. Mi volis batadi lin tiom, ke li eĉ dum semajnoj ne plu

pensu pri tio fikumi kun Sinferosa laŭ sia plaĉo. Li sangis sufiĉe forte, kaj mi pensis, ke li havas jam sufiĉe. Kaj tiel mi survojiĝis. Ekstere, tuj apud la magazeno staris du viroj, kiuj estis kun mi en la bilarda halo. 'Por certa tempo la fekfikulo ja lasos en paco mian *mujer,* tiu havas nun sian dorson plena de batoj, kaj tion vi povos rakonti al li, se li ne lasos en paco mian *muchacha*, mi tanos lian felon je dua fojo, se mi revenos.'

Mi iris al mia edzino kaj sidiĝis por manĝi. Mi diris al ŝi, ke ŝi nun certe havos pacon pro li dum certa tempo. 'Kion vi do faris kun li, he?' ŝi demandis timigite. 'Mi draŝis al li kelkajn fojojn sur la melonkapon, por repagi tion, kion li batis sur vian kranion.' Ŝi komencis plori kaj plorsingulti. 'La kompatinda kompatindulo, kaj li ja tute nenion faris, mi kulpas ĉion tion. Vi estas ja la vera diablo, kaj mi efektive ne plu volas havi ion komunan kun vi.' Kaj ŝi sidiĝis kaj ploregis kiel gurdo. Do, tiel nun aspektas la kaĉo, mi diris al mi, nun havas mi la tutan kulpon, kaj ĉiuj aliaj estas puraj senkulpaj anĝeloj. Mi sidis tie kaj havis la senton, ke mi estas terure stulta.

Kiam mi nun ĝuste pripensis ĉion tion, kiel ĉio tio estas interplektita, jen venas Pedro, la karavanestro kaj diras:

'Santiago, he, kuru tiel rapide kiel vi povas kuri. La polico serĉas vin, ili pensas, ke vi estas en la bilarda halo, sed ili tuj estos ĉi tie. *Don* Manuelo, tiu, al kiu vi draŝis suke sur la kapon, estas morta.' Kiel freneziĝinta nigrulino tiam kriis Sinforosa: 'Morta, murdisto vi, vi eĉ mortbatis lin, murdisto vi estas!' kaj ŝi saltis al la pordo, kuris mezen de la vojo, starigis sin tie kaj kriis: *'Policía, aquí, acá,* ĉi tie estas la asesino, la murdisto, jen li.'

Mi kaptis la ĉapelon kaj kuris kiel sago el la domo. 'Al la ĉaroj', diris Pedro, 'mi iros alian vojon, por ke ne leviĝu suspekto. Ni renkontiĝos tiam ĉe la ĉaroj. Pri tio ili ne pensas dum la sekvaj dek minutoj.' Mi kuris malantaŭ la domoj de la placo, laŭ ili, kie ni havis nian kampadejon antaŭ la urbo. 'Rapide, rapide, mi devas foriĝi, la polico persekutas min', mi diris haste al la viroj, kiuj tie estis kaj riparis la ĉarojn. Mi kuris al mia ĉaro, rapide plenigis mian pakaĵon, kaj kiam mi volis foriĝi kun ĝi, venis Pedro, donis al mi kvar pesojn kaj diris: 'Jen, iom da mono, kaj nun ek do! Ni ne diros, ke vi estis ĉi tie. Tiam ili ankoraŭ traserĉos du tagojn la urbon. *Muy buena suerte*, multe da feliĉo. Mi iros al via *muchacha* kaj kroĉigos al ŝi kelkajn sukajn vangofrapojn, danku al viaj sanktuloj, ke vi sukcesis liberiĝi de ŝi. Kaj nun eksaltu, kaj

ne lasu kapti vin.' Nun vi povas ekkompreni, kial Pedro estas bona *compañero*, bona kamarado.

Mi nun rapidis tra la kampoj kaj la arbustoj kaj tiam en la vepron, kaj mi evitis ĉiun lokon, kie troviĝas polico. Ĉar mi scias, ke dum la *Candelaria*-festo kolektiĝas la karavanoj por la monterioj, mi supozis, ke mi trovos la trupon ie tie. Kaj ĉi tie mi estas. En la monterio serĉos min neniu. Ili eĉ ne pensas pri tio. Kaj post du, tri aŭ kvar jaroj ĉio tio jam estos kirlita ŝaŭmo de hieraŭ. La vidvino de *don* Manuel estos tiam eble sufiĉe gaja, ŝi heredis ĉion kaj povas elserĉi novan knabon al si, kiu tiklos ŝin sub la akseloj. Kaj se ŝi ne volas tion kaj restas needziniĝinta, plaĉas al ŝi eble eĉ multe pli bone. Povas esti, ke ŝi dankas al mi interne por la helpo, kiun mi donis al ŝi, kaj kiu ne kostis ion al ŝi, ĉiukaze ne pli ol naztukon plenan de ploroj, kiuj eble eĉ ne estis aŭtentikaj. Se mi transvivos la monterion, kaj kial ne? La respubliko estas ja tiom longa kaj tiom vasta, ke troviĝos loko, kie mi povos setli kaj neniu min molestos. Kaj nun finfine la faboj fariĝis molaj. Kaj mi pensis, ke mi devas stari ĉi tie je la fajro dum eterneco ĝis oni povos manĝi ilin sen tio, ke knalos inter la dentoj.“

Rimarkoj

adios = Adiaŭ

camino = vojo

enganche = kontrakto kun varbitoj

enganchador

kikero = normala speco de pizo

m'ijo = mia filo

hombre = homo, viro

mujer = edzino

penitenciaria = pundomo

Je la dua marŝtago la karavano atingis la torenton Jatate. Tie ne sufiĉis, ke oni malŝarĝas la bestojn kaj tiam portas la indiĝenoj la pakaĵojn surkape ĝis la alia bordo. La torento estas tre profunda kaj larĝa.

Oni malŝarĝis ĉiujn bestojn. Tiam oni kondukis ilin je longaj lazoj. En kanuon troviĝantan ĉe la bordo, engrimpis pluraj viroj. On depuŝis la kanuon de la bordo kaj viroj en la kanuo tiris je la longaj lazoj, dume ĉe la forlasita bordo la mulpelistoj kun terura hurlado kaj kun vipobatoj pelis la bestojn en la akvon, kaj tiom grandan distancon, ĝis la bestoj perdis la teron sub la piedoj kaj eknaĝis. La tirado je la lazoj ekde la kanuo helpis la bestojn ĉe la naĝado. Ĉiufoje nur tri aŭ kvar bestoj estis tiel pelataj. Kelkaj el la bestoj estis tiom bonvolemaj, ke ili iris en la akvon sen ŝnuregoj kaj trans la torenton naĝis al la bestoj , kiuj jam atendis ĉe la transa bordo.

Kiam jam ĉiuj estis transe, oni kargis pakaĵojn en la kanuoj, kaj ĉiufoje tiom da ili, kiom la kanuo kapablis porti. La torento estis sovaĝa, sed la indiĝenaj kanukondukiistoj estis tre lertaj viroj, kiuj kapablis stiri la

kanuon, kiu estis nenio alia krom elkavigita arbotrunko, tiel lerte tra la akvoj de la torento, ke ĝi renversiĝis eĉ ne unufoje. Kiam ĉiuj ŝarĝoj estis transportitaj al la alia bordo, la viroj transigis sin mem sur la alian bordon.

Estis nur unu kanuo por transigi tiun grandan karavanon de unu bordo al la alia. Tial tio daŭris preskaŭ kvin horojn. Kaj kiam la lasta viro alvenis sur la alia bordo, fariĝis jam nokto.

Oni starigis la kampadejon sur la altaĵo de la bordo, de kie oni jam povis vidi la grandan bienon *La Condesa,* nur duonon de kilometro malproksime.

Don Gabriel kaj don Ramon kun du el la komercistoj strebantaj al pli bona tranoktejo ol la kutima kampadejo povus oferti ĝin, rajdis al la bieno, por pasigi tie la nokton, kiel decas por civilizitaj homoj. Estis la antaŭlasta ripozejo, kie ili povos dormi sub tegmento. La tegmento, kiun ili trovis ĉe la sekva ripozejo, estis jam nur farita el interplektitaj palmfolioj kaj la muroj estis nenio alia krom krude prihakitaj fostoj, kiuj unu apud alia estis kunigitaj per basto kaj lianoj. Tie sur tiu granda kaj majesta bieno estis la lastaj tabloj kaj seĝoj, kiuj estis

renkontataj en la marŝo, la lastaj glasoj kaj porcelantasoj, la lasta flegata florĝardeno, la lastaj plankoj pavumitaj per brikoj, la lasta lito kaj la lasta civilizita kuirejo.

Ĉion ĉi ambaŭ agentoj kaj tiuj inter la komercistoj, kiuj konsideris sin kiel apartenantoj de la *caballeros,*ne volis preterpasi senatente. Pri la karavano ili tie ne devis zorgi sin. Ili eĉ ne devus postlasi la *capataces* kiel gardistojn, por ke ne fuĝu ulo. Trans tiun riveron, kiu tiam disigis la karavanon de la regionoj, kie estis urboj kaj vilaĝoj, kaj kie oni legas librojn, ne povis fuĝi viro sen endanĝerigi sian vivon per dronado. La kanuo estis firmligita al peza ĉeno. Kaj se ĝi ne estus firme ligita, la viroj ne povus porti la kanuon eĉ nur kvin metrojn laŭ distanco. Sen tio, ke ĝi renversiĝus. Krome estis profunda nokto kaj ĉiuj viroj estis tiom lacaj, ke ili ĝojis, ke ili ne devas eskapi.

En la mastra domo ĉiuj estis en bona humoro. Komercisto aĉetis du mulojn de la bienulo, ĉar li ekakceptis, ke la muloj, kiujn li havis ĉe si, estis tro ŝarĝitaj kaj verŝajne renversiĝus, se oni ne plifaciligus la ŝarĝojn. Ĝis tie la marŝo estis promeno, tiel kiel konfirmis tion ankaŭ la bienulo kaj liaj filoj kaj ties *mayordomo*. Sed kompreneble, por iu, kiu ne scias, kion signifas la

vorto *camino* aŭ vojo en Centrala Ameriko laŭ ties vera senco, la parto de la vojo, kiu estis marŝata en tiuj du tagoj, estis rigardata kiel la plej aĉa el ĉiuj vojoj, kiun homo kiel ajn povas elpensi al si, se li volas imagi la vorton laŭ ties plena senco, do: 'La plej aĉa, plej malinda kaj plej lamentinda vojo, kiu povus ekzisti ie surtere'. Sed la homoj de la bieno, kiuj konis tie ĉiujn vojojn, en ĉiu direkto, diris, ke ili iras la vojon de tie ĝis Hucustin dimanĉe posttagmeze kun dudek-jara olda mulo, kiu lamiras, kaj ĉe tio eĉ dormadas, ĉar tiu vojo estas ja asfaltita aŭtomobilstrato, kompare al tio, kio postmorgaŭ por vi, sinjoroj, iel tiel komenciĝos. Sed nur ne perdu la kuraĝon, ankaŭ jam aliaj postrestis sur tiu distanco.

En tiu ĉi nokto tamen viro volis fuĝi. Ne nur la *caballeros* estis elirintaj al la bieno, sed pli poste ankaŭ la *capataces* kaj la etkomeristoj. Sed dum la *caballeros* iris en la mastran domon, la *capataces* iris en la pueblon de la peonoj, kie oni pro iu festo faris dancmuzikon kaj la *capataces* esperis, ke en la tumulto de la festo, speciale en la progresinta nokto ankaŭ por ili io postrestos en la formo de knabino, kiu eraris pri la vojo kaj estis plena de bona volo. Sed okazis nenio tia kaj ili ĉirkaŭ noktomezo devis reiri al la kampadejo tiel negajigite, kiel ili foriris.

La foreston de ĉia kontrolo uzis unu el la viroj, kiu tie vidis sian lastan okazon povi fuĝi kaj hejmiri en sian vilaĝon. Li ŝtelforiris de la fajro, kunŝnurigis pakaĵeton, kaŝis sian grandan pakaĵon inter arbustoj kaj tiam marŝis al la torento.

Li estis bona naĝisto kaj ne timis la akvon, ankaŭ ne la sovaĝan torenton. Li devis peni, sed li alvenis je la alia bordo. Li grimpis sur la deklivo de la bordo supren kaj migris en la nokton. Li atingis grandan paŝtejon, kaj jen li rimarkis, ke du bestoj kliniĝintaj kaj ŝtelirantaj proksimiĝis al li. Li ne povis klare ekkoni ilin. Sed kiam ili pli proksimiĝis, ĉiam ŝtelirante kaj heziteme, li opiniis, ke estas hundoj. Sed tiam li povis percepti antaŭ la trembrila ĉielo, ke estis pumoj, kiuj venis el la densejo de El Paraiso por rasti la paŝtejojn, aŭ eble alogite de bestoviando, kiun kunportis multaj viroj el la karavano, kiun ili ĉasadis dum la hela tago. Sed ankaŭ povis esti, ke la pumoj volis nur troti al la torento por trinki.

La ulo haltis kaj kliniĝis. Li esperis, ke la pumoj senzorgeme iros plu kaj tute ne atentos lin. Sed, se li serioze atendis tion, li do ne konis pumojn en libero. Ili jam antaŭ kelkaj minutoj ekflaris lin, kiam li ekvidis ilin.

Ĉu ili estis tre malsataj kaj efektive pensis pri tio satiĝi je li, aŭ ĉu ili ne rigardis lin sufiĉe potenca por bari al ili la vojon al la akvo, aŭ ĉu ili nur intencis iom flirti kun li, ĉion tion la viro ne sciis. Sed kion li certe sciis, ĉar li povis vidi tion, estis, ke la pumoj ĝuste proksimiĝis al tiu loko, kie li kliniĝis. Li ne riskis esplori, ĉu estis nur iluzio, kaŭzita per la fakto, ke li povis vidi la pumojn kaj ties vojon nur neprecize konturitajn kontraŭ la nokta kaj klara horizonto.

Li ne atendis, sed kliniĝinte hastis reen al la torento. Li aŭdis parte sufokatan kraĉospiran tusadon, kaj nun li sciis tute certe, ke temas pri pumoj. Kiam li turniĝis, li konstatis terurigite, ke la pumoj el sia trankvila trotado transiris en galopon, kaj ĝuste en tiu direkto kaj tien, kie li troviĝis.

Tremo en ekstremo! Sed nun li komencis kuri. Ĉar la vojo tiam estis jam tute proksima al la torento, do sabla kaj malferma, li povis same tiel bone kuri kiel la pumoj. Sed tiam li stumblis pro radiko. Sed la agento bonŝancis, li ne perdis la junulon, ĉar la viro falis tiel bonŝance, ke li estis ĝuste ĉe la kruta deklivo, kiam li stumblis. Li ne kapablis rektiĝi, sed ruliĝis pli rapide ol barelo malsupren de la

deklivo kaj tuj kelkajn metrojn en la torenton. Kiam li havis grundon sub la piedoj, li turniĝis, viŝis la akvon el la hararo kaj la vizaĝo kaj rerigardis al la bordo. Tie estis hele kiel dum krepusko, kaj li povis nun vidi tute precize, ke estis efektive du pumoj, kiuj persekutis lin. Ili staris atendante tri paŝojn for de la bordo, svingadis la vostojn kaj grincigis grumble la dentojn. Ili evidente ne sciis kion fari. En la akvo ili ne ĉasas predon, kaj ili atendis, ke la viro revenos.

Sed la viro preferis la monterion kaj forgesis eĉ la hejmsopiron pri la vilaĝo. Kiam li vidis, kiel la pumoj kliniĝis kaj ekŝteliris ĝis la akvo, li ne atendis pli longe por ekscii, ĉu pumoj efektive estas akvotimaj. Li saltis antaŭen en la profundan akvon kaj komencis naĝi per sia tuta forto. Reen al la bordo kaj al la kampadejo. Li rakontis al siaj kamaradoj, ke la agentoj sur la alia flanko de la torento alogis pumojn per viando, por tie je lasta okazo malhelpi ĉiun eblan dizerton, kaj ke tial ĉiuj agentoj kaj eĉ la *capataces* kaj pelistoj iris transen al la bieno. Sian malgrandan vojaĝpakaĵeton li ne perdis, li firmligis ĝin je la zono; ĝi estis nun tute malsekigita.

Neniu el la viroj perfidis la fuĝprovon al la *capataces*. Tiel

la *muchacho* ne ricevis ducent kvindek batojn, kiujn sekvigus la provo.

Kiam la viro kaŭris je la bivakfajro,varmigis sin kaj sekigis kaj jam rakontis sian travivaĵon, diris Paŭlino, indiĝeno, kiu laboris en Jovel ĉe ĉeval- kaj modokomercisto, kaj kiu tial tie inter tiuj viroj konantaj nur sian bienon kaj la plej proksimajn vilaĝojn, estis rigardata kiel mondosaĝulo: 'Mi estis nun jam dufoje en monterio. Ĉiam la harplektaĵoj kaj jupoj kulpis tion, ke mi denove kaj denove devis reiri tien. Sed, se vi, knabeto, pensas, ke estas tiel facile eskapi kiel museto, tiukaze vi estas supre kaj malsupre malĝuste ŝarĝata. Tie, kien la ladinoj volas meti kaj firmteni vin, indiĝeno ne tiel facile liberigas sin. En la monterio, en profunda ĝangalo, oni lasas vin eĉ dum tagoj tute sola. Ili scias, kial. La ĝangalo, kiun vi devas trakuri, estas pli bona gardisto ol ĉiuj *capataces* kune. La pumoj kaj jaguaroj estas multe pli bonaj policistoj ol tiuj, kiuj havas revolveron aŭ karabenon. Pli bone vi forbaraktos viajn du aŭ tri aŭ kvar jarojn en la monterio sen lamenti kaj sen grati kaj mordi. Tiukaze vi havos perspektivon, perspektiveton, reveni hejmen. Sed lasu en paco la jupojn kaj harplektaĵojn, kiujn vi ĉeokaze trovos survoje hejmen. Harplektaĵoj

estas kaj ĝuo kaj malĝuo, aŭ, se mi do rajtas ion diri al vi, ĉar vi apenaŭ eloviĝis, kiom da jaroj vi fakte havas? Do dekses jarojn. Jes ja, fidu al maljuna kaj sperta stalono: Se vi ion vidas, kio havas malsupre nigran museton, jen tie estas ĝuo kaj malĝuo; kaj por ne fali en la kaptilon de la museto, ĝuu rapide kaj ne atendu la mornan finon. Por mi estas tro malfrue, kaj la plej terura estas, ke mi havas la sperton kaj konas voluptojn kaj festfoirojn, kaj tamen, kvankam mi scias ĉion tion kaj havas ĉiuj tiujn spertojn, oni ne plu povas helpi al mi. Kaj se mi vidas ion vagadi kaj scias, ke tie pli malsupre ie estas malgranda nigra katineto kaj embuskas pro sukero, tiukaze mi estas perdita kaj donas al la katino blankan mielon, tiom, kiom ĝi volas havi, kaj tiom, kiom ĝi bezonas por satiĝi. Tio estas ja vere plezura. Sed, se mi tiam vekiĝas kaj ĉirkaŭrigardas, jen mi vidas, ke mi jam estas denove sur la marŝo, sur la marŝo al la monterio. Mi ne povas fari ion kontraŭ tio. Ankaŭ mi jam provis tion per edziĝo. Sed la blanka mielo ne volis atendi, ĝi volis nutri katineton. Kaj kiam ĉio estis preta por la nupto, mi jam denove marŝas al monterio, ĉar mi erare kaj en la tenebro havis la malĝustan sub mi kaj ekestis granda tumulto kaj mi devis kuri kiel formiko pro fulmotondro. Sed unu bonan aferon

mi almenaŭ lernis: Eskapi ne indas la penon. Nur stultulo, kiu ne havas sperton, provas tion. Estas ja tiom da aliaj plezuroj en la monterio, kiujn oni ne pretervidu. Ekzemple esti sufiĉe mirinde kolera pri skurĝisto, se vi foje renkontas lin sola, afable rideti al li, fari ĝustan finkalkulon kun li kaj kaŝi lin poste tiel bone, ke eĉ la hundoj ne povus trovi lin. Tio estas preskaŭ same tiel gajiga kiel danco en la nokto de la Festo de Sanktulo Juan.“

Rimarko
mayordomo = intendanto, domkortega mastro, administristo, domisto

Ĉapitro 06

01

En la lasta setlejo antaŭ la enmarŝo en la ĝangalon, la karavano kampadis trankvile dum du tagoj. La agentoj kelkajn tagojn antaŭe sendis rajdan heroldon al tiu setlejo por anonci la alvenon de tia granda karavano. La malmultaj inoj loĝantaj en tiu setlejo, ĉiuj el la indiĝena raso, kun escepto de la edzino de la *mayordomo,* kiu estis mestizo, laboris tage kaj nokte por baki la gigantajn kvantojn de *totopostles,* kiun la karavano bezonos por la longa marŝo tra la ĝangalo. *Totopostle* estas granda tortiljo, maizoflano el muelitaj kaj kaĉigitaj maizograjnoj kun diametro da tridek kvin centimetroj kaj du milimetrojn alta. Tiuj flanoj estas mallonge rostataj laŭ la maniero de la kutimaj indiĝenaj tortiljoj, sur malferma bivakfajro sur lada bakpleto aŭ bakitaj argilaj platoj. Tuj poste, kiam ili fariĝis malvarmaj, oni rostas ilin duan fojon, sed ĉifoje ĝis ili malmoliĝas. La kutima tortiljo je la dua tago de marŝo ekŝimas sub la influo de la tropika varmego kaj la malseko de la ĝangalo, ĝi fariĝas je la tria tago ne plu manĝebla kaj povas, se tamen manĝita, estigi

gravajn intestajn malsaniĝojn. Malsaniĝi ĝangale je la stomako aŭ intesto, por almenaŭ mencii tion, estas ĉiukaze malagrabla, ĉar estas afero, kiun oni povas priskribi sufiĉe rajtigite kiel senesperan kazon. Sed *totopostle* male al tio ne ŝimas. Ili nur diseriĝas, tagon post tagon pli, kaj en la lastaj tagoj oni havas plu nur multajn eretojn, kiujn oni, manke de pli bonaj nutraĵoj, tamen ĝuas ĉe ĉiu manĝo kun la sama volupto, kiel oni plezure ŝtopas buŝen en Eŭropo varmajn bulkojn kaj en Usono biskvitojn. Ĉiu viro en la karavano ricevis ducent *totopostles* por la marŝo. Sed ducent pecoj el tiuj rostitaj flanoj estas ridinda kvanto je nutraĵoj por streĉe marŝantaj viroj, kiuj krom tiuj *totopostles* havas nur nigrajn fabojn kaj ruĝajn kaj verdajn kapsikojn. Oni ne povas nutri indiĝenajn mahagonlaboristojn tiel lukse kiel la karbistojn kaj hejtistojn sur mortula ŝipo; ĉar tiukaze la mahagonligno fariĝus tro multekosta kaj la misteroj je la verdaj tabloj fariĝus eĉ pli nekompreneblaj ol ili jam estas sen tio.

„Dos diás de descanso“, du tagoj de ripozo, la agentoj nomis la du ripoztagojn de la marŝintoj. Sed estas ĉie tiel, ke tiam, se estas komandataj ripoztagoj al soldatoj aŭ laboristoj, estas kutime la plej duraj labortagoj. Je la

ripoztagoj la soldatoj lavas siajn subvestojn, ili lubrikas kaj prîŝmiras siajn botelojn per graso, poluras siajn fusilojn ene kaj ekstere, gratas la nazmukon el la vestoj de siaj subofociroj kaj malfermpikas la pustulojn de siaj piedoj; en la interaj minutoj okazas punekzercado, enviciĝo kaj antaŭmontrado de poluritaj fusilfustoj kaj de elskrapitaj ŝraŭbokanelojn je la kanonoj, flikado de putriĝintaj pantalonoj kaj postnombrado de la najloj en la botoplandumoj.

Tie okazis la sama. Oni alvokis la virojn, por ke ili elgrajnigu maizon, draŝu fabojn, portu maizon kaj fabojn en sakoj al pesiloj kaj poste reen al la transportbestoj. Oni povus porti la pesilon al la transportbestoj kaj tiel farus el duoblaj vojoj ununuran. Sed pri plifaciligo oni pensis tie tiom malmulte kiom ĉe la soldatoj, al kiuj oni devas komplikigi eĉ la naturan kuradon per tio, ke oni kvazaŭ dresas ilin kiel aŭtomatojn stamfi per rigidaj gamboj. Homoj, kiuj ne estas ĉiam okupataj faras revolucion. Poste la viroj devis rasti kafon pro malbonaj kafograjnoj, devis rosti kaj mueligi ĝin. Muelilojn ili ne havis.Oni disfrotis la kafon sur ŝtonoj, sur metates. Aliaj helpis ĉe la kuracado de la ŝarĝbestoj kaj ĉe la surnajlado de la hufoj, se bestoj perdis tian feran hufon. Dekopon el ili oni

sendis en la vepron por dehaki lignon. Aldonaj viroj flikis kaj ŝtopis la portoselojn de la bestoj. Plua dekopo devis konstrui novan latbarilon por la mayordomo, ĉar tiu asertis, ke eskapis kelkaj el la muloj en la karavano kaj detruis lian latbarilon. Kaj ĉar la viroj foje faris tion ili ankaŭ tuj duobligis la longon de la barilo kaj pli firme konstruis ĝin ol ĝi estis antaŭe por tiel malhelpi, ke eskapos la muloj eble ankoraŭfoje en la nokto. La viroj devis alporti el la ĝangalo ĉion tion, kion ili bezonis por la nova latbarilo, do la lignon, la baston kaj lianojn. Ili havis nek ĉarpentistajn najloj nek segilojn en tiu setlejo.

Kiam ambaŭ ripozotagoj laste fine pasis, la viroj eĉ ne havis la tempon lavi siajn ŝvitsaturitajn ĉemizojn. Tie estus por tia laboro la lasta okazo. En la monterioj oni laboras, kaj nenion alian faras tie krom labori. Oni ne povas disipi tempon por lavi ĉemizojn. Tiel estas neniel mirige, ke en la monterioj ĉemizo alvenis al la fino de sia surtera kariero, eĉ sen tio, ke oni lavis ĝin iam. Se viro tion tamen iam provis, tiukaze estis certe, ke la kontraktisto aŭ ties *ayudante, ties* helpisto, alvenis kaj diris: „He, vi, vi estas ĉi tie por haki mahagonlignon, por tio oni pagas vin, sed ne tial, ke vi lavu viajn kotigitajn ĉemizojn. Mi notos vin por kvindek *azotes*, por kvindek

sanigaj batoj ĉe la sekva festo.“ Tial formiĝis la kutimo, ke la viroj en la monterio nokte forŝteliĝis de la kampadejo, iris al rivero kaj lavis siajn ĉemizojn, se ili sciis, ke la kontrolistoj ne povas surprizi ilin. Dum kelkaj nacioj de la indiĝenoj ŝajne nek sentas nek konas la meksikan koton, estas aliaj, kiuj povas veki la envion aŭ la venĝemon de nederlanda kamparanino. Viroj de tiuj nacioj trovis tion pli eltenebla havi kvindek batojn sur sia dorso ol kotan ĉemizon.

Rimarkoj

azotes = tradraŝo per skurĝo ktp...
metate = estas frotmuelilo por maizo, uzita kaj uzata ekde de la aztekoj en Meza Ameriko, konsistanta el iom kurbigita ŝtono simila al benketo aŭ alia frotŝtono kaj cilindra ŝtona pistilo. Kutime la frotŝtono kaj la pistilo estas el lafoŝtono. Ankoraŭ nun ĝi ĉeokaze estas uzata de indiĝenoj por froti maizon
totopostle = granda tortiljo (rostita maizoflano el muelitaj kaj kaĉigitaj maizograjnoj, maizaj kukoj, maizaj panetoj) kun diametro de 35 centimetroj kaj du milimetrojn alta.

02

Je la unua tago en la ĝangalo la karavano atingis ankoraŭ antaŭ la duono de la tagmarŝo lagon. Negrandan, sed belan pro ties kvieto. La agentoj prenis siajn fajfilojn kaj fajfis la halton por ripozo. La viroj sidiĝis kaj deĵetis siajn pakaĵojn. Ili iris malsupren de la deklivo, lavis la buŝon kaj la manojn kaj ĉerpis akvon en siajn pelvojn por ekkirli la posolon.

Celso, Andreo kaj Santiago marŝis kune. Ekde la kamapadejo ĉe la bieno *La Condesa* aliĝis al la triopo ankaŭ Paŭlino, la indiĝena viro, kiu estis rigardata de la ceteraj de sia nacio kiel mondosaĝulo, ĉar li havis tre riĉan vivosperton, kiu origine radikis en lia kaptado de nigraj katetoj. Kiamaniere homo venas al siaj spertoj estas ne tre grave. Grave estas, ke li entute kolektas spertojn kaj tiujn uzas je sia plejbono. Estas tute ne mirige, ke homo, iafoje aŭ eĉ ofte, spite al ĉiuj vivospertoj, faras ĉiam denove la samajn stultaĵojn, kiuj estis la elirpunkto de sia unua stultaĵo kaj per tio de ĉiuj pliaj vivospertoj. Popoloj faras la saman. De dekmil jaroj scias popoloj, ke militoj ne estas solvo, sed ĉiam nur la komenco de novaj komplikaĵoj; tamen ili ree kaj ree faras

militojn kaj havas neniun alian penson krom ĉion tion entrepreni kaj subteni, kio neeviteble devos konduki al nova milito. La unua stultaĵo, kiun faras homo, kaj kiu validas kiel elirpunkto de liaj spertoj, estas kutime lia plej granda malforta flanko. Kaj tial li ne povas venki ĝin, kaj faras la eraron ĉiam denove. Estis en la kazo de Paŭlino, tiel kiel ĉe la plej multaj aliaj homoj, la spertoj, kiujn ili ricevis kvazaŭ preterire krom la plej esenca sperto, kaj kiuj tial ne estis tiom multekostaj; kiuj havigis al Paŭlino la famon esti mondoprudentulo.

Estis pro tio kompreneble, ke tiuj kvar viroj trovis sin reciproke. Ili estis sur la la sama ŝtupo de denaska inteligenteco. Andreo, la iama karavanestro, estis la plej edukita. En la civilizacio li atingis plej multe, per propra laboro kaj pro propra instinkto. Al la cetera triopo verŝajne mankis nur simila okazo, kaj verŝajne ankaŭ sufiĉe da instinkto.

Andreo estis la plej trankvila, la plej serioza kaj plej pacama el la kvar viroj. Celso, Santiago kaj Paŭlino fidis pli pri siaj pugnoj kaj pri rapida salta atako ol pri longa pripensado kaj zorgema konsidero. Andreo estis stratego, sed la tri kamaradoj estis taktikuloj. Andreo havis la

emon tro serioze preni la vivon kaj per tio komplikigi ĝin al si. La tri aliaj prenis la vivon tiel, kiel ĝi montriĝis kaj poste aranĝis ĝin tiom longe, ĝis ili supozis, ke ili bonfartas. La tuta kvaropo kiel la tuta cetera karavano eniĝis en la influon de fortoj, kiuj estis pli fortaj oli ili. Sed ĉia potenco baziĝas je agnosko. Ne ekzistas potenco, kiu el si mem ekzistas kiel eterne plu naskiĝanta universo. Neniu diktatoro estas tiom potenca, ke lia potenco ne ĉirkaŭireblus. Neniu diktatoro povas komandi tie, kie volo obei, ne ekzistas. Skurĝoj, prizonoj kaj mortopunoj havas siajn malvastajn limojn; ĉar la volo al neobeado, la volo rezisti al perforto estas senfine pli forta ol la volo ataki aŭ la volo ekzerci perforton. Tial diktatoro ne povas diktatori por eterne. Ĉiam li devas translasi la diktaturon al posteuloj, kiuj sufokiĝas je lia diktaturo. La potenco, kiu regis la sorton de tiuj kvar viroj, kiel ĉiujn aliajn tie, estis por tiuj homoj nevidebla kaj nekaptebla. Por ili tio estis tro transmonta kompreni, ke ilia sorto dependas de la diktatoro *don* Porfirio Diaz , kies agado siavice estis influata de la ideo, ke la bonfarto de la meksika lando estas garantiata nur tiukaze, se la kapitalismo posedas nelimigitajn liberojn kaj la peono ne havas alian celon en la mondo ol obei kaj kredi tion, kion ordonas la

aŭtoritatoj, la grandaj kaj malgrandaj diktatoroj. Tiu, kiu havis aliajn ideojn rilate la rajtojn de homoj, estis skurĝata ĝis li ŝanĝis sian opinion aŭ oni pafmortigis lin, se li disvastigis tiajn ideojn , aŭ li retroviĝis en la Valo de l' Morto, se li incitis peonojn al ribelo.

Se estus la kazo, ke ĉiu unuopulo el la cent naŭdek viroj marŝantaj en la karavano, renkontus la potencan diktatoron *don* Porfirio persone, neniu el ili eĉ nur dum momento pensus, ke tiu maljuna malsanema viro estas la potenco, kiu komandis ilin al la monterioj. Li aspektis tiel, kiel ĉiu alia kutima homo, la diferenco estis nur tiu, ke li ŝatis fiksi ordenojn kaj honorsignojn sur sian bruston kaj paŝadi kiel stilzbirdo en uniformo. Ju pli sensignifa homo estas kiel persono des pli tiu sentas la urĝon enknedi sin en uniformon, kiu donu al li la ŝajnon, ke li estas pli ol oni supozus, se oni rigardus lin. Ĉiuj prezidantoj de la respubliko post li, kiuj escepte de kelkaj malmultaj, vere estis viroj kaj elstaraj personoj, neniam trotadis en uniformoj, kvankam ili ĉiuj, kun du esceptoj, estis generaloj kaj havis la rajton vesti sin kun uniformoj, kiam ajn plaĉas al ili.

Se oni estus kapabla transigi la virojn al Nov-Jorko kaj

kondukus ilin en la oficejojn de *Central American Fine Woods* kaj *American Chicle Corporation,* ili certe same tiom malmulte akceptus, ke tiu malgranda armeo de junaj viroj, kiuj tie pigrume apogadis sin al skribotabloj, estas la potenco, kiuj kondamnas ilin al la infero en la monterioj. Ankaŭ la sinjorojn, kiuj en la havenoj *Laguna de Carmen kaj Puerto Alvara* Orbegon, tiam nomata Frontera, notis la alflosigitajn flosojn kaj disrompis ilin en arbotrunkojn, kiujn ili tiam surtavoligis kaj kargis en grandajn transportŝipojn, la junaj viroj ne rigardus kiel la potencon, kiu influas ilian sorton.Tiuj sinjoroj, agentoj kaj kunaĉetistoj de la usonaj kompanioj de altvaloraj lignospecoj estis afablaj sinjoroj laŭ sia maniero, ili estis humanaj, kion oni vidis jam je tio, ke ili plej ofte estis ebriaj, kaj se oni bezonis ilin, serĉendaj unue en la kantinoj, kie ili sidis dum dudek kvar horoj je unu sidado kaj ludis domenon. Se ili ne troveblis en kantino, oni trovis ilin tute certe en la *Barrio de Tolerancia*, en la Kvartalo de l' Indulgo, do en la bordela kvartalo de la haveno, kie ili forbalae disipis la monon, kiu krom iliaj salajroj, glitis kvazaŭ preterire en iliajn poŝojn, kaj ili dispis la krommonon kun tiuj knabinoj, kiuj plej lerte dancis rumbon.

Eĉ la agentoj, kiuj varbis la laboristojn por la monterioj, estis rigardataj de neniu de tiuj viroj kiel la fatala potenco, kies perforton oni ne povas eskapi.

Ĉiuj tiuj viroj, la diktatoro, ties ministroj, la estroj de la magahonkompanioj en Nov-Jorko, la havenagentoj kaj la varbistaj agentoj ŝajne siavice mem estis devigataj de pli alta potenco praktiki potencon malsupren ĝis la peonoj. La ĉefoj de la mahagonkompanioj, kiom ajn ili ŝajnis esti la esencaj mastroj, estis nur dungitoj kun monata salajro. Oni povis maldungi ilin kiel la stenografiistojn kaj skribmaŝinistojn en la burooj. Ilia agado rilate al siaj limoj supren kaj malsupren estis dependaj de folioj el papero nomataj *shares, acciones,* akcioj. Kaj tiuj, kiuj havis tiujn akciojn en siaj ŝtaltrezoroj, komandis al la direktoroj, kion ili faru kaj kion ili ne faru.

Tiom profunde certe eĉ ne la plej inteligenta el la viroj kapablis rigardi por kompreni, kie estas la potenco, kaj kiu tenas en la manoj la potencon , kiu disponas pri ilia vivo. Ĉiu unuopulo en la longa vico de homoj, kiuj havis siajn interesojn je tiu negoco, estis per si mem tute senkulpaj je ĉiuj strecoj kaj egaj penoj kaj suferoj de la mahagonlaboristoj. Ĉiu, se oni demandus iun el ili ,

respondus: 'Mi ne sciis tion, ke io tia povas okazi. Mi tre bedaŭras tion kaj mi volas provi mildigi tion.'

De tempo al tempo la dolorkrioj de la turmentatoj en la ĝangalo trapenetris ĝis la diktatoro. Li fariĝis tre kolera kaj ordonis denove esplorkomisionon. Tiam surtabliĝis ĉe li pli gravaj aferoj, kaj pro tiuj li forgesis sciigi sin, ĉu la esplorkomisiono efektive ekveturis kaj esploros la tuton aŭ ĉu lia ordono sendi esplorkomisionon servis nur pagi por dekopo de liaj partianoj, kiuj fiŝkaptadis bone pagatan posteneton, dum sesdek tagoj altajn tagsalajrojn kiel parlamentanojn, sen tio, ke ili eĉ nur dum unu nokto forlasus la ĉefurbon por esplori ĉu vere estis aŭdataj dolorkrioj aŭ, ĉu temas nur pri trompa manovro aŭ pri popolveneniga propagando de la disvastiĝanta movado kontraŭ la diktaturo.

La laboristoj en la monterioj, kompreneble eĉ tiukaze, se ili rekonus, kie troviĝas la origina potenco, kiu disponas tiel pereige pri ilia sorto, ne estus kapablaj forigi tiun potencon, ja ili eĉ ne povus skui je ĝi, tiom interplektita estis tiu potenco kun siaj ceteraj potencoj kaj perfortoj en la lando, sed ne, ne nur en la lando, eĉ tutmonde. Ĉar tiu novjorka korporacio ne estis aŭtokrata rilate al sia

potenco. Ilia potenco dependis de la bona volo kaj la aĉetopreteco de la importkompanioj por altvaloraj lignospecoj en Londono, en Liverpolo, en Havro, en Hamburgo, en Roterdamo, en Ĝenovo, en Barcelono, en Amsterdamo, en Sankt-Peterburgo, en Kopenhago. Kaj ĉiuj tiuj dependis kun sia potenco de la bona volo de la miloj de kompanioj, kiuj uzadis altvalorajn specojn de ligno, kies spuroj kiel branĉoj kaj branĉetoj sekveblas ĝis la vilaĝoj eĉ de la plej etaj landoj. La prapotenco estis tiel disigita, tiom disbranĉigita, kvazaŭ tiom miksteksita, tiom disbranĉetigita kun ĉiuj agadoj de homa kreado kaj de homa uzado, ke eĉ Dio ne povus montri per fingro sur homon kaj diri: „Ĉi tie estas la enkorpiĝinta prapotenco, kiu determinas la sorton de la monteriaj laboristoj."

Tiom malmulte, kiom estus eble klarigi al peono per multaj vortoj kaj ankoraŭ pli da ekzemploj, ke buroo en Nov-Jorko, plenigita per diligente kaj nelacigeble skribantaj viroj kaj inoj, kiuj eterne devas zorgi ne perdi sian postenon, determinas la sorton de la karavano, kiu marŝas tra la ĝangalo. Des pli malmulte estus eble konvinki peonojn kaj klarigi al ili, ke ne unu persono aŭ certa kvanto de personoj determinas la sorton de la proletoj, sed sistemo. Kaj eĉ la plej lerta propagandisto, la

plej pasia parolisto ne povus klarigi eĉ nur al unu viro en la tuta karavano kun certa sukceso, kio estas sistemo.

Por tiuj proletaj indiĝenoj, eĉ ne sen ekskludo de la inteligenta Andreo, ĉio tio, kio ne senpere kunplekteblas al persono, estis nekomprenebla. Kvarcent jaroj da edukado fare de la eklezio ne kapablis atingi, ke eĉ nur unu el ili povus imagi al si Dion sen efektive vidi antaŭ si Sanktan Virgulinon aŭ Sanktan Antonion skulptitan el ligno kaj vestitan tutkorpe per velura ŝtofo, tiel, ke ili povas tuŝi kaj kisi la veston, kaj ke ili rajtas premi siajn lipojn kaj manojn sur la lignajn piedojn de Sankta Petro. Kiel ili estu komprenintaj en tiu kazo multe pli komplikan sistemon ol la religan?

Rimarko
stilzbirdo = vadobirdo sur kvazaŭaj paŝstangaj kruroj

Tiel, kiel la kutima soldato, kiu komprenas, ke oni traktas lin kiel sklavon kaj skurĝas lin, ne ekkonas la militarismon kiel sistemon, sed rigardas kiel militarismon nur la pli longe servintajn kamaradojn, kiuj nokte tradraŝas lin, la suboficirojn kaj la ĉefserĝentojn kaj eble ankoraŭ sian kapitanon, kiuj turmentas lin tage kaj nokte kaj faras inferon el lia vivo, tiel ankaŭ la junaj viroj en la karavano rigardis kiel la fatalan potencon nur tiujn, kiuj estis plej proksimaj al ili, kiujn ili povis vidi, kies skurĝbatojn ili sentis. Ilia malamo pro strangaj kaŭzoj eĉ ne atingis la agenton. Ili senkulpigis la agentojn per tio, ke ili diris, ke tio estas ties negoco kaj ties komisio varbi homojn por la monterio, tiel kiel estas la negoco de brutkomercisto kunaĉeti bruton por la viandovendistoj en la urboj. La homoj, kiujn ili rigardis kiel perforton kaj potencon, ĉar ili sentis senpere ties perforton kaj potencon, estis la *capataces,* la alpelistoj por la agentoj, kaj la pelistoj en la karavano.

Ne ekzistas ekzemplo por tio, ke oni povas tiom longe skurĝi kaj tiom longe subigi homojn, ĝis ili fine rezignas pri ĉiu penso rilate al rezisto. Ju malpli da cerbo regento

havas des pli li provas malebligi reziston per perfortaj punoj. Eĉ sub la plej senrespekta diktaturo, kiun povas praktiki potenculo, restas kvinono de la popolo neatingebla. Tiu kvinono estas ne la plej malbona kvinono de popolo. Tuj kiam la tiraneco nur iom malfirmiĝas, kreskas la kvinono je kvarono. Diktatoroj vivas en blindeco, ĉar ili ĉiam devas labori pro la subpremo de la gazetara kaj parola liberoj. Se la dikatoro estas involvata en militon aŭ nur en malcerton de la ekstera politiko, jen estas la restinta neatingebla kvinono, kiu zorgas por lia pereo.

La dikatoro, kiu eble povus ŝanĝi ilian sorton estis al la peonoj simile fremda, simile neatingebla, simile neproksimigebla, senpardonema kaj senhelpema kiel Dio en la ĉielo, kiun ili ne povis imagi kaj al kiu ili povis interligi nur tre foran kontakton per tio, ke ili surgenuiĝis antaŭ ligna vaksa figuro.

Ilia diktatoro, kiun ili konis kaj vidis, estis la *capataz*. Tiu estis atingebla. Petegi lin, ke li estu iom malpli kruela, pri tio ili eĉ ne pensis. Estus pli facile petegi ŝtonon. Ŝtono eble moviĝus, se oni estus sufiĉe proksima al ĝi, kaj se oni sufiĉe laŭte krius. Sed la *capataces*, plejparte de indiĝena

sango kaj elirinta el la propra laboranta klaso, rifuzis ĉian sangokomunecon, kaj eĉ pli ĉiun klasan komunecon. Tiel, kiel la suboficiro supozas, ke li estas pli proksima al la oficisto ol al la simpla soldato, se li turmentas la soldatojn, tiel ankaŭ la *capataces* supozis ju pli socie proksimiĝi al la ladinoj kaj al agentoj kaj *contratistas* des pli brutale ili traktas la peonojn kaj des pli senkompate ili helpas al siaj mastroj kapti novajn viktimojn.

La peonoj, se ili ne volis disrompiĝi je sia propra kolero, ne sentis alian elirvojon ol ĉiam esti en ribelemo kontraŭ la *capataces*, ne nur dum la transporto, sed des pli en la monterioj. Estis ilia ĉiama penso, dum la hela tago kaj nokte, kapti almenaŭ unu el la *capataces* je la gorĝo. Tiom malmulte kiom turmentita soldato pensas pri tio fini siajn turmentojn per tio, ke li provas renversi la tutan militarisman sistemon, tiom malmulte kaj eĉ centoble pli malmulte pensis eĉ ne unu el la peonoj pri tio, forigi la *capataces* per komuna atako al la ekonomia sistemo, en kiu *capataz* estas nur ilo. La plej ekstrema, al kio ili pro sia despero estis peleblaj, estis la detruo de la monterioj, tiel kiel kelkajn jarojn poste la revoluciaj peonoj en la federacia ŝtato Morelos tute detruis ĉiujn sukerfabrikojn ĝis la plej suba fundamenta muro, ĉar ili rigardis la

sukerfabrikojn kiel la fonton de siaj suferoj. Kaj ĉar ribelantaj proletoj ĉiam emas detrui la plej proksiman, se ili pensas ne plu povi elteni la infere duran vivon. Tial diktaturo estas tiel danĝera por la ĝenerala bonfarto de popolo. La diktaturo donas al tiuj, kiuj sentas sin subigitaj neniun okazon trankvile interkonsiliĝi kaj intertrakti kiel sistemo, kiu ŝajnas maljusta al parto de la popolo, forigeblas aŭ plibonigeblas sen tio, ke ĉe eksplodo de ribelo tiom da damaĝo ekestas, ke ankaŭ tio estos detruita, kio nemalhaveblas por bone funkcianta plua ekzisto de la civilizacio. Diktaturoj finiĝas ĉiam en kaoso. Kaj la kaoso estas des pli granda, ju pli longe daŭris diktaturo. Sed ĉiu diktatoro pensas, ke la propra diktaturo estos escepto. Kaj ĉu diktaturo al la homaro volas trudi novan sistemon aŭ ĉu ĝi refreŝigas malnovan kaj putriĝantan sistemon nove orumitan kaj en nova kadro komandas ĝin al la homoj, ne faras diferencon. La sekvoj estas ĉiam similaj, ĉar la homoj ĉiam restas samaj al si, ĉar neniam sukcesas, ke eĉ nur tri kvaronoj de la homoj el la sama popolo agnoskas certan opinion aŭ ideon aŭ akceptas certan programon. Ĉar ĉiu homo havas sian propran opinion pri tio, kio povas fari lin feliĉa kaj kontenta, kaj laŭ kiuj leĝoj li kaj liaj najbaroj estu regataj.

Tial li estas ja homo; ĉar nur bestoj kontentas aŭ almenaŭ ŝajne kontentas, se ili havas sian laŭregulan manĝon kaj la liberon ĉeokaze rajti naski idon.

Ĉe la lago, kie la karavano restadis, la marŝo malfruiĝis dum certa tempo. Ĉe la praarbara rojo, kiu estis travadenda, pluraj el la ŝarĝbestoj havis malfacilaĵojn sendanĝere transiri. La rojo estis tre ŝtonplena, kun multnombraj ellavitaj truformaj profundaĵoj, pro kiuj la bestoj stumbladis kaj faladis. Kaj ĝi estis plena de drivantaj arboj, kiuj ie derompiĝis kaj nun komplikis tie la travadejon. Necesis haki novan grandan arkan vojon tra la ĝangalo, por traigi la bestojn. Granda parto de la karavano estis jam apud la lago, dum preskaŭ same tiom granda parto ankoraŭ ne transiris la rojon. Tial tie la tuta trupo atendis tiom longe, ĝis la ceteraj atingis ĝin. Tiu posta trupo kompreneble same volis ripozi.

La antaŭtrupo jam ekmarŝis. Kaj nun ankaŭ la plej granda trupo volis ekmarŝi. Sed tiam alvenis la mesaĝo de la antaŭtrupo, ke unue necesas konstrui ponton trans marĉon, ĉar la bestoj tro sinkus en ĝin. Kaj, tial, ĉar en tiu loko la pado estis tiom malvasta, ke ĉiam nur du viroj aŭ besto povis marŝi, venis la ordono, ke la ĉefa trupo restadu apud la lago, ĝis alvenos la marŝordono. Samtempe oni anoncis, ke ne estos plua komuna ripoza

restado je tiu tago ĝis estos atingita la ripoza kampadejo, kiu ankoraŭ estis sufiĉe malproksima.

Sekve de la malvasta vojo uzeblis nur malmultaj viroj ĉe la konstruado de la ponto trans la marĉon, ĉar tro da ili reciproke nur malhelpus sin.

„Tiukaze ni prefere senzorge multe antaŭdormu kvazaŭ provizige“, diris Santiago kaj poste sternis sin.

Andreo same volis dormi. Sed ŝajnis, ke Celso ne estis dormema kaj, ke li ne volis resti maldorme sola. Li penis tial trovi iun, kun kiu li povus interparoladi. La sorto, kiu disigis lin tiom senkompate de lia hejma vilaĝo, de lia knabino kaj per tio de ĉiuj aĵoj, kiujn li bezonis por ebligi al si propran vivon, ĉu riĉan, ĉu povran, sed lian propran, tiu ĉi sorto, kiu trudis sin en lian vojon, kvazaŭ gorĝopremis lin la imago. Li montris al neniu, kiel li sentas sin, kiel li suferis interne kaj malĝojis enkore, li tiom malĝojis, ke iafoje li opiniis, ke lia animo ploras internen, ke ĝi plenigas lin tute per ploroj. Laŭaspekte li apenaŭ sciis, kio estas ploroj, ĉar la karaktero de lia raso ne permesis montri sian senton kaj sian veon sur la vizaĝo. Li estis per ĉio, kio li estis, indiĝeno. Indiĝeno ne

prezentiĝas kaj ne diras per vortoj aŭ gestoj: 'Rigardu al mi, homoj, rigardu, kiom mi suferas. Havu kompaton al mi aŭ almenaŭ komprenon.' Kiel ĉiuj siaj raskunuloj li havis stoikan rezisteman karakteron kaj la neskueblan esperon pri savo laŭ maniero, kiun havas en la blanka raso nur la fanatikuloj kaj la torturataj kaj ĉasataj komunistoj. Sed vespere, kiam li sternis sin por dormi, aŭ je hela tago, kiam li ripozis kaj fariĝis dormema, la sento komencis efiki kaj furiozi en li. Tiam, ofte jam en duondormo, li sorĉis al si bildojn pri venĝo, kiun li volis praktiki je tiuj, kiuj senpere kulpis lian sorton. Li vidis la *capataces* kaj agentojn kaj *contratistas* morti kun teruraj turmentoj, vidis petegi ilin pri helpo, kaj li rigardis sin mem kaŭranta antaŭ ili kaj senkompate observante iliajn suferojn, tiel senkompate kiel ili estis kontraŭ li kaj liaj laborkunuloj. Tiuj imagoj ekscitis lin, faris lin sovaĝa, lacigis lin kaj elĉerpis lin fine pli ol erotikaj pensoj kapablus tion. Li timis tiujn imagojn, pro iliaj detruigaj sekvoj. Li estis ĉiam ĝoja, se li je hela tago laboris tiom streĉe, ke li ekdormis, tuj, kiam li nur sternis sin sur sia petato. Sed tiumomente li ne estis sufiĉe lacigita por rapide ekdormi. Tial li serĉis akompanon por povi babili kaj restadi maldorma.

Sur la altaĵo, kie la karavano kampadis, staris abioj tiom altaj kiom turo. Ili kreskis ĝis la bordo de la lago. La abioj memoris lin pri lia vilaĝo kaj pri la pacaj kabanoj de lia hejma regiono. La kabanoj estis faritaj el argilo, sen fenestroj, sen mebloj. La kuireja fajro brulis sur la stamfita tero en la mezo de la kabano, kaj kiam lia patrino kuiris, la kabano ĉiam estis plena de fumo; ĉar la fumo foriĝis nur iom post iom je la flankoj, sur kiu apogis sin la palmtegmento sur la fostoj, kiuj kuntenis la argilajn murojn de la kabano.

Tie la tero estis dense kovrata per fingrolongaj abiaj pingloj, kiuj estis deskuitaj de la arboj. Kaj tio memoris lin pri la festotagoj en lia vilaĝo, se en ĉiuj kabanoj la stamfita tera planko estis dense priŝutita per verdaj abiopingloj, kiuj estis pli belaj ol la plej bela tapiŝo, kaj kiuj plenigis la kabanojn kun aroma odoro, pli dolĉa ol la plej rava parfumo.

Li kaŭris kun la brakoj volvitaj ĉirkaŭ la genuojn. Li ne fumis, rigardis nur supren en la kronojn de la abioj.

„Andreo“, li diris, ĉu ankaŭ vi havas en via vilaĝo abiopinglojn en la *jacalitos,* en viaj kabanetoj, se vi havas

festojn?“

„Nu, certe“, Andreo respondis.

Andreo, kiu en tiu momento pensis pri sia ĉaro kaj kiu kondukas ĝin, kaj kiel la junuloj nun eble ie devas halti kun la ĉaroj en la ŝlimo, kvazaŭ estis vekita el siaj revoj per tiu ĉi demando. Ankaŭ li memoris pri la hejma regiono pro la tapiŝo de la pingloj, sur kiu ili tie kampadis. Kaj ankaŭ li subite rememoris pri sia knabino Estrellita, la Steleton, kiun li devis postlasi, kun kiu li esperis loĝi iam en kabano, kie la stamfita tera planko estas kovrata de abiaj pingloj.

„Bueno“, parolis Celso plu, „se ankaŭ vi havas abiajn pinglojn en viaj *casitas*, dometoj, kaj tial same pensas kiel bele estas hejme, jen rigardu nur sufiĉe longe tiun abion ĉi tie. Adiaŭu de ĝi. Estas la lastaj abioj, kiujn vi ne plu vidos de nun dum jaroj. Eble ili estas entute la lastaj abioj, kiujn vi vidos en via vivo. Ĉar ni estas la perdidos, la perditoj. Kaj ĉu vi kiam ajn revenos kaj kiam ajn revidos abiojn, tion eĉ Sankta Andreo ne povus rakonti al vi. Kunprenu bonan nazplenon kun vi en la monterion, de tiu odoro de la abioj ĉi tie.“

Andreo levis branĉeton, kiu kuŝis je lia flanko, ludis kun ĝi, flaris je ĝi kaj kvazaŭ senpripenseme li metis ĝin en sian pakaĵon.

„Tio estas bona ideo“, diris Celso, kiam li vidis tion. „Tion ankaŭ mi volas fari. Havi tian branĉeton kaj teni ĝin ĉeokaze en mano vespere ĉe la bivakfajro en la monterio, estas kiel havi etan peceton da espero. Kaj eĉ, se ĝi estos elsekigita, ĝi estos ja ĉiam esperiga, kaj oni ne forgesos, ke ie kreskas abioj en la mondo kaj, ke ie iu estas, kiu atendas vin kaj kiu pensas pri vi, kiom ajn aĉa afero trafas vin.“

Andreo nun same perdis sian dormemon. Li rektiĝis kaj proksimiĝis al Celso. Ili parolis dum certa tempo nenion. Ili rigardis nur malsupren al la lago, kie ludis malgrandaj ondoj subsune.

Ĉirkaŭ ili babilis kelkaj el la viroj. La plej multaj dormis. Kelkaj malmutaj manipuladis je sia pakaĵo.

Tiam oni aŭdis grincantan krevon, krakadon kaj falon de giganta abio, kies branĉoj dum la renversiĝo kraketis kaj fajfis tra la aero. Transe, sur la alia flanko de la lago lacigita maljuna abio ĉesis balanci sian kronon en la

sunlumo. Ĝi sternis sin teren por morti kaj por doni lokon al la junaj, kiuj strebis al la lumo, kaj kiuj portis la esperon en si, ke neniam la sama sorto okazu al ili, kiel al la faligitaj kamaradoj de sia aĝo kaj de foruzita vivoforto.

„Eltranĉu ĉi tie sufiĉe da *ocote*, kenon“, diris fine Celso. „Se vi ĉi tie ne detranĉos kenon, vi ne plu havos ĝin sur la tuta vojo, kaj vi tiam povos provi ekblovi fajron per sekigita merdo. Ĉu vi tion iam provis? Funkias tute bone, sed devas esti merdo de ĉevalo aŭ de mulo. La merdo de tiuj diodamnitaj *capataces* estas uzebla por nenio. Ĝi fetoras nur kiel la pesto, kiel cetere la tuta bando entute. Se mi nur povus peli al ĉiuj tiuj kojotoj la maĉeton tra la kadavro. *M'jito*, fileto mia, tio ja estus ankoraŭ agrabla plezuro, damnite! Mi tute nenion scias en la mondo, kion mi volus fari kun pli da devoto. Por tio mi lasus min eĉ pendigi kun volupto kaj poste tuj entombigi tie. Vi konas ja la du rabistojn, kiuj kaptis min en Hucutsin por *duro*, por tri surfekitaj pesoj. Sed mi tute ne devas grati mian maĉeton je iliaj stinkantaj ledohaŭtoj.“

„Mi ne scias, kion vi celas, *que pienses*, *hombre*“, diris Andreo, sen deturnigi sian rigardon de la briltrema lago.

„Mi estas *adivinador,* aŭguristo, fileto mia“, diris Celso. „Ĉu vi tion ne scias? Mi povas antaŭdiri tute konkrete, kio okazos en tiu marŝo al tiuj du friponoj. En la lasta kampadejo, en la lasta setlejo, de kie ni hodiaŭ matene ekmarŝis, mi hieraŭ ja devis helpi konstrui la latbarilon, kiun la muloj damaĝis per tretado. Jen mi enmartelis certan *palo,* foston, kaj kiam la viroj ektiris la baston al la alia *palo*, jen renversiĝis mia fosto. Sed kiel tiel rapide rami teren foston, se oni devas fosi la truon nur per la manoj kaj la maĉeto kaj la *capataz* ne volas atendi, ĝis mi ree estos firmstamfinta la teron ĉirkaŭ ĝi. Jen la bastarda filo de putino per la skurĝo tiel brutale batis min, ke mi ekhurlis, tion mi devas diri al vi! Damne, kaj apenaŭ horon poste mi tie staras kaj tiras iom post iom la dornojn el miaj manoj, ĉar ili enboris sin kaj mi ne tute povis kapti ilin, jen alvenas alia filo de kotŝmirita hundino kaj diras: 'He, vi *flojo,* fi-pigrulo, stinkanta kanajlo de mulo, ĉu vi volas fari ĉi tie *fiesta,* feston, mi ja tuj donos al vi vian feston.' Kaj jen li tuj ŝarĝis hajlon da batoj sur min per sia mulovipo. Mi diris nenion, kiun sencon havus kvereli?! Oni devas ne paroli, sed agi. Kaj vespere, jen mi agis. Mi legis al tiuj du hundoj, kiuj vendis min por tri pesoj kaj nun eĉ dum la marŝo volas turmenti

min, la manojn. Mi konas nun ilian sorton tiel bone kiel mian. Mi ja diris al vi, ke mi estas aŭguristo. Mia kulpo tio ne estas. Estas skribite en iliaj manoj, ke la hundino, kiu naskis unu el tiuj du vojembuskistoj, ne plu revidos lin inter siaj filoj kaj la tortiljoputino, kiu elvomis la alian mulmerdulon, same havos filon malpli antaŭ ol ni alvenos en la monterio. Mi ne estigas sortojn, mi legas nur en la manoj, kion la sorto devas plenumi. Tiuj du knaboj, kiel ajn belaj ili estas, kiel ajn fieraj ili sidas sur la selo kaj kiel ajn majeste ili zumigas la vipojn kaj komandas, ambaŭ ne akompanos nin ĝis la monterio. Neniu el ili revenos, kaj ambaŭ oni ne enfosos sur benita tombejo. Tiaj estas la sortoj de la homoj, tion ni povas ŝanĝi neniel. Kaj se la sorto iras sian vojon, mi faros nenion por malhelpi ties iradon.“

„Estas efektive, friponoj“, diris Andreo, „kaj mi pensas, ke estos pli agrable en la monterio, se ili ambaŭ ne estos tie.“

„Pri tio vi povas esti certa, fileto mia, estos pli bone tie sen ambaŭ. La *capataces*, kiujn ni tie havos, ja certe ne estas bonkoraj inoj kaj ili certe damne bone scias svingadi la skurĝon. Sed ili apenaŭ ne havos tiel inferan ĝojon pri tio turmenti iun, kiel la du uloj ĉi tie. Tiujn, kiujn ni havos

tie en la ĝangalo, faros ĉion kiel negocistoj. Por tio oni pagas ilin. Sed ili ne ekscitiĝas ĉe tio kaj ĉeokaze svingas la vipon eĉ tiel, kvazaŭ ili karesus ŝafidon, kaj de tempo al tempo vi povos interparoli kun unu el ili kaj diri al li, ke via stomako doloras pro pirozo, kaj tiam li tiros vin flanken kaj skurĝos vin nur je duono de tio, kion oni punnotis por vi. Sed tiuj murdobruligistoj havas sian plezuron pri tio perforti sendefendajn peonojn. La plej fiaj friponoj surtere estas tiuj, kiuj delektiĝas je sendefenduloj. Kaj la samaj kanajloj, egale kiun vi el ambaŭ renkontus sola kaj hazarde estus supera al li, estus la plej ridinda plorhundeto, kiun vi povas imagi. Ĉiu el ili tiukaze tremus kaj plorĝemetus kiel maljunulino. Ĝuste tio estas tio, kio faras la kojotojn tiel naŭzigaj al mi, pli naŭzigaj ol laŭsoj. Similan vi povas observi ĉe policistoj kaj ĉe skribistoj en la oficejoj. Se ili tenus iun ĉe la kolumo kaj tiu montrus eĉ nur oblikvan vizaĝon, jen ili tirus lin en angulon kaj batadus lin tiom longe ĝis li kurbiĝus kaj lamiĝus. Kaj poste ili dirus, ke li falis, ĉar li estis ebria. Kia aĉa bando, estas la samaj, kiuj krias al nia vizaĝo, kiaj gigantaj virviroj ili estas, kiaj veraj viroj kaj la grandaj herooj, kiuj havas sole la rajton aliajn komandi kaj ĉirkaŭĉasadi. Estas stinkanta kanajlaro. Nia kota

salivo estas ankoraŭ tro bona kraĉi ĝin al tia speco de herooj vizaĝen. Se mi volus tradraŝi vin, mi kaptus vin je via kolumo kaj ekdraŝus vin tiom, ke la batoj kvazaŭ hajlus sur vin; sed mi farus tion sola, kaj mi ne ligus vin al io, mi lasus al vi la liberon defendi vin. Kaj mi ne bezonus la helpon de ses aldonaj uloj, kiuj protektu min, se viaj pugnoj draŝus min. Sed kontraŭ tiuj kojotoj ĉi tie, kontraŭ kiuj vi havas neniun alian rimedon, vi devas blovi specialan kornosignalon, por ke ili komprenu vin. La sorto, kiun mi antaŭdiris al ili el iliaj manoj, baldaŭ blovos la necesan signalon al ili. Vi povas veti vian lastan ĉemizon kun mi, *m'jito*, filo mia."

„Ĉu vi diris do al la du hundoj, kion vi legis en la manoj?" demandis Andreo kiel ŝafido.

„Al vi certe la sunardo glitis intesten, ke vi supozas tion pri mi", diris Celso.

„Estas ja tamen pli bone, ke vi diras ion al ili, por ke ili bone memgardu survoje kaj por ke vi ne havu la kulpon, kiam io estos okazinta al ili."

Celso rigardis Andreon per kunpinĉitaj okuloj. Li ne sciis ĝuste, ĉu Andreo diras tion serioze aŭ ironie.

„Ĉu vi opinias tion efektive?“ li demandis, „ke mi avertu ilin ambaŭ, kion la sorto intencas fari al ili?“

„Estas, mi opinias, ja ankaŭ ili estas kristanoj kaj ne paganoj“, diris Andreo heziteme.

„El la tono, kiel Andreo parolis, sentis Celso, ke Andreo opiniis efektive tion, kion li diris.

„Ĉu kristanoj? Merdo ili estas. Seka bovomerdo ili estas, sed ne kristanoj.“ Celso diris tion tiel, kvazaŭ la sorto de la du *capataces* jam plenumiĝis je ili. „Kristanoj, ĉu? Nu, bone. Tiukaze mi ne volas esti kristano, sed prefere ĉino aŭ mi ne scias kio, sed ĉiukaze ne la sama kia ili. Kaj mi diru tion al ili, ĉu? Ili povis ja demandi maljunulinaĉon en Hucutsin en la sanktulofesto kaj doni al ŝi du realojn, por ke ŝi aŭguru al ili. Tio ne estas mia negoco. Mia negoco eble estas atenti pri tio, ke mia aŭguro estu prava.Se vi volas havi bonan sorton por vi, *un buen destino,* tiukaze vi devas tikli ĝin iom en al faŭko, por ke ĝi viviĝu. Estas *adivinador muy malo,* aŭguristo tre fia, kiu ne de tempo al tempo forte tretas sur la piedfingrojn de la sorto, por ke ĝi kviku. Kaj mi nun tuj ankoraŭ rakontos tion al vi: „Se vi diros al tiuj du putinfratoj, al

tiuj *cabrones* eĉ nur mallongan silabon el mia aŭguro, aŭ se vi diros eĉ nur vorton al alia *muchacho* ĉi tie en la trupo, aŭ nur al via granda *amigo* Santiago, kara mia, tiam mi draŝos al vi tiel forte vian grimacon, ke vi pisos dentojn antaŭe kaj malantaŭe. Tion vi nun scias. Fermtenu vian damnitan babiltruon kaj diru ankaŭ ne estontece, ke mi kapablas aŭguri el manoj. Jes ja, kaj nun ĉi tie vigliĝas. Jen venas la *capataces,* kaj jen vi ankaŭ jam aŭdas la fajfadon por la plumarŝo. Ek do.“

Rimarkoj
adivinado = hispane: aŭguristo
adivinador = certe meksika variaĵo, slanga vorto por aŭguristo
adivinador muy malo = tre fia aŭguristo
casitas = dometoj
cabrones = virkaproj, fikuloj (kiel insultvorto)
duro = kvin pesoj
jacalito = kabaneto
ocote = speco de abio, tielnomata montezuoma abio, kies branĉoj facile estas flamigeblaj pro la entenata rezino
que pienses = kion vi pensas

Ĉapitro 07

01

La karavano fariĝis rapide vigla. La *arrieros* ŝarĝis la bestojn. Kaj tiuj, kiuj ne malŝarĝis la bestojn, firmtiris ĉiujn ledorimenojn de la pakaĵoj, kaj skuante ŝovadis la pakaĵojn ĝis ili estis en bona ekvilibro. Tiam ekhurlis la krioj de la mulpelistoj: *„Olla mula, adelante. Que cabrón de diabolo, caray Prieto, pronto, pronto. Chingarse de pestilencia de una vieja. A donde te vienes, macho. Al camino, todos. Madre mia y carambola, de dondo quedas, Pintado. Corre,corre, corre, corre. Ya cayo la Chabela, este ching vieja de una bestia. Andele, andele. Pronto, pronto. Vamonos, flojos, vamanos, andele.* He, mulo, antaŭen! Kia diabla fikul', fulmotondro! Rapide, Nigrul'! Rapide! Damnite de la fetoro de olda inaĉo! Kien? Jen, por vi, azeno! Survojiĝu, ĉiuj! Dipatrino kaj kunpuŝiĝo! Kie vi restas? Makulito! Kuru, kuru, kuru, kuru! Tiu bestaĉo Izabnjo jam falis. Antaŭen! Antaŭen! Rapide, rapide! Pigruloj! Iru, antaŭen!“

La krioj kaj blasfemaj sakroj de la mulpelistoj resonadis kiel multnombra eĥo de la arbaraj vandoj el la transa

lagobordo kaj pligrandigis la bruon.

Intertempe kriis la *capatazes* kaj pelistoj de la peonoj, ke la karavano vigliĝu. Knalis la vipoj kaj fajfis la signaloj de la agentoj. La viroj reciproke vokis vortojn, kaj tie kaj tie unu el ili kriis ĝis lia voĉo fariĝis raŭka, por ke oni alvoku kamaradon, por ke tiu al li helpu ŝarĝi la pakaĵon aŭ memoru alian pri tio, ke li forgesis sian ĉapelon aŭ sian kalabasan botelon sur la kampadejo.

Post mallonga marŝo la karavano atingis la ĵus konstruitan ponton trans la marĉon. La ponto, tiel provizore kiel rapide farita, etendiĝis trans rojon, kies akvo estis nigra de la marĉa ŝlimo. Ĝi faris la impreson, ke tiukaze, se disrompiĝus la ponto, oni tuj kaptiĝus ĝis super la kapo en la marĉo.

Konstrui la ponton, tio certe estis la plej eta parto de la laboro. Pli da laboro postulas la firmigo de la pado ambaŭflanke de la rojo. Tiuj bordoj estis ebenaj kaj ĉiam plenaj de marĉa ŝlimo. La densa ĝangalo ne tralasis sunbrilojn, kiuj iam kaj tiam povus sekigi tiun marĉon tute aŭ almenaŭ parte. Falintaj folioj, derompiĝintaj branĉoj kaj renversitaj putriĝantaj arboj formis lozan

teron, kiu estis favora por la disvastigo kaj konservado de la marĉo.

Eblus konstrui firman ponton trans la marĉon. Sed ĝi devus esti bonkvalita ponto el cemento kaj ŝtalo. Eĉ sur la grandaj trafikvojoj en la ŝtato, kie vojaĝis la ĉarokaravanoj, la pontoj estis nur el ligno kaj ĉiam troviĝis en stato, ke oni ne certis, ĉu oni ankaŭ ĉifoje kun ĉevalo sen trarompo ankoraŭ atingos sana la alian flankon. Des malpli, ja centmiloble malpli estis atendeble sub tiaj rilatoj, ke tie en la ĝangalo troviĝas pontoj el fero kaj cemento. Kompreneble ne estis necese tie konstrui ferpontojn; estis eĉ ne necese konstrui aŭtovojon tra la ĝangalo. Du - aŭ trifoje en la jaro tie sufiĉe granda mulokaravano marŝis al la monterioj. Por tio eldoni dudek milionojn aŭ eĉ tridek milionojn da pesoj, dum eĉ en la dense loĝataj distriktoj de la ŝtato ne estis stratoj, tion neniu en la registaro povus respondeci. Tio propre estus nur la afero de la monterioj, ĉar la monterioj estis la ununuraj entreprenoj, kiuj havas intereson je bonaj stratoj kaj pontoj. Sed tiukaze la mahagonligno fariĝus eĉ pli multekosta, kaj oni ne povus vendi ĝin kaj la meblofaristoj elektus aliajn lignospecojn por povi oferti uzeblajn, belajn kaj vendeblajn litojn kaj spegulošrankojn

al al nuptogeo, kaj por tiom malkare oferti ilin, ke la gefianĉoj rapidus pri la nupto, por ne veni tro malfrue pri la generado de malsataj proletoj.

Dudek metrojn al flanko de la pado kaj simile tiom malproksimen, aŭ eĉ kelkajn metrojn plu al la alia bordoflanko, etendiĝis la marĉo. La marĉo estis verde nigra, kun intermiksitaj akvoriĉaj lagetoj. En la malhele verda trembrila, ŝarĝanta, peza enfermiteco de la ĝangalo aperis la marĉo multe pli nigra kaj hantata ol li eble aperus en hela ardanta sunlumo. Se oni kuraĝus moviĝi pli en ĝin, kaj se oni firme paŝus, oni tuj mergus sin ĝis la genuo en la ŝlimon. La marĉo gluiĝus kaj kroĉiĝus al la kruro kvazaŭ ĝi estus vivanta estaĵo. Ĝi firmsuĉus sin, tirus la kruron kaj oni ekhavus la senton, ke sube ĉe la piedo iu malrapide sed seninterrompe tiras malsupren. Oni metus la alian kruron proksimen por eltiri la sinkintan piedon, sed tiel nun ankaŭ la dua piedo komencus sinki, firmsuĉate de la marĉo. Se oni riskus tion, tiukaze oni eble malkovrus, ke la marĉo eble ne estis profunda, ke sube, ĉirkaŭe en unumetra profundo estas roka grundo. Sed kompreneble la grundo povus esti profunda ankaŭ tri metrojn. Aŭ tie, kie oni mem ne plu kapablus moviĝi, estus truo en la grundo. Tial oni rezignis pri tio esti esploristo aŭ malkovrulo, ne okupiĝis pri tio,

kiom profunda la grundo eble estas, sed oni tuj plena de energio eklaboris por elveni de tie. Anhele, ŝvitante, senspire kaj kun tondranta koro al oni sukcesis tiri sin sur firman teron, kie oni tiam sidiĝis kaj pripensis tion, kio estas farenda. Retroiri ne eblas. Antaŭen aŭ mortaĉi.

Tiel certe okazis al la unuaj meksikanoj kaj hispanoj, kiuj traserĉis la ĝangalon pri padoj kaj vojoj por atingi la kaŝitajn kaj legendecajn urbojn de la indiĝenoj, kie ĉiuj tegmentoj estas el pura oro kaj la inoj havas kolĉenojn kun diamantoj, kiuj estas tiel grandaj kiel anasaj ovoj. Ĉar tiuj unuaj oroserĉistoj tiam ne trovis tiujn perdiĝintajn urbojn, ili serĉis orminejojn kaj diamantkampojn. Ili ankaŭ tiujn ne trovis kaj fine kontentiĝis pri mahagonligno, kiu post lerta traktado ja simile povas ŝanĝiĝi en oron. Tial la penoj kaj vojoj ne estis tute vanaj.

La karavanoj, kiuj nun iris sur tiuj padoj, restadis sur la padoj, kaj faris eĉ ne la plej etan provon elesplori la profundon de marĉoj aŭ iri ĉirkaŭvojojn por trovi aliajn, eble pli bonajn padojn. Ili estis pagitaj por tio transporti la komercovarojn je la plej mallonga kaj rapida vojo al la monterioj. Ili ankaŭ neniel estus preparitaj pri tio esplori aliajn vojojn. La maizoporciojn, kiujn ili kunportis por la

ŝarĝbestoj kaj la rajdobestoj, tiel kiel la porcioj por la propra nutrado, estis precize prikalkulataj, tiel ke perdo de du tagoj dum la marŝo povus fariĝi fatala. Ja ankaŭ transatlantika pasaĝervaporŝipo ne povas trovi novajn favorajn marfluojn.

La *arrieros* konis siajn bestojn. Muloj kaj ĉevaloj naskitaj kaj plenkreskintaj en Tabasko havas la famon esti bonaj marĉiraj bestoj, *bestias de lodo*. Ili estas kutimigitaj de juneco pri marĉoj kaj ŝlimo.Tial tiuj marĉiraj bestoj estas tre avidataj kaj tre multekostaj. En tiu ĝangalo tamen eĉ muloj el Tabasko komencas fariĝi kapricaj. Sed la plimulto de la bestoj, ĉe tiuj monteriaj karavanoj, ja preskaŭ ĉiuj, ne estas bestoj marĉiraj, sed bestoj, por kiuj kutimas steporegionoj. Kaj tiajn bestojn oni ja povas konduki tra rojoj kaj profundaj riveroj, sed ne tra marĉoj. Se ili sinkas eĉ nur ĝis la duono de la kruroj, ili fariĝas preskaŭ frenezaj pro timo. Ili ĉirkaŭtretadas, pliprofundigas la marĉon, fine ili liberigas sin el tio kaj; se oni ne bone atentas ilin kaj ne tenas bone per lazo, ili retrokuras kaj oni retrovos ilin nur je la sekva ranĉo.

Kompreneble oni ne lasas eskapi ilin. Sed nek per batoj nek per dolĉaj vortoj nek per teruraj sakroj oni povas

konduki ilin ekde tiu momento tra la ĝangalo. Eble sukcesas traigi ilin sen ŝarĝo, sed kun ŝarĝo sur la dorsoj estas senespere. La bestoj sentas, ke la ŝarĝo tiras ilin pli profunden en la marĉon kaj ke tio faras ĝin pli komplika por ili, eble eĉ malebla eltiri sin. Iafoje helpas havi bonajn bestojn el Tabasko kiel gvidajn bestojn kaj lasi sekvi la aliajn. Sed ofte misŝancas ankaŭ tiu truko.

Pro ĉiaj tiaj kazoj, kaj ĉar ankaŭ vere ekzistas la danĝero, ke la bestoj kun sia ŝarĝo tute mergiĝos, sen tio, ke oni povus savi ilin, la mulpelistoj ne longe provas eldevigi la marŝon tra marĉo. Spertoj instruis ilin, ke kostas malpli da tempo, kaj ke la ŝarĝoj kaj bestoj estas pli bone protektataj, se ĉe la la plej eta signo de marĉtimideco la marĉo estos transpontigita.

Oni detranĉas amase trunkojn kaj branĉojn, kiuj havas sufiĉe da foliaro kaj lerte dismetas ilin sur la marĉo. Pro la abunda foliaro de la branĉoj la marĉo perdas sian danĝeran aspekton por la bestoj. Tio estas grava afero. Kaj la dua afero estas, ke la grundo gajnas ŝajnan stabilecon. Tiu kovraĵo balanciĝas sur la marĉa supraĵo. Tiu ŝanceliĝado malcertigas la bestojn, tial ili iras tre atenteme, sed almenaŭ ili iras. Trans la rojon, kiu estas la

kaŭzo de la marĉiĝo de la tereno, necesas konstrui preskaŭ plenvaloran ponton el longaj fortikaj trunkoj kuntenataj per basto aŭ per enbatitaj fostoj ĉe la flankoj, kiuj estas abunde kovrataj per branĉetoj kaj foliaro, por ke la bestoj ne glitu kun la hufoj inter la trunkojn, se tiuj trunkoj moviĝas kaj transŝoviĝas.

Se ĉio estas konstruita, oni blovas la signalon kaj tiam la mulpelistoj ekhavas laboron. La bestoj, speciale la viglaj, kaj tiuj, kiuj iras ĉiun vojon, kiom ajn aĉe ĝi eble estas, urĝis jam al la konstruaĵo, kiam ankoraŭ ĉiuj peonoj okupiĝis pri tio dismeti branĉojn kaj branĉetojn. Bonaj bestoj, kiuj jam ekmarŝis, malfacile reteneblas. Ili volas marŝi antaŭen. Ili scias pro longa sperto, ke ili devas iri certan vojdistancon ĉiutage. Ili konas la kampadejojn eĉ tiukaze, se ili unuan fojon faras certan vojaĝon, ĉar je la kampadejoj dum longa tempo konserviĝas la odoro de tiuj bestoj, kiuj tie kampadis kaj la spertaj bestoj scias bone, kio estas kampadejo por la nokto kaj kio estas nur ripozejo por mallonga restado. Sur la kampadejoj por la nokto, la *parajes*, la bivakfajrejoj estas larĝigitaj per cindro kaj parte per bruligitaj lignoj, kaj je ĉiuj anguloj kuŝas la seka sterko de la bestoj, kiuj tie ripozis kaj manĝis. Spertaj bestoj, kiuj en marŝo longe distance

antaŭiĝas, aŭ car ili estas bonaj irantoj aŭ ĉar la postsekvaj bestoj ofte deĵetis sian ŝarĝon kaj oni devis ŝarĝi ilin ĉiam denove, haltas ĉe la *parajes*, tuj kiam ili alvenas tie. Tiel, kvazaŭ tie estus ŝildo, kiu montras la kampadejon. Ili sternas sin kaj atendas la postsekvan trupon. Ne nur la aspekto de la kampadejo ekkonigas ilin, ke tie estas kampadejo, sed ankaŭ la tempo. Se ili renkontiĝas ripozejon je la dekunua matene, ili plej ofte tuj iras plu sen atendi la aliajn. Sed, se ili alvenas ĉe la loko je la dua posttagmeze, ili hezitas, ĉar ili laŭ la tempo sentas, ke tio povus estis la kampadejo. Sed se ili alvenas je la kvara, tiukaze ili apenaŭ estas antaŭigeblaj plu, ĉar ili scias, ke post la kvara oni ne plu marŝos en ĝangalo kaj vepro, escepte de la retromarŝo, se en la sama tago ankoraŭ atingeblos la komenca ekira loko de la karavano.

La viglaj ŝarĝbestoj kuras certe ne tial tiom rapide, ĉar ili estas tiom laboremaj, sed tial, ĉar ili havas econ, kiun havas ankaŭ multaj homoj: la instinkton plenumi malagrablan laboron tiel rapide, kiel eblas, por poste havi trankvilon. Ju pli rapide la bestoj kun tia eco alvenas je sia celo, des pli frue oni deŝarĝos ilin kaj ili jam povas ripozi kaj manĝi. La plimulto de la bestoj estas kiel la plimulto de la homoj: Kion oni ne povas fari hodiaŭ, de

tio oni delasas, kaj oni faros tion en la sekva semajno, ĉar la laboro ja ne forkuras.

Estis tiuj viglaj bestoj, kiuj urĝis trans la ponton jam antaŭ ol tiu estis preta, kaj la peonoj devis iri flanken de la vojo, por ke la bestoj ne tretu ilin.

La pelistoj nun devis atenti pri tio, ke ĉiuj postsekvantaj bestoj sekvu tiom dense la urĝantajn antaŭajn bestojn, ke la malcertaj bestoj ne havu tempon ektimi pro la malagrable ŝanceliĝanta foliara kovraĵo trans la marĉon. La traboj de la ponto ne kuŝis firme. Ili ŝovis sin kaj puŝis sin tien kaj tien, kaj tio faris la hezitemajn bestojn tiel malcertaj, ke kelkaj el ili provis desalti flanken. Sed tiam ili tie vidis la nigran marĉan akvon, ektimis kaj saltis per unu fojo al la bordo, kie ili tial entretis la facilan kovraĵon trans la marĉon. Ĉiu entretita truo tuj suĉe plenigis sin per nigra akvo. Estis tie ĉe la marĉo sovaĝa kriado de la pelistoj, kiuj eligis nur frazojn kaj vortojn, kiuj estis diabla sakro pri putinfiloj kaj putinoj kaj virkaprecaj fikuloj, kiuj ĉiuj komunume festis orgion kun voluptaj ĝuoj. Sed iuj ĝuoj, eĉ tiuj de la plej modesta speco, tie estis tre malproksimaj.

La krioj kaj sakroj kaj la pelmelo de la urĝaj bestoj batantaj ĉirkaŭ sin kaj mordantaj ĉion kaj stamfantaj kaj ĝemantaj, ties anheloj kaj gruntoj, la susuroj kaj klakoj de la rimenoj kaj pakaĵŝnuregoj, la ĉeokaza falo de besto kaj ties batalo pri rapida restariĝo por aŭ eviti la batojn de la urĝaj bestoj aŭ por ne esti puŝita de la ponto, estis sufiĉe da vivo. La kriado kaj sakrado de la mulpelistoj kaj de dekoj de peonoj, kiuj parte staris ĝis la brusto en la marĉo kaj batis ĉe la flankoj la bestojn per branĉoj, por ke tiuj restadu sur la kovraĵo kaj la ponto, alogis grandan gregon de kriosimioj, la *gritones*, kiuj alte sidis kaj pendis en la kronoj de la arboj super la marĉo kaj levis teruran kriadon tian, ke ankaŭ la plej teruraj krioj de la *arrieros* kompare aŭdiĝis nur kiel flustrado.

Ĉio ĉi faris la ŝarĝbestojn ankoraŭ eĉ pli konfuzaj, tiel, ke ili tiumomente certe devis pensi, ke la infero malfermiĝos ĉe la plej proksima kurbiĝo de la pado. Sed ju pli la bestoj estis ekscititaj des pli cedis ankaŭ la kovraĵo trans la marĉon. La lastaj bestoj vadis jam ĝis la rimenoj en la marĉo, kaj necerte ili transiris la ponton, kiu tiam jam komencis disfali.

La trupo de laboristoj, kiujn oni intence retenis por

sekurigi la ponton por la bestoj, nun alvenis kaj tute foruzis la lastajn restaĵetojn, kiuj ankoraŭ postrestis de la marĉokovraĵo kaj de la rojoponto. Kiam duono de la trupo estis alveninta sur la alia flanko de la marĉo, je la transirejo jam foriĝis la kovraĵo kaj la ponto. La branĉoj kaj branĉetoj jam malsekiĝis kaj trafrotiĝis. Ili pliprofundigis la marĉon kaj la marĉo aspektis ankoraŭ eĉ pli timiga kaj pli nepasigebla ol je la antaŭa tago. Kelkaj traboj ankoraŭ etendiĝis trans la rojon. La viroj, ĉiuj kun nudaj piedoj, iris kiel ŝnurartistoj sur la solaj trunkoj, kiuj ankoraŭ postrestis, trans la rojon. La trunkoj ne plu kunestis, kaj neniu besto plu povus uzi la ponton au pli ĝuste tion, kio ankoraŭ restis de la ponto. La molaj bordoj de la rojo cedis, kelkaj el la trunkoj forglitis kaj drivis longe kaj transverse en la rojo. La plej sekva karavano, eĉ se ĝi ekzistus nur el du bestoj, devus konstrui novan ponton trans la marĉon.

Ne estis la ununura marĉo, kiun renkontis la karavano je tiu tago. Sed la dua kaŭzis malpli da laboro. Sed atendeblis, ke post la travado de la karavano kun ĉiuj bestoj, tiam, kiam sekvatage karavano alvenus tie, la karavanuloj devus labori plenan tagon por povi transiri. Se restis pli da tempo, la marĉaj truoj parte surkreskiĝis

de plantoj, parte la akvo disiĝis en aliaj direktoj, parte maljunaj arboj falis bonŝance tiel, ke ili formis aŭ ponton aŭ kovraĵon, aŭ ili kreis digon kaj parte sekigis la padon. Dum komplikaj marŝoj tra la ĝangalo de tiu speco, oni ĉiam vivas kun la espero, ke io okazos, kio plibonigas la vojon. Ofte oni povas fidi pri sufiĉe granda tertremo, kiu plibonigas la vojon aŭ pli malbonigas ĝin centoble. Foje estas terglito, kaj ne malofte trarompo al subtere fluanta rivero. Oni almenaŭ havas la esperon, ke la vojo ne fariĝos eĉ malpli bona. Sed tiu espero ofte trompas onin. Kaj oni miras pri la fakto, ke la vojo fariĝis tamen ankoraŭ pli aĉa.

Rimarko
paraje = loko, ejo

03

Estis je la dua tago de la marŝo tra la ĝangalo. La karavano ĉirkaŭ tagmeze restadis dum iom da tempo en loko, kiu nomiĝis *La Lagunita*. Akra eĝo de roko vundis piedon de Celso. Li kaŭris ĉe la rando de la akvo kaj forlavis sian sangon. La karavano ricevis la signalon de la agentoj ekiri kaj marŝi plu.

Celso vualis kotŝmiritan lanan disŝiraĵon, kiun li deŝiris de sia ĉemizo aŭ de sia pantalano, ĉirkaŭ la vunditan plandoŝvelaĵon. Li agis malprapide, ĉar Celso volis ligi la bandaĝon, kiom ajn kota ĝi estis, tamen tiel firme, ke ĝi ne forglitu kaj ne perdiĝu sur la vojo. Kiel ĉiuj anoj de lia raso, kiuj vivis kiel kamparanoj aŭ peonoj, li ne estis hezitema pri aferoj de korpaj vundoj. Li povis havi kvin centimetrojn profundan kaj dudek centimetrojn longan maĉetovundon en ŝultro aŭ eĉ similian, kvankam iom malpli profundan vundon en la kapo, kaj li nek fariĝus senkonscia nek hurlete petus pri kuracisto. Tiu helpus al li tie tiom malmulte, kiom en lia hejmvilaĝo, kie loĝas la plej proksima kuracisto du tagvojaĝojn malproksime, kiu verŝajne ankaŭ ne estas pli bona doktoro ol la pramaljuna akuŝistino en lia vilaĝo, kiu en sia vivo helpis enlumigi pli

ol kvincent infanojn sen lavi al si la manojn antaŭe kaj ofte ankaŭ ne poste. Kompreneble, duono de la infanoj kaj kvinono de la inoj kutime mortas. Sed tio ne estas ilia kulpo, sed la natura sekvo de la naskoj, kiujn ŝarĝis bonkora Dio en la ĉielo al ili kun senfinaj doloroj por amarigi al la homoj la antaŭnaskajn ĝuojn per dornoj, pikiloj kaj kardoj, por ke oni ne forgesu, ke la plej belaj kaj plej delikataj pekoj surtere estas heredaj.

Ne nur pro la doloroj Celso bandaĝis sian piedon tiel zorgeme, sed pro sperto. Li iam vidis, kiam li estis en la kafoplantejo en Soconusco, kiel viro hakis per maĉeto vundeton al si, kaj kiel tiam tero penetris en ĝin. Je la sekva tago la viro kapablis nek movi la kapon nek la ŝultrojn, kaj kelkajn horojn poste li estis morta. Helpe de la bandaĝo Celso volis protekti la vundon kontraŭ venena tero kaj samtempe li volis malhelpi, ke la vundo per ankoraŭfoja malfermiĝo pli grandiĝu kaj pli aĉiĝu. Kuracisto estis nek tie en la karavano nek en iu el la monterioj. Ĉiu devis atenti pri si mem, kaj ĉiu devis esti propra kuracisto. Tiu, kiu mortis, pruvis per tio nur, ke li ne havas rajton por vivi kaj li pruvis krome, ke li estis fripono, kiu trompis la agenton aŭ la monterion pri la ricevita antaŭpago.

La karavano jam ekiris kaj marŝis. Celso ankoraŭ ne tute fariĝis preta pri sia bandaĝo, kiam pretermarŝis lin ankaŭ la lasta trupo.

Post tiu trupo kiel gardisto kaj pelisto de la truporestaĵo rajdis El Zorro. Tiu nomo estis la kromnomo de unu el la du alpelistoj, kiuj kaptis Celson en Hucutsin por enspezi kvin pesojn. La alia havis la kromnomon El Camaron. Kial oni nomis unu el ili El Zorro kaj la alian El Camaron ne estis tute evidenta. Tiel, kiel ofte, la origino de kromnomo ne sufiĉe malkovreblas por kontentigi scivolemulon. La kromnomojn ambaŭ certe jam havis ekde sia juneco. Neniu, eĉ ne iliaj dungintoj, la du agentoj *don* Ramon kaj *don* Gabriel, konis iliajn ĝustajn nomojn. Kaj neniu sciis, kie ili vere estis hejme aŭ el kiu prizono aŭ el kiu prizonula transporto ili eskapis.

El Zorro surĉevaliĝis, rajdis malantaŭen kelkajn cent paŝojn por rigardi, ĉu unu el la du viroj forŝteliĝis malantaŭen, tiam li alvenis galopante ĉe la tielnomata vosto por kvazaŭ veki el dormo la lastajn marŝantojn kaj por ĵeti kvazaŭ ardantan cindron sub ties plandojn. Li vidis kaŭri Celson sur ŝtono, kiu ankoraŭ nun okupiĝis pri la knedado de la bandaĝo kaj pri la provoj kiel eble

plej bone surmeti la piedojn kaj iri sen tio, ke transŝoviĝos la bandaĝo.

„*Andele,* antaŭen,chamulano, olda stinkanta mulo“ vokis El Zorro al Celso. „*Andele, andele*, ĉu vi volas dormi ĉi tie kaj revi pri inaĉoj? Ek, antaŭen, la aliaj estas jam en la monterio!“

Ĉar Celso ne tuj ekstaris sur la piedoj kun sia pakaĵo, kaj ĉar El Zorro al Celso, kiun li ne tre ŝatis pro ties ribelemaj kontraŭparoloj, ree foje volis montri, kiu havas ĉi tie la rajton komandi, li batis lin per la vipo plurfoje forte sur la vizaĝon.

„Por ke vi ne forgesu, chamulano“, li diris, „ke estas mi la ladino kaj vi la kota chamulano.“

Celso nun jam levis sian pakaĵon dorsen kaj estis tuj post la ĉevalo de El Zorro, kiam li diris: „Tiuj batoj ankoraŭ mankis al mi por la finkalkulo, kaj la kvitancon vi ricevos ankoraŭ hodiaŭ, *cabrón,* virkapro*,* ĉe la plej pura Sankta Dipatrino.“

Celso vokis tion per sia majaa lingvo, en la tsotsila. El Zorro komprenis ĝuste nur iom aŭ iomete, el kio li

apenaŭ povis konkludi ion. Sed li komprenis la vorton filo de putino, kaj li sciis tial, ke Celso ne flatis lin.

„Mi la virkaprulon, la fikulon, kiun vi ĵus kroĉis al mi abunde redonos al vi, frateto mia“, li vokis, „lasu nin nur esti unue bele bonorde kaj konkorde en la monterio, kaj lasu min esti la ordonito, kiu gvidos la festeton. Vin mi tiam unue skurĝos, kiam mi ankoraŭ havos la plenan forton en la brakoj. Vin mi atendas jam delonge. Vi estas tro impertinenta kaj vi ankaŭ fiagitas ĉiujn aliajn. Vin kaj la celtalan viron, la ĉariston, vin ambaŭ mi ja traktos laŭorde.“

„Se vi atingos la monterion, hundido de kota putino“, respondis Celso.

Li iris ankoraŭ proksime post la ĉevalo. El Zorro faris siajn paroladojn nur malantaŭen, parte, por ke li estu certa, ke Celso ne perdu vorton el ili, parte, ĉar li esperis, ke li povu delektiĝi je la timigita kolera vizaĝo de la peono. Tial li ne atentis la vojon. La ĉevalo stumblis pro radiko. Ĉevaloj sur tiuj longaj solaj vojoj trans stepoj, tra veproj, ĝangalo kaj praarbaro, havas la kutimon atenti kaj bone aŭskulti, kiam parolas la rajdisto. Ili turnas la

orelojn kaj parte eĉ turnas la kapon flanken. Ili ja ne scias, ĉu parolado celas ilin aŭ ne, kaj ĉu en la longaj paroladoj eble estas inkludita komandovorto por ili, kiun ili volas sekvi. Ĉar tiukaze, se ili ne sufiĉe rapide sekvas la komandon, ili estas batataj per vipo. Rajdistoj sur tiuj longaj vojaĝoj estas ofte dum tagoj tute solaj kun sia ĉevalo. Kaj tiel, kiel homoj, kiuj vivas solaj, kutimiĝas paroli kun sia hundo kvazaŭ li estus homa kunulo, ankaŭ rajdistoj kutimiĝas paroli dum la marŝo kaj eĉ ĉe la bivakfaro al siaj ĉevaloj. La ĉevalo, kiu samtempe sopiras societon, post certa tempo aŭskultas sian mastron same tiel atenteme kaj ŝajne komprenante, kiel hundoj faras tion tiel bonege.

Ĉar la ĉevalo de El Zorro supozis, ke la paroloj povus enteni komandon, ĝi atentis pli zorgeme kaj pli precize pri la vortoj la paroloj ol rigardi tien, kie ĝi marŝas.

El Zorro, kiu tiom malmulte kompatis sian ĉevalon kiom la indiĝenojn, kiujn li kaptis, pelis dum la marŝoj kaj poste pagate per monatsalajroj skurĝadis, puŝis la spronojn profunde en la flankojn de la ĉevalo kaj samtempe li draŝis ĝin per fajfanta kaj doloriga bato sur la dekstran postaĵparton. La bato fakte pli celis Celson ol

la ĉevalon, ĉar lia tuta kolero koncentriĝis al la ulo Celso. Kaj la ĉevalo, ĉar ĝi iom miskondutis, devis senti la koleron.

La ĉevalo, samtempe sentante la spronojn sur la flankoj kaj la vaste svingitan baton sur postaĵparto, baŭmis pro doloro kaj moviĝis dekstramanen, ĉar la bato trafis dekstre. La vojoj tra la ĝangalo ne rajdeblas galope, escepte eble de kelkaj mallongaj vojdistancoj. La vojoj estas tiel konstruitaj, ke besto devas kvazaŭ seninterrompe palpi sian vojon. Ĝi povas degliti flanken, malantaŭen, antaŭen; estas grandaj kaj malgrandaj ŝtonoj survoje, kiuj ruliĝas aŭ cedas; elstaras radikoj en ĉiuj direktoj; tutaj arboj kuŝas laŭlonge aŭ transverse sur la vojo, estas krutaĵoj supren kaj krutaĵoj malsupren; jen flanke de profundaj abismoj, jen al la alia flanko. Sed la plej malica afero estas la profundaj truoj en la vojo, truoj, kiuj ekestis pro kio ajn, kiuj kutime estas malpeze kovrataj kun foliaro, branĉoj, marĉo kaj radikoj, jen kovraĵoj kreataj de la naturo. La truojn oni vidas nur tiam, kiam oni jam sinkis kun la ĉevalo en ilin aŭ, se la kruroj de la ĉevalo firmpinĉiĝis ĝis la genuaj artikoj aŭ ĝis la ventro. Se la ĉevalo trotus, aŭ eĉ pli terure, galopus, ĝi neeviteble rompus la krurojn al si, se ĝi sinkus en unu el

la miloj de la truoj. La plej rapidaj bestoj, kiuj estas plej bone ekzercitaj kaj tre valoraj, atingas rapidan tempon per tio, ke ili, sen vere troti, tre rapide iras, sed ne tro rapide, tiel, ke tia besto povas ankoraŭ rapide retiri la piedon, se ĝi sentas, ke la tero cedas. La ekzercitaj bestoj iras ĉiam tiel, kvazaŭ ili irus sur ovoj, kiam ili marŝas en ĝangalo.

En la proksimo de vastaj marĉoj kaj praarbaraj areoj, tiaj truoj estas plej oftaj kaj oni trovas dum tagoj vojpartojn, kie la tuta tero estas kavigita kiel kribrilo. Krome oni trovas aliajn vojpartojn, kie la kovraĵo estas tiom loza, ke ĝi ŝanceliĝas, kiam oni transrajdas ĝin aŭ, kiam oni rajdas trans subterajn kavernojn, kiuj havas nur tute maldikan ŝtonan kovraĵon, kie aŭdiĝas la obtuzaj eĥoj de la rajdobestaj hufoj.

Tie, kie tio okazis, estis tiom marĉe; ĉar la ripozejo, kiun la karavano ĵus forlasis, troviĝis parte en marĉo, kiu neniam elsekiĝis, ĉar sur unu el la flankoj estas eta lago, *La Lagunita,* kun multnombraj fontoj sur sia grundo, kiujn oni ekkonis ankoraŭ ĉe la surfaco de la lago.

La ĉevalo de El Zorro, tute konfuzita pro la doloro de la

enbatitaj spronoj kaj la kruela bato perdis ĉian atentemon. Ĝi saltis al la flanko de la vojo kaj tiom forte saltis teren, ke ĝi sinkis kun ambaŭ kruroj en truojn. Ĉar tio okazis dum la saltado, la postkruroj baŭmis supren, la besto provis turniĝi kaj falis flanken. La maldekstra antaŭkruro turniĝis el la truo, dum la dekstra antaŭa kruro sinkis eĉ pli profunden. La besto laboris kiel freneziĝinta, saltis kaj batadis ĉirkaŭ sin kaj fine eltiris ankaŭ la dekstran antaŭan kruron. Ĝi staris tiam anhelante kaj tremante dum iom da tempo surloke kaj atendis pacience pri tio, ke la rajdisto ree surĉevaliĝos.

La rajdisto, kiam sinkis la besto tiom neatendite en la truojn, flugis kiel sago trans la kapon de la ĉevalo. Li falis ĉe tio kun la vizaĝo en marĉotruon, elgrimpis kaj ricevis de la batadanta besto hufon kontraŭ la ventron. Li retrofalis, sakris, kaj komenis viŝi la ŝlimon el la vizaĝo.

Kiam la ĉevalo sinkis en la truojn, Celso tuj lasis gliti sian pakaĵon de la dorso kaj saltis flanken por malhelpi, ke la timigita besto hufbatu lin, aŭ, por ke la forgalopanta besto tuj post sia liberiĝo ne tretu sur lin.

El Zorro, ĵus kiam li kapablis fari nur palpebrumon el la

ŝlimaj okuloj, tuj kriis: „Venu ĉi tien, chamulano. Ĉu vi ne vidas, ke mi sidas ĉi tie en la merdokaĉo. Helpu elen min kaj atentu, ke la bestaĉo ne forgalopu. Retenu ĝin. Ek, stinkfurzo de chamulano.“

Dum El Zorro tion diris, li skrapis kaj gratis la gluglan ŝlimon el la okuloj kaj la hararo, kraĉis, kaj parte kvazaŭ iomete stultiĝinte pro la falo, li ree ŝmiris la ŝlimon en sian vizaĝon. Kiam li konstatis tion, li forte skuis la ŝlimon de la manoj. Li provis rektiĝi, sed kaj pro la hufobato, kiu trafis lin ventre, kaj pro liano, kiu retenis lian piedon, kaj, ĉar li estis tiom kolera, ke li ne kapablis decidi sin al certa ago, li ne povis leviĝi.

„Hundo, diodamnita, venu ĉi tien kaj eltiru min fine“, li kriis kiel obsedito.

„Ya me voy“, diris Celso, „mi ja jam venas. Kaj mi venas ĉifoje rapide kaj volonte.“

Li ligis la ĉevalon arben. Kiam li volis levi la bridon, kiu trempiĝis tere, li vidis tie fortikan eburan branĉon. Li levis ĝin, kaptis ĝin firme en pugno kaj proksimiĝis al El Zorro.

El Zorro serĉis sian poŝtranĉilon por tratranĉi la lianon, en kiu firmligiĝis unu el liaj piedoj. Nur per la manoj li ne povis disŝiri ĝin. Li vidis Celson, kiu proksimiĝis kun la branĉo.

Celso hezitis nur dum sekundo. Li aŭskultis, ĉu tiukaze, se oni juĝas tion laŭ la vokoj de la mulpelistoj, la trupo estis jam sufiĉe malproksime kaj tro kovrita de la densa ĝangalo, por ke iu povu vidi kaj aŭdi, kio okazas tie.

„Por kio vi bezonas tiun *palo,* la grandan bastonon?“ demandis El Zorro. Liaj okuloj disvastiĝis, lia buŝo gape malfermiĝis, lia vizaĝo verdiĝis pro terura ektimo.

Kun la piedo ankoraŭ nun firme tenate de la liano, li turniĝis je duono kaj surgenuiĝis. Ambaŭ manojn li tenis alte kaj vaste malfermis la fingrojn. Ĉe tio la poŝtranĉilo falis el liaj manoj.

Celso trafis lin inter ambaŭ manoj, kaj ĝuste tien, kien li celis. Li levis la poŝtranĉilon, kiu ankoraŭ ne estis malfermita kaj metis ĝin denove en pantalonpoŝon de El Zorro. Tiam li kondukis la ĉevalon proksimen.

Li levis la fiksitan kruron de El Zorro. Ĉu li estis morta aŭ

ne, pri tio Celso ne tre zorgis. Li volis lasi al la ĉevalo parton de la honoro elmondigi ties turmentiston, por ke la ekvilibro en la mondo estu rekreita.

Celso premis la piedon de El Zorro en la piedingon, bone firmligis ĝin kaj lerte ŝovis la spronon en fendon de la piedingo, tiel, ke la piedo neniel povos gliti el la piedingo, sub la kondiĉo, ke la rimeno de la sprono ne disrompiĝos. Tiam li turnis la piedan pinton en la piedingon tiel, ke la piedo en ĝi pendis kvazaŭ kiel en maŝo. Ĉar la piedingo laŭ meksika maniero havis antaŭŝuon el ledo, Celso sufiĉe plivastigis la kunkudron, kiu jam je duono estis malfermŝirita por preme enpuŝi la piedon tiel, ke oni prefere devus detranĉi la piedon aŭ dissegi la piedingon antaŭ ol oni havus la eblon liberigi la kruron eksteren.

Poste li okupiĝis pri la lazo je selobutono.

Kiam ĉio ĉi estis farita, li tiris la ĉevalon sur la vojon, donis al ĝi softan baton sur la postaĵon, kaj la ĉevalo ektrotis.

La korpo de El Zorro treniĝis kun la kapo laŭtere. La korpo ĉe la irado de la besto ĉiam ŝoviĝis iom sub la ventron de la ĉevalo. Ĉe tio premiĝis la sprono en la

flankon de la besto kaj la ĉevalo ektrotis pli rapide, posttirante la korpon je duono sub si. La besto ekscitiĝis kaj komencis kuri. Ĉe tio la kapo de El Zorro batadis kontraŭ la ŝtonojn kaj radikojn kaj kontraŭ la arbojn. Ĉiam, kiam la ĉevalo komencis iri pli lante, ŝoviĝis la korpo sub la ĉevalon, la sprono ekpremiĝis en la flankon kaj la ĉevalo ree komencis kuri. Celso iris trankvile sian vojon. La ĉevalo nun jam tiom antaŭis, ke li ne plu vidis ĝin.

Li konis la vojon sufiĉe, ĉar li ja jam dufoje marŝis ĝin. Unufoje tien, kaj unufoje reen. Kaj kiam li marŝis kiel akompananto de tiu etkomercisto, li atenteme devis observi la vojon.

La vojo turniĝadis kun centoj de spiraloj plu, laŭ la roka regiono kaj laŭ lagoj, riveroj kaj marĉoj, kiujn evitis la vojo, ĉar ne estis pontoj kaj oni povis kruci la riverojn nur tie, kie ili ne estis tro vastaj kaj ne tro forfluigaj.

Celso atingis nun longan kurbiĝon de la vojo, kiu volviĝis ĉirkaŭ altan monton, kiun la ŝarĝbestoj ne povis iri sur rekta vojo, ĉar ĝi estis tro kruta kaj tro plena de ruliĝantaj ŝtonetoj.

Celso ŝtreĉis ĉiujn siajn fortojn. Kiel kaprino li premiĝis flanken tra la densa dorna arbustaĵo kaj grimpis per manoj kaj piedoj sur la monton. Li ne supozis, ke li povus sukcesi. Ĉiumomente li havis la senton kvazaŭ lia koro transsaltus plurajn batojn kaj haltus. Tiam denove li havis la senton, kvazaŭ lia polmo eksplodus.

Gutante pro ŝvito kaj anhelante kun vaste malfermita buŝo kaj flirtanta nazo, li atingis la montopinton.

Li falis, lasis degliti la pakaĵon teren, viŝis la salan ŝviton el la okuloj, kiuj ŝajne firmgluiĝis. Li frotis forte la nukon kaj la gorĝon, frotis sian maldekstran bruston kaj marteladis ĝin per pugno, plurfoje li profunde kaj brue enspiris kaj tiam li levis sian pakaĵon denove.

Ĉe la malsuprenkurado sur la alia flanko de la roko li ruliĝis multajn fojojn tuj dudek metrojn. Sed li ĉiam restariĝis kaj antaŭeniĝis saltante. Li lasis fali sin, ruliĝis, kiam li supozis, ke li povas fari tion sen deskrapo de sia haŭto, aŭ kiam li vidis, ke en certa distanco estos arbustoj kaj arboj, al kiuj li povos kroĉiĝi, por ke li ne ruliĝu en abismon, se li ne povus halti dum sia sturmrapida kurado.

Li venis sur la vojon, kiam tie ĵus estis pretermarŝinta la antaŭtrupo kaj la marŝantaj laboristoj unu post la alia, iom post iom, sekvis la antaŭan trupon.

Li ne iris tuj sur la vojon el la densa ĝangalo. Li tre proksimiĝis al la vojo kaj kaŝis sin dum certa tempo post arbusto. Li lasis gliti teren la pakaĵon kaj tiris la pantalonon malsupren. Kun parte malsuprentirita pantalono li tiam paŝis el la arbustaĵo kaj alvenis sur la vojo. Tie li skuadis sian pantalonon, tiam li tiris ĝin ree supren kaj denove firmvolvis ĝin.

„Mi ĵus eligis bonan laŭordan monteton, fulmotrondro!“ li diris ridante, kiam la sekva grupo alvenis. Kelkaj el la viroj deĵetis siajn pakaĵojn por restadi kelkajn minutojn, por viŝi la ŝviton el la bruldoloraj okuloj kaj por kapti freŝan aeron.

Celso anhelis kun plenaj pulmoloboj. Sed tio ne tre frapis la atenton de la ripozantaj viroj. Ĉiu havis sufiĉe da okupo pri si mem.

Tiam diris Celso: „Mi postkuris junan sovaĝan porketon. Mi jam supozis, ke mi certe kaptos ĝin, sed tiam ĝi tamen ankoraŭ forglitis kaj tuj en tian malaltan dornan

arbustaĵon, ke mi devis rezigni pri la ĉasado. Kian bonegan rostaĵon tio donus vespere! Tiu besteto ĵetis siajn krurojn sur mian postaĵon. Ĉe la diablo! Kiom rapide tia juna ido povas kuri! Mia ventfajfilo ankoraŭ tute malplenas kaj mi devas blovi kiel maljuna mulo kiun ĉasis tigro. Ĉe virgulino Maria! Se mi estus povinta feki la monteton antaŭe, mi tamen estus kroĉinta la porkidon. Sed tiel mia ventro plenis ĝis la kolo."

„Jes ja, vi ĉiuj eble pensas, ke tia eta fasketo de ido de sovaĝa porko ne povas kuri", diris unu el la viroj. Sed mi scias tion pli bone. Ankaŭ mi jam ĉasis tian, du aŭ tri horojn, ĝis mi tute perdis la vojon en la *selva*, en tiu damnita ĝangalo. Sed la porkidon mi ne kaptis. Tiuj estas rapidaj kiel musoj. Kaj ĝuste tiam, kiam oni pensas, ke oni tuj povos kapti ĝin sufiĉe tenere je la vosteto, jen ĝi fuĝos en truon aŭ en arbustaĵon aŭ Satano sciu kien ajn, kiel glutite. Kaj se alvenos la maljunaj sovaĝaj porkoj, jen kuregu, filo mia, aŭ venos via horo lasta. Ne havas sencon postkuri, ankaŭ ne post *pescuintle*. Se vi ne havas bonan hundon, prefere ŝparu vian aeron."

Ĉiuj uloj tuj komencis rakonti propran ĉasraktonton, por montri tiel, ke ili ne estas plu beboj.

Celso eltiris sian pakaĵon el la arbustaĵo, prenis cigaron el faldo de ĝi, bruligis ĝin, levis sian pakaĵon kaj diris: „Mi devas rapidi, *muchachos*, mi apartenas al la trupo antaŭe, kie estas miaj *compañeros,* miaj kamaradoj. Tiuj nun certe jam sufiĉe antaŭas.“

Li ektrotis, dum la viroj ankoraŭ iom ripozis kaj interbabilis, ĝis alvenis la sekvaj grupoj, kiuj tie enombre volis ripozi iom. Strio de frideta akvo elpremiĝis el fendo de alta rokvando, kaj tiu fonto estis la kaŭzo de tio, ke ĉiu viro, kiu preteriris, sentis la urĝon tie restadi.

Rimarkoj
andele = antaŭen
compañeros = kunuloj, akompanantoj, kamaradoj
majaa lingvo = lingvo de la majaoj en Meksiko
palo = bastono
pescuintle = speco de kuniklo, luksa manĝo en Meksiko kaj en najbaraj landoj

04

La trupo atingis la kampadejon je la kvara posttagmeze. La postvenintoj, la preskaŭ-lamiĝintoj kaj tiuj viroj, kiuj jam ekhavis febron, alvenis je la kvina.

Ne frapis la atenton, ke mankis El Zorro, kiu plej ofte estis je la fino de la karavano por vigligi la neaktivajn, kaj kiu rajdis plej ofte kvaronon de horo post la lasta postveninto por estis tute certa, ke neniu postrestis. Tial la agentoj ne sentis lian mankon.

Sed tiam alvenis viro, kiu spiris tre pene. Ekscitite li kuris al la bivakfajro, ĉe kiu kaŭris la agentoj kaj la komercistoj: „*Patroncito*, jen pli supre ĉe la vojo firmkroĉiĝis la ĉevalo de El Zorro je arbotrunko kaj El Zorro falis malsupren.“

„Se la filo de putino falis de ĉevalo, li ankaŭ ree povos surseliĝi, li ne estas plu bebo“, diris *don* Ramon.

Neniu serioze traktis la ekscititan viron. Kial zorgu la agentoj tiom pri la bonfarto de la alpelistoj. Se pelisto falas de la ĉevalo, li taŭgas neniel. Verŝajne li estas denove ebria. La diablo sciu, de kie li havas la tekilon.

Eble li forprenis ĝin de laboristo. Se li ne plu povas surseliĝi, jen li restadu en la koto, tio okazas juste al li. Bebetojn oni ne bezonas en tiu negoco.

La agentoj kaj komercistoj havis pli gravajn faraĵojn ol okupiĝi pri El Zorro. De tiu speco ili povis havigi al si en ĉiu urbeto du dekojn, se ili volis. Kaj ĉe ĉiu deko ili ricevus kiel aldonaĵon ankoraŭ du virojn, kiuj kunrajdus kaj ne postulus alian salajron krom povi manĝi la restaĵojn, kiujn postlasis la agentoj kaj komercistoj. Kaj tio plej ofte ne estis multe da manĝo.

„Ĉu sekvajare ni povos ree kunkolekti tian grandan kaj bonan karavanon kiel ĉifoje, *don G*abriel, tion eĉ ne *don* Porfirio povas promesi al ni. Multe malpli la guberniestro“, diris *don* Ramon, kiam li metis la *frijoles*, la fabojn sur la varmegajn *totopostles*. „Ankaŭ tiu ĉi negoco fariĝas post ĉiu tago pli aĉa kaj pli mizera. Kaj malĝojiga hundovivo ĝi estas eĉ aldone. Tion vi ja iam ankoraŭ akceptos, *don* Gabriel. Ĉi tie oni do sidas nun kiel sovaĝa indiano ĉe la fajro sen tegmento super la kapo, manĝaĉas kiel porko kaj ne kiel bona katoliko. La edzino hejme kuŝas sola en la lito, kaj ĉifoje ni havas eĉ ne unu putinon en la tuta karavano. Fariĝas pli kaj pli

malĝojige, ĉiu ajn negoco.“

Don Gabriel estis multe malpli pesimisma pri la negoco. Kompare al liaj antaŭaj negocoj, tiu ĉi estis orminejo. Sur la tuta longa marŝo li pensis ĉiam nur pri unu afero: kiel li povas forpreni la negocon de don Ramon kaj kiel ebligi, ke suferu don Ramon sur la vojo reen akcidenton. Kaj akcidenton tian, ke ĉe la finkalkulado neniu povus ĉeesti, kiu kun bona konscienco povus ĵuri, ke don Ramon ne ŝuldas kvinmil pesojn al don Gabriel, kiun don Gabriel pruntis laŭdire en la kuro de la aĉetoj de peonoj al don Ramon. Sed, se ne okazus, ke don Ramon suferus akcidenton, tiukaze la gajno de don Gabriel estus eĉ ne triono de kvinmil pesoj. Kaj don Gabriel devus labori streĉe ankoraŭ kelkajn jarojn antaŭ ol li povus fari la negocon sola kaj nur por sia propra favoro.

„*Un accidente*, akcidento, granda malfeliĉo“ kriis tiumomente voĉo el la anserbleka babilaĉo de la viroj, kiuj ĵus boligis akvon. Don Gabriel, kiu seninterrompe pensis pri malfeliĉo, kiu trafu lian negocan partneron, paliĝis, kiam li aŭskultis la kriadon. Sed tiam li vidis, ke don Ramon kaŭras trankvile manĝante kaj intertempe parolante, kaj per tio li revenis al la realeco.

La *caballeros* tie ĉe la bivakfajro ne ekscitiĝis pro la kriado pri la akcidento. Ili atendis unue ĝis venos preciza raporto. Verŝajne estis nur peono, kiu glitis en abismon, aŭ estis mulo, kiu falis. Aŭ estis ĉevalo aŭ mulo, kiu trafis viron per hufo. Se oni volus ekscitiĝi en tiaj marŝoj pri la kriado de aĉa indiano, oni havus neniam minuton trankvilan.

La peonoj estis forkurintaj de siaj fajroj kaj staris poste en densa aro kune. La aro proksimiĝis al la kampadejo. Kiam ĝi estis nur dudek paŝojn for de la fajro de la *caballeros*, ĝi malfermiĝis kaj lasis malfermita trairejon.

La *caballeros* nun ekstaris nerapide kaj iris renkonte al la aro. Jen viro, kiu tenis la ĉevalon de El Zorro je la brido. La ĉevalo kaptiĝis sur sia vojo plurajn fojojn per la malsupren pendantaj rimenoj kaj ŝnuroj ĉe arbustoj kaj arbotrunkoj. Sed evidente ĝi povis liberigi sin ĉiam denove, eĉ se tio lacigis ĝian marŝon konsiderinde.

„Tio estas ja El Zorro“, diris *don* Ramon. „Ja kion li faris? Ĉu li ne kapablas bridi ĉevalon? Ĉe la diablo, li aspektas ja terure frakasita. Oni ne plu ekkonas lin. Li povus esti ĉiu alia. Sed estas lia pantalono, estas liaj botoj kaj liaj

sekaj kaj ŝrumpigitaj ledogamaŝoj kaj estas lia ĉevalo.“

La *caballeros* proksimiĝis nun tute.

La ĉevalo estis kovrata per ŝvito sur la tuta korpo. Ĝi tremis kaj ĝiaj okuloj estis grandaj kaj plena de teruriĝo. Oni sentis, ke ĝi estis feliĉa esti inter vivantaj, babilantaj kaj gestadantaj homoj, ke ĝi flaris proksime la aliajn bestojn kaj, ke ĝi troviĝas en ĉirkaŭejo, kiu estas kutima al ĝi, kaj kiu ĝin savis de la terura fantomeca timo, kiun ĝi travivis en la lastaj horoj.

„Kiel tiu putinosklavo tion nur aranĝis, ke li glitis tiel sub la beston?“ diris don Alban, unu el la komercistoj. „Li fuŝas mian tutan apetiton. Ni danku al la nemakulita Sankta Virgulino, ke ni havas kelkajn botelojn da komiteko ĉe ni. Aŭ mi ne povus liberigi min dum la tuta nokto de tiu fantomeca aperaĵo.“

La selo jam glitis malsupren, tiel, ke la sido firmgluiĝis ventre surflanke de la ĉevalo. Sed la fortikaj bendoj fermtiriĝis tro por tio, ke la selo povus gliti ĝis la postaĵo de la ĉevalo kaj poste esti forŝovita trans la malantaŭajn krurojn. Tio okazas ofte, se la rajdisto sidas sur la ĉevalo kaj la besto baŭmas pro timo kaj tial deiĝas la selobendoj.

Tamen estus eble fortiri la selon, se ne volviĝus maŝo de la lazo firmligita ĉe la selo per fortikaj krudaj rimenoj per movo trans la kolon de la besto. Jen la kaŭzo, kial la selo plu pendis flanke kaj ne povis gliti malantaŭen.

El Zorro havis piedon en la piedingo. Verŝajne li volis turni sin sur la ĉevalo kun la supra korpoparto malantaŭen por komandi postvenantojn, kaj ĉe tio li tiom misturnis la piedon en la piedingo, ke la piedo ne liberigeblis ĉe timema baŭmo de la ĉevalo.

La vestoj de El Zorro tute disŝiriĝis de la treniĝado ĉe la arboj kaj arbustoj.

La vizaĝo ne estis ekkonebla. La kapo estis kota amaso, apenaŭ plu karno troviĝis sur la kranio kaj nur kelkaj hartufoj. La nuko estis kvazaŭ viŝĉifono.

„Detranĉu lin de la selo, se vi ne povas tiri lin el la piedingo“, diris don Ramon. „Sternu lin tien transen post la herbojn. Ni enfosos lin pli malfrue. Deseligu la ĉevalon kaj konduku ĝin al la aliaj bestoj. Pobre bestia, kompatinda besto.“

Rimarkoj

frijoles = faboj

totopostle = granda tortiljo (rostita maizoflano el muelitaj kaj kaĉigitaj maizograjnoj, maizaj kukoj, maizaj panetoj) kun diametro de 35 centimetroj kaj du milimetrojn alta.

05

La *caballeros* reiris al sia bivakfajro. La antaŭĝojo pri la manĝo estis fuŝita. Ili parolis pri ĉiaj eblaj aferoj. Ĉeokaze pri aliaj akcidentoj, kiujn ili vidis iam aŭ pri kiuj oni parolis al ili.

„Eligu tuj la komitekon, *don* Alban“, diris *don* Gabriel. „Mi esperas ja, ke vi ne lasos sidi nin sekaj en tiaj cirkonstancoj, ĉu?“

„Certe ne, *caballeros*, la komiteko apartenas al vi tiel kiel al mi. Priservu vin. Nur ne timeme hezitadu. Mi havas bone ŝarĝitan baterion de boteloj ĉe mi. Kion ni trinkos ĉi tie, tion mi ne devos vendi en la monterio. *Salud, caballeros*.“

Don Ramon vokis la serviston, kiu estis lia kuiristo kaj tiu de *don* Gabriel: „Ausencio“ voku ĉi tien El Camaron. Mi devas paroli kun li.“

„*Orito, patroncito*“, respondis la servisto kaj tiam li kriis: „*El Camaron! El Camaron! Al Patron*.“

Li devis lin serĉi kaj trovis lin en la grupo de la *arrieros*.

La *arrieros* estis en tiu trupo la socia tavolo al kiu apartenis El Camaron. Estis la tavolo de la suboficistoj en tiu armeo. „*Ya me voy*, jes ja, mi ja jam venas“, diris El Camaron kaj sekvis la serviston.

El Zorro estas via *compañero*, via kamarado, ĉu?“ demandis *don* Ramon.

„Ĉu *compañero,* nu jes, en tiaj cirkonstancoj, *compañero“*, diris El Camaron. „Ankaŭ mi ne konas lin pli bone ol ĝuste de tiam, kiam ni kune laboris por vi, patrono.“

„Sed vi ja almenaŭ scias, kie li estas hejme, ĉu?“

„Kiel mi sciu tion, *jefe*“, rediris El Camaron.

„Kie vi renkontis lin unue?“

„En Calabos, en Tukstla, en prizono, *jefe*.“

„Kiaj bonaj fratoj“, ridante diris *don* Alban. „Venu ĉi tien, El Camaron, trinku gluton.“

„*Muchas gracias*, mi tre dankas al vi, patrono“, diris El Camaron kaj enverŝis gigantan gluton el la transdonita

botelo. Li ja ne sciis, ĉu oni ofertus duan fojon la botelon al li. Kaj tion, kion oni jam havas en la stomako, neniu plu povos ŝteli de oni.

„En la karcero, en Tukstla do“, kapjesante diris *don* Ramon.

„Sed mi estis tie tute senkulpa, *jefe*, tion vi rajtas kredi al mi, tion mi povas ĵuri ĉe Sankta Virgulino kaj la infano.“ Dirinte tion, li faris kelkajn bone ekzercitajn krucosignojn antaŭ la buŝo kaj kisis dikfingron por emfazi la ĵuron.“

„Kial El Zorro estis en la karcero?“ demandis *don* Alban.

„Tio estis speciala afero, patrono. Vi ja scias, kion mi opinias per tio“, respondis El Camaron per larĝtirita buŝo.

„Kia afero?“ volis scii *don* Ramon.

„El Zorro tie havis knabinon, certa *criada,* servoknabinon. Li asertis, ke ŝi havis amaferon kun *carretero,* kun ĉaristo. Li hontinde kverelis pro tio kun la *muchacha,* tiel, kiel tia afero deruliĝas kutime, kaj kiam li rigardis tiam pli atente, jen la *muchacha* ne vivis plu. Jen

okazis granda kriado. Kaj tial ili simple metis lin en la *calabos*, en la karceron.“

„Ĉu ili lin do ne retenis en la karcero?“ demandis *don* Gabrielo.

„*Que va no*. Vidis ja neniu, ĉu li mortbatis la knabinon aŭ ĉu falis ŝtono de la tegmento sur ŝian kapon. Monon li ne havis, eĉ ne centavon. Jen neniu okupiĝis pri tio, ĉu li restadu en la karcero ĉu ne. Kaj tial ili lasis lin foriri post kelkaj semajnoj.“

„Ĉu vi kune eliris?“ demandis *don* Ramon.

„Ne, mi estis enliberigita multe pli frue, mi ja ne faris ion, mi estis tie tute sen mia kulpo.“

„Vi laboris ja en Tukstla ĉe *don* Elizeo kiel mozo, do kiel helpanto“, diris don Ramon.

„Tio estas la vero, *jefe, es la verdad.“*

„*Don* Elizeo havas en Tukstla butikon, li estas mia *compadre“,* klarigis *don* Ramon al la *caballero*.

Li turnis sin denove al El Camaron: „*Don* Elizeo ordonis

meti vin malantaŭ la *rejas,* post la ferajn kurtenojn de la karcero, ĉar vi ŝtelis ĉe li medicinon. Kiam vi malfermis la keston vi vendis medicinon al *don* Ismael, al la turka komercisto, kiu iras kun sia fatraso al foiroj, al *ferias*.“

Tio estas *mentiras,* malicaj mensogoj, *jefe*. Mi neniam tuŝis ion, kio apartenas al mia patrono.“

„Ne provu iam tuŝi ion, kio apartenas al ni, fi-fikulo, filo de putino! Jen ni ne metos vin en karceron, ni pafos kuglon en viajn intestojn“, diris *don* Ramon. Tiam li parolis plu: „Kaj vi ambaŭ, vi kaj El Zorro, vi sidis ja ankaŭ malantaŭ feraj kurtenoj en Huixtla. Ĉu tio ne pravas?“

„Ĉu El Zorro enprizonis en Huixtla, tion mi ne scias, *jefe*, ĉe Sankta Virgulino kaj Josefo, tion mi ne scias. Sed mi certe ne troviĝis en tiu *calabos.*“

„Ĉu ne? Sed jen, li mangestis al *don* Gervacio, „li konas vin de Huixtla. *Don* Gervacio, ĉu li ne estas la sama kanajlo, pri kiu vi scias la rakonton?“ demandis *don* Ramon.

„*Preciso*, tute precize“ rediris *don* Gervacio, la alia

komercisto.

„Vi ŝtelis kun El Zorro en la bieno *Peña Flor* ĉe *don* Adelino ok bonajn mulojn, kaj tiam vi tute lerte ŝanĝis kun El Zorro la brulmarkojn, kaj en Huixtla vi volis vendi la mulojn kun via kunkrimulo El Zorro, al bienulo, al *don* Federico, kiu posedas la kafobienon Providencia en la distrikto Ocunusco. Sed malbonŝance por vi hazarde ĉeestis la iama *mayordomo* de Peña Flor el Huixtla, kiu tie havas nun ranĉeton, kaj tiu zorgis pri tio, ke oni arestis vin friponojn. Ĉu tio pravas aŭ ĉu tio ne pravas, filo de putino?“

„Mi, ĉu? Mi estu ŝanĝinta brulmarkojn? Mi eĉ ne scias, kiel oni faras tion. *Jefe*, jen tuj la povra animo de mia avino ĝemu en la purgatorio, se mi iam ajn estis en Huixtla; ne en mia tuta vivo, kaj des malpli mi estis prizonulo en la *calabos* en Huixtla aŭ en Motocintla, ne dum mia tuta vivo kaj neniam krome.“

„Pri viaj agoj kaj aventuroj kaj tiuj de via kunkrimulo El Zorro en Montocintla kaj en Niquvivil ni prefere ne interparolu. Alikaze ni ankoraŭ devos pendumi vin ĉi tie, por protekti nin kontraŭ vi“, enmiksiĝis en la

interparoladon *don* Matildo, etagento, kiu posedis en la trupo nur ĉirkaŭ dekkvin virojn varbitajn por la monterio.

„Jen, trinku ankoraŭ gluton, *Camaronĉjo*“, diris *don Alban* kaj transdonis al Camaron la botelon kun tekilo.

El Camaron denove bone tralavis la gorĝon.

„Gracias, caballeros“, li diris kaj purviŝis sian buŝon per pinto de sia ruĝflore ornamita koltuko.

„Malkovri ĉi tie vian vivraporton kaj tiun de El Zorro, nin certe okupus ĝis la sekva vespero“, diris *don* Ramon, „kaj ĉu ni tiam estos fininta tion, pri tio mi dubas serioze. Do, diru al ni almenaŭ de kie estas El Zorro, por ke ni povu informi lian patrinon aŭ liajn fratojn aŭ kiun ajn.“

„Eble li estas de Pichucalco“, respondis El Camaron. „Unufoje li iam diris ion tian. Sed tute certe mi ne scias tion.“

„Nu, se tiel estas“, diris post kelke da tempo *don* Ramon, „jen ni devas fari nenion plu krom enfosi lin. Venu, *caballeros*.“

La viroj leviĝis.

Ili alportis kenajn torĉojn, kaj la viroj serĉis taŭgan lokon, kiu troviĝas ĉirkaŭ kvincent paŝojn de tie.

„Jen malagrabla sento“, diris *don* Ramon, „havi entombigiton tro proksime al la kampadejo. Kiu sciu, kiom ofte ni ankoraŭ devos kampadi ĉi tie. Tiam estos maltrankvilige havi tro proksima tiun *cemeterio*, la tombejon kaj eble eĉ treti sur la kadavron, se oni devas malsuprenigi la pantalonojn.“

Kelkaj el la viroj altrenis la mortinton. Kelkaj aliaj kunvenis por observi ĉion.

En la karavano estis hakiloj, hokoj por grimpado, ĉenoj, dratŝnuregoj, pikdrato, pezaj feraj krampoj, feraj bendoj, leviloj kaj diversaj aliaj iloj, kiujn oni bezonas en la monterioj kaj kiujn mendis la administristoj de la monterioj, kaj kiuj nun la transportaj entreprenoj kunportis sur la dorsoj de ŝarĝbestoj.

Sed en la tuta granda karavano estis eĉ ne unu ŝpato kaj eĉ ne unu ŝovelilo. Ĉar tio estis aĵoj, kiujn oni ne bezonas en monterio. Eble en tiu aŭ tiu monterio ekzistis ŝpato,

kiu troveblis, se oni serĉis ĝin sufiĉe longe, kaj kiu eble iam venis tien, kiam la unuaj malkovruloj kaj esploristoj preterire havis la intencon serĉi oron. Sed en la karavano estis neniu ŝpato.

La viroj eĉ ne demandis pri ŝpato. Ili tuj ekskrapis per siaj maĉetoj kavaĵon el la tero. Kiam la kavaĵo estis ĉirkaŭ duonon de metro profunda, la tero fariĝis tro dura. Sed ĝis tiu momento *don* Ramon eĉ ne atendis. Kiam li vidis, ke la kavaĵo estis sufiĉe elskrapita por doni ankoraŭ sufiĉe da loko por la korpo, li diris: „Enmetu lin!“

Kiam la viroj levis la korpon, li vokis: „Momenton, *un momento*, unue traserĉu ĉiujn poŝojn. Detiru liajn botojn kaj rigardu, ĉu li havas ion en la botoj. Sed la ringon lasu je lia fingro, ĝi estas nur latuno kun vitroŝtono.“

La viroj trovis en liaj poŝoj dekdu pesojn kaj kelkajn centavojn, cigaredan tabakon en saketo kaj kutiman blankan paperon, kiun li mem pritranĉis. Krome stabilan poŝtranĉilon kaj la kutiman fajrilon, kiun havas ĉe si ĉiuj homoj, kiuj devas vojaĝi tra la ĝangalo kaj la vepro.

La fajrilo estas precize de la sama speco kiel oni uzis ĝin en malnova Francujo, kiam Carlo Magno, Karlo la

Granda, ankoraŭ ne havis barbon. Ĝi do konsistis el ŝtalpeco, el peco da fajroŝtono kaj el meĉo. La meĉo estas la ununura parto, kiu devenis el pli posta tempo. Estas meĉo, kiu similas al ŝnura flava meĉo de oleolampeto, kiun oni aĉetas laŭ metroj. Neniu homo, kiu konas la ĝangalon en Centrala Ameriko, kaj kiu tie jam migris, ekvojaĝas sen kunpreni tian fajrilon, eĉ se li kunhavus krome cent skatoletojn da bonkvalitaj kaj modernaj alumetoj en fera tropika kofro. La indiĝenoj eĉ ne fidas pri la moderna meĉo, ili kunprenas krome la ŝatatan malnovan tindrofungon. Tial indiĝenoj havas fajron ankaŭ tiam, kiam eĉ la moderna esplorista vojaĝanto kun du elegantaj benzinfajriloj, el kiuj ĉiu kostas dek dolarojn, sidas malĝoja antaŭ sekaj arbobranĉoj.

„Vi estas ja ĉi tie la ununure rajtigita heredanto de El Zorro“, diris *don* Ramon al El Camaron, tial prenu do tion ĉion al vi.“

„Mil gracias, jefe“, diris El Camaron kontente kaj prenis la vestaĵojn kaj la monon. „Sed kun via permeso, jefe, mi eble povus preni ankaŭ la ringon. La *hombre* ne plu bezonas ĝin kaj la ringo estas ja ankoraŭ tute bona, eĉ se ĝi aspektas kiel latuno, sed la inoj ja ne scias tion kaj

pensas, ke ĝi estas oro.“ Sen atendi la permeson de lia patrono El Camaron kaŭriĝis kaj detiris la ringon de la mortinto. La manoj, kiuj simile al la kapo estis trenitaj laŭ la vojo, aspektis tiom deskrapitaj, tiom naŭzaj kaj tiel mukaj, ke oni povus teruriĝi, se oni rigardus la fingrojn pli longe ol sekundon. Ĉar la fingroj pro la surbatado kaj treniĝado estis ŝvelintaj, El Camaron kapablis detiri la ringon nur per tio, ke li uzis sufiĉe da salivo, kaj devis elartikigi, distordi kaj dispremi la fingrojn de la mortinto. Detirinte la ringon, li tuj metis ĝin sur la propran fingron, frotadis ĝin ĉe ĉemizomaniko kaj lasis brili ĝin en la flagranta lumo de la kenaj torĉoj.

„Nun vi povas kuŝigi lin en la tombon“, diris *don* Ramon al la viroj.

La peonoj tiris la korpon en la kavaĵon kaj volis tuj ekŝoveli.

„*Un momento*, *muchachos*“, vokis *don* Ramon, „c*aballeros*, li estis ja fripono, bandito kaj murdisto, kaj mi ne scias kiom ajn plu, sed li tamen estis ja homa estaĵo kaj kristano. Lasu nin preĝi por lia animo Avemarion.“

La *caballeros* kaj la viroj demetis la ĉapelojn kaj ĉiuj

komencis gurdi: „*Ave Maria, Santa Purisima, Santa Madre de Dios, salvenos, ora pro nobis, Santa Purisima, Santa Madre de Dios, ora pro nobis. Amen.*“

Tiel senpripenseme, kiel oni dresis la preĝojn al ili en ilia infanaĝo, sen senco kaj sen menso, tiel senpripenseme ili regurdis nun mem la preĝojn. Tial ĝi tute ne frapis ilian atenton, kiel kontraŭdira estis ilia konduto. Ili havis la intencon kaj la bonan seriozan volon preĝi por la animo de la akcidentinto, sed okazis, ke ili petis Sanktan Virgulinon pri tio, ke la kara Dio petu pri la savo de iliaj propraj animoj. Sed ĉar la kara Dio scias ĉiujn aferojn, kiuj troviĝas en la koro de la homoj, Li ja certe akceptis tiujn preĝojn por la povra animo de la morttrenigito tiel, kiel celis ĝin la preĝantoj, spite al la eklezio.

Kiam la preĝo estis finita, la *caballeros* levis kelkajn terbulojn kaj ĵetis ilin sur la korpon. Don Alban tiris ruĝan poŝtukon el la pantalonpoŝo kaj disvastigis ĝin sur la defrotitan parton de la kranio, kiu iam estis la vizaĝo de El Zorro. Tiam li faris tri krucosignojn super la tuko kaj diris: „Ahora, muchachos, nun vi ekŝovelu!“

La peonoj skrapis la surĵetitan teron aparte kun siaj

piedoj, parte kun siaj maĉetoj, parte kun branĉoj, sur la korpon. Ĉar la korpo komplete plenigis la kavaĵon, formis la elĵetita tero skrapita sur la mortinton, monteton.

Pluraj viroj kuradis kun siaj fulgantaj kenaj torĉoj en la ĝangalo tien kaj tien kaj alportis ŝtonojn, kiujn ili dissemis sur la monteto. Tiam ili metis sur ĝin branĉojn kaj branĉetojn, kaj ankoraŭfoje kelkajn ŝtonojn por malhelpi, ke la branĉoj estu forblovataj ĉe la unua vento.

La korpo tute ne estis sekurigita tiel bone, ke sovaĝaj porkoj aŭ malsataj jaguaroj ne havus la eblon elskrapi la kadavron.

Ne estis dubo, ke jaguaroj trovos la spuron kaj sekvos ĝin tien, kie la korpo de El Zorro estis trenita laŭtere. La jaguaroj sekvas kun certo eĉ karavanojn, kiuj kunportas ĉasitan viandon de sovaĝaj bestoj kun si. Eĉ, se la ĉasbestoj jam estis dispecigitaj kaj la karno portata en la pakaĵoj kaj en la kuirkaldronoj.

Sed, se la tombon ne malfermos la bestoj, la surĵetitaj branĉoj kaj branĉetoj putriĝos rapide, formos novan fekundan teron. Kelkaj el la freŝe sekigitaj branĉoj enradikiĝos kaj post malmultaj semajnoj neniu plu povus

trovi la tombon, kiom ajn li serĉus ĝin. Ĝi des pli malfacile troveblus, ĉar la entombigo okazis en profunda nokto ĉe la lumo de la fulgantaj kenaj torĉoj, kiuj donis al la ĉirkaŭo aspekton, pri kiu neniu en hela tago detale povus memori.

„Faru kruceton por li kaj surpiku ĝin“, diris *don Ramon*.

Kaj *don* Alban aldonis: „Vi, la *muchachos*, kiuj portis tiun *hombre* ĉi tien kaj enfosis lin, venu al nia fajro kaj trinku gluton, por ke vi ne sonĝu pri tio dum la tuta nokto.“ Poste li turnis sin al la *caballeros:* „Ankaŭ ni trinku ankoraŭ pluan botelon, sinjoroj, ni perlaboris tion al ni. Ĉe l' diablo, ĉe Sankta Nikolao, *caracoles* kaj *caramboles,* tiel disŝirita mi ankoraŭ en mia tuta vivo ne vidis iun. Kaj kiom peste li stinkis! Sed egale, ni pafu kelkajn glasetplenojn gorĝen, por ke oni ne forgesu tion. *Asi es la vida*, tiel estas la vivo; hieraŭ ankoraŭ ĝoja kaj impertinenta kiel stratofeĉo kaj hodiaŭ jam en ĉifonoj kaj eĉ ne sekura pri tio, ke la porkoj voros nin. *Santísima Madre de Dios*, Sankta Virgulino, donu honestan finon al mi.“ Li krucognis sin.

La sinjoroj ree atingis sian fajron kaj helpe de pluraj

boteloj da *comiteco añejo* ili pretigis sensonĝan nokton al si.

Rimarkoj
ahora = nun
calabos = (hisp.) *calabozo* = karcero sen lumo, kelokarcero ktp.
caracoles = helikoj
caramboles = bilardoj
comiteco añejo = pli longe en lignaj bareloj aĝigita komiteko ol simpla komiteko
mayordomo = intendanto, domkortega mastro, administristo, domisto
mentiras = mensogoj
ora pro nobis = Petu por ni! (en la katolika liturgio formuleca parolturno al Maria kaj la sanktuloj en litanioj)
orito (slange) = *señorito* = sinjoreto = mastro

Ankaŭ ĉe la fajroj de la peonoj oni parolis pri la kazo, ĉar ĝi estis la plej freŝdata okazaĵo, kaj krome ĝi estis travivaĵo, kiun neniu el ili forgesos ĝis la lasta tago de sia vivo.

La *muchachos*, kiuj helpis ĉe la entombigo, ricevis de *don* Alban kutiman brandon en botelo. Ili estis kontentaj pri la *aguardiente*, ĉar ili kutimiĝis pri tiu speco pli ol pri la *comiteco añejo*, kiun trinkis la *caballeros*. Ĝi ne sufiĉe gratus ilin en la gorĝo por povi esti akceptata de ili kiel vere perlaborita salajro por ilia malagrabla kromlaboro.

Don Alban, al kiu la vivo kaj morto de El Zorro estis tute egala, ĉar li ja ne estis muchacho lia, devis pagi ĉiujn kostojn de la entombigo. Kiam li prikalkulis la eldonojn, li trovis, ke la akcidento de El Zorro kostis lin du botelojn kun kutima aguardiente kaj kvar komitekajn. Unu botelo por la peonoj ne sufiĉis. Li aldone devis oferi duan botelon, ĉar post certa tempo alvenis ankoraŭ aliaj viroj, kiuj rajtigite asertis, ke ili same manovradis je la korpo de la mortinto kaj, ke ili ne plu povus manĝi en la sekvaj semajnoj, se ili ne tralavus la gorĝon per konsiderinda

gluto kontraŭ la pesto. Ĉe la bivakfajro, ĉe kiu sidis kaj kuiris Celso, Andreo, Paŭlino kaj Santiago, sidis krome kelkaj aliaj viroj, kiuj en la kuro de la marŝo aliĝis al tiuj kvar kamaradoj.

Neniu el tiu grupo okupiĝis pri la okazaĵo, kiam la ĉevalo kun la akcidenta alpelisto venis en la kampadejon, ili kuris tien, sed restis tie nur dum iom da tempo, post mallonga observado ili reiris al sia fajro.

Celso diris tiam: „Foriĝu el la vojo. Ĉi tie atendos vin kromlaboro. Ne vidigu vin proksime.“

Neniu el ili iris al la entombigo.

Sed okazis tute per si mem, ke oni parolis pri tio.

Paŭlino, la saĝa kaj sperta indiĝeno kun bonaj scioj pri la vivo kaj la okazaĵoj en la monterioj, diris: „*Hombres,* kiom da bonŝanco vi havas, vi eĉ ne scias tion. Tiu *cabrón*, tiu malicega filo de putino, mi celas la fikulon El Zorro; ke li nun kuŝas sub la koto, estas afero, pri kiu ni ĉiuj estu dankemaj al Sankta Josefo. Tiun viron kaj la alian punekzekuciistan serviston El Camaron havi en la monterio, kaj krome eĉ kiel *capataces, hijitos,* filĉjoj miaj,

pri tio vi ne havus kaŭzon por ridi. Jen vi havas ja nun multajn kaŭzojn ploregi. Ili estis fifriponoj, banditokunuloj korfrataj. Se oni enmanigas al tiuj bestaĉoj la vipon, la *látigo,* kun permeso de la aŭtoritatoj, mi volas diri, kun la helpo de la administrado, jen vi saltus, jen vi tremus kaj ĝemetus pro doloro, eĉ se vi nur aŭdus la flustritan vorton *„fiesta“*. Tiuj farus tion pro pura amo. Kaj tiuj, kiuj faras tion pro plezuro, estas la plej furiozaj punekzekuciistoj. Ke unu el ambaŭ ne plu sidos sur via nuko, tion danku al la sanktuloj en la ĉielo. La ununura malfeliĉo, kiu okazis hodiaŭ, estas tiu, ke El Camaron ne pendis en la alia piedingo de la ĉevalo. Kaj se mi povus aranĝi tion por li, mi farus tion pli volonte ol eltrinki du botelojn da brando. Se vi kredas pri la sanktuloj, preĝu nur sufiĉe firme kaj obstine hodiaŭ nokte, por ke El Camaron morgaŭ simile estu enfosigita. *He dicho,* mi parolis.“

Andreo rigardis Celson. Celso akceptis la rigardon, sed indiferente levis la ŝultrojn. Tio lin ja tute ne interesis, kion Paŭlino pensis pri la sorto de El Camaron.

07

Iom pli malfrue Celso iris kun siaj potoj al la rivero por lavi ilin, por gargari la buŝon kaj poluri la dentojn per montrofingro.

Andreo sekvis lin por fari la saman.

Kiam ili kaŭris ĉe la bordo unu apud la alia, kaj kiam Andreo vidis, ke neniu alia estis proksima, li diris: „Kiel vi povis scii, ke El Zorro estos trenata de la ĉevalo?“

„Tion mi ne sciis“, Celso respondis indiferente, „mi nur legis en la steloj, ke li mortos. Je kia maniero la stinkanta hundo mortaĉos, tion la steloj ne sciigis al mi. Ankaŭ ne liaj manoj. Pri tiaj bagateloj mi ne okupiĝas. Vi konas mian historion ĝis la lasta punkteto.“

„Oni rakontis ĝin ja detale al mi, kiam vi volis mortbati min sen koni min“, diris Andreo ridante.

„Vi farus la saman, se vi renkontus iun, kiu aspektas kiel *capataz* kaj, se vi ĵus iris en la maŝon de tiuj du friponoj, kiel mi en tiu tago.“

„Eble jes.“

„Kaj ĉu vi supozas, ke la sorto permesu tion, ke du tiaj diable malicaj friponoj restu vivaj post tia tiel diokompatinda kaj ĉielen stinkanta infere venena malico, kiun praktikis ambaŭ je mi, por perlabori tri pesojn, por ĝui poste Sunon kaj ĉiutage delektiĝi pri tio vidi min laboraĉi kaj krome ankoraŭ havi la rajton skurĝi min? Tia sorto, kiu ion tian permesus, ne ekzistas. Tiukaze sub la ĉielo io ne estus en ordo. Jen mi devas eĉ ne scii multon pri la granda arto legi stelojn aŭ manojn. La alia putina filo de hundo same ne atingos la monterion. Eble la alia eĉ ne estos entombigita kun avemario. La alian *cabrón* eble voros la sovaĝaj porkoj kaj la vulturoj. Mi povas fari tute nenion kontraŭ tio. Tio estas lia destino kaj lia sorto.“

Andreo ridis kaj diris: „La sorto de tempo al tempo kaŭzas sufiĉe strangajn erarojn.“

„Kiel vi opinias tion, Andreĉjo?“

Ambaŭ povis rekoni sin nur tre malklare laŭvizaĝe, ĉar tenebris. Iliaj vizaĝoj estis nur iomete pli helaj, pro malforta trembrilado de la steloj, kiuj banis sin en la

rivero, kiu flustrante kaj mallaŭte gargarante sekvis sian eternan vojon tra la fantoma ĝangalo.

„He, kiel vi opinias pri la eraroj de l' sorto?“ demandis Celso ankoraŭfoje.

„Kiam hodiaŭ posttagmeze la ĉevalo de El Zorro alvenis ĉi tie en la *paraje*, jen vi apenaŭ rigardis tien kaj okupiĝis tie pri nenio. Neniu okupiĝis tie pri iu detalo. Ĉiuj estis tiel ekscititaj, tiel teruritaj kaj konsternitaj, ke ili rigardis nur sur la pendantan kaj trenatan kadavron de tiu stinkanta hundo. La vidaĵo estis sufiĉe terura.“

„Nu, kaj kion nun plu? Por rakonti tion al mi, ŝparu la vortojn. Tio min ja tute ne interesas. Ĉu la hundo aspektis tiel aŭ tiel, tio tute ne havas ion komunan kun lia sorto.“

„Sed mi ja tamen rigardis precize tien, ĝuste tial, ĉar vi aŭguris ĉion ĉi tute ĝuste. Kaj jen mi volis vidi kiel laboras la sorto. Kaj nun pripensu, se tia lazo en maŝo malnodiĝas kaj la maŝo falas pro nelerta movo de la ĉevalo trans ties nukon, jen la lazo kvazaŭ per si mem disruliĝas plu kaj tiam la lazo treniĝas en sia tuta longo post la ĉevalo.“

„Eble jes. Sed eble ankaŭ ne“, diris Celso, dum li gargaris sian buŝon.

„Sed la lazo ne povis malnodiĝi, kiel mi vidis. La maŝo estis ja tiom firme kunligita, ke la ĉevalo povus kuri tutan tagon sen tio, ke la selo povus disruliĝi trans la postaĵon de la ĉevalo.“

„Bone observite, korfrato, vi estas pli inteligenta ol mi supozis. Sed lazo tute bone ankaŭ sola povas firmligiĝi, se la maŝoj tordiĝas, kaj se ili dekomence ne estis tute aparte kunruligitaj.“

Andreo frotadis per sablo en sia fabokaldroneto kaj diris: „Ĝuste tiel. La sorto faras tiajn aĵojn, ke lazo aŭ ĉe la ĉaroj eĉ tirŝnurego tiel pelmele nodiĝas per si mem, ke oni devas tratranĉi ĝin, sed“, kaj nun Andreo kvazaŭ ekridis kreve, „mi ja volus koni la sorton, kiu pendigas tian spertan *jinete*, la ĉevalrajdiston El Zorro kun la maldekstra piedo en la dekstran piedingon. Kiel El Zorro devus sidi sur sia ĉevalo por premegi la maldekstran piedon en la dekstran piedingon, tion la sorto ne povas klarigi al mi.“

„*Lagarto, lagarto“*, Celso vokis, „damnite. Ja pensante

nun pri tio mi supozas, ke vi pravas Andreĉjo.“

„Kompreneble mi pravas. Mi estis ja antaŭpreparita pri la sorto kaj mi ne ekscitiĝis, kaj tial mi vidis tion kaj tion, kion la aliaj ne vidis.“

„Ĉu vi estas certa, ke nenies atento estis frapita?“

„Eĉ ne tiu de *don* Ramon. Mi volas diri al vi, pro kio. La selo estis preskaŭ tute sub la ventro de la ĉevalo. En tiu ĉi situo la selo kompreneble aspektis tiel, kvazaŭ la ĝusta piedo troviĝas en la ĝusta piedingo. Ĉiu, kiu tie staris proksime rigardis nur la misformitan kranion de El Zorro, ĉar ĝi estis multe pli interesa. Krome oni tiom rapide tranĉis tiun *cabrón,* tiun fekfikulon, el la piedingo, ke neniu havis tempon pensi pri tio, kiu piedo pendas en kiu piedingo.“

Nun ankaŭ Celso ridis kaj diris: „Bone rigardite kaj bone observite. Sed tiel facile, kiel vi pensas, vi tamen ne povas kapti min, frateto mia, korfrato. Ne vi, kaj ne agento. Multe malpli polica ĉefo.“

„Mi tute ne parolas pri vi, Celso.“

„Ĉu vi parolas pri mi aŭ pri la sorto aŭ pri la *diabolo,* tio glitas de mi kiel pizo de la muro. En la *paraje* ĉe la *lagunita*. El Zorro estis ankoraŭ freŝa kaj malica. Li rajdis ĉiam je la tielnomata vosto. Tio estis lia speciala plezuro. Jen li povis tie kaj tie karesi iun per la vipo, sen tio, ke la agentoj vidis tion. Al neniu li permesis senĝenan bonan fekadon. Se iu volis kaŭriĝi, tiu tuj havis kelkajn larĝajn sangajn striojn sur la postaĵo. Kaj se li ne povis sufiĉe proksimiĝi kun la ĉevalo, li derompis branĉon kaj ĵetis ĝin sur la dorson de la kompatinda peono, kiu havis diareon, tiel ke li falis en sian merdon, ke ŝprucis, kaj eble li poste ĝemis la tutan tagon sub sia pakaĵo, ĉar la branĉo postlasis malferman vundon sur lia dorso. Ni havas ja eĉ ne ĉemizon sur la dorso, ĉar ni devas konservi ĝin.“

„Bone, konsentite, El Zorro ĉiam rajdis je la fino de la trupoj. Kaj kio nun?“

„Ĉu mi eble estis ĉe la vosto?“

„Lasu min foje pripensi tion. Ne, tio estas ĝusta. Vi ne estis inter la postvenintoj.“

„Pravas, filo mia, vi ĝuste kaj bone observis tion. Mi estis dum la tuta marŝo ĉe la viroj el Cahancu, eĉ multe antaŭe

de la meza trupo, kie marŝas la muloj de la komercistoj. Demandu nur viron el la Cahancu-*muchachos*, li diros al vi, ke estas tiel. Kiun rilaton mi do havu kun la kadavro, se El Zorro estis ĉe la vosto kaj mi en la unua trupo?“

Andreo silentis dum certa tempo. Tiam li diris: „Jen min ja nun vere tuj fikulo seksperfortu, se mi povos fari el ĉio ĉi rimon. Mi tute serioze pensis, ke estis vi, kiu vigligis la sorton.“

„Mi, ĉu? He, Andreĉjo, kion vi fakte pensas pri mi? Mi tiun mizeran kojoton…ĉu? Jen vi foje tute preterdivenis la personon. Al vi mi ja certe povus diri tion, frateto. Al vi mi fidas. Sed tion, kion mi ne faris, por tio mi ne povas pretendi dankon.“

„Tiukaze mi tamen volonte volus scii, kiu atakis tiun *cabrón*.

„Kiu? Ĉu tion vi volas scii? Ĉi tie en la karavano estas ducent kvindek aŭ ducent viroj, kiuj devas marŝi al la monterio. Demandu el tiuj ducent aŭ kiom ajn estas, tiun, kiu plaĉas al vi, ĉu li kun la maĉeto trahakus la gorĝon de El Zorro, se li havus okazon kaj ne devus timi, ke oni eltrovos, kiu faris tion. Ĉiu farus tion. Ankaŭ vi kaj mi.

Kaj nun vi ja povas cerbumi, kiu estis tia stulta mulo, ke li premegis lian maldekstran piedon en la dekstran piedingon. Se vi eble pensas, ke estas mi tiel stulta, ke mi ne scias, en kiu piedingo devas esti la maldekstra piedo de rajdisto, jen vi pensas malĝuste. Eble estis unu el la junaj ŝafidoj el eta pueblo, el tia de Dio forgesita vilaĝeto, tre stulta indiĝeno, kiu neniam antaŭe en sia vivo vidis sidi iun *jinete* sur la ĉevalo. Sed ne la maljuna kaj sperta kafoplantisto kaj mahagahonlaboristo Celso. Tiu scias, kiu piedo estu en la dekstra piedingo kaj kiel lazo kunruligendas, por ke ĝi ne nodiĝu per si mem. Kaj ĉar min ĉio ĉi tute ne koncernas, *m'jito*, kara filo mia, tial mi nun sternos min sur mian petaton kaj dormos bone kaj bonfarte.“

„Vi pravas, ankaŭ mi estas laca, Celso“, diris Andreo.

Kiam ili ambaŭ promenis al sia bivajkfajro, Celso diris: „Kiam mi laboris en la kafoplantejo, estis iam la naskiĝtago de la bienulo. Jen venis *cura*, la pastro, kaj preĝis. Ĉar mi hakis min en tiu tago per maĉeto en piedon, mi tiutage ne povis labori, kaj tial mi starigis min ekstere ĉe la preĝeja pordo, kie la *ladinos* ĉiuj aŭskultis la pastron. Jen mi aŭdis frazon, kiun diris la pastro: *'De*

todos modos, mi hijos e hijas el mejor cojin es una conciencia limpia.' En ĉiu kazo, miaj gefiloj, la pli bona kuseno estas pura konscio. Mi tiel bone memortenis tion, ĉar la pastro diris tion tiel bele. Kaj mi bone dormos, ĉar mi havas puran kaj bonan konscion hodiaŭ, kaj antaŭ ol ni venos al la lago Santa Clara, mi havos ankoraŭ multe pli bonan kaj multe pli trankvilan konscion. *Buenas noches*, bonan nokton.“

R**imarkoj**
cojin = kuseno
de *todos modos* = en ĉiu kazo
mi hijos e hijas = miaj gefiloj
el mejor = la pli bona
jinete = rajdisto
lagarto = lacerto
lagunita = lageto
una conciencia limpia = pura (bona) konscio

Ĉapitro 08

01

La marŝo je la sekva tago estis tiel enuiga, tiel trotoplena kaj tiel treniĝiga, kiel la marŝoj estis en la antaŭaj tagoj, de kiam ili forlasis la lastan setlejon.

La voston de la karavano nun havis *don* El Camaron. Pro la akcidento de sia koramiko li fariĝis timema. Li ne bone dormis en la nokto. Ĉiam denove la sorto de lia kunulo venis en lian kapon. Li sentis sin maloportuna ekde tiu mateno. Prironĝis lin io enkape, pri kio li ne kapablis klariĝi. Dum la marŝo li cerbumis kiel tio estas ebla, ke tia sperta kaj lerta viro kiel El Zorro povis fali de la ĉevalo. Kaj eĉ, se li efektive estus falinta de la ĉevalo, kio povas okazi ja al ĉiu, kiel do tiukaze eblis, ke li ne povis haltigi la ĉevalon kaj liberigi sin el la piedingo. Lia ununura klarigo estis tiu, ke El Zorro ĉe la renversiĝo falis kun sia kapo sur nudan rokon, kio prenis de li la konscion. Antaŭ ol li rekonsciiĝis, li estis tiam ŝajne jam tiom frakasita, ke li similis al mortinto.

Rajdi ĉe la tielnomata vosto de karavano, estas preskaŭ

tiel danĝera kiel rajdi tute sola. Se io malbona okazas al tiu, kiu rajdas aŭ migras ĉe la vosto, ekscias tion neniu el la karavano. La karavano marŝas plu. Oni nur tiam ekscios ion pri la mankanto, se la karavano posttagmeze alvenas en la kampadejo kaj oni konstatas, ke la viro perdiĝis. Tiam oni unue atendos kelkajn horojn, esperante, ke ankoraŭ venos la postrestinto. Se li ne venos, oni sendos du virojn, kiuj piede aŭ surĉevale serĉos lin. Intertempe fariĝos nokto kaj la viroj en la nokto ne povos fari multon kaj revenos al la kampadejo, kun la intenco plu serĉi ekde matene. Intertempe kio ajn povas okazi al la serĉato en la ĝangalo.

El Camaron pro sia forta timo ne volis transpreni la tielnomatan voston, la *cola*.

Sed *don* Gabriel sciis paroli kun li en la ĝusta maniero: „Ni ja ne kunprenis vin por nia plezuro, *cobarde*, malkuraĝulo, timema pantalonfekulo, kiu vi estas. Ek, foriĝu hejmen. Ni ankaŭ sen vi sukcesos.“

Sole devi rajdi hejmen, estis multe pli terura ol transpreni la postrajdadon. Tiel ne restis elirvojo al li, li devis obei la ordonon kaj sekvi al la aliaj.

Li bone amikigis sin kun la posttrotuloj, por ke ili restu en lia proksimo, kaj li tre penis estis daŭre proksima al la trupo, tiom ofte, kiom tio eblis.

Sed la peonoj lertaj kiel katoj kaj ekde sia infaneco kutimigintaj pri marŝoj kaj migradoj, tie kaj tie mallongigis la vojon. Ili spite al siaj pezaj pakaĵoj povis malsuprengliti laŭ la rokoj, facile saltis trans marĉajn lokojn kaj grimpis trans falintajn praarbarajn gigantajn arbojn. El Camaron sur sia ĉevalo devis rajdi la vojon tute sen interrompo. Nur malofte li rajdis galope. La tereno ne permesis tion. Tiel li ofte troviĝis dum kvaronhoroj kaj eĉ pli longe tute sola en la ĝangalo. Kaj okazis en tiuj kvaronhoroj, kiam la viroj per transversaj padoj multe antaŭis lin, ke ekregis lin forta timo. Kiel sekreta voĉo, kiu rapide parolas seninterrompe al li, li supozis aŭdi en la flustrado de la arboj kaj arbustoj, ke El Zorro trovis sian morton ne tute per akcidento, sed per kuna agado de diversaj cirkonstancoj, kiuj havis ion nenaturan je si.

Li moderigis sian brutalecon kontraŭ la varbitajn indiĝenojn tiom, ke li trovis sin mem ridinda. Per ĉiaj eblaj truketoj li provis teni proksimaj la postirantojn. Li donis cigaredojn al ili, li parolis kun ili pri la familioj kaj

eĉ ne unufoje li vipadis iun, se tiu por certa tempo devis kaŭriĝi post arbustaĵo. Pro pura plezuro certe neniu restadis por tiu korpa bezono. Ĉar tio, kio eble aliloke iafoje estas bonfartiga, tie ĉiam estis ligita al turmentoplenaj malagrablaĵoj: moskitoj, pikmuŝoj, ĉevalmuŝoj, vespoj, krabroj, mordantaj formikoj kiel svarmoj tuj ĉeestas.

El Zorro, kaj hieraŭ ankoraŭ ankaŭ El Camaron, rigardis tiun mallongan restadon de viro ĉiam kiel kaŭzon por svingoplene vipi lin kaj ĉe tio krii, ke la pigra porko faru tion morgaŭ aŭ en la nokto, kaj ke li manĝaĉu ne tro de la *frijoles,* de la faboj, ke li marŝu kaj ne dormu.

Sed en tiu tago El Camaron ne diris eĉ unu malican vorton al la viroj. Li rajdis malrapide antaŭen kaj tiam atendis, ĝis la viro estos ree proksima. Tamen eĉ ne unu el la peonoj lasis nebuligi sian cerbon. Ĉiu sciis, ke El Camaron pudris la diablopelton per anĝelopudro nur tial, ĉar li komencis timi. Ili ankaŭ sciis sufiĉe bone, ke El Camaron, kiom ajn kareseme li nun kondutis, ankoraŭ plenumos ĉion preterlasitan, tuj post la alveno en la monterio kaj kiam li ricevos la oficon de *capataz.* Kaj ĉar la indiĝenaj viroj ne estis hipokrituloj kaj flatistoj, tial ili

ne akceptis lian miele dolĉigitan amikecon. Ili rifuzis liajn cigaredojn kun la elturniĝo, ke ili ĵus momente ne emas fumi kaj ankaŭ dum liaj provoj paroli intime kun ili, ili nur grumblis kaj kondutis tiel kvazaŭ ili ne aŭdis lin aŭ kvazaŭ ili estas tro lacaj por detale respondi ion. Tuj kiam ili rigardis ireblan transversan padon, ili forlasis la vojon kaj foriĝis.

La konduto de la peonoj eĉ pli malcertigis El Camaron kaj plenigis lin kun forta timo. Nun fariĝis al li certo, ke kunhelpis unu el la viroj aŭ kelkaj el ili, ke El Zorro trovis sian finon surtere. Pro tio leviĝis en li la sufokiga konscio, ke li estos post El Zorro la sekva.

Ial Celso estis la viro, pri kiu li pensis plej malmulte el ĉiuj. Celso ĉiam faris al li la impreson de mense flegma indiĝeno, kiu faris sian laboron kiel bovo kaj estis kontenta, se oni ne vipis lin.

Celso ne estis la viro ununura en la karavano, kiun li kaj El Zorro kaptis per malica agado por la agentoj, kiuj pagis lin.

En sia pensoj li cerbumis pri ĉiuj peonoj en la karavano por trovi tiun, kiun li devas timi. Estis pluraj, kiujn li

rigardis kiel danĝeraj. Inter ili troviĝis Andreo. Ial li profundiĝis obstine en la imagon, ke li plej devas gardi sin kontraŭ Andreo. Andreo estis inteligenta, foje impertinenta, li kontraŭdiris kaj ne iris por si mem, sed por sia patro en la monterion.

Rimarkoj
cobarde = malkuraĝulo
cola = finparto

Tre frue, je la unua tagmeze, la karavano atingis la bordojn de la rivero Santo-Domingo.

La *arrieros*, la mulpelistoj matene laboris kun ĉiuj siaj fortoj por rapide ekmarŝi tiom frue, kiom fareblas. Ili faris tion, ĉar ili jam konsideris la transiradon de la rivero.

La kampadejo troviĝis sur la transa bordo.

La plej granda laboro de tiu tago ne estis la marŝo, sed la transiro de la rivero.

Estus jam sufiĉe da malfacilaĵoj entrepreni tian transiron, se temus nur pri kelkaj vojaĝantoj. Sed ju pli granda estis karavano des pli komplika fariĝis la problemoj, kiuj ekestis ĉe tio.

Nur malmultaj bestoj kun siaj pakaĵoj povis proksimiĝi al la bordo en unu grupo. La pado estis malvasta kaj marĉa. La loko, kie la bestoj devis halti, estis nur tri metrojn larĝa kaj ĉirkaŭ ok metrojn longa. La ĝangalo estis tro densa por plivastigi la lokon; tio kaŭzus laboron dum

multaj horoj.

Ĉiujn bestojn oni deŝarĝis.

La bordodeklivo estis kruta kaj ĉirkaŭ du metrojn alta. La akvo de la rivero estis nigra, netravidebla kaj marĉa. Pro la ĝangalo, kiu etendiĝis preskaŭ ĝis la bordo, la rivero kun sia koloro fariĝis ankoraŭ pli sinistra.

Sur la longa marŝo estis transirendaj ĉirkaŭ kvardek riveroj. Estis ne ĉiam aliaj riveroj, sed ofte nur aliaj kurbiĝoj de la sama rivero, ĝis la karavano alvenis en nova rivera tereno. La plimulto de tiuj riveroj tamen facile transireblis. Ilia akvo estis klara kaj la bestoj povis rigardi ĝis la grundo, kiu plej ofte estis sabla kaj kovrata de silikaj ŝtonetoj aŭ de rokoj. Sed tiaj riveroj ĉiam estis klaraj, eĉ se la akvo de tempo al tempo atingis la rimenojn de la bestoj. En la pluva tempo okazis, ke la akvo alte leviĝis. Tiukaze la karavano devis atendi ĝis forfluis la alta akvo, kio daŭris ofte nur horon, iafoje tamen tutan nokton. Estis nur ĉiam necese atenti pri tio, ke la bestoj kun sia pakaĵo ne sternu sin en la akvo por ruliĝi kaj fridetigi sin. La ekmarŝejo en tiajn riverojn estis ofte plata aŭ havis nur malaltan bordon.

Sed tie ĉe la rivero Santo-Domingo la bestoj timis la morne nigran kaj marĉan akvon, kies profundon ili ne povis taksi. Kaj speciale instigi la memgardajn kaj atentemajn mulojn, por ke ili saltu de la altaj krutaj bordoj rekte en la riveron kaj poste naĝu transen, tio ne sukcesus eĉ al la plej lertaj *arrieros*. Bati la bestojn , tio ne helpus; tion la spertaj viroj tute ne provas.

La plej danĝeraj akvofluoj en la ĝangalo ne estas la larĝaj, sed tiuj, kiuj estas malvastaj kaj havas tre krutajn kaj ofte dek ĝis dekdu metrojn altajn bordojn.Tiuj por la bestoj estas tre malfacilaj obstakloj.

La rivero tie ĉe la transirejo ne estis larĝa, apenaŭ tridek metrojn. Helpus fosi vojon, kiu komenciĝus ĉirkaŭ dudek metrojn de la bordo kaj tiam iom post iom malsupreniĝus ĝis la rivero. Tio estas direbla tre facile. Sed oni ne havis fosilojn. Kaj se oni havus ilin, jen ankaŭ tiukaze tio ankoraŭ ne estus facila. La bordoj de tiaj riveroj estas prikreskataj per kaose kunplektitaj arbustoj el fera dura ligno, kiuj kungluiĝis kaj kvazaŭ cementiĝis per kalka argilo, mucidaĵo kaj peza nigra tero. Estas bordoj, pri kies konstruado la digofaristoj en Eŭropo nur revas. Elhaki el tiuj bordoj deklivan vojon, tion entreprenas nur iu, kiu

vojaĝas tie je la unua fojo. Sed post duono de tago li ĉesas fari tion, kiam li ekvidas, ke li profundigis la vojon eĉ ne dudek centimetrojn kaj ĉiuj liaj akompanantoj sidas jam kun sangantaj manoj ĉe la borda rando kaj ne plu povas teni la maĉetan tenilon enmane.

Sukcesus eble peli la bestojn de la alta bordo en la riveron, per fortimigo, per krioj kaj urĝado de la postsekvaj bestoj. Sed, se ili poste naĝos en la rivero, ili ne plu povos eliĝi, ili ne povos grimpi supren la transan altan bordon; ĉar ili ja ne estas katoj. Ili apogos sin per la antaŭaj kruroj surborde, sed la postaj kruroj, kiujn ili bezonas por postŝovado kaj saltoj ne trovos apogon en la marĉa grundo. En multaj lokoj la bordo estas eĉ sublavita. La bestoj naĝos dum du horoj senhelpe en la akvo ĝis ili fine tute elĉerpite fordrivos kaj eble du aŭ tri mejlojn pli malproksime ie povos atingi platan bordon. Sed de tie oni ne plu kapablus rekonduki ilin, ĉar la intera tereno estas marĉo.

La riveron oni devas transiri en tiu loko aŭ tute ne.

Bonaj militistoj ne retroiras. Kaj la mulpelistoj, la komercistoj, kiuj transportas siajn varojn al monterioj, kaj la agentoj, kiuj volas vendi siajn varbitajn indiĝenojn en monterioj, estas ĉiuj bonaj militistoj. Se tiuj homoj entreprenas militmarŝon, ili atingos sian celon, eĉ se perdiĝus certa kvanto de bestoj kaj ne alvenus tiu aŭ tiu viro.

La vortojn „ne eblas“ ili ne konas. Ili konas nur malfacilaĵojn. Okazas efektive, ke ili sidas dum tuta tago ĉe bordo aŭ ĉe kruta roka kanaleto kaj pripensas kion fari por transiĝi. Sed neniam trudiĝas al ili penso pri retroiro.

La unuan grupon de la bestoj oni deŝarĝis. La pakaĵojn de la bestoj la peonoj levis sur la ŝultrojn. Pli supre de la loko la rivero estis pli malvasta. Sed la bordoj estis pli altaj kaj la ĝangalo etendiĝis preskaŭ ĝis la borda rando. Tie troviĝis giganta arbo transverse de la rivero. Sur tiu trunko la indiĝenoj transportis la pakaĵojn sur la alian flankon de la rivero.

Tuj kiam oni deŝarĝis la unuan grupon de la bestoj, oni

rekondukis ilin sur la malvasta vojo, kiun oni rapide senigis de ĝenaj malhelpaĵoj, al malferma loko. Kvankam ĝi estis marĉa, la bestoj tie povis stari. Pro tio la malvasta loko ĉe la bordo fariĝis libera, kaj dua grupo de bestoj alkondukeblis, oni deŝarĝis ankaŭ ilin kaj same pelis la bestojn poste al tiu malferma ejo.

Fervoraj kiel formikoj portis la indiĝenoj la pakaĵojn, kaj tuj post dfeŝarĝo, ili portis ilin trans la arbon sur la alian bordon.

Kiam ĉiuj bestoj estis sen ŝarĝo kaj tie ĉe la bordo ekestis loko por povi labori, kaj sur tiu ĉi kaj flanko kaj sur la alia oni konstruis pontojn.

Oni dehakis tre longajn trunkojn. La trunkojn oni kunligis per ŝelita basto kaj lianoj unu apud la alian. Sur tion oni plektis horizontalajn rungojn. Poste oni ŝovis tiun flosforman ponton en la riveron, ĝis ĝi atingis la grundon. Supre oni fiksis ilin per lianoj, por ke ili ne deglitu. Tiel oni kreis vojon, sur kiu la bestoj de la alta bordo iom post iom kaj sen timo povis iri en la akvon. Se ili atingis la akvon, ili deglitis de la ponto, ĉar tie intence ne estis alplektita rungo. Kaj ili komencis naĝi. Retroiri ili

ne povis, ĉar supre ĉe la ponto staris jam la sekva besto. Dum iom da tempo la besto naĝis malcerte tien kaj tien, sed baldaŭ ĝi trovis la ponton, kiu je la alia bordo estis same konstruita kaj ŝovita akven. Tiu ponto havis horizontalajn rungojn ekde malsupre, tiel ke la bestoj povis apogi sin. Tuj kiam ili sentis la firman ponton, ili kuris rapide kaj kuraĝe sur la ponto supren kaj plezure alvenis sur la alia bordo. Konduki transen la unuajn bestojn, ne ĉiam estis facile. Tial la unuaj du aŭ tri bestoj estis ligitaj al longaj lazoj. Oni ĵetis la lazon sur la alian bordon, tie kaptis ĝin viro, kaj tuj kiam la besto eknaĝis, oni tiris ĝin per la lazo al la ponto.

La bestojn, kiuj devis sekvi, oni pelis en vico unu post la alia, sen lasi multe da loko inter ili kaj kun infera kriado kaj sovaĝa suprenĵetado de la brakoj kaj per ĵetitaj ŝtonetoj sur ties postaĵojn sur la ponton. La bestoj ne havis tempon pripensi ion aŭ retroeviti aŭ ektimi. Se ili vidis, ke nenio okazis al la antaŭaj bestoj, ili sekvis libervole kaj sen spiti en tia ordo kvazaŭ ili troviĝus sur kutima marŝo sur firma tero.

La bestoj, kiuj tamen retroevitis kaj ofte tuj antaŭ la ponto deŝiriĝis, oni plej ofte lasis en paco por ne

interrompi la linion kaj por ne timigi tiujn bestojn, kiuj estis bonvolemaj. La eskapemajn bestojn pretaj viroj, kiuj tie staris, tamen ĉiam denove envicigis laŭorde, ĝis ankaŭ ili fine troviĝis sur la ponto, kie ili sekve de la urĝantaj bestoj malantaŭ ili ne plu povis retroeviti. Okazis, ke tiuj timigitaj bestoj tamen ne iris rekte antaŭen sur la ponto, sed flanke deglitis aŭ tuj saltis en la akvon. Tiel ili eĉ pli ektimis kaj provis atingi la saman ponton, de kiu ili falis. Sed tiumomente alvenis jam la sekvaj bestoj kaj ne postlasis liberan lokon.

Ankaŭ sur la transa bordo la bestoj ne ĉiam naĝis rekte antaŭen al la alia ponto. Ili provis deflanke surgrimpi la ponton.

Estis ĝuste tiuj bestoj, kiuj ne envicigeblis, kiuj pro la deflanka surgrimpado kaj la flankeniĝanta glitado de la ponto havis la kulpon, se disrompiĝis ambaŭ pontoj komplete, post kiam transiris la tuta karavano la riveron.

Tial oni trovas, kiam ajn oni venas al tiu aŭ al simila rivera transirejo nur la restaĵojn de iamaj pontoj. Sed oni trovos neniam ponton, kiu ankoraŭ uzeblas, eĉ ne tiam, se nur semajno pasis, de kiam alia karavano je la sama

loko transiris la riveron.

La *arrieros* posedas tute mirigan kapablon pri la arto konstrui pontojn kaj aliajn helpilojn tiel, ke ili tute precize tiom longe eltenas, kiom la *arrieros* bezonas ilin por sia propra transporto kaj ili tuj disrompiĝas, kiam la lasta besto transiris la riveron. Estas efektive strange, ke tia ponto ĉiam disrompiĝas post la lasta besto, egale, ĉu la karavano konsistas el sesdek aŭ el ses bestoj. Ion tian eŭropa pontokonstruisto foje provu! Kun ĉiuj siaj matematikaj artifikaĵoj li ne sukcesos konstrui fervojan ponton tian, kia precize sufiĉas por kvindek trajnoj kaj disrompigas sub la lokomotivo de la kvindekunua trajno. Sed *arrieros* ne studis matematikon, kaj tio eble estas la kaŭzo, ke ili kapablas fari ion, kion la diplomitaj inĝenieroj ne povas fari.

Tiuj militistoj, kiuj marŝis en la landon, kie oni konkeras la mahagonon, por ke ĝi iĝu alirebla de la civilizacio kaj estu transsorĉita en dividendojn, estis la plej facile kontentigeblaj kaj plej simplaj militistoj, kiujn kiam ajn militestro havis je dispono. Ili estis la plej facile kontentigeblaj militistoj kaj tamen eble inter ĉiuj militistoj la plej kuraĝaj. Ili batalis ne por famo kaj ordenoj, ne por la patrio, sed ili sangis, suferis, estis mortigitaj, kaj se ili vivis kaj batalis, vivis pli facile kontentigeble ol estus vivinta soldato de Hanibalo.

En iliaj kuirpotoj troviĝis *frijoles* kaj akra kapsiko matene, kaj akra kapsiko kaj *frijoles* vespere. Nigraj faboj kun ruĝaj aŭ verdaj akraj kapsikoj kune kuiritaj.

Kaj al tio aldoniĝis kiel dorlota refreŝigaĵo, ĉiam malforta nigra kafo kun peceto da bruna kruda sukero. Tagon post tago. Semajnon post semajno, monaton post monato. Kaj se ili travivis tion, jaron post jaro. Kelkfoje en graso rostita rizo kun ruĝa akra kapsiko. De tempo al tempo strio de sekigita viando, dura kiel rimeno el ledo. Neniu dimanĉo, neniu festtago. Iafoje la festo, *la fiesta*, en kiu la

dancistino estis la skurĝo de la *capataz,* kun kiu la peono devis danci laŭ la indikoj de la notlibro, aŭ kvindekfoje aŭ centfoje aŭ ducentkvindekfoje.

Neniu militisto en iu ajn armeo, en malnovaj tempoj aŭ nun, portis iam pli pezan pakaĵon sur sia dorso ol tiuj senfamaj militistoj, kiuj sen muziko, tamburoj kaj flutoj kaj sen kantoj marŝis sian vojon. Svarme karesataj kaj pikataj de moskitoj, de tabanoj, vespoj kaj iksodoj, marŝante sen ŝuoj sur rokaj vojoj, tra marĉo kaj akvo, tra dornaj arbustaĵoj, krute supren, krute malsupren, marŝante de sunleviĝo ĝis malfrue posttagmeze, kun laboro tie kaj tie sur la vojo; marŝante sub la torenta kaj neniam ĉesanta ardo de Suno, kiu estis peza kaj ĝemiga en la malhele verda ŝarĝanta malseko de la ĝangalo.

Tiam ili alvenis en la kampadejo, kie estis denove laboro. Ili dormis sub liberaera ĉielo, indiferente ĉu pluvis torente elverŝiĝe, ĉu densa ŝarĝanta kaj ne foriĝanta nebulo en la ĝangalo ŝveligis kaj lamigis iliajn membrojn.

Sed kompreneble ankaŭ iliaj kondukantoj ne vivis en dormovagono aŭ en riĉe ornamita luksa tendo de klasika batalestro. Ili tute ne havis tendojn kaj nenion, kio similis

al tendo.

Tuj kiam la karavano alvenis en la kampadejo, la peonoj konstruis *casitas*, dometojn, por la ladinoj. Tiuj dometoj havis kiel komunecon kun domo nur la nomon.

La viroj kun siaj maĉetoj iris en la densejon kaj dehakis trunketojn. Du trunketojn oni pikis vertikale en la teron, je distanco de proksimume kvar metroj. Supre oni surmetis trunketon transverse sur la branĉoforkojn, kiujn oni lasis sur la fostaj trunketoj. Kontraŭ tiuj transverse metitajn trunketojn oni apogis klinitajn trunketojn, kiuj estis longaj kaj sveltaj. Tiujn apogitajn trunketojn oni facile kunligis per kelkaj strioj el lianoj. Poste on kovris tiujn trunketojn per foliaro kaj palmfolioj. Se la tuta dometo estis preta, ĝi aspektis kiel duono de tegmento, kiu troviĝas surtere. Estis efektive nur duono de tegmento, kiun ajn nomon oni donus al tiu *casita*. Je ambaŭ antaŭfrontoj la dometo estis malferma. Se la vento blovis la pluvon antaŭfronte en la dometon, jen la loĝantoj havis tute la saman travivaĵon kiel tiukaze, se ili dormus tute sen tegmento superkape.

Sed dormi en tia dometo estis la loĝoprivilegio de la

ladinoj kompare al la peonoj. La ladinoj tenis tiel vivanta la imagon, ke ili vere estas civilizitaj homoj, dum la peonoj dormis kunruliĝintaj kiel hundoj.

Oni povus kovri la teron, sur kiu la ladinoj dormis, per foliaro, por krei oportunan subaĵon. Sed tion provis neniu. Ĉiu preferis dormi sur la nuda tero, nur en *sarape*, do envolvite en kovrilo, ĉar la branĉoj kaj la foliaro estis kutime ankaŭ la loĝejo de skorpioj, de malgrandaj venenaj araneoj, de iksodoj kaj mordantaj formikoj. Kaj tute verŝajne povus okazi, ke oni sonĝas en la nokto, ke oni havas elegantan tre bele poluritan promenbastonon enmane, kaj se oni vekiĝas kaj rigardas pli detale la promenbastonon en hela lumo de la lastaj flagrantaj restaĵoj de la bivakfajro, oni malkovras, ke ĝi estas bele polurita serpento, foje venena, foje, se ankaŭ ne tiom ofte, nevenena.

Spertaj ladinoj havis de tempo al tempo ankaŭ hamakon ĉe si. Ili ankaŭ dormis en ĝi. La hamako estas pli sekura ol la tero. Sed, tiu, kiu ankaŭ hejme ne ĉiam dormas en hamako, ĉar li kuŝas kutime en la lito kun sia edzino, ne vere povas dormi en la unuaj semajnoj tiel, ke la dormo utilas al li.

Ankoraŭ nun rondiras la legendo, ke vojaĝis en tiu regiono iam esploristo el Usono aŭ el la meza Eŭropo aŭ de kie ajn li venis, kun dormsako. Oni ĵuras, ke li havis dormsakon. Ĉio laŭdire iris sufiĉe glate, kvankam li nokte ĉiam troviĝis kvazaŭ en vaporbanejo. Sed iunokte li havis du skorpiojn en la dormsako. Daŭris tre longe, ĝis li forlasis la dormsakon, tie longe, ke li neniam denove rampis en ĝin, sed rapide iris hejmen al sia universitato kaj sur la revojaĝo dormis nur sub la kutimaj tegmentoj, el kiu oni pli rapide fuĝas, se oni sentas skorpion aŭ tarantulon grandan kiel manon.

Rimarkoj
s*arape* = kovrilo

05

Don Gabriel funebris je tiu ĉi vespero. Li parolis pri nenio alia ĉe la fajro ol pri la kruela sorto, kiu trafis lin.

Unu el liaj peonoj aĉetita en bieno, kiu provis reatingi sian trupon en la marŝo, ĉar li postrestis, marŝis ĉe la flanko de la pado por preteriri ŝarĝmulon.

Kiam la viro estis ĝuste apud la mulo, elrompiĝis plato el la roko, sur kiun paŝis la mulo. La mulo kun sia peza pakaĵo transturniĝis kaj falis sur la viron. La viro, kiu estis jam forte dispremigita sur la brusto, ne povis firmteni sin je la deklivo. La rimeno de lia pakaĵo, kiun li portis sur la frunto, deglitis malsupren kaj sufokis lian kolon. La pakaĵo estis nemezureble peza, kaj kiel ajn la viro palpis ĉirkaŭe por firmteni sin je arbusto, li glitis tamen malsupren de la roko. La viroj, kiuj tuj malsuprengrimpis la abismon, trovis lin morta. Ili enfosis lin ĉe la sama loko, kie ili trovis lin.

Don Gabriel marŝis pinte de la karavano. Li ĉiam penis marŝi en la unua trupo, kaj se eblis kiel antaŭa rajdisto. Li volis, kiel li pensis, pli bone konatiĝi al la vojo. Sed li diris

al *don* Ramon, al sia negoca partnero, ke li marŝas pinte tial, ĉar la viroj tre stinkas pro la furzado sur la vojo, pro la multaj faboj, kiujn ili manĝis ĉiam.

Don Gabriel aŭdis je la unua fojo posttagmeze en la kampadejo, kio okazis al li en tiu tago. Tuj li eltiris sian etan notlibron, kalkuladis kaj diris: „*Caray, chinga, la matricula*, fulmotondro, fekkalkulo, cent kaj okdek pesoj merdiĝis!“ Pro tio li forgesis preĝi malfruigitan avemarion por la viro, kiu havis la akcidenton.

Kaj ĉar ankaŭ neniu alia el la *caballeros* penis regurdi avemarion, la povra indiĝeno devis senbenite kuŝi en la tero de Dio.

Don Gabriel trastrekis la nomon de la peono certe dudek fojojn, ĉiam denove kaj denove. Li faris tion senpripense. Sed li diris plurajn fojojn: „Jen la pura trompo! Cent kaj okdek pesoj. Se mi almenaŭ ne estus doninta antaŭpagon en Hucutsin al li. Tiel ili trompas onin pri la mono. *Don* Alban, vi ne havas tiajn zorgojn, kiajn ni. Via negoco funkciadas pli simple.“

Li subite rektiĝis. Esperoradio lumigis lin. Li vokis al si iun el la viroj, kiuj ĉeestis. Li demandis: „Eble li estis eĉ

ne morta, ĉu? Vi ja ne eble jam enfosis lin ankoraŭ vivanta?“

„*No, patroncito*, certe ne. Tiu estis tiom morta, ke duono de la kapo mankis al li. Ni ĝin serĉis por aldoni ĝin, sed ni ne trovis la kapon.“

„Tiel vi ekkomprenas“, diris *don* Gabriel, „kio ĉio povas okazi al vi kokoj sur la marŝo, se vi ne bone atentas pri vi.“

Rimarkoj
caray = fulmotondro
c*hinga* = hispane chingar = fiki
matricula = kotizo ks.

Ĉapitro 09

01

Andreo sidis fumante sur renversita arbo, cent paŝojn aŭ eĉ kelkajn paŝojn plu for de la kampadejo. Kiam li ĉeokaze turnis la kapon kaj rigardis en la verdecan lumon de la ĝangalo, li vidis Celson kiel necertan ombron preterhasti inter kelkaj malfermaj lokoj. Celso vekis la impreson, kvazaŭ li persekutus sovaĝulon. Andreo antaŭrigardis la vojon, en kies direkto Celso hastis antaŭen, kaj jen li ekvidis la irantan El Camaron, kiu serĉis la ĝustan lokon por persona bezono.

El Camaron ŝajne ne sciis, ke iu persekutas lin. Andreo ekstaris kaj iris reen al la kampadejo, kie li sidiĝis al la bivakfajro. Fariĝis nun rapide vespero. Post iom da tempo Celso trankvile alvenis kaj kaŭris sin same antaŭ la fajro. Li metis siajn fabojn kaj la kafon al la fajro kaj ekkirlis la ardon.

„Hodiaŭ mi vidis El Camaron la tutan tagon eĉ ne unufoje“, diris Andreo.

„Ĉu vi tiom amas lin, ke vi ne povas vivi, se vi lin foje ne vidas?“ rikanante demandis Celso. „Tiu rajdas nun ĉiam je la vosto, kaj ni estas en la unua trupo de la karavano. Kial koncernu nin tiu filo de putino?“

Ĉe la fajro sidis ankaŭ Paŭlino kaj Santiago kaj ankoraŭ du aliaj viroj.

Jen diris Paŭlino: „Kial El Camaron nin koncernu? Tiu nin ja vere koncernu. Tion mi diras al vi. Kaj, se ni estos iam en la monterio, jen vi baldaŭ ekscios, kial li koncernas nin. Tion mi povas diri al vi, se mi povus fari tion, mi ja mortbatus la kojoton kiel malsanan hundon. Tion mi farus, ĉe l' Nemakulita. Mi estas nur tro senkuraĝa por tio. Eble se mi gargarus la gorĝon per botelo da *aguardiente*. Per kutima bastono mi mortbatus lin.“

Eble li falos ja en la lagon Santa Clara“, diris Celso, „tiukaze ni ĉiuj estos liberaj de li.“

„Kiel li falu tie en la lagon? Tion mi volus scii“ demandis Paŭlino.

„He, vi Andreĉjo“, enmiksiĝis Santiago, „se ni ĉi tie estus

kun niaj ĉaroj, tio ne longe daŭrus pri li.“

„Pro mi, faru tion, kio plaĉas al vi“, diris Andreo. „Sed kial ne lasi vivi lin? Tiu eble iam sin pendumos tute per si mem.“

„Tio estas ankaŭ mia penso“, opiniis Celso, „ni lasu vivi lin. Kaj pri la mempendumo, tio ne estas tiel necerta kiel vi pensas. Lia pantalono estas plena de merdo. Li fantaziadas kaj pensas, ke El Zorro persekutas lin, ĉar li prenis lian monon kaj la ringon. Plena de merdo estas lia pantalono, jes ja.“

„*Por diabolo*, ĉe la diablo, kiu prenis mian salon ĉi tie?“ demandis Paŭlino.

„Ne kriu tiom pri via iometo da salo“, respondis Santiago, jen via salo, voru ĝin kaj sufokiĝu je ĝi.“

„Mi vidis, ke El Camarron iris en la densejon antaŭ tridek minutoj“, diris Celso. „Eble li serĉis arbon por pendumi sin je ĝi. Sed mia opinio estas, ke li havas tro multe da merdo en sia pantalono por pendumi sin mem. Tiukaze unue devus helpi iu, por ke la ŝnurego ne disŝiriĝu. Kaj se li iam pendos, li sagos kiel ŝtormo en la inferon, kaj tie li

renkontos El Zorron, kiu tuj ĉe la alveno rakontos al li sukan tekston pri la mono kaj ankaŭ jam pro la diamanta ringo.“

„Tio ja ne estas diamantringo“, diris Santiago.

„Sed ĝi tamen estas diamanta ringo“, enmiksiĝis Paŭlino.

„Vi estas ja la ĝusta, por diri al mi, ke mi ne konas diamantojn. Mi eble havis pli da diamantoj enmane ol vi entute povas nombri. Cetere, kie vi iam vidis diamanton en via tuta vivo? Tion foje diru al mi. Eble ĉe viaj kaprinoj kaj ŝafoj, ĉu? Ne ridigu min.“

„ Ja ne kverelu ĉi tie pri diamantoj, kiujn ni ne havas“, diris Andreo. „Kial tio interesu nin, ĉu tio estas diamanto aŭ rubeno aŭ silika ŝtoneto?“

„Andreĉjo pravas, tio ne estas diamanto“, diris Santiago, „estas blua topaso.“

„Estas ĉiukaze nur tute kutima peco da vitro, kaj el oro la ringo ankaŭ ne estas“, diris Otilio, alia viro, kiu sidis tie kun la aliaj ĉe la bivakfajro kaj nur malofte enmiksiĝis en la interparoladon de la kvar intimuloj.

„Vi kompreneble scias tion tute precize“ diris Santiago moke. „Kaj mi scias tamen, ke la ringo estas aŭtentike originala kaj, ke ĝi kostas almenaŭ cent pesojn. La filo de putino ne aĉetis la ringon. Li rabatakis hispanan komerciston tie supre en la proksimo de Copainala, li mortbatis kaj skrape enfosis lin kaj forprenis la ringon kaj la tutan monon de li.“

„He, vi, Paŭlino, alportu lignon, por ke nia fajro ne estingiĝu“, vokis Celso. „Tiuj de Dio damnitaj kaj fuŝitaj faboj hodiaŭ denove ne moliĝas kaj ni certe ricevos iom da manĝo nur antaŭ *la madrugada,* do morgaŭ matene. Mortaĉi oni povas ĉi tie kaj neniu animo en la mondo okupiĝas pri tio. Ek do, *mozo*, alportu lignon.“

„Alportu la lignon mem“, respondis Paŭlino. „Kaj ankaŭ via *mozo* mi ne estas.“

„Saltu, aŭ mi tuj tradraŝos vin“, diris Celso kaj levis branĉon.

„Vi volas tradraŝi min, kaj kiu ankoraŭ krome?“ kriis Paŭlino koleriĝinte.

„Bone, restadu nur trankvile sur via pigra stinkanta

postaĵo, Paŭlinĉjo“, diris nun Andreo, „mi alportos la lignon. Per si mem ĝi ne alsaltos. Kaj se Celso jam kuiras nian manĝaĉon ĉi tie, li ne ankoraŭ iru kolekti la lignon.“

„Ni iros kune“, diris Paŭlino kun trankviligita voĉo. „Kial mi ne alportu lignon? Sed la knabo tie ne havas la rajton komandi min. Li estas same tiel putina sklavo kiel mi, kaj ankoraŭ tute ne *contratista* aŭ guberniestro.“

Fariĝis longa nokto por la viroj. Ĉar ili iam komencis babili, ili ŝajne ne povis trovi finon dum la tuta nokto, kaj neniu vere dormis.

Rimarkoj
contratista = trupestro
madrugada = matene, ĉe la tagokomenco
mozo = servisto, subulo, taglaboristo

Je la mateno, kiam estis ankoraŭ tenebre, ekbrulis jam denove hele ĉiuj bivakfajroj, por la kafo kaj por varmigi por la matenmanĝo la fabojn, kiuj ĉiam postrestis de la vespermanĝo, por ke oni povu manĝi ion ĉe la komenco de la tago.

Ankaŭ la *cabbaleros* ekmoviĝis kaj poste rampis el siaj *casitas* ĝis la fajro, kiun la viroj komanditaj al ties persona servo, jam flamigis. La bivakfajro de la *caballeros* bruladis ĉiam proksime de la malferma flanko de ilia tegmento, por ke ĝi varmigu la internon de ilia *casita* kaj, por ke ili povu etendi nokte siajn piedojn en la direkto de la fajro por varmteni ilin.

Krome la fajro donis protekton kontraŭ la jaguaroj, kiuj nokte ĉiam ŝteliradis ĉirkaŭ la kampadejoj, allogite per la surpendigita viando kaj per la ŝvito de la muloj.

La muloj nokte libere ĉirkaŭiradis por havigi al si foliaron aŭ alian manĝon, kaj por trovi taŭgajn lokojn por sterni sin tie. Ili sternis sin dufoje, trifoje aŭ eĉ kvarfoje en nokto, sed malofte pli longe ol tridek minutojn. Poste ili

saltis supren, skuiĝis kaj laŭte snufis. Ili ĉiam kunestis kiel gregoj. Ĉio, kion la muloj kaj ĉevaloj faris, servis ilin kiel protekto kontraŭ la jaguaroj. Tial jaguaroj kaj pumoj atakis nur solajn bestojn, kiuj perdis la vojon aŭ tre malantaŭis. Eĉ tiukaze temis ofte nur pri bestoj, kiuj estis malfortaj aŭ lamis.

La *arrieros* baris la padon, sur kiu alvenis la karavano, per dornaj arbustoj, kaj kelkaj el la pelistoj pretigis sian kuŝejon por la nokto apud tiu artifika baraĵo. La pado estis malvasta, kaj pro la densejo la bestoj ne povis eskapi flanke de la starigitaj arbustaĵoj. Ili provis ĉiam nur eskapi malantaŭen sur la vojo, kiun iris la karavano, kaj kiun la bestoj konis pro tio. Sur la marŝota vojo de la sekva tago, la bestoj iris dum sia serĉado de verda manĝo nokte malofte pli ol du kilometrojn.

Tie, ĉe tiu kampadejo, tiel, kiel ĉe la plimulto de la kampadejoj, oni ne devis fermi la padon. Tie la bestoj havis la riveron malantaŭ si. Eĉ, se la pontoj ne disrompiĝus, tamen neniu el la bestoj provus retromarŝi sola sur la vojo en la nokto, ĉar la transiro de la rivero estis tro komplika. Unu el la kaŭzoj, kial kampadejo ĉiam, se tio eblas, estas starigata apud rivero, estas la akvo,

kiun oni bezonas por la kuirado kaj la trinkado. La alia kaŭzo estas la pli granda sekureco, ĉar la libere irantaj bestoj ne tiel facile povas eskapi. Okazis plej ofte sur la retromarŝo, ke necesis konstrui tiujn baraĵojn.

Serĉi la bestojn matene, estis streĉa laboro. Nur tre ekzercitaj *arrieros* sciis kunkolekti ilin dum mallonga tempo. Tiuj spertaj karavanestroj havas strangan percepton instinkte trovi la bestojn, eĉ, se la nokto en la ĝangalo estas kiom ajn tenebra.

La oldaj veteranoj el la muloj kompreneble tre frue alvenas mem en la kampadejo, ĉar ili scias, ke maizo atendas ilin. Nur unufoje en tago la bestoj ricevas maizon. Maizo estas la rostaĵo por la muloj kaj ĉevaloj. Kaj tiu, kiu frumatene ne ĉeestas ĝustatempe, ricevas neniun maizon aŭ devas kontentiĝi per tio, kion la *arrieros* povis savi por ili antaŭ la rapide laborantaj buŝoj de la ĝustatempaj bestoj.

Ĉar la vojo ne ĉiam troviĝas en la densejo, sed dum longaj distancoj ankaŭ en la ĝangalo, kie arboj kaj arbustoj staras malpli dense, la bestoj nokte vagadas for de la vojo kaj flankeniĝas ofte kilometron kaj eĉ pli profunde en la

ĝangalon. Serĉi tiujn bestojn estas la laboro, kiu matene bezonas plej multe da tempo kaj sufiĉe ofte estas la kaŭzo, ke kelkaj mulpelistoj devas formarŝi sen matenmanĝo kaj tiutage devas atendi pri la unua manĝo ĝis vespere en la nova kampadejo.

La *cabbaleros* rampis tremetante pro frosto el sub la tegmentoduono. Siajn kovrilojn ili volvis firme ĉirkaŭ sin kaj tiris ilin supren ĝis trans la nazojn. Je la frua mateno estas diable fride en la tropika ĝangalo. Ĉar la korpo tute adaptiĝas al la tropika varmego, oni sentas tiun matenan friskon eĉ pli.

La *cabbaleros* ne rektiĝis por ne perdi ion de la nokta varmo. Ili iris kliniĝinte al la hela fajro.

La kafo estis jam preta. Avide ŝmacante, ili sorbis la kafon kun gruntanta gargaro, kiu malkaŝis ilian bonfarton. Ili ĉirkaŭtenis firme la emajlotasojn por varmigi la manojn.

Tiam ili formetis la tasojn, gratadis sin je la tuta korpo, ruktis, oscedis, sputis salivon, sakris, forĵuris sian animon, streĉis kaj malstreĉis siajn membrojn, skrapis sin per ĉiuj fingraj ungoj en la hararo, frotadis la kreskantan barbon kun la fingro-artikoj, denove ruktis kaj sputis salivon kaj sakris kaj poste fine etendiĝis kaj streĉis sian korpon.

Post tio alvenis iliaj servistoj kun duonigitaj fruktŝeloj

plenigitaj per freŝa akvo. La servistoj verŝis al siaj mastroj la akvon sur la manojn. La *cabbaleros* frotadis ilin, elviŝis per la malsekaj manoj la okulojn kaj deskuis poste la akvon de la manoj. Tiam ili sekigis ilin je la mantuko, kiun ĉiu *cabbalero* dum la nokto havis ĉirkaŭ sia kapo por malhelpi, ke la insektoj rampu en la orelojn kaj en la kolon, kaj por malhelpi, ke la moskitoj ŝiru la karnon de la vizaĝo.

La viroj ankoraŭfoje alportis akvon kaj la *caballeros* longe kaj detale gargaris kaj lavis la buŝon.

Intertempe jam validis la tagordonoj por la kampadejo, dum la viroj ĉe la bivakfajro rostis rizon, varmigis fabojn, kuiris freŝan kafon, malfermis sardinskatoletojn kaj kvazaŭ fiŝkaptis la pecetigitajn *totopostles* el la tolosako.

La kampadejo estis jam preta por la ekmarŝo.

Ĉe la bestoj la *arrieros* sakris kaj forĵuris sian animon, ĉar la bestoj ne pacience staris kaj ne volis akcepti trankvile sian ŝarĝadon.

Jen denove forkuris besto, kiun oni jam kondukis tien, alia besto jam ŝarĝita sternis sin rapide kaj provis deĵeti

la ŝarĝon, kelkaj el ili jam ekmarŝis sen ordono. Jen disiriĝis rimeno, jen trarompiĝis ŝnuro kaj la ŝarĝo deglitis, krome mulisto dekfoje kriĉe kriis al viro, ke li estas *cabrón* kaj filo de putino, ĉar li transdonis la malĝustan maŝon, per kio tordiĝis la ordigitaj ŝnuroj de la ŝnurtiriloj tiel, ke la ŝarĝo ne firmtireblis.

Oni certe ne devas esti sperta ĝangala migranto por aserti kun certo, ke dum tiu ekmarŝo neniu jaguaro estis en la ĉirkaŭo de kvin kilometroj kaj ankaŭ ne proksimiĝus, se tie troviĝus meze de la kampadejo ĵus buĉita antilopo.

Rimarkoj
cabrón = fikulo, merdulo, virkapro, idioto ks.
cabrones = fikuloj, virkaproj ktp.

04

Celso, Andreo kaj la aliaj viroj de tiu marŝkunularo ligis per ŝnuroj siajn pakaĵojn.

Paŭlino skrapante estingis la fajron kaj surpikis la restaĵojn de la kenaj torĉoj, kiuj ne tute elbrulis. Li ŝovis la parte jam karbokovritajn lignosplitojn en sian pakaĵon.

La viroj sidadis kaj eltrinkis la lastajn glutojn de sia kafo el la ladokruĉetoj. Tiujn kruĉetojn oni ligis sur la pakaĵon aŭ supre ŝovis en la malferman reton.

Jen oni aŭdis krii *don* Gabriel: „*El Camaron*, diodamnita pigra stinkanta osto, kie vi estas? Venu ĉi tien!“.

Andreo ektimis forte. Li rigardis Celson, kiu sentuŝite sidis sur la tero kaj skuadis la kafon en sia kruĉeto kaj grumblis kvazaŭ por si mem: „Fek', kaj ankoraŭfoje fek', mil diabloj!“

Estis ankoraŭ malhele, sed la mateno rapide proksimiĝis. La ĉirkaŭo kolorigis sin en grizan malklarkonturan bluon.

Andreo sufiĉe bone povis vidi la vizaĝon de Celso. Li

miris, ke Celso restis tiel indiferenta.

Poste Celso konstatis, ke Andreo atente rigardis lin.

„He, bovpelisto, kial vi gapas min tiom?“ li diris fihumure, „ĉu mi tuj matene boksu pugnon sur vian dentaron? Mi estas ĝuste en la ĝusta humuro por tio. Mi povus sufoki min mem.“

„*Orito, jefe,* cefĉjo, ĉefo“, kriis el certa distanco en la densejo El Camaron, „tuj, tuj, mi ja jam venos, *a sus ordenes*, je via servo.“

„*Bueno*“, vokis *don* Gabriel, „ni forrajdos. Vi transprenos denove la voston, tiel, kiel kutime, kaj eknombros de tie ĉi, por ke neniu manku.“

„*Muy bien, jefe*, tre bone, ĉefo“, respondis El Camaron.

Sed nun Celso rigardis Andreon. Ĉe tio li leviĝis, prenis sian pakaĵon kaj diris: „Ek, venu, Andreĉjo. Ni estas en la unua trupo.“

Kiam ili marŝis certan tempon unu apud la alia, diris Celso: „Kion vi do pensis, *manito*, frateto?“ Li rikanis. „Mi scias tute precize, kion vi pensis. Mi ne estas vane

aŭguristo kaj astrologo. Sed vi pensis malĝuste. Notu, se vi aŭ iu alia povas pensi ion al si, jen okazas tute nenio. Nur tiukaze, se vi pensas tute nenion kaj tute nenion vidas, jen eble la sorto laboros. Cetere, mi observis vin hieraŭ, kiam vi vidis min tie preterhasti. Mi persekutis *pescuintle*-on. Viando refoje bonfartigus nin. Kaj ankoraŭ ion aldonan, filo mia, ni ankoraŭ ne estas ĉe la lago Santa Clara. Estas ankoraŭ du tagvojaĝoj ĝis tie. Dum du tagvojaĝoj ĝangale povos okazi ankoraŭ multaj aferoj. Se vi ankoraŭfoje postgapos min, ĝuste tiam, kiam mi ĉasos *pescuintle*-on, jen vi tamen ankoraŭ sentos mian pugnon sur via nazo. Pro bona amikeco. Kaj nun lasu min sola. Mi devas pripensi multon. La *vereda*, la pado nun ankaŭ fariĝos tro malvasta, por ke ni povu marŝi unu apud la alia.“

Rimarkoj
manito = frateto
apudaj landoj
vereda = pado

05

Je tiu tago la karavano atingis la *paraje* Busija.

La rivero Busija estis pli larĝa ol la rivero Santo-Domingo, sed li transireblis tiel facile, ke la transiro estis kiel promeno. La grundo konsistis el ŝtonoj kaj kruda sablo. La bestoj devis atenti nur pri tio, ke ili ne stumblu pro la ŝtonoj aŭ firmkroĉiĝu kun siaj hufoj inter ili. Sed la akvo estis klara kiel aero, kaj la bestoj povis vidi, kien ili paŝas.

Sur la transa flanko de la rivero troviĝis sufiĉe granda loko por kampadejo.

La rivero havis flankan branĉon. Tiu brako elkreskiĝis al duono de cirklo kaj unuiĝis post ĉirkaŭ kvindek paŝoj denove kun la rivero. Tiel formiĝis insulo. Malgrandaj karavanoj, kiuj marŝis al la monterioj, kampadis sur la insulo.

Sed por granda karavano ne estis sufiĉe da loko sur la insulo. Tial restadis tie nur la *caballeros* kaj ties servistoj.

Estis unu el la plej belaj kampadejoj. Sed nokte torente

verŝiĝis pluvo, kiu devigis la peonojn meze de la nokto konstrui al si kelkajn provizorajn protektajn unuflankajn tegmentojn. Tiuj tegmentduonoj ne eltenis multon; sed ili donis al la peonoj almenaŭ la senton, ke ili sen tiaj tegmentoj fariĝus eĉ pli malsekaj. Sed ĉe la unua matena krepusko montriĝis, ke tio estis eraro, ĉar la peonoj tute malsekiĝis kaj neniel eblis, ke ili povu fariĝi eĉ pli malsekaj, eĉ se ili estus dormintaj dum la tuta nokto meze de la rivero.

Celso je tiu vespero ne ĉasis sovaĝan kuniklon. Li diris, ke estus sensence tie perdi sian tempon pro tio, ĉar tie ne estas *pescuintles*. Sed en la nokto li vagadis kiel la ceteraj en la ĝangalo por serĉi palmfoliojn kaj branĉojn por konstrui unuflankan tegmenton.

Estis nun la tempo de la leviĝanta Luno. La vesperoj iom pliheliĝis per tio. Ili ŝajne fariĝis pli afablaj, la ĝangalo ricevis alian lumon kaj komence de la nokto ne plu aspektis tiom timige minaca.

Kiam la viroj vespere kaŭris ĉe la manĝado, diris Celso: „Ĉi tie proksime iam estis monterio. Tiu nun kompreneble estas morta. Ĝi ne havis longan spiron.

Kompreneble tio ne estis plenvalora kaj bone elkreskiĝinta monterio. Estis ĝuste nur tia monterio, kian eble ricevas infanetoj por ludi kun ĝi, por ke ili ne kriadu.“

Andreo ĉirkaŭrigardis: „Sed oni ja tute ne plu vidas ion de la monterio.“

Paŭlino ridis: „Jen la pruvo, ke vi estas novulo. De monterio oni neniam vidas multon.Vi povas esti meze de monterio kaj eĉ ne rimarkas tion.“

Santiago diris: „ Ankaŭ mi ne vidas plu mahagonon, mahagonarbon.“

„Se monterio estis proksime, kiel vi vidu tiukaze ankoraŭ *caobo*-n, mahagonon?“ respondis Celso. „Sen bananarbo neniujn bananojn kaj sen *caobo* neniun mahagonon. Ĉiuj mahagonarboj estas forhakitaj, kaj tio estas la kaŭzo, kial vi ne plu vidas iujn. La kompanioj ĉiuj havas koncesion kun la kondiĉo, ke ili devas planti por ĉiu forhakita mahagonarbo tri junajn mahagonarbetojn, por ke la arbo ne estu ekstermita. Tion ili devas fari, aŭ oni forprenas la koncesion de ili, kaj ili devas pagi punmonon. Ĉu vi vidas ĉi tie eble eĉ nur unu junan mahagonarbeton? Nombru

ilin. Eĉ ne unu videblas. La kompanioj elrabas ĉion, kaj ili eĉ ne postlasas sekan mahagonbastonon, kaj poste ili formigras. Tion ili faras. Kaj la mahagono estas tiel bone la natura riĉo de la indiĝenoj, kiel la karbo estas la natura riĉo de la blankuloj.“

„Oni parolas nun jam dum la tuta kara longa marŝo ĉiam pri mahagono. Pri *caobo* matene, tagmeze kaj vespere. Pri mahagono kaj pri nenio alia krom mahagono“, diris Andreo. „Mi volus vidi nun finfine aŭtentikan mahagonon, per propraj okuloj.“

„Vi estus devinta malfermi la okulojn, frateto“, opiniis Paŭlino. „En la lasta setlejo, ĉiuj pordoj en la kabanoj, ĉiuj benkoj, ĉiuj krudaj seĝoj kaj bakotabuloj, kiujn vi vidis, ĉio estas pura peza *caobo*. Vi devas rigardi la mondon, se vi volas lerni ion.“

„Mi povus ja serĉi por vi belan arbon“, diris Celso. „Pli profunde en la ĝangalo certe ankoraŭ postrestis kelkaj sveltaj junaj arbetoj. Sed vi vidos ankoraŭ sufiĉe da ili. Vi vidos ankoraŭ tiom da ili, ke vi kraĉos libervole sangon, de antaŭe kaj malantaŭe kaj el ĉiuj truoj kaj brankoj, se vi nur aŭdos tremsoni: '*A donde quede hoy, tu jornal,*

cabrón? Kie estas via taga normo hodiaŭ, putinido?' Andreo, ne estu tro rapidema, la *caobo* ja ne forkuros de vi.“

Ankaŭ Paŭlino, same tiel kiel Celso sperta mahagonlaboristo, volis montri, ke li scias kunparoli. Li diris: „Tuj post la lago *Santa Clara* komenciĝas la granda regno de l' *caobo*. Tie, kie ni estas nun, tio estas ĝuste nur malgranda elsputita loketo. Ĉi tie infere harditaj uloj tiaj kiaj ni, tute ne komencas preni eĉ nur maĉeton en manon, multe malpli hakilon. Kion diras vi, Celso?“

„Tute ĝuste“, rediris Celso, „sed ni ja nun tamen devos preni unue nian maĉeton en manon por konstrui *casitas*.“ Komenciĝas pluvi, la pluvo aspektas tiel dense, ke certe ses horojn seninterrompe pluvos. La lunarketon, kiun ni havis, la pluvo jam delonge forlavis. Mi tamen antaŭ ĉio nun sternos min kaj atendos, ĉu vere pluvos kvazaŭ el siteloj.“

„Morgaŭ vespere ni estos je la lago *Santa Clara*“, diris Paŭlino. „Tie pluvas ĉiam tre plezure“.

„Sed de tempo al tempo tie estas la plej bela brilo de Suno“, diris Celso, volviĝis en sian kovrilon kaj kunruliĝis

por la dormo.

06

Matene la pluvo maldensiĝis. Sed furiozaj pezaj dikaj nuboj preterhastis ĉiele. Kaj ĉirkaŭe estis tiel nigre, ke la *arrieros* bezonis la duoblan tempon por surŝarĝi ĉion. La pakaĵoj estis bone kunligitaj en petatoj, kiuj estas tre akvorezistaj. Sed ili kuŝis en ŝlimo. Ĉiuj ŝnuregoj kaj rimenoj estis malsekaj kaj kuntireblis ne facile. Dum la marŝo sub la ardanta Suno ili sekiĝis, fariĝis malstreĉitaj kaj la pakaĵoj falis sub la piedojn de la bestoj kaj denove ŝarĝendis.

Celso trinkis sian kafon kaj kirladis la fabojn. La aliaj viroj de lia bivakfajro elvringis siajn pantalonojn kaj siajn kovrilojn kaj tenis ilin proksime de la fajro. Ĉirkaŭ la fajro staris la kruĉetoj kaj la potetoj por la matenmanĝo.

Jen oni aŭdis krii de la insulo, kie kampadis la *caballeros, don G*abrielon: „*Ahooouahooo*, El Camaron, virkapra fikulo, kie vi jam denove fikadas? He, alvenu, mizera osto de *dormilón!* Dormema rato. He, El Camaron.“

„Tiu foriris serĉi sian *caballon*, sian ĉevalon,

*patroncito“,*diris unu el la viroj, kiu kirladis la rizon en la pato por la *caballeros*.

„Tio estas tiel, *patrono*“ diris alia viro, „preskaŭ ĉiumatene li devas serĉi sian ĉevalon. Ĝi ne restadas proksime.“

„Li firmligu ĝin, se li ne povas eduki ĝin pli bone“, malvoleme rediris *don*Gabriel, dum li lavis siajn manojn kaj okulojn.

Post tridek minutoj *don* Gabriel vokis denove *don* Camaronon: „Je ĉiuj diabloj kaj inferoj, kie do estas la ulo? He, vi, Chicharon“, li alparolis viron, kiu venis proksimen, „ekmarŝu, rigardu foje, kie sin kaŝas El Camaron.“

La karavano estis marŝpreta.

„Kaj kion vi do volas de El Camaron?“ demandis *don* Alban, „li ja posttrotos. Li ja scias, ke li devas rajdi je la vosto. La fripono ja ne perdiĝos.“

„Pri tio ne temas“, diris *don* Gabriel, „sed li havas la marŝliston por la nombrado de la viroj.“

Don Ramon, kiu ne ŝatis ekscitiĝi nenecese, kaj kiu, ĉar li ja sciis, ke li estas la reĝo de la tuto, translasis la kutiman komandadon al la subgvidistoj, diris: „Nu jes, don Gabriel, jen vi do transprenu la voston kaj kalkulu ilin tiel bone, kiel vi povas. Ja ne mankos iu. Kiu ne mankis ĝis ĉi tie, de nun ne mankos plu. La retrovojo fariĝis tro longa."

„*Bueno"*, respondis don Gabriel, „mi transprenos la voston, la *cola*. Mi prefere rajdas antaŭe aŭ en la mezo, sed bone, iu ja devos transpreni la voston."

Don Ramon fajfis la signalon por la ekmarŝo.

Kiam la vipoj knalis kaj la arrieros sakris, ĉar la bestoj sinkis en la ŝlimon kaj nur malvoleme ekmarŝis, alkuris Chicharon, la indiĝena servisto, kiun don Gabriel sendis serĉi.

Li alvenis tiel rapide kiel ĉasato, kvazaŭ ĉiuj flamoj de la infero persekutus lin. Kiam li estis jam proksime, li ne povis eligi eĉ nur vorton. Li glutis kaj anhelis kaj montris per la brako al la direkto, el kiu li venis.

„Parolu do, ĉe la diablo", diris don Ramon,.aŭ mi tanos al vi la felon."

„El Camaron estas morta, jen transe, en la densejo, ĉe la deklivo, li estas surlancigita.“

„Ĉu surlancigite?“ vokis ĉiuj *caballeros*.

„Jes surlancigite“, ripetis la viro, „Purisima, Santísima, savu kaj elaĉetu min.“

„Fermu la buŝaĉon pri via aĉa plorsingultado“, diris don Gabriel. „Ek, venu, ni rigardu, kie li estas. Ĉu vi freneziĝis? Surlancigite? Kvazaŭ oni tion jam iam aŭdis. Vamos, sinjoroj, ni ekiru kaj konvinkiĝu mem.“

Jen vokis arriero: „*Perdoneme*, pardonu, *don* Ramon, kion faru do ni? La bestaĉoj ne plu volas stari. Ili forkuros. Ĉiuj estas jam ŝarĝitaj. Ni ja ne jam denove povos deŝarĝi ilin.“

„Ek, do, vi ekmarŝu kun la bestoj. Ni postvenos.“ *Don* Ramon fajfis pluan fojon kaj la karavano ekmarŝis.

„Bueno, jefe“, diris la *arriero, „hasta luego,* ĝis pli poste. Li knale dancigis la vipon sur la postaĵoj de la bestoj, kiuj estis proksimaj al li. Kaj tial ili postsekvis haste al la pinte marŝantaj.

Don Alban vokis al grupo de viroj: „ He, vi ĉiuj tie, vi venu kun ni. Eble estos io por fari.“

Tiu komisio ne celis la grupon, en kiu estis Andreo.

Celso tuj diris, kiam Chicharon kriante alkuris: „Ne proksimiĝu tro, jen atendos vin nur kromlaboro. Ne ŝoviĝu antaŭen. Pli poste vi povos labori ankoraŭ sufiĉe multe.“ Li rapidis atingi kun sia trupo la unuajn ekmarŝintajn bestojn.

„Sed mi ja volas vidi, kio okazis al *don* Camaron“, diris Paŭlino.

„Kial koncernu la pisulo vin?“ opiniis Celso. „Ja lasu mortaĉi lin. Ĉu li eble estas via frato?“

„Preferere la onklon de Satano kiel fraton“, respondis Paŭlino.

„Tiukaze iru vian vojon kaj fajfu kanteton al vi“, diris Celso, adaptiĝante al la marŝpaŝado. „Se la ovosuĉulo mortaĉis, des pli bone estas por vi, jen skurĝulo malpli. Kaj kia!“

Tiel ili ekmarŝis kaj ne disipis plorojn.

Rimarkoj

caballo = ĉevalo

c*ola* = finparto

dormilón = longdormulo

petato = fragmita mato

Purisima Santísima = Senmakula Sanktulino, Sankta Virgulino

La *caballeros* devis postlasi siajn ĉevalojn kaj iri piede. Chicharon kondukis ilin ĉirkaŭ tricent paŝojn en la ĝangalon.

Jen ili trovis la mortan El Camaron kuŝantan surtere. Chicharon vidis bone. La alpelisto estis surpikita surtere. En unu el la manoj li tenis la lazon, kun kiu li kaptis sian ĉevalon. La lazo estis firme volvita ĉirkaŭ lia manartiko, tiel, ke li ne povis liberigi sin de ĝi, kiom ajn la ĉevalo eble tiris ĝin.

La okuloj estis malfermaj kaj vitraj. En la vizaĝo li montris teruriĝon, kvazaŭ li tre timis pri io en la lasta momento.

Don Ramon, al la viroj, kiuj sekvis ilin, ordonis, ke ili levu la korpon de *don* Camaron.

Necesis tiri la korpon tien kaj tien, por ke ĝi leveblu. Ĉar la korpo tre firme fiksiĝis en kvazaŭlanco.

La *caballeros* esploris la lancoforman stangeton.

Don Ramon diris: „Malofta kazo de akcidento. Sed io tia povas okazi. Kiel knabo mi vidis iam ion, kio estis simila al tio. Estas tute nature.“

La lanco estis svelta trunketo de juna arbo el tre dura ligno. La viroj, kiuj serĉis trunketojn por la protektaj tegementoj forhakis tiajn trunketojn per unu bato de maĉeto. La bato okazis ne de la flanko, sed forte de supre al malsupre. Tiel la trunketo ĉirkaŭ kvardek centimetrojn super la radiko postlasis longan oblikvan tranĉon. Tiu tranĉo estis tiom forta kiel la finaĵo de rondigita glavo. Kiu ĉirkaŭtrotas la ĝangalon en la malhelo de la nokto aŭ frue matene, kiu tial stumblas kaj falas rapide, kaj je sia malfeliĉo ĵetiĝas senkonscie sur tian tranĉitan durlignan stumpon de trunketo, nesaveble surpikiĝas. Li surpikiĝas des pli malsaveble, se li eble ĵus firmligis per lazo la ĉevalon, kiu ankoraŭ timeme fuĝas pro la neatendita apero de sia kaptanto kaj kiu tial forkuras en la momento de la surĵetado de la maŝo kaj ŝiras per tio la viron tenantan la lazon kun vehementa forto en la dikan pikilon. Ankaŭ alia afero povus okazi en tiu momento: La ĉevalo, ŝirante la lazon, ekscitite kuradis rapide kiel sago plurajn fojon en cirklo kaj trafis la falintan viron surbruste, premante lin per la pezo de la ĉevalkorpo en la

pintigitan ŝtumpon.

Don Alban kraĉis, krucosignis sin kaj diris: „La vidaĵo estas simile tiel kruela kaj terura kiel estis la vidaĵo de la alia fripono. Sinjoroj, pardonu, mi ne povas restadi ĉi tie, fariĝas malfrue. Mi iros al mia ĉevalo, surseliĝos kaj rajdos antaŭen.“

Don Ramon staris dum momento sendecide. Poste li diris: „Ne havas valoron longe staradi ĉi tie. Vekigi lin ni ne plu povos,.glacie frida li estas, li certe estis surpikita jam en la nokto. Terura morto. Kaj kiel li gapas! Li certe jam alvenis en la infero. Mia stomako ekribelas. Kaj tion eĉ tuj post la matenmanĝo.“

Don Gabriel bruligis cigaredon por si kaj opiniis: „Ni skrapu teron sur lin.“

„Kompreneble“, enmiksiĝis la komercisto Gervacio, „kompreneble ni devos enfosigi lin. Ni ja ne povos kunpreni la viron. Post du horoj li ekstinkos. Mi ekiros, sinjoroj. Mi devas restadi ĉe miaj varoj.“

Fariĝis nun jam hela tago.

Don Ramon kolektis ĉiujn siajn fortojn:„Aŭskultu, *don* Gabriel, mi iros al la aliaj, ni ne povos lasi ilin solaj. Se ni ankoraŭ longe pripensados ĉi tie, ni atingos hodiaŭ nur la ripozejon Cafetera. Tie ni ne havus akvon. Nur stinkantan flakon, flavan, ŝliman, plenan de ranoj. Eĉ la muloj ne tuŝos la pestigitan flakon. Ni nepre devos atingi la lagon *Santa Clara*. Jen bonaj puraj fontoj. Mi ekiros, *don* Gabriel. Faru ĉi tie la farendan. *Santísima Madre de Dios, ruege para mi.“* Li krucosignis sin kaj haste kaj stumbladis reen al la pado, kie la viroj atendis kun la ĉevaloj.

„Malplenigu liajn poŝojn“, ordonis *don* Gabriel al la peonoj, kiuj estis tie por helpi ĉe la surskrapado de la mortinto. „Ĉu li havas leterojn aŭ paperojn ĉe si?“

„*Ningun papeles, jefecito,* neniujn paperojn, ĉefĉjo“, respondis Chicharon.

„La nombroliston de la viroj li havas en la selopoŝo“, diris *don* Gabriel.

„Disdividu inter vi tion, kion li havas“, li ordonis poste.

„Sed unue enfosu lin kaj kverelu nur poste.

„Ĉu mi deprenu ankaŭ lian ringon?“ demandis Chicharon.

„Jes, surfingrigu ĝin al vi.“

Chicharon kraĉis sur la fingron de El Camaron kaj pene deturnigis la ringon. Li rigardis ĝin dum certa tempo kaj tuj ŝovis ĝin sur fingron. Ĝi taŭgis nur por meza fingro.

La viroj jam okupiĝis elskrapi kavaĵeton por la korpo.

„Montru foje la ringon, Chicharon“, diris subite *don* Gabriel.

La peono detiris la ringon kaj transdonis ĝin al *don* Gabriel kun seniluziigita gesto.

„Helpu al la *muchachos* ĉe la fosado. Por ke ni ne perdu tiom da tempo ĉi tie“, li komandis.

„Detiru liajn botojn, por ke vi vidu, ĉu li havas paperojn aŭ monon en ĝi.“

„Ni jam kontrolis tion, *jefe*, vokis unu el la viroj. Li havas nenion en ili. Ankaŭ la plandumoj estas rompitaj kaj truigitaj, kaj la ledo diskrevis je la flankaj kunkudroj.

Don Gabriel rigardis la ringon atente. Li spirblovis ĝin, frotante ĝin per ĉemizmaniko, ĝis ĝi estis pura. Li rigardis la grandan ŝtonon detale de interne por vidi, ĉu la ŝtono estas apogita aŭ libera sur la ringo.Tiam li pesis la ringon taksante sur la mano, poste li frotadis ĝin ankoraŭfoje per la maniko kaj gratadis la ŝtonon per sia poŝtranĉilo.

Lastfine li ŝovis la ringon sur unu el siaj fingroj kaj rigardis plaĉe la manon, dum li disetendis la ringohavan fingron kaj turnis la manon al ĉiuj flankoj. Li klakis kontente la langon kaj diris fine ne laŭte: „Nekredeble, kiu estus pensinta tion. Mi volonte volus scii, de kie la bandito havas la ringon.“

Li tiris la ringon de la fingro kaj ŝovis ĝin en poŝon. Post certa tempo li fiŝkaptis ĝin denove kaj plektis ĝin per nodoj en sian koltukon, zorgeme kaj malrapide.

„Ĉu vi pestdifektitaj pigruloj kaj fibuboj, damnitaj de Dio, ankoraŭ nun ne estas pretaj?“ li kriis koleriĝinte kaj tretis tiun peonon, kiu laboris plej proksime de li, per boto postaĵen, tiel, ke la viro transkape falis en la elskrapitan teron. „ Mi helpos surpiediĝi al vi, se vi eble pensas, ke vi povas satdormi ĉi tie. Ek, rapide. Sciu la diablo, kiam ni

reatingos la karavanon.“ Li paŝadis tien kaj tien, bruligis novan cigaredon, palpis je la nodo de sia koltuko, en kiun li plektis la ringon, iris kelkajn paŝojn, returniĝis, proksimiĝis kaj diris: „Ĝi sufiĉe profundas. La sovaĝaj porkoj ja tamen snufos lin, kaj ankaŭ la jaguaroj. Levu ĝin en la kavaĵon kaj fermĵetu ĝin per la tero.“

„Deprenu la koltukon de li“, li tiam diris al unu el la viroj.

„Jen ĝi, *jefe*.“

Don Gabriel disvastigis la koltukon, iom da tempo skuis ĝin, poste li paŝis al la kavaĵo kaj kovris la vizaĝon de la mortinto per la malfermita tuko. Tiam li premis tra la tuko sur la okulglobojn de El Camaron. *Don* Gabriel poste rektiĝis, krucosignis sin kaj diris: „*Purisima Virgencita*, preĝu por ni hodiaŭ kaj ĉiam. Amen.“

Li faris krucosignon sur la morta korpo, kaj tri pliajn sur sia propra vizaĝo kaj kisis la dikfingron de unu el siaj manoj.

Poste li kliniĝis, ĵetis manplenon da tero sur la tersurfacon kaj diris: „Fermĵetu ĝin. He vi, Chicharon, faru kruceton.“

„Tio estas jam preta, *jefecito*“ rediris la indiĝeno.

„*Bueno*, surpiku la krucon supre. Ne tie, *burro*, azeno, je la fino de la kapo. Kaj nun ek do, svingadu viajn gambojn. Kaj vi ĉiuj bone kuntrotu, alikaze mi instruos al vi la rapidan iradon, stinkuloj diodamnitaj.“

Li donis al Chicharon la ĉevalon de El Camaron, por ke li konduku ĝin per la lazo, li iris al sia ĉevalo, sursidiĝis, atendis ĝis ĉiuj viroj surhavis siajn pakaĵojn, lasis ilin pretermarŝi ĉe si, kaj tiam li rajdis post ili, tiel proksime post ili, ke lia ĉevalo preskaŭ tuŝis la lastan viron, tiel, ke la grupeto kvazaŭ ekgalopis.

„Mi fine foje montros al vi, kiel oni marŝu. Eĉ ĝis nun vi ne sciis tion.“

Post du horoj li kun ili atingis la karavanon antaŭ si.

Rimarkoj
b*urro* = azeno
jefecito = ĉefĉjo

Ĉapitro 10

01

Estis iom malpli ol kvardek kilometroj, kiujn la karavano devis marŝi en tiu tago.

Ĉirkaŭ tagmezo ili atingis la riveron Desempeño, kie la karavano restados dum mallonga ripozo. Kiel bastonoj laŭlonge renversiĝis la viroj, kiujn *don* Gabriel foje instruis marŝi. *Don* Ramon vidis tion, proksimiĝis al ili kaj diris: „Se vi tiel sovaĝe kurados plu, vi ne atingos la monterion.“ Li prenis el sia *morral,* el la bastujo, kiun ĉiu meksika rajdisto havas ĉe si kaj en kiu li portas sian tagan porcion, skatoleton da sardenoj, ĵetis ilin al la anhelantaj viroj kaj diris: „Disdividu ilin inter vi kaj ne trinku tiom da akvo, tio ne bonfartigas vin.“

Pli poste li diris al *don* Gabriel: „*Amigo,* unu aferon vi ankoraŭ devos lerni ĉe tiu negoco, kaj kelkon pluan krome. Ne sufiĉas kapti homojn, oni devas ankaŭ transdoni ilin bonstataj kaj bone sanaj en la monterioj, alikaze ili pagos nenion por ili.“

„Tio ne damaĝas al ili, se oni ĉeokaze iom vigligas ilin“, respondis *don* Gabriel, „ili estas kiel kaproj.“

„Pro mi“, rediris *don* Ramon trankvile, „mi volis nur foje diri tion al vi. En mia vivo mi ofte havis kontakton kun laboristoj, mi varbis ankaŭ laboristojn por la arĝentominejoj kaj kuprominejoj en miaj junaj jaroj. Ĉiuj laboristoj, sen escepto, rilate la fortojn ŝarĝeblas nur ĝis certa limo, se temas pri la laborrezultoj kaj pri la volo. Se oni pelas ilin tro trans tiujn limojn, jen okazas du aferoj: aŭ ili fariĝos danĝeraj aŭ ili fariĝos senvaloraj. Ambaŭ aferoj ne bonfartigas nin kaj neniel pliriĉigas nin.“

Don Gabriel kvazaŭ ronronis: „Eble vi pravas, don Ramon, sed pripensu, mi volis liberigi min de la vidaĵo.“

Kiam li diris tion, *don* Alban necerte irante proksimiĝis. „*Señores mios*, mi sentas min terure malagrable. Mi havas la senton kvazaŭ ni ĉi tie en tiu ĉi ĝangalo eterne marŝas tiel, kvazaŭ ni ĉiam nur en cirklo marŝus. Eĉ ne unufoje kun malferma ĉielo super ni. Verdiĝas kaj malheliĝas, verdiĝas kaj malheliĝas. Kaj jen la kvazaŭ krianta varmego kaj la premanta malsekeco. Krome la eternaj flustrado kaj ĉirpado ĉirkaŭe kaj la terura kriado

de la gritones, de kiu oni tage kaj nokte ne povas liberigi sin. Se mi ne baldaŭ vidos domon kaj tablon kaj teleron kaj kelkajn aliajn vizaĝojn antaŭ miaj okuloj, mi pensas, ĉe Santísima, ke mi fariĝos freneza. Ja kial devis pinĉi min la diablo vagadi kun mia komerco en monterion?“

Don Ramon laŭte ekridis, batis lin forte sur la ŝultrojn kaj diris: „Ne parolu pizokaĉon, *don* Alban. Ĉio pasas. Kaj se vi ĉion, kion vi trenadas kun vi, vendos kun centprocenta gajno, vi pensos alie pri la ĝangalo. Por nenio oni ricevas nenion. Oni devas fari ion por havi la rajton enspezi monon. Ne pensu pri tio, fajfu ion dum la marŝo por vi. Ankaŭ ni ne havas edzinon kun ni, tiel kiel vi. Jen la tuta malgaja afero pri vi. Mi kutimiĝis al tio. Kaj nun, sinjoroj, ek, sur la ĉevalojn!“

Li eltiris la fajfilon kaj blovis la ekmarŝan signalon.

Rimarko
gritones = bleksimio

Ĉirkaŭ la kvina posttagmeze la karavano sentis en la aero la unuajn antaŭsignojn de la granda lago. Facila vento ekde la lago portis al ili la odoron de la fragmito, de la mucidaj lagoherboj, de la ŝlimaj kaj marĉaj bordoj supren sur la rokoplenan monton, je kies deklivo la karavano sur kurbiĝoj serpentumis malsupren al la lago. De tempo al tempo oni vidis ekbrili por momento la lagon kaj la malfermejon super la lago tra kelkaj senarbejoj en la ĝangalo.

La pado estis plena de disfalintaj terpecoj kaj ofte ne pli larĝa ol tridek centimetrojn. Sed eĉ, se oni deglitis, nek viro nek ĉevalo povis fali en abismon, ĉar la alta rokeca monto estis dense prikreskata per arboj kaj arbustoj.

La trupoj marŝis en longa linio, viro post viro, besto post besto. Neniu rajtis halti, ĉar tio haltigus la tutan karavanon. Ŝarĝbestoj deglitis, sed sen tio, ke la karavano haltis, la mulpelistoj apogis la bestojn permane kaj oni helpis ilin reiri sur la padon. La bestoj, ekflarante la lagon kaj ties freŝajn paŝtejojn, henis kaj trumpetis tiel, ke la eĥo resonis de la lago. Ju pli ili proksimiĝis la akvon, des

pli rapidaj ili fariĝis. La lastan kvaronhoron ili eĉ rapide trotis, spite al siaj pakaĵoj, spite al siaj vundfrotitaj dorsoj, spite al sia laco.

La aero estis plenigita de la kriado kaj kriĉado de miloj da akvobirdoj, kiuj tie vivis ĉe la lago.

Tamen ŝarĝis la lagon kaj ties bordojn soleco, kiu samtempe aspektis kaj horora kaj animŝokiga.

Proksime de la lago estis grandaj paŝtejoj, al kiuj la bovoj, kiuj laboris en la monterio, estis senditaj post ĉiu tria monato en la feriojn. La peonoj, la indiĝenaj mahagonlaboristoj laboris en la monterioj ĉiun tagon, jaron post jaro, ĝis oni fine skrapis teron sur ilin. Ili ricevis feriojn neniam. La bovoj de la monterioj mortaĉis, se ili ne ofte ricevis feriojn, kaj se oni ne kondukis ilin sur la paŝtejojn ekstere de la monterio. La indiĝenoj ne pereis, ne tiel rapide. Unu parto el la laboristoj estis bovoj; kaj la alia parto estis indiĝenoj. La indiĝenaj laboristoj havis animojn, kiuj iam estos savitaj. Kaj la bestaj laboristoj ne havis animojn, pri kies saviĝo okupiĝas elaĉetonto.

Ĉe la bordo de la lago, kiun la karavano nun atingis, staris domo kun palmtegmento. Sed la domo ne havis murojn. En la domo loĝis la servisto, kiu gardis la bovojn, kiuj estis tie en la ferioj.

Kiam la karavano alvenis, la viro ne ĉeestis. Li devis frekventi ankaŭ aliajn paŝtejojn, kiuj estis malproksimaj tutan tagovojaĝon de tie kaj kiuj troviĝis ĉe aliaj flankoj de la lago.

La kampadejo estis malferma. Oni vidis la liberan ĉielon super si. Post la multaj tagoj kaj la eterne sama verdo de la ĝangalo estis kiel liberigo el sovaĝa inkuba sonĝo, tie povi ripozi.

Sed post tri horoj de ĉeesto komenciĝis la turmento. Turmento, kiu estis tiom granda, ke oni bonvolemis fordoni ĉiujn belaĵojn de la lago, por savi sin de ĝi. Sekve de la bovoj, kiuj tie ĉiam paŝtis, la kampadejo estis plenigita per miliardoj kaj miliardoj de iksodoj. Post horo, ĉiun, kiu tie kampadis, kovris cikatroj tiom sur la korpo kaj la vestoj, ke oni rezignis pri ĉia rezisto kaj lasis

dismordi sin, kie kaj kiel plaĉis al la mastroj de tiu ĉi mondo, al la cikatroj. Per banado en la lago oni ne mortigis la cikatrojn, sed bonfartigis ili same tiom, kiom la banantojn. Sed banado eĉ ne eblis, ĉar la bordoj en vasto de ducent metroj estis marĉaj kaj prikreskataj per fragmito.

La akvo por la karavano ne estis prenita el la lago, sed el du fontoj, kiuj fontis proksime ĉe la lago ĉe la piedo de la roka monto.

Vespere ĉe la frajro diris Celso al Andreo, kiam ambaŭ estis solaj: „Mi aŭguris, ke El Camaron havos akcidenton ĉi tie ĉe la roko. Sed la sorto volis ĝin alie. La sorton oni ne juĝu. Kaj oni ne provu fari ion pli bone ol la sorto mem celas tion.“

„Ĉu vi aŭdis“, demandis Andreo, „kion la viroj, kiuj enfosis lin, rakontis pri tio, kiel okazis la akcidento?“

„Se mi volus aŭskulti tian babilaĉon, mi ja ne plu pensus propran penson“, rediris Celso. „Kaj entute kaj tiel plu, kial koncernu min la rabisto? Li kaj El Zorro ĉiukaze ne plu kaptos indiĝenon kaj forŝtelos lin de lia edzino kaj de lia ĝojo pri la vivo. Mi nur elkraĉas, se mi pensas pri tiuj

du idoj de putino.“

La marŝo je la sekva tago iris tra densa ĝangalo, kiu laŭ karaktero tute deflankiĝis de la ĝangalo, kiun ili renkontis en la lastaj tagoj.

La vojo fariĝis eĉ ne unufoje firma aŭ sabla aŭ ŝtona. Estis ŝlimo kaj marĉo sen ĉeso kaj sen la plej eta ŝanĝo.

Celso, apud kiu Andreo marŝis, diris: „Filo mia, nun vi jam povas flari la mahagonon en ĉiuj anguloj kaj anguletoj, eĉ se vi ne vidas arbon. Sed nun la regno de l' *caoba* efektive komenciĝis. Hodiaŭ vespere vi vidos la unuajn postrestaĵojn de malkonstruita granda monterio. Kaj ankoraŭ multon alian, kio pensigos vin, se vi ankoraŭ ne mallernis pensi.“

La plantomondo mem fariĝis alia. La ŝanĝo estis tiom okulfrapa, ke ĝi frapis ne nur la indiĝenojn, kiuj migris tie je unua fojo, sed eĉ la komercistojn, kiuj kutime ne interesiĝas pri plantoj kaj arboj, kiujn ili vidas dum siaj vojaĝoj. Arbo estas arbo por ili, kaj arbusto arbusto. Ĉu estas ebona arbo aŭ kaŝtanarbo aŭ oranĝujo aŭ kverko, tio estas tute indiferenta al ili. Tiom longe, kiom la arboj

ne volas aĉeti ion de ili, ili ne havas intereson je ties aspekto aŭ valoro.

La rajdobestoj kaj la ŝarĝmuloj profunde glitis kaj sinkis post ĉiu paŝo en la molan teron. Ili palpadis sian vojon antaŭen, ĉiam serĉante la plej sekajn lokojn, kie ili povas firme surmeti siajn piedojn.

En tiuj regionoj ĉiam estis pluvotempo. Se oni demandis spertan kontraktiston de monterio, kiam komenciĝas tie la pluvotempo kaj kiam la seka tempo, li respondis sen tordi la vizaĝon: „Jes ja, *señores*, la pluvotempo komenciĝas ĉi tie ĉirkaŭ je la dekkvina de junio.“ Tiam sekvis la neevitebla dua demando: „Kaj kiam finiĝas ĉi tie la pluvotempo?“ Kaj la demando estis same tiel senemocia: „Je la dekkvara de junio.“

Tio estis prava. Eĉ, se ne pluvis, matene kuŝis tiom peza roso sur la ĝangalo, ke tiam, se oni tie rajdis aŭ marŝis, oni estis ĉiufoje ĝis tagmeze malseka ĝis la haŭto pro la malsupren falantaj gutoj de arboj kaj arbustoj. Je la unua horo posttagmeze oni komencis fariĝi seka, kaj je la dua posttagmeze komenciĝis la tropika pluvo, seninterrompe dum kvar aŭ ok horoj .Tial ne estis miraklo, ke la vojo tie

estis tia, kia plugita terpoma agro post seninterrompa pluvo dum ses semajnoj.

Kien ajn oni rigardis, kreskis ventumilopalmoj kaj staŭdopalmoj. La palmaj ventumiloj kreskegis el la palmoj, tuj rekte ekde la radiko. Tial tiuj palmoj ne havis trunkon, sed ĉar palmventumiloj ne kreskis supre sur la trunko, sed tuj ekde la tero, tial fariĝis la ĝangalo tiel densa, ke oni povis diri tute rajtigite, ke oni ne vidas la ĝangalon pro tiom da palmoj.

Estis sovaĝa, reviga pelmelo de plantoj de la pramondo. La palmaj ventumiloj estis de tempo al tempo ĝis tridek metrojn altaj. Kaj la filikoj same tiom altaj.La teron apud la pado oni ne povis vidi, tiel dense ĝi estis prikreskata, tiel kaose interplektita kaj konfuzmiksita. Oni sentis en la animo kaj la humuro la senkompatan batalon, kiun la plantoj reciproke havas, por gajni pecon da loko, kiu havas la grandon de fingra ungo. La batalo de la homoj pri siaj vivekzistoj ne povas esti pli brutala kaj pli senrespekta ol la batalo de la tieaj plantoj. Kaj tamen: Ĉio kreskis kaj abundege kreskis kaj elspiris nehaltigeblajn torentojn de riĉa vivoforto, kiu lasis sin venki kaj subigi per nenio.

Jen la tero, kiu naskigas kaj kreskigas mahagonon ĝis plena belo kaj forto. Tiel bela kaj plensuka kaj fere dura povas fariĝi altvalora lignospeco nur tiukaze kaj tie, kie ĝi devas batali pri sia ekzisto kaj vivtenado tiom streĉe kaj tiom senkompateme kiel tie.

Kiu estas naskita tie, kiu plenkreskiĝis kaj transvivis tie, estis de nobla deveno. Molan kaj heziteman oni premis en la ŝlimon kaj ili putriĝis, ili devis ĝoji pri tio, ke ili estas almenaŭ la sterko por la pli bela, pli forta kaj pli nobla.

„Rigardu ĉirkaŭ vin, filo mia“, diris Celso al Andreo, kiu migris kvazaŭ kiel revulo tra tiu sorĉa mondo, kiun li eksentis tiel nove kaj tiel tute ne atendite. „Rigardu ĉirkaŭ vin, tion mi diras al vi. Ĉi tie komenciĝas la granda sovaĝa regno de l'*caobo*. Kaj nun, eble je la unua fojo vi ekkomprenos, kial oni ne simple rikoltas mahagonon sur la kampo de bieno. Ankaŭ mi ja plantis kafon en Soconusco. Ankaŭ en speco de *selva*, en ĝangalo. Sed pripensu, kafon oni plantas kvazaŭ tiel kiel en ĝardeno. Tiom da diferencoj tiukaze ne estas. Sed jen mahagonarbo! Amiko, knabo mia, tio estas ja io tute alia. Kaj nun, kredu tion aŭ ne. Mil diabloj, de kiam mi denove estas ĉi tie kaj flaras mahagonon, mi efektive pensas, kaj

Santísima perfortu min pro tio – ja mi vere supozas – ke mi ne plu povus vivi aliloke. Mi preskaŭ pensas, ke mi havas hejmsopiron pri la *caobo,* fulmotondro, kian fabokaĉon mi parolas ĉi tie! Sed vi povas akcepti tion aŭ ne, mi preskaŭ pensas, ke mi mem jam fariĝis peco el mahagono. Kaj jen, kial mi havas hejmsopiron pri la *caobo*. Mi komencas bonfarti, kaj mi povus, sciu la diablo pro kio, ĉirkaŭbraki kaj kisi mahagonarbon, eĉ se vi eble pensas, ke mi fariĝis freneza pro la ardo kaj la sensenca marŝado. Estas ja tamen ĉio fekaĵo kaj en merdo. Edzino kaj dekkvin infanoj kaj kokinoj kaj porkoj kaj troti al la foirplaco. Ankaŭ tio povas fariĝi naŭziga. Mi estas koruptita kaj apartenas ĉi tien. Gardu vin, Andreĉjo, ke tio ne iutage ne same okazos al vi. Tiukaze fariĝos neniam io el vi kaj el via, he, kiel estis ŝia nomo, via Estrellita, via stelulino.“

Rimarkoj
caoba = mahagono
Estrellita = stelulino
Sa*ntísima* = *Sankta Virgulino*
selva = praarbaro, sovaĝejo, ĝangalo

05

Tio iris tiel dum horoj. Estis kvazaŭ komenciĝis tute nova mondo kaj kvazaŭ la malnova konata mondo tute perdiĝis. Nova mondo malfermiĝis, kaj tiu mondo estis nur maldisplektebla amaso da plantoj. Oni perdis la kapablon distingi unuopajn plantojn. Estis ĉie nur verdaĵo, densaĵo, konfuzo, oraj sunviretoj, kiuj saltetis sur la palmfolioj kaj branĉoj. Estis kvazaŭ troviĝus super tiu mondo el kompaktaj plantoj seksarda krio, kiu ankoraŭ en la sama sekundo eksplodus kaj naskus novan mondon, fantastan mondon, en kiu regas nek la homoj nek la bestoj, sed plantoj. Tia krio estus kiel elaĉeto el nedifinita kaj neklarigita premo sur la animon. Oni sentis sin forlasita kaj soleca, disigita de ĉiuj ceteraj mondoj, kvazaŭ la vicoj de la peonoj kaj la murmuraj ŝarĝbestoj marŝus kiel maŝinoj antaŭen. La marŝantoj, homoj kaj bestoj aspektis kvazaŭ ili marŝus al tiu mondo de kompaktaj plantoj sen propra volo, por ke tiu mondo glutu ilin.

Kaj tiumomente Andreo ekkriis: „*Dios mio*, dio mia, kio estas – sed tio estas ja…“, per unu fojo li haltis kaj lasis fali la pakaĵon.

„Kio estas tio?“ li demandis kun aŭdebla spiro.

Antaŭ li la ĝangalo subite vaste malfermiĝis. Tiom vaste, ke li plilarĝigis ĉiujn horizontojn mondolonge. Je la piedoj de ambaŭ troviĝis profunde malsupre la torento, la giganta, potenca, sekretoplena torento Ushumacintla. Ĝi estis la dio, sen kies helpo neniu mahagano transporteblus el tiuj regionoj al la civilizita mondo. Estis la dio, kiu estis respondeca por la indiĝenoj, kiujn voris la *caobo*. Sen tiu majesta praarbara torento la mahagono tie estus tiom senvalora kiel putriĝinta bastono en arbaro en Dakoto. Kaj ĉar tiukaze la *caobo* estus senvalora, neniu vendus indiĝenojn, por ke ili laboru en la monterioj.

Spite al ĉio ĉi la vidaĵo de tie estis nekomparebla pro ties vasto kaj majesto, jen alte super la bordoj, de kie eblis rigardi la torenton dum longa distanco.

Estis ankoraŭ frutempe. Apenaŭ pasis du posttagmezaj horoj. Sed tamen eliris la ordono pri ekkampado. De tie komenciĝis la unua distribuo de la varbitaj laboristoj al la diversaj monterioj, kiuj bezonis homojn kaj postulis ilin.

La plej granda trupo marŝis kelkajn tagojn plu en la ĝangalon, plu restante sur la ĉi-tiea flanko de la torento. Pli malgrandajn trupojn oni transportis per kanuoj trans la torenton kaj poste oni kondukis ilin de la transflanka bordo al tiuj monterioj, kiuj tie havis sian reĝlandon.

La filoj de Meksiko, kiuj jam troviĝis sur la transa bordo, venis en fremdan landon sen scii tion. Ili venis en regionon sub la suverenecon de alia ŝtato sen esti demanditaj. La mahagonkompanioj agnoskis nek ŝtatanecojn, nek civitanajn rajtojn nek la rabadon de samlandanoj nek landlimojn. Ili agnoskis nur la potencan regnon de l' *caobo*. Tie, kie regis la mahagono, estis ilia lando, en kiu ili regis kaj kie validis la leĝoj, kiujn ili faris mem, kie ili ekzercis la kriminalan jurisdikcion, kiu plaĉis al ili. Ili tie ne zorgis pri koncesioj kaj ties paragrafoj, ili ne atentis landajn limojn, landajn prezidantojn kaj

diktatorojn. Tio estis ĉio tiom malproksima, tiom senfine malproksima por ili. Ĉio ĉi malaperis, kien ajn. Estis du semajnoj da senkompata marŝo tra profunda ĝangalo post ili. Kiu tie alvenas por serĉi justecon, alvenas tiel ete aŭ malgrande, ke la administranto de la unua monterio, kie li estas gasto, draŝas lin per muŝbatilo sur la nazon, kaj li ne plu ekstaros kaj ne plu scias, kial li venis. Ĉar la *caobo* scias sian valoron kaj sian potencon.

07

La kamaradoj de la trupo de Celso jam kaŭriĝis. Ili provizore ne pensis pri tio ekflamigi bivakfajron. Ili havis ankoraŭ tiom da tempo, la tago estos longa ankoraŭ.

Ili sidis tie, bonfarte kaj kontente pri tio,.ke ili havas trankvilon.

Proksime ĉe la alta bordo de la torento ili kaŭriĝis.

„Kiom bela la torento, estas“, diris Celso, „jam sole tiu validas tion, ke oni iras en la monterion kaj tie putriĝos. Malsupre ĝi havas ĉe kelkaj lokoj mirinde belajn sablajn bordojn. Tie ni certe iam naĝos pli poste.“

„Kiuj kabanoj estas tiuj sur la alia flanko de la torento?“ demandis Andreo.

„Tio estas jam monterio, la administrejaj konstruaĵoj“, klarigis Celso. „La vera monterio estas pli profunde de la ĝangalo.“

Li tiris sian pakaĵon proksimen, elserĉis krudan tabakon kaj rulumis cigaron.

Li iris al bivakfajro, kiun bruligis kelkaj viroj, kaj ekfumis sian cigaron.

Poste li revenis al sia trupo.

Post iom da tempo li diris: „Nu, do, la viroj do alvenis. Ĉi tie komenciĝas la batalkampo. Ankaŭ ĉi tie pli antaŭe estis monterio. He…“ ‚li interrompis sin mem, „jen certa afero eniras mian kapon. Ĉu vi volas vidi tion, rekrutoj, novuloj? Kunvenu do.“

Li kondukis ilin iomete laŭ la torento kaj tiam maldekstren en la densejon.

Vasta kampo de montetoj, kaj sur ĝin metitaj krudaj krucetoj, ekmontriĝis antaŭ ili. La kampo estis abunde prikreskata de herboj kaj de densa arbedaĵo. Sed centoj kaj centoj de montetoj kaj krucoj videblis. La krucetoj plejparte estis veterbatitaj kaj disrompitaj, la montetoj plejparte disblovitaj, disĵetitaj kaj elgratitaj.

„Kio estas tio?“ demandis Santiago ektimigite, tio aspektas ja kiel…“ Sed ĉi tie en tiu soleco…, ĉu??“

„Jes, ĉi tie, en tiu soleco, kie iam estis monterio“, diris

Celso sobre, „ĉi tie estas loko, kie la batalfalintoj de tiu monterio havas sian lastan kampadejon. Eniru nur pli profunden en la regnon de l' mahagono, jen vi ekrigardos ankoraŭ tute aliajn aferojn kaj aĵojn, junaj senkulpaj ŝafidoj, kiuj vi estas. Kaj tion mi diras al vi jam nun kaj tuj: „Se vi ne fariĝos kiel la *caobo*, dura kiel ŝtalo kaj kun ruĝa sango, jen ankaŭ vi baldaŭ ripozos sur via lasta kampadejo. Tiu, kiu venas ĉi tien, devas kapabli mordi kaj mordi, aŭ oni glutos lin tiel, kiel grasa rano laman muŝon. Fek! Ek, iru jam kaj lasu la pripensadon. Ne havas sencon cerbumi. Tiuj, kiuj kuŝas tie sub la forblovitaj montetoj ne plu tusas. Sed mi malsatas. Ni kuiru al ni niajn fabojn kun kapsikoj, por ke ni havu ion en la malplena stomako. Ek, kaj vigle saltu. Serĉu lignon por la fajro.“

Ili reiris al la kampadejo kaj flamigis sian fajron.

Rozkoloraj birdoj flugis super ili, rondcirklis kiel vasta arko malsupren al la bordoj de la majesta torento, stilziris sur siaj altaj mincaj kruroj trankvile en la senhaste fluantan akvon kaj komencis fiŝkapti.

FINO

Glosaro

adios = adiaŭ
adivinado = hispane: aŭguristo
adivinador = certe meksika variaĵo, slanga vorto por aŭguristo
adivinador muy malo = tre fia aŭguristo
alcalde = alkaldo, lokestro, urbestro ks.
amiguitos = karaj amikoj
andele = antaŭen
azotes = tradraŝo per skurĝo ktp...

burro = azeno
buenas noches = Bonan nokton

caballero = sinjoro, kavaliro, ĝentlemano, honorindulo
candelaria = Puriĝo de Sankta Virgulino
cabrón = fikulo, merdulo, virkapro, idioto ks.
cabrones = virkaproj, fikuloj (kiel insultvorto)
camino = vojo
caoba = mahagono
capataz = subestro, skipestro, gvidanto de la laborgrupo
caray = fulmotondro
casitas = *dometoj*
chamaquito = bubeto, knabeto
Chamula = loko, centro de la cocilaj maja-indiĝenoj en la federacia meksika ŝtato Ĉiapaso
caoba = mahagono
carpas = tendoj
chinga = hispane chingar = fiki

cocilo = Ttzotzil-ano
cojin = kuseno
comadre = klaĉulino
comiteco = speco de brando, produkita en Comitán, Ĉiapaso
Como estas? = Kiel vi fartas?
compadre = baptopatro, amiko, kunulo, kamarado
compañeros = kunuloj, akompanantoj, kamaradoj
contratista = kontraktisto
copita = glaseto (da brando ktp.)

Ĉiapaso = Chiapas (en la originalo)

de todos modos = en ĉiu kazo
dueño = posedanto
duro = kvin pesoj

el mejor = la pli bona
endogamio = devigo klane geedziĝi
enganchador = varbisto
enganche = kontrakto kun varbitoj
Estrellita = ina nomo, Stelulino

feria = foiro, jarfoiro
fierro = fero (monera mono)
flojos = pigruloj
frijoles = faboj, fazeoloj

garrapatas = iksodoj
gerente = administranto, negoca estro, manaĝero
gracias = dankon

hermanito = frateto
hijito = eta filo, fileto
hombre = homo, viro

jacalito = kabaneto
jefe = ĉefo
jefecito = ĉefĉjo
jinete = rajdisto

kikero = normala speco de pizo
komiteko = (hisp. Comiteco) = speco de brando, produkita en Comitán, Ĉiapaso
korido = balado
koridokantisto = migrantaj popolkantistoj en Meksiko

ladino = mestizo = ido de blankuloj kaj indiĝenoj, en Ĉiapaso uzata specife por kontrasti indiĝenojn kaj ne-indiĝenojn, do ne nur mestizojn, sed ankaŭ blankulojn
lagarto = lacerto
lagunita = lageto
Lleven = Forprenu!

madrugada = matene, ĉe la tagokomenco
majaa lingvo = lingvo de la majaoj en Meksiko
manito = frateto
matricula = kotizo ks.
mayordomo = intendanto, domkortega mastro, administristo, domisto
mi hijos e hijas = miaj gefiloj
m'ijo = filo mia

m'ijito = eta filo mia, fileto mia
milpa = maizejo, kultivita terpeco, sur kiu oni plantas ekz. maizon, fabojn kaj kukurbojn
mozo = servisto, subulo, taglaboristo
muchacha = knabino, ino, junlino
muchachos = knaboj, junuloj, eŭfemisme: servistoj
mujer = edzino, vivkunulino
municipo = loka administrejo

ocote = speco de abio, tielnomata montezuoma abio, kies branĉoj facile estas flamigeblaj pro la entenata rezino
„Ora pro nobis“ = „Petu por ni“, liturgia formulo por alvoko de sanktulo
orito (slange) = señorito = sinjoreto = mastro

palo = bastono
paraje = ripozejo = ripozejo, loko, ejo
patrono = patrono, ĉefo, mastro
patroncito = ĉefĉjo, patroneto
penitenciaria = pundomo
Perdóneme, patroncito= Pardonu, ĉefĉjo
pescuintle = speco de kuniklo, luksa manĝo en Meksiko kaj en najbaraj landoj
petato = fragmita mato
posol aŭ potzol = trinkaĵo el fermentita maizo, komuna en Chiapas.
Purisima Santísima = Senmakula Sanktulino, Sankta Virgulino

que pienses = kion vi pensas

Santísima = Sankta Virgulino
sarape = kovrilo
selva = praarbaro, sovaĝejo, ĝangalo
semanario = kolono
Semana Santa = La indulgenca semajno de Pasko
señor = sinjoro
señora = sinjorino
Sierra Madre del Sur = montara ĉeno en la sudo de Meksiko
stilzbirdo = vadobirdo sur kvazaŭaj paŝstangaj kruroj

tienda = vendejo
tostón = monero de kvindek centavoj
totopostle = granda tortiljo (rostita maizoflano el muelitaj kaj kaĉigitaj maizograjnoj, maizaj kukoj, maizaj panetoj) kun diametro de 35 centimetroj kaj du milimetrojn alta.

una conciencia limpia = pura (bona) konscio

vereda = pado